# ESPERANTA TEKNIKA

# MEDICINA

## VORTARO

[illegible]

[illegible], avenue du Longchamp, Bruxelles
1932

*Imprimerie Médicale*
*et Scientifique, S. A.,*
*rue Botanique,* 34,
*Téléphone* 17.16.49 - *Bruxelles*

# ESPERANTA TEKNIKA
# MEDICINA
# VORTARO


verkita de

**Doktoro BRIQUET**

(de Lille)



Eldonita de

INTERNACIA
MEDICINA REVUO

255, avenue du Longchamp, Bruxelles

1932

Esper. 364 I

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

## ANTAŬPAROLO

*Tiu ĉi vortaro estas reprodukto de mia provo de teknika medicina vortaro eldonita en Internacia Medicina Revuo, sed kompletigita kaj korektita. Kelkaj samideanoj, nome D-ro Babadagly (Odessa), D-ro Blassberg (Krakow), S-ro Boucon (Annecy), D-ro Fels (Lwow), S-ro Weleminsky (Praha-Smichow), S-ro Willcocks (Woodford), kaj aliaj, bonvolis atentigi min pri la preseraroj kaj lingveraroj de la supredirita provo; mi ilin tre sincere dankas; ĉiam mi atentege konsideris la korektaĵojn de ili proponitajn kaj konsentis kun ili kiam ili ŝajnis al mi esti pravaj.*

*Mi ne iluziiĝas pri la kritikoj kiujn meritos mia vortaro; ĝi eble kontentigos nek la ultrafundamentulojn nek la revoluciemajn lingvistojn, sed mi ne pretendas la netuŝeblecon de la vortoj momente de mi elektitaj kaj proponitaj. Ĉiuj lingvoj evoluas, kaj, iom post iom, per uzado, per interkonsento, per pridiskutado, ni akiros sufiĉe bonan teknikan lingvon. Por tion faciligi mi esperas ke multaj samideanoj bonvolos ekzameni, vorto post vorto, mian vortaron kaj sendi al mi siajn proponojn, kritikojn, k.t.p. ; tiamaniere ili laborados por pli bona estonta eldono de la vortaro.*

D-ro Briquet,

Boulevard Montebello, 48, Lille.

# KONSILOJ AL LA KOREKTONTOJ

*La korektaĵoj povas esti tre diversaj:*

*a) Esperantaj vortoj proponataj por anstataŭi la vortojn de la teksto.*

*b) Medicinaj vortoj forgesitaj en la teksto; malgraŭ mia zorgado tre certe multaj vortoj mankas, precipe en kelkaj fakoj; plie, kelkaj dirmanieroj, specialaj al tiu aŭ tiu lando, eble meritus esperantan tradukon.*

*c) Sciigi ke tiu ĉi aŭ tiu vorto ŝajnas nekomprenebla de la korektanto; tiaokaze mi aldonus en la dua eldono mallongan esperantan klarigon.*

*d) Sciigi ke tiu aŭ tiu vorto, esperanta aŭ ne, ŝajnas senutila al la korektanto en teknika medicina vortaro.*

*e) Medicinaj vortoj de la landlingvo de la korektanto, kiujn ŝajnas al li tute necese aldoni, post la esperanta vorto, por pli facila kompreno de liaj samlingvuloj.*

*f) Rektifoj pro ortografiaj malkorektaĵoj k.t.p.*

*Kelkaj vortoj ŝajnas al mi ne sufiĉe bonaj sed mi ilin provizore akceptis ĉar ili estis antaŭe uzataj de kelkaj kolegoj. Aliaj vortoj estas iom riskaj neologismoj. Estas la tasko de diverslingvanoj esprimi opinion; el la renkonto de la ideoj ekaperos la lumo.*

# MALLONGIGOJ

| | | | |
|---|---|---|---|
| *A.* | *anglalingve* | *H.* | *hispanlingve* |
| *F.* | *franclingve* | *I.* | *itallingve* |
| *G.* | *germanlingve* | *L.* | *latinlingve* |

| | | | |
|---|---|---|---|
| ANAT. | Anatomio | ĤEM. | Ĥemio |
| BAKT. | Bakteriologio | ĤIR. | Ĥirurgio |
| BOT. | Botaniko | IL. | Ilaro |
| DER. | Derivita vorto | PAT. | Patologio |
| ELEKT. | Elektrologio | TERAP. | Terapeŭtiko |
| FARM. | Farmacio | TOKOL. | Tokologio |
| FIZIOL. | Fiziologio | | |

| | | | |
|---|---|---|---|
| Ekz. | Ekzemple | t.n. | tiel nomataj |
| Elp. | Elparolu, prononcu | v. | vidu |
| k.k.f. | kelkfoje | Var. | Varioj |
| k.t.p. | kaj tiel plu | v.ĉ.v. | vidu ĉiun vorton |

La streko — anstataŭas la radikon de la vorto; la streketo- nur unuigas du partojn de unu vorto.

# Esperanta Teknika Medicina Vortaro

## A

1 **Aa,** en recepto signifas « po egalaj partoj da ».

2 **Abazio,** nekapablo por norma irado.

3 **Abdomen-o,** ventro ; **—a** pario.

4 **Abdukt-o** (L. *Abductio*) ; **—i** ; longa **—anta** muskolo aŭ **—oro** de la dika fingro.

5 **Aberaci-o,** 1° deflankiĝo : genera —o (F. *Aberration du sens génésique*) ; —o en juĝkapablo; ĥromata —o, t.e. pri la koloroj; 2° (FIZ) disperso de la lumo : sfera —o.

6 **Abiogenezo,** memnaskiĝo, spontanea nasko.

7 **Ablacio,** fortranĉo.

8 **Abort-o** (L. *Abortus*) ; **—a** ; **—i** ; **—igi** ; (G. *Frucht abtreiben*) ; **—iga** ; **—igilo** ; **—igaĵo.**

9 **Abr-o** aŭ Jekirito (BOT.) (L. *Abrus precatorius*) ; **—ino,** toksalbumino de ĝia semo.

10 **Abrotano** (BOT.) (A. *Lemon grass;* F. *Citronnelle*).

11 **Absces-o,** amaso de puso en histoj. VAR: fiksiga, (F. *Abcès de fixation*), malvarma,

metastaza, osta, ostodevena, varma, k.t.p. **—iĝi.**

12 **Absint-o** (BOT.) (L. *Artemisia absinthium*; G. *Wermut*); **—pintaĵoj**; **—aĵo**, **—likvoro**; **—ismo,** venedado per —aĵo.

13 **Abstemi-a**, kiu neniam trinkas vinon, alkoholaĵon; **—o**; **—ulo**.

14 **Abstinenc-o** (L. *Abstinentia*); **—ulo**, vorto ofte uzata anstataŭ « abstemiulo » (v. 13).

15 **Abundeg-a** (L. *Profusus*); **—aj** ŝvitoj.

16 **Acefal-io,** senkapeco; **—o** aŭ **—iulo**, senkapa monstro; **—ocisto** (L. *Acephalocystis*).

17 **Acervulo**, kalkaĵoj en la ĥoroidaj pleksoj, kaj en la pineala korpo.

18 **Acet-a** (aŭ **—ata**) acido; **di**, **tri—a** acido; glacia —a acido; **—ato**, salo el —a acido kaj metalo; amoniak—ato; baza kupr—ato; **—igi**; **—igo**; **—iga**; —iga bakterio (G. *Essigsäurebakterium*); triklor—a acido (L. *Ac. trichloraceticum*); **—amido** aŭ etanamido; **di—urio,** di—a acido en urino.

19 **Acetablo,** artika kavaĵo de la koksosto (L. *Acetabulum*).

20 **Acetalo**, kombinaĵo el alkoholo kaj aldehido.

21 **Acetanilido,** eltiraĵo el anilinacetato (F. *Antifébrine*).

22 **Aceton-o** (L. *Acetonum*); **—emio**, —o en sango; **—urio**; —o en urino; **—aj korpoj** (F. *Corps acétoniques*).

23 **Acid-a** (L. *Acidum;* G. *Sauer*); **—ega** (L. *Cor-*

*rosivus*); —**o**; fumiĝanta —o; —**eco**; reala, jona —eco (simbolo : p. H) ; —**iĝi** ; —**etiĝi**, fariĝi iom acida (F. *Surir*); —**emo** (A. *Tendency to acidity*); —**ozo**, —a saturado de teksaĵoj, ekz : ĉe diabetuloj; **hidr—oj** : bromhidr—o, klorhidr—o, k.t.p. ; —**orezistaj** baciloj ; —**obaza** ekvilibro de la biologiaj medioj.

24 **Acino**, beraroforma korpo (L. *Acinus*).

25 **Adamantino**, denta emajlo.

26 **Adapt-o**, alkonvenigo, akomodo ; —**i** ; —**iĝi** ; —**ilo**, ĝustmetilo (F. *Ajutage*).

27 **Addison**, angla kuracisto ; —**a** malsano (G. *Bronze Krankheit*).

28 **Adeno**, glando ; —**io**, gangliona limfadenio (v. t. v.); —**ito**, inflamo de glando ; **poli—ito** ; —**oflegmono** ; —**oido** (v.t.v.) ; —**omo**, glanda tumoro ; —**opatio**, iu ajn glanda afekcio.

29 **Adenoid-a**, glandosimila ; nazofaringaj —aj vegetaĵoj; —**ulo** ; —**ula** vizaĝo ; —**ito**, inflamo de —aj vegetaĵoj : —**ektomio,** eltranĉo de la diritaj vegetaĵoj.

30 **Adhez-o**, perfekta almetiĝo, algluiĝo ; —**aĵo**, —**a** plastro uzata post operacioj ; —**i** ; —**iĝi**.

31 **Adianto** (BOT.) (L. *Adiantum*, H. *Capillera*).

32 **Adinamio**, senforteco (G. *Schwäche*).

33 **Adip-a**, grasa ; —**o** ; — **ozo**, trograseco ; doloriga —ozo (F. *Maladie de Dercum*); —**omo**, graseca tumoro; —**ociro**, postmorta ĥemia kvazaŭfromaĝa ŝanĝo de la graso.

34 **Adipsio**, sensoifeco.

35 **Adonid-o**, genro de venenaj ranunkolacoj (VAR. : printempa, aŭtuna, k.t.p.) —**ino**, ĝia alkaloido.

36 **Adrenalino** aŭ surrenino, substanco eltirita el surrenaj glandoj.

37 **Adstring-a** (L. *Astringens*); —**eco**.

38 **Adukt-o**, alkonduko (L. *Adductio*); —**i**; longa, mallonga, granda —**oroj** (aŭ —**antaj** muskoloj) de la femuro.

39 **Adulteracio,** aldono al medikamento de senaga aŭ malbonkvalita substanco, falsado.

40 **Adventic-a** (L. *Adventitius*), —a tuniko.

41 **Aer-o**; mallibera, enfermita —o; —**a**; —aj vojo (G. *Luftwege*); —**umi**; —**umo**, ventolado (F. *Aération*, G. *Auslüftung*); —**oforma**. BAKT. : —**obia**, vivkapabla en —o; **an** —**obia**, nevivkapabla en ĝi. PAT.: —**emio**, difektoj kaŭzitaj kiam laboristo trorapide eliras el densigita aero; —**hemoktonio**, morto per —o en sango; —**ofagio**, —**englutado**; —**ofobio**; —**omanka**; —**pleŭro** aŭ pneŭmotorako. TER. : —**oterapio,** terapio per densigita (per premo) aŭ maldensigita aero; —**pleŭroterapio** aŭ kolapsoterapio, terapio per artefarita pneŭmotorako.

42 **Afazi-o**, foriĝo de la parolkapablo, sen paralizo de la lingvaj muskoloj; —**ulo.** VAR. —o kortika (L. *Corticeus*), mova (F. *Logoplégie*), optika, senta (F. *Sensorielle*).

43 **Afekcio**, malsano, malordo.

44. **Aferanta**, alkondukanta.

45 **Afonio**, senvoĉeco.

46 **Afrodizi-o**, eksciteco de la seksorganoj; **—emo**; **—iga**; **an—o** aŭ **mal—o** (A. *Impotence*, F. *Frigidité*, G. *Geschlechtsabneigung*); **an—iga**.

47 **Aft-o** (L. *Aphthae*); **—a** febro.

48 **Agac-o**, malagrabla speciala sento, ĉu en la dentoj pro acidoj, ĉu en la nervoj, k.t.p.; **—i**.

49 **Agalaktio**, manko de lakta sekrecio.

50 **Agarik-o**, speco de fungoj (L. *Agaricus*) **—ino** (F. *Agaricine*).

51 **Agar-o**, aŭ **agaragaro**, gelateno el samnoma algo, medio de kulturo por bakterioj; k.k.f. uzata kiel medikamento.

52 **Agenezio**, denaska manko de norma kresko.

53 **Agitacio**, malsana ekscitiĝo.

54 **Aglutin-i**, kunglui, kunarigi; **—anta**; **—ita**; spora **—ado**; **—ebleco**; **—metodo**; **—ino**.

55 **Ag-o**, efikigo (L. *Actio*); **—i**; medicina **—anto** (F. *Agent médicamenteux*); **tre—a** (L. *Activus*); **re—o** (V.t.v.).

56 **Agoni-o** (L. *Agonia*); **—ulo**; **—i**.

57 **Agorafobio**, spacangoro.

58 **Agrafio**, skribnekapableco.

59 **Agramatismo**, perdo de kapablo gramatikregule paroli.

60 **Agreg-i** (L. *Aggregare*); **—ado**; **—aĵo**; **—ato**, amaso; **—acio**; **—aciulo**, eksterordinara profesoro en Francujo.

61 **Agresinoj**, sekreciaĵoj de kelkaj bakterioj kiuj atakas la ĉelojn.

62 **Agrimonio** (BOT.) (L. *Agrimonia Eupatoria*).

63 **Agropiro** aŭ hundherbo (BOT.) (L. *Agropyrum repens*, A. *Couchgrass*, F. *Chiendent*, H. *Grama*, I. *Gramigna*).

64 **Aĥil-a** tendeno; **—odinio**, doloroj ofte pro inflamo de la serozburso kiu kuŝas sub tiu tendeno.

65 **Aĥolio**, sengaleco, interrompo de la sekrecio de galo.

66 **Aĥondroplazio**, tromallongaj membroj, kun norma trunko, pro maldisvolviĝo de ĥondroj.

67 **Aĥoriono**, fungo de la favo.

68 **Aĥromat-a** (L. *Achromaticus*); **—eco** (A. *Achromatism*); **—ino**, plasmo nekolorigebla de la ĉela kerno; **—ocito**, sangoglobeto perdinta koloron; **—opsio**, nepercepto de ĉiuj aŭ de kelkaj koloroj.

69 **Aĥromio**, haŭtsenkoloreco lokalizata, ofte denaska.

70 **Ajlilo** (ĤEM.) (F. *Allyle*).

71 **Ajl-o** (BOT.) (L. *Allium sativum*, A. *Garlic*, G. *Lauch*, H. *Ajo*); **—a**, **—eca** (L. *Alliaceus*).

72 **Ajnhumo**, trofoneŭrozo, kun spontanea defalo de piedfingro.

73 **Akantomo**, tumoro per trokresko de Malpighi'a tavolo.

74 **Akantoz-o**, densiĝo de ĝermiga haŭta stratumo; nigriga —o (F. *Acanthosis nigricans*); **hiper—o.**

75 **Akardi-o**, kormanko; —**ulo**, senkora feto.

76 **Akar-o**, skabia parazito; —**ozo** (F. *Acariose*) — **ofobio.**

77 **Akatizio**, nerva timemo sidiĝi.

78 **Akcel-i**, plirapidigi; —**o** de materiŝanĝoj (F. *Accélération des échanges*); —**anta** (H. *Acelerador*); **mal—i**, malrapidigi.

79 **Akcesor-a**, flanka, malĉefa, aldona; —aj nervoj spinaj, facaj (F. *Nerfs accessoires de Willis, de Wrisberg*).

80 **Akcident-o**, malfeliĉa okazaĵo; —**a.**

81 **Akinezio**, malfacileco, aŭ neeblo, de movoj.

82 **Akmo**, plej supra punkto de febro, de malsano.

83 **Aknito**, vario de perifoliklito (F. *Acnitis*).

84 **Akne-o**, speciala haŭtmalsano. VAR.: juneca, kaĥeksa, keloida, keratika, komedona, malmoliĝinta (L. *Indurata*), medikamenta (broma, joda), milioforma, nekroziga, papula, punktata, pustula, rozacea, sebeca, senhariga, varioloforma; —**oforma** (F. *Acnéiforme*); —oforma sifilido.

85 **Akno**, butono (v.t.v.).

86 **Akomod-o**, —**eco** (I. *Accommodazione*); —**ilo**, adaptilo, ĝustmetilo (F. *Ajutage*).

87 **Akonio**, sen konio (V.t.v.).

88 **Akonit-o** (BOT.) (L. *Aconitum Napel*, A. *Monkshood*, G. *Eisenhut*); —**ino**, —**a** alkaloido.

89 **Akordiĝ-i**, harmonii; **mal—eco** (L. *Incompatibilitas*).

90 **Akoro** (BOT.) (L. *Acorus calamus*).

91 **Akr-a** (L. *Acutus*, F. *Aigu*); **—eco**; **mal—iĝo** de la vidado (F. *Baisse de la vue*); **mal—igi** doloron.

92 **Akracid-a** (A. *Sour*, F. *Aigre*, G. *Sauer*, H. *Agrio*); **—eta** (F. *Aigrelet*); **—eco**.

93 **Akrocefalulo**, pintkrania homo.

94 **Akrocianozo**, blua koloro de ekstremaĵoj kaŭzita de malbona sangcirkulado.

95 **Akrodinio** (L. *Acrodynia*, A. *Epidemic erythema*).

96 **Akrofobio**, altaĵotimo.

97 **Akromegalio**, malsano de la cerba hipofizo karakterizata de hipertrofio de manoj, piedoj, kranio k.t.p.

98 **Akromelalgio**, nerva malsano kun doloroj en fingroj.

99 **Akromfalo**, parto de umbilika ŝnuro lasita ĉe novnaskito.

100 **Akromi-o**, skapola apofizo; **—a**; **super—a**.

101 **Akroparestezio**, sento de rigidiĝo persistema, sen paralizo, sen cirkulada malordo, en la ekstremaĵoj.

102 **Aksel-o** (L. *Axilla*); **—a**. ANAT.: —a kavo; —a nervo; —a vejno. Branĉoj de l'—a arterio: torakoakromia; torakoflanka; subskapola kun branĉetoj, torakodorsa kaj ĉirkaŭfleksa de la skapolo; ĉirkaŭfleksa de la humero.

103 **Aks-o**, rekta centra linio; vidada —o; —**cilindro**. (G. *Achsencylinder.*)

104 **Aksungo**, pura porka graso.

105 **Aktin-a**, kiu havas ĥemian kaj biologian agadon; la ultraviolaj radioj estas —aj.

106 **Aktinomik-o** (L. *Actinomyces*); —**ozo**, malsano kaŭzita de —o.

107 **Aktinoskopio**, esploro de la travidebleco de organo.

108 **Aktinoterapio**, terapio per la radiadoj de la aktina parto de la spektro, ĉefe radioj U-V.

109 **Aktiv-a**, aganta; —**eco**; —**igo**; **mal—igo** (L. *Attenuatio*); **tro—eco**.

110 **Akumulatoro**, amasigilo por elektra energio.

111 **Akupunkturo**, nadlopikado (L. *Acupunctura*).

112 **Akustik-o**; —**a** aŭ aŭda. ANAT.: —a nervo; —a ekstera arterio; —a ekstera tubo: meato, timpana sulko (L. *Incisura timpanica*), kartilagaj sulketoj (A. *Fissures of Santorini*), traga lameno (L. *Lamina tragi*). V. ankaŭ Aŭdo.

113 **Akuŝ-o** (L. *Partus*); memnaska aŭ spontanea —o; kaŭzita —o; antaŭtempa —o; norma —ado (F. *Eutocie*) —**faciliga** (F. *Ocytocique*); unuaj dilatigaj doloretoj je la komenco de la —o (F. *Mouches*) —**i**, naski feton almenaŭ 180 tag. post fekundiĝo; —**anta**; —**inta**; —**onta**; —**ulino**; —**igi**; —**igisto**; —**igistino**; sendiploma —igistino; —**ejo**, —domo, —hospitalo; —**lito**; finaj doloregoj (F. *Douleurs conquassantes*); —**fino** aŭ ellivero (F. *Délivrance*);

**post—o** (G. *Nachgeburt*); **—ologio** aŭ tokologio.

114 **Akuta**, akra, nelongedaŭra, rapidiranta.

115 **Akv-o** (L. *Aqua*) ; **—a** ; **— eca** ; —a poŝo ĉe nasko ; **—oplena** ; **—eco** ; **—ecemo** (L. *Deliquescentia*) ; —aldoni (F. *Couper d'eau*) ; **sen—a** ; **sen—igo**, koncentrigo ; **sen—iĝo** (F. *Déshydratation*). ANAT. : **—odukto** aŭ **—okonduk(il)o** de la cerbo (F. *Aqueduc de Sylvius*), de la vestiblo (G. *Wasserleitung des Vorhofes*) TER. : Gudra —o; kalka —o; kloroforma —o; sedativa —o; **—punkturo**, akvopikado (L. *Aquapunctura*).

116 **Alalio**, parolnekapablo.

117 **Alantoido**, feta organo nedaŭra (L. *Allantois*).

118 **Alarma regiono**, interna parto de la superdorna kavaĵo de la skapolo, kie oni aŭdas ofte la unuajn simptomojn de la pulma tuberkulozo.

119 **Alastrimo**, varioloforma erupcia febro ĉe neblankrasuloj observata en Ameriko.

120 **Albin-o**, homo denaske senpigmenta ĉe haŭto, haroj kaj irisoj ; **—eco** aŭ **—ismo**.

121 **Albug-o**, blanka makulo de la korneo ; **—a** aŭ **—inea** membrano.

122 **Albumin-o** ; **—urio** ; **—imetro**, —mezurilo ; **—oido** ; **—oida** (G. *Eiweissförmig*); **par—o** ; **—oreago**.

123 **Albumoz-o**, propeptono, substanco inter albuminoido kaj peptono ; **—urio**.

124 **Aldehid-o** ; **benz—o** ; **par—o**, ($C^4$ $H^4$ $O^2$) ; por

la —oj oni uzas la sufikson **alo**, ekz. : metanalo, etanalo.

125 **Aleksin-o**, albumina bakteriodetruanta substanco ĉeestanta en la norma sangosero (F. *Alexine, Cytase, Complément*); deviado, fiksado de l' —o.

126 **Aleksio**, perdo de la kapablo legi skribaĵojn.

127 **Alergi-o**, reago alia. Ekz. : ĉiu modifo de l'organaro per viruso : imuneco k. t. p.; sentemigo.

128 **Algid-a**, malvarmega ; —a febro aŭ frostotremiga ; —a stadio de ĥolero ; **—eco.**

129 **Algi-o**, doloro ; dent —o ; nerv —o ; fiksita —o (F. *Topoalgie*).

130 **Algo**, akvoherbo (L. *Alga*).

131 **Ali-a** (L. *Alius*) ; **—eco** ; **—igi** ; **—iga** (L. *Alterans*); **—igo**; **—iĝo**; **—igilo** (ELEKTR.). (F. *Transformateur*); **—iĝi** ; **—estezio,** sent.o sur alia flanko : Se oni pikas la malsanulon ĉe ia punkto, li sentas la pikon ĉe la kontraŭa punkto. (F. *Allochyrie*).

132 **Alilo** (ĤEM.) (A.*Allyl*, F. *Allyle*).

133 **Aliment-o**, nutraĵo ; **—ado** ; **—a.**

134 **Alirejo**, aliriga vojo (ĤIR.) (F. *Voie d'accès*).

135 **Alkali-o** (G. *Alkali*), hidrato de kalio, de natrio k.t.p. ; **—a** ; **—igo** ; **—ometro,** ilo por mezuri la —econ ; **—ometrio.**

136 **Alkaloid-o** (F. *Alcaloïde*) ; natura, artefarita —o.

137 **Alkekeng-o** (BOT.) (L. *Physalis alkekengi*) ; **—aj** beroj.

138 **Alkohol-o.** VAR. : absoluta aŭ senakva, akvigita aŭ diluita, redistilita, kamfora, melisa; —o kun sulfata acido (L. *Spiritus sulfuricus*); **—ato**; **—aturo**, macerajô en —o; **—aĵo**; —aĵo de amoniako kun anizo (L. *Spiritus ammonii anisatus*); **—ulo**; **—(ul)iĝi**; **—ismo**; **—ometro**, ilo uzata por **—ometrio**. En organika ĥemio, oni uzas por la —oj la sufikson **olo** : etanolo, metanolo, propanolo k.t.p.; se estas en la molekulo 2, 3, 4, 5 aj ekvivalentoj, oni uzas la prefiksojn di, tri, tetra, penta; ekz. : trimetanolo.

139 **Alkutimiĝo**, logiĝo al tolero de medikamento (F. *Accoutumance*).

140 **Alno** (BOT.), arbo el la familio de Betulacoj (L. *Alnus*, A. *Alder*, F. *Aulne*, G. *Erle*).

141 ...**alo**, finaĵo uzata en organika ĥemio por aldehidoj : etanalo, metanalo, k.t.p.

142 **Alogotrofio**, disproporcio, malreguleco en la trofio.

143 **Alo-o** (BOT.) (L. *Aloe*); Sokotorina —o.

144 **Alopati-o** (A. *Allopathia*); kuracisto **—ulo**, **—isto.**

145 **Alopeci-o**, senhareco; kapa —o, kalveco. VAR. : areoforma, cikatra, fava, keroza, lokalizata, pitiriaza, postimpetiga, postmalsana, postradioterapia, pseŭdofava, sebeca, sifila (—o kiel arbaraj maldensejoj ĉe sifiluloj).

146 **Aloritmi-o**, periode nenorma ritmo de la pulso. Ekz. : bi aŭ triduopa pulso; —a.

147 **Alotriosmio**, neĝusta flarado.

148 **Alotrofi-o**, stato kiam organaj substancoj, albumino, fibrino, perdis siajn normajn nutrajn ecojn, aŭ iĝis malbonfarantaj, ekz. post malsano; —a.

149 **Alotropi-o**, malsamaj statoj kiujn povas alpreni kelkaj simplaj korpoj; ekz. : karbo kaj diamanto; —a.

150 **Altaĵ-o**, **—eto** (A. *Pimple*, F. *Elevure*, G. *Knötchen*, H. *Grano*, I. *Elevazione*).

151 **Alteo** (BOT.) (L. *Althaea*, A. *Marshmallow*, G. *Eibisch*, H. *Malvavisco*).

152 **Altern-i**, sekvi unu alian kaj reciproke; elektra **—a** fluo; **—a** hemiplegio (v. t. v.); **—anta**; **—igi**; **—eco**.

153 **Altmontarsun-o**, artefarita suno, lampoj aŭ instrumentaj aranĝoj por imiti sunon de alta montaro (agas precipe per **ultraviolaj radioj**); **—a** bano.

154 **Alumin-io**, simpla elemento; **—ia** sulfato; **—o**, **—ia** oksido.

155 **Alun-o**, duobla sulfato de aluminio kaj alia metalo, ĥromo, kalio.... ; kalcinita (kalia) —o.

156 **Alveol-o**, loĝieto; dentaj, pulmaj —oj; **—ito**, inflamo de —o; **inter—a**.

157 **Amalgamo**, kunfandiĝo de hidrargo kun alia metalo.

158 **Amanitino**, danĝera veneno entenata en kelkaj fungoj (F. *Phalline*, *Amanitine*).

159 **Amar-a**, maldolĉa; —aj gutoj de Beaumé (Elp. : Bomé), apetitdona kuracilo.

160 **Amas-o**, granda kvanto, kolekto; **vat—o** (F. *Gâteau d'ouate*; **—igi**; **—igilo**, akumulatoro, kondensatoro; **—iĝo**, densiĝo; **aŭto—igo** (F. *Autocondensation*).

161 **Amaŭrozo**, blindeco.

162 **Ambaŭ**, unu kaj la alia; **—dekstra** (L. *Ambidexter*); **—dekstrulo**, homo faranta same per dekstra kaj maldekstra mano; **—seksa**, duseksa; **—seksulo**, hermafrodito.

163 **Ambliopio**, malfortiĝo de vidkapablo.

164 **Amboceptoro**, specifa konsistiga parto de antikorpo. (F. *Ambocepteur, Sensibilisatrice, Corps immunisant, Fixateur, Philocytase*).

165 **Amboso**, unu el la ostetoj de la meza orelo (L. *Incus*, F. *Enclume*, H. *Yunque*). ANAT.: longa kaj supra kruroj; lentoforma apofizo.

166 **Ambro** (L. *Ambanum*, A. *Amber*, G. *Ambra*).

167 **Ambulanco**, nedaŭra kuracejo por vunditoj aŭ malsanuloj.

168 **Ambulatori-a**, kiu ne trudas ripozon al la malsanulo; —a kuracado; —a tifuso.

169 **Ameb-o**: (L. *Amoeba*); **—a** disenterio; **—oida** movo; —oida pseŭdamembro (F. *Prolongement amoeboïde*, G. *Ausläufer*); **—ozo** (F. *Amibiase*).

170 **Amel-o** (L. *Amylum*, A. *Starch*); **—a**; **—eca**; **—gumo** aŭ dekstrino; **—glicerinaĵo** (F. *Glycérolé d'amidon*); **—gluo** (F. *Empois d'amidon*, G. *Stärke*, I. *Salda*); **—oida** degenero, transformiĝo de teksaĵo en amorfan,

amelsimilan substancon; —**azo**, —**diastazo** fermento de la pankreasa sekrecio (F. *Amylase*); —**oformolo**, kombinaĵo de —o kaj formolo (F. *Amyloforme*).

171 **Amenoreo**, foresto de menstruado.

172 **Ametrop-a** okulo, nenormalvida (miopa, hipermetropa aŭ astigmata; —**io**.

173 **Amfiartrozo**, vario de artiko (L. *Amphiarthrosis*).

174 **Amfiastero**, ŝpinilforma korpo kiu estas aliiĝo de la ĝermiga vezikulo (dum unu el la periodoj de la kariokinezo).

175 **Amfibola** stadio, dum la tifoida febro, inter la akmo kaj la progresa malpliiĝo.

176 **Amfora** bruo, rememoriganta blovon en amforon, ekz.: en kelkaj tuberkulozaj kavaĵoj.

177 **Amfotera**, kiu havas ecojn de acido kaj bazo.

178 **Amiant-o**, natura minerala substanco nebrulema; —**osimila** tineo (F. *Teigne amiantacée*); —**okoniozo** (F. *Asbestose*).

179 **Amido** (ĤEM: $NH^2$); derivitaj vortoj: etanamido, metanamido, k.t.p.

180 **Amigdalino** aŭ **migdalino** (v.t.v.)

181 **Amilen-o** (ĤEM : $C^{10}H^{10}$); —**a** hidrato (L. *Amylenum hydratum*).

182 **Amil-o** (ĤEM : $C^5H^{11}$); —**a**; —**nitrito** (L. *Amylum nitrosum*); —**obakterio** (L. *Bacillus butyricus*).

183 **Amin-oj**, ĥemia grupo kiu entenas amoniakajn alkaloidojn; —oj povas esti unu, du, trigradaj : metilamino, dietilamino, k. t. p.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

184 **Amiotaksio**, kvazaŭĥoreaj movoj, ofte kaŭzitaj de multoblaj nervitoj.

185 **Amitozo**, senpera divido de ĉeloj, ameboj, leŭkocitoj, sen kerna partopreno, sen kariokinezo.

186 **Amnezi-o**, senmemoreco; **par—o**, malsana difekto en la memoraĵoj.

187 **Amni-o** (L. *Amnium*, G. *Schafhaut*, H. *Zurron*); **—a** akvo (H. *Liquido amniotico*); **hidr—o** aŭ **—a** hidropso; **—a** sako aŭ akva poŝo (G. *Wasserblase*).

188 **Amona korno** (ANAT.), hipokampo (G. *Ammonshorn*).

189 **Amoni-o** (ĤEM: NH³); **—a** benzoato, bikarbonato, bromido, jodido, klorido, klorhidrato, seskvikarbonato, sulfoiĥtiolato, valerianato; **—ako** aŭ **—aksolvo** (L. *Ammonium causticum*); —a aŭ **—aka** gaso; **—uro**, komponaĵo de **—ako** kaj metala oksido; **—umo**, dubebla radikaĵo el kiu deriviĝus —o. PAT.: **—emio**, ĉeesto de —ako en sango; **—urio**, ĉeesto de —ako en urino.

190 **Amorf-a**, senforma; **—ismo**.

191 **Amper-o**, elektra unuo de intenseco; **—metro**; **—horo** (F. *Ampère-heure*).

192 **Ampleks-o**, dimensioj; **—esploro**, ĉirkaŭpreno de torako, per iloj aŭ per la manoj, por kontroli ĝian formon, kreskadon (F. *Amplexation*); pulsa **—eco** (F. *Amplitude du pouls*).

193 **Ampol-o**, botelo kun longa kolo; **—eto**, vitra globeto kun unu aŭ du pintaj ekstremaĵoj

(F. *Ampoule*, G. *Ampulle*, *Kolben*). ANAT.: **Vater—o** (ĉe pankreaso); rektuma —o.

194 **Amput-i**, fortranĉi; **—o**; kinematika —o, tiel farita ke oni povu poste pli bone utiligi la stumpojn por almeto de artefarita membro; popeca —o (V. Peco).

195 **Amuziko**, kiam malsanulo ne plu havas muzikkapablon, muzik-senton (F. *Amusie*).

196 **Anabiozo**, reveno al aktiveco post kaŝita vivo.

197 **Anaerobia**, nevivkapabla en aero.

198 **Anafilaks-o**, speciala sentemo al iu specifa albumineca substanco. Ekz.: ju pli oni ripetas la injektojn de ia korpo en organismon, des pli kreskas la sentemo al ĝi; alivorte la individuo iĝas pli sentema post dua inokulo ol post la unua; **—a** kolizio.

199 **Anakardi-o** (BOT.) (L. *Anacardium*, A. *Cashew nut*, G. *Nierenbaum*); **—frukto**.

200 **Anakinezio**, moviga reedukado.

201 **Anakrot-a** pulso; sur la sfigmogramo, je la supreniranta linio, oni vidas suprenirantan anguleton; **—eco**.

202 **Analeptik-a**, plifortiganta; **—o, —aĵo**.

203 **Analgez-o**, sendoloreco, senpiksenteco; **—a** rimedo.

204 **Analiz-o** (L. *Analysis*); urin—o.

205 **Anamnez-o**, detaloj pri antaŭirintaj momentoj de malsano ĉe individuo.

206 **Anasarko**, hidropso, akvoza ŝveliĝo de la korpo.

207 **Anastomoz-o**, interkomunikiĝo; **—a** granda arterio (ANAT.); butonforma **—ilo**, uzata en intesta ĥirurgio.

208 **Anatomi-o**, scienco pri la homa, besta kaj vegetaĵa korpoj; **—a**; **—isto** aŭ **anatomisto**.

209 **Andropogono** (BOT.) (L. *Andropogonum citratum*, A. *Lemon grass*).

210 **Aneks-o**, aldona organo; **—ito**, inflamo de uteraj —oj: salpingo, ovario.

211 **Anemi-o** (L. *Anaemia*); —o ĉe la ministoj; —o pernicioza aŭ pereiga; **—a**; **—igi**; **—iĝi**.

212 **Anergi-o**, provizora aŭ daŭra malapero de l'alergio. Ekz. de provizora —o: la haŭta reago per tuberkulino mankas, ĉe kelkaj tuberkulozuloj, dum infekta malsano, aŭ post resaniĝo (pozitiva —o).

213 **Anestez-o**, sendolorigo, sensentigo; —o per kloroformo; lumba —o; **—a**; **—i**; **—ilo**; **—aĵo**.

214 **Aneŭrism-o** aŭ **anevrismo**, dilatiĝo de arterio. VAR.: —o cirsoida, milioida, kvazaŭsekcanta (F. *Anévrisme disséquant*).

215 **Angeliko** (BOT.) (L. *Angelica archangelica*, G. *Engelwurz*).

216 **Angilulo**, speco de malgranda vermo (L. *Anguillula*).

217 **Angin-o**, 1) inflamo de la gorĝa istmo kaj de la faringo (A. *Sore throat*, G. *Braüne*). VAR.: flegmona, foliklara, herpeta, katara, nekroza, ulcera k. t. p. 2) **brust—o** aŭ brustangoro.

218 **Angi-o,** organa tubo tra kiu fluas sango aŭ limfo; **—ektazio**, dilatiĝo de —o; **—ito** inflamo de —o; **—oleŭcito**, limfangito (v. t. v.); **—ologio**, parto de anatomio pri —**oj**; **—okeratomo**; **—omo**, tumoro formata el sangovazoj; **—opatio**; **—osarkomo**; **—ospasmo**; **—ostenozo**; **—otribio**, premegado de —oj per speciala prempinĉilo nomata—**otribo**; **—oĥolito** aŭ galkanalito, inflamo de la galkanaloj.

219 **Angor-o** (G. *Angst*, H. *Congoja*, I. *Angoscia*); kora —o aŭ **brust—o** (L. *Angor pectoris, Anxietas praecordialis*); neorgana brust—o; paroksisma brust —o; **—iga** doloro (F. *Douleur angoissante*); —a emociemo (F. *Emotivité anxieuse*).

220 **Angul-o** (L. *Angulus*); faca —o; parieta —o; lip—o (L. *Commissura labialis*); palpebr —o.

221 **Angusturo**, ŝelo de Amerika arbo uzata kiel kontraŭfebra rimedo.

222 **Anhel-i**, malfacile kaj rapide spiri; **—o**; **—ado**.

223 **Anhidr-a**, senakva; **—eco**; **—ido** (ĤEM); sulfata —ido; sulfita —ido; **—ozo**, sensudoreco.

224 **Anĥilopso**, tumoreto antaŭ (aŭ flanke de) la larmsako.

225 **Anilino**, kolorigilo produktita el karbaj distilaĵoj.

226 **Aniono**, jono kiu eliras el anodo.

227 **Anisokorio**, malegaleco de la pupiloj.

228 **Anisometropio**, malegaleco de la refrakto en la du okuloj.

229 **Anisosfigmio**, pulsado regula pri intertempoj, neregula pri forteco.

230 **Anisurio**, kvanto da urino tre varia laŭtaĝe.

231 **Aniz-o** (BOT.) (L. *Pimpinella anisum*); **stel—o** aŭ **ilicio** (L. *Anisum stellatum*).

232 **Ankilodontio**, algluiĝo de dentoj.

233 **Ankilogloso**, algluiĝo de la lango al la gingivoj aŭ al la buŝaj parioj.

234 **Ankilostom-o**, vario de parazito; **—ozo** (F. *Ankylostomiase*).

235 **Ankiloz-o**, senmoveco de artiko; **—igo**, operacio, aŭ proceso, kaŭzanta —on; **—iĝi**.

236 **Ankon-o**, muskolo fiksata je epikondilo kaj ulno (L. *Anconeus*).

237 **...ano**, finiĝo uzata en organika ĥemio por la saturitaj hidrogenaj karbidoj: butano, metano, pentano, propano; mono, di, triklora metano.

238 **Anodo**, pozitiva elektrodo, ankaŭ nomata **antikatodo**.

239 **Anofelo**, vario de moskito peranta malarion.

240 **Anoftalmio**, senokuleco.

241 **Anoksemio**, malsufiĉeco de oksigeno en sango.

242 **Anomali-o**, eksternormaĵo; **—a**, netipa.

243 **Anonca** (G. *Ankündigend*, I. *Premonitorio*).

244 **Anopsi-o**, blindeco; **hemi—o** dutempia.

245 **Anoreksio**, senapetiteco.

246 **Anorgana**, senviva, minerala.

247 **Anosmio**, senflarsenteco.

248 **Ans-o** (L. *Ansa*, G. *Henkel*); intesta —o; elektroterma —o.

249 **Anstataŭ-i**, esti en la loko de io alia; —**igo** (L. *Substitutio*) —**iga** (F. *Substitutif*); —**igi**, meti en la lokon de; —**eco**; —**anteco** (F. *Suppléance*).

250 **Antagon-isto**, kiu agas kontraŭe; —**ismo**.

251 **Antaŭ-a**, 1° pri loko (L. *Anterior*) : —a muskolo de l'orelo; —**enpuŝo** (L. *Propulsio*) ; 2° pri tempo: —**tempa** (F. *Prématuré*) ; —**aĵoj** de la malsanulo (F. *Les antécédents*) ; —aĵoj de la malsano aŭ prodromoj; —**gardado** (L. *Preservatio*) ; —**gardilo** (F. *Préservatif*).

252 **Antaŭbrak-o**, parto de la supra membro de la kubuto ĝis la manradiko. ANAT.: Muskoloj: ronda pronanta, kun kapoj humera kaj ulna; radiusa fleksanta la karpeon (F. *Grand palmaire*) ; ulna fleksanta la karpeon (L. *Flexor carpi ulnaris*, F. *Cubital antérieur*); brakoradiusa (L. *Supinator radii longus*); radiusa, longa kaj mallonga, etendanta la karpeon (F. *Premier et second radial externe*) ; ulna etendanta la karpeon (L. *Extensor carpi ulnaris*, F. *Cubital postérieur*) tendenaj anastomozoj; tendena ĥiasmo; mezotendenoj (L. *Vinculum tendinum*). ĤIR: Havi —on bandaĝe senmovigitan.

253 **Antefleks-o**, kliniĝo antaŭen, formante angulon; ĉe utera —o grava angulo estas formata sur

la antaŭa parto de l'utero, inter la korpo kaj la cerviko, kaj la utera korpo estas antaŭe.

254 **Antemo** (BOT.), roma kamomilo.

255 **Anteversi-o**, kliniĝo antaŭen sen angulo; ĉe utera —o estas antaŭkliniĝo de utera fundo, kaj utera kolo estas pli malantaŭe ol norme.

256 **Anthelikso**, elstaraĵo de l'orelkonko kiu kuŝas antaŭ la helikso.

257 **Anti...** prefikso kiu signifas kontraŭ. Ekz.: —**biozo** (BAKTER), mortigo de patogenaj bakterioj per nepatogenaj. Por —**doto**, —**fagino**, k. t. p... v. t. v.

258 **Antidoto**, kontraŭveneno.

259 **Antifagino**, substanco kiu malhelpas la englutiĝon de mikroboj per fagocitoj.

260 **Antifebr-a**, kontraŭ la febro; —**ino**, acetanilido.

261 **Antiflogistik-a**, kontraŭinflama; —**o**, —a rimedo.

262 **Antigen-o**, substanco kiu estigas antikorpojn; ekz.: bakterioj, organaj ĉeloj, albuminoj; **parta** —**o**, parta elemento de —o (F. *Partigène*).

263 **Antikorpo**, specifa aĵo, formata kontraŭ antigeno.

264 **Antilobo**, traga altaĵeto ĉe l'ekstera orelo.

265 **Antimon-o**, vario de metalo; —**a** triklorido (L. *Stibium chloratum*); kalia acida —**ato**; —a kalitartrato, aŭ tartaremetiko (F. *Tartre stibié*); —a trisulfido (L. *Stibium sulfuratum nigrum*); —a pentasulfido (L. *Stibium aurantiacum*).

266 **Antipiret-a**, kontraŭfebra ; **—o**.

267 **Antipirin-o**, dimetiloksikinizino ; **—a** salicilato ; **—idoj**, erupcioj kaŭzitaj de —o.

268 **Antiseps-a**, kontraŭmikroba ; **—o** ; **—eco** ; **—igi** ; **—aĵo** ; **—ilo**.

269 **Antitenaro**, parto de la manplato de la komenco de la orelfingro ĝis la manradiko.

270 **Antitoksino**, antikorpo kontraŭ toksino.

271 **Antitrago**, parto de l'orelkonko.

272 **Antraceno** ($C^{24}$ $H^{10}$), acetilo-difenileno.

273 **Antrakozo**, karba pulmokoniozo.

274 **Antraks-o**, 1) furunkego (L. *Anthrax*) ; **—oida**, osimila; 2) kkf. uzata malprave anstataŭ karbunkolo (v.t.v.), infekta malsano elvokata per specifaj bakterioj.

275 **Antropofagio**, manĝado de homa karno.

276 **Antropologio**, scienco pri homo.

277 **Antropometrio**, mezurado de la homa korpo.

278 **Antropomorfa**, homsimila.

279 **Antrotomio**, ĥirurgia malfermigo de la makzela sinuso.

280 **Anurio**, manko de urino.

281 **Anus-o** (L. *Anus*); **—a** ; **ĉirkaŭ—a** (F. *Péri-anal*). ANAT. : Levatoro de l' —o, muskolo levanta la —on ; —a rando ; —okokciga ligamento ; —orektuma tubo. PAT. : —algio, —a doloro, —aj tenesmaj doloregoj ; —ito ; —a inflamo (v. Prokt). ĤIR. : Artefarita —o (L. *Anus praeternaturalis*, F. *Anus contre nature*, G. *Künstlicher After*); —ektomio.

282 **Aort-o** (L. *Aorta*). ANAT.: —o supreniranta; —**a** arko; —a bulbo; el —a arko devenas arterioj sennoma, karotida kaj subklavikla; —o malsupreniranta el kiu devenas arterio abdomena kun branĉoj, frenika malsupra, sakra meza, celiaka (v. t. v.), iliaka komuna, hipogastra, k.t.p. PATOL.: —a aneŭrismo aŭ —**ektazio**; —**ito**, —a inflamo; —a nesufiĉeco, nesufiĉeco de la —a klapo ĉe koro; —a stenozo.

283 **Aparat-o** (L. *Apparatus*). ANAT.: cirkulada —o; digesta —o. ĤIR.: marŝ—o, kiu ebligas marŝadon ĉe ostrompuloj; kapfiksanta —o (F. *Minerve*).

284 **Apati-o**, senimpresemo, senenergieco; —**a**.

285 **Apendic-o**, alpendaĵo. ANAT.: ileocekuma (vermoforma) —o; ksifoida —o. ĤIR.: —**ektomio**, fortranĉo de l'ileocekuma —o. PAT.: —**ito**, —a inflamo; **para—ito**, inflamo apud —**o**.

286 **Apepsio**, senpoveco digesti kaŭzata de manko de pepsino.

287 **Aperitiva**, apetitdona.

288 **Apertur-o** (F. *Ouverture*, *Embouchure*, G. *Öffnung*, I. *Imboccatura*); **kontraŭ —o**, aliloka entranĉo por faciligi la eliron de la puso; **sen—o**, denaska manko de iu norma —o; ekz.: akustika ekstera sen—o.

289 **Apetenco** (L. *Appetentia*).

290 **Apetit-o** (L. *Appetitus*) ; **—dona** aŭ **—iga**, aperitiva ; **—ego** aŭ bulimio ; **sen—eco** aŭ anoreksio.

292 **Apio** (BOT.) (L. *Apium graveolens*, A. *Smallage*, F. *Ache*, G. *Petersilie*).

292 **Apiolo**, eltiraĵo el petroselo.

293 **Apireksio**, apiretikeco, senfebreco.

294 **Apiretik-a**, senfebra, **—eco** aŭ apireksio.

295 **Aplazio**, foresto de norma kresko.

296 **Aplik-o**, uzo, surmeto ; vorto ankaŭ uzata de iuj en senco de donado de medikamento ; **—ado** (F. *Application*).

297 **Apneo**, momenta senspiro (L. *Apnoea*).

298 **Apofiz-o**, osta elstaraĵo. ANAT. : —o artika, bazilara (L. *Processus basilaris*), etmoida, korakoida, stiloida, zigomatika. PATOL. : **—ito**, ostinflamo lokalizata je —o.

299 **Apolinar-akvo**, akvo entenanta natrian bikarbonaton kaj riĉenhava pri karbonata acido (Apollinaris, Rheinlando).

300 **Apolizino**, kombinaĵo de citrata acido kaj fenetidino.

301 **Apomorfin-o** ($C^{17}H^{17}AzO^{2}$) ; klorhidrato de —o.

302 **Aponeŭroz-o** (L. *Aponeurosis*) ; **—a** (F. *Aponévrotique*).

303 **Apopleksi-o** (L. *Apoplexia*) **—a** ; **—ema** ; **—ulo** ; **—oforma**.

304 **Apotek-o**, magazeno kie la **—isto** vendas la medikamentojn ; **—ista** arto, farmacio ; **—a**

(L. *Officinalis*); —aj komercaĵoj (A. *Medicines*, F. *Drogues*, G. *Droguenwaren*).

305 **Apozemo**, dekoktaĵo, aŭ infuzaĵo de vegetaĵoj, en kiun oni aldonas alian kuracilon, salon, siropon, k.t.p.

306 **Apraksio**, perdo de la kompreno por uzebleco de objektoj.

307 **Aprosopio**, denaska manko de vizaĝo.

308 **Apsitirio**, histeria muteco.

309 **Aptialismo**, manko de salivo.

310 **Apud-a** (L. *Contiguus*); **—eco** (F. *Contiguité*).

311 **Araĥnoid-o** aŭ aranea meningo, unu el la tri meningoj; **—a**; **—ito**, inflamo de la —o.

312 **Arbut-o** (BOT.), speco de erikacoj. (L. *Arbutus*, F. *Arbousier*); **—ino**, aktiva principo de Uvaursia arbuto.

313 **Areol-o**, ĉirkaŭanta parto (L. *Areola*, G. *Hof*).

314 **Areometr-o**, denseco-mezurilo.

315 **Argas-o**, vario de insekto (L. *Argas*).

316 **Argono**, unu el la gasaj elementoj de l'aero.

317 **Arĝent-o**, metalo; **—a** nitrato, oksido, proteinato.

318 **Arĝiri-o**, depon(itaĵ)o de arĝento en la korpo, ekz.: sub la haŭto, sekve de kuracado per arĝentsalo.

319 **Arĝirolo**, arĝenta nukleinato.

320 **Aristolo**, dijodido de ditimolo.

321 **Aristoloĥi-o** (BOT.), speco de plantoj (L. *Aristolochia*, A. *Bitworth*, G. *Osterluzei*). VAR.: klematita, longa, ronda k.t.p.

322 **Aritenoid-o**, laringa kartilago ; **—a** epiglota muskolo (L. *Musculus arytaeno- epigloticus*).

323 **Aritmi-o**, senritmeco, nereguleco de la koraj batoj, de la pulso.

324 **Ark-o** (L. *Arcus*, F. *Arc*, *Arcade*, *Crosse*). ANAT. : —o alveolara aŭ dentara (G. *Zahnhöhlenbogen*), aorta, brova, femura (F. *Arcade crurale*), orbita, puba, tempia, zigomatika ; **—aĵo** (L. *Fornix*, A. *Vault*, F. *Voûte*, G. *Wölbung*, H. *Bovela*, I. *Volta*). ĤIR. : **—aro**, protektilo kiun oni metas super la ostrompitajn membrojn en la lito. DER. : elektra —o ; **—eco** (F. *Cambrure*) ; **—igi** la vertebraron ; **—oforma**.

325 **Arnik-o** (monta) (BOT.) (L. *Arnica montana*, A. *Leopard's bane*, G. *Wohlverleih*).

326 **Arom-a** (L. *Aromaticus*) ; —a tinkturo ; —a vino.

327 **Aroruto**, fekulo ekstraktita el *Maranta indica* (A. *Arrowroot*, G. *Pfeilwurzmehl*).

328 **Arsenik-o**, arsenita anhidrido (F. *Acide arsénieux*, G. *Arseniksäure*) ; **—ismo**, venenado per —o.

329 **Arsen-o**, metaloido, ĥemia elemento (L. *Arsenicum*) ; **—a** flava sulfido ; natria **—ato** ; **—ito** ; —ita anhidrido aŭ arseniko (v.t.v.) ; —obenzolo aŭ salvarsano ; natria —ilato (F. *Atoxyl*); metil—ilato; dimetil—ilato.

330 **Artemizio** (BOT.) (L. *Artemisia vulgaris*, A. *Wormseed*. VAR. : komuna, kontra, k.t.p.

348 **Aspergilozo**, malsano kaŭzita de *Aspergillus fumigatus*.

349 **Aspir-i**, altiri akvon, puson, aeron... ; **—o**, **—ado** ; **—ilo**.

350 **Aspirino**, salicilacetata acido.

351 **Astazio**, nekapablo stari.

352 **Astenio**, senforteco.

353 **Astenopio**, nekapablo por daŭra vidado.

354 **Asteriono** (ANAT.) punkto kie mastoido tuŝas parietoston, tempioston kaj sfenoidoston.

355 **Astigmat-a**, ĉe kiu ekzistas **—eco** (aŭ **—ismo**) (G. *Astigmatismus*); **an—a**, senigita je —eco.

356 **Astm-o** (L. *Asthma*). VAR. : bronĥa, kora, nerva, somera (A. *Hay fever*), timusa ; **—ulo** ; **kontraŭ —aj** cigaredoj.

357 **Astragalo**. 1) (ANAT.) (L. *Astragalus*, G. *Sprungbein*) posedas tri artikajn surfacojn : kalkanean, postan kaj mezaĵan. 2) (BOT.) : speco de legomo el kiu devenas la Traganto (v.t.v.).

358 **Asulo** aŭ **splinto** (v.t.v.).

359 **...ata**, sufikso, uzata en ĥemio kiam simpla ŝtofo formas nur unu anhidridon ; ĝi estas same uzata por la responda acido. Ekz. : karbonata anhidrido, karbonata acido.

360 **Atak-o**, subitaj doloroj, spasmoj k.t.p. ; nerva —o ; **—aĵoj** aŭ agresinoj (v.t.v.).

361 **Ataksi-o**, senordeco de korpaj movoj ; **star—o** (F. *Ataxie statique de Friedreich*); **ir—o**

(ĉe tabeso) ; **pseud—o**, kvazaŭa —o (ĉe kelkaj veneniĝoj : per sekala ergoto, alkoholo...).

362 **Atavismo**, prapatra simileco.

363 **Atelektazo**, stato de pulmo kies alveoloj estas senaeraj, kuntiritaj.

364 **Atenc-o kontraŭ sekshontemo**, seksa perfortigo k. t. p. (A. *Indecent assault*, G. *Notzucht*, I. *A'ttentato al pudore*).

365 **Atend-i** ; observa **—o** (F. *Expectation*); **—a** metodo.

366 **Atest-o (skriba)** (F. *Certificat*) ; medicina —o, medicino-leĝa —o.

367 **Aterom-o** (L. *Atheroma*) ; **—a**.

368 **Atetoz-o**, malrapidaj senvolaj movoj kaŭzataj de malsano de la centra nervaparato ; pupila —o, alterna kuntiro kaj dilato de la pupilo.

369 **Atik-o**, parto de la orela timpana kavo ; **—ito**, inflamo de l' —.

370 **Atlas-o**, unua kola vertebro. ANAT. : —o-okcipita artiko, membrano ; —o-epistrofa artiko ; foveo de la dento ; flugilaj ligamentoj ; ligamento de la pinto de la dento ; krucoforma ligamento.

371 **Atmokaŭterizo** (F. *Atmokausis*), kaŭterizo per varmega vaporo.

372 **...ato**, sufikso uzata en ĥemio por la saloj formataj de **...ata** acido kaj bazo. Ekz. : Natria sulfato ($SO^4$ $Na^2$).

373 **Atoksilo**, natria anilarsenato.

374 **Atomo** (G. *Atom*).

375 **Atoni-o,** senagemo; muskola —o, sen (aŭ nesufiĉa) moveco.

376 **Atrepsio**, malbona kreskada nutrado ĉe la infanetoj.

377 **Atrezi-o**, manko de truo ĉe norma aperturo.

378 **Atricio**, grava kontuzvundo (L. *Attritio*).

379 **Atrofi-o**, malkresko, manka evoluo; hemifaca —o; muskola progresa —o; haŭt—oj cikatraj, idiopatiaj, liniaj, makulsimilaj, sklerozaj; —**aj**(haŭt)sulketoj (F. *Vergetures*); —**iĝi** (v. Trofio).

380 **Atropino**, alkaloido de la beladono.

381 **Aŭd-o**, **aŭdosento** (L. *Auditus*); —**ado** (L. *Auditio*); kolora —ado, asocio de percepto de koloro kun sono; —**omezurilo**, ilo por la mezuro de la —a kapablo; **duobl—o**, samtempa percepto de malsamaj sonoj (F. *Diplacousie*); **hiper—o**, **hiperaŭdosento** (F. *Hyperacousie*); —**a** aŭ Eŭstaĥia tubo (L. *Tuba auditiva*, A. *Eustachian tube*); Eŭstaĥiatubito, inflamo de l' —a tubo (L. *Rhinosalpingitis*); —**iga** reedukado; —**ifono,** aŭdilo por la surduloj. (V. Akustiko).

382 **Aŭrikl-o** (L. *Auricula*): **kor—o** (v. koro); **orel—o** (v. orelo).

383 **Aŭro**, fenomenaro okazanta antaŭ iaj nervaj atakoj.

384 **Aŭskult-i** aŭ brustaŭskulti; —**o**; —**ado** (L. *Auscultatio*).

385 **Aŭtakoid-o**, specifa substanco kreata de la ĉeloj de organo kaj, enigata en sangfluon, aganta kiel kuracilo por aliaj organoj. Estas —oj ekscitantaj, nomataj « Hormonoj » kaj —oj inhibiciigaj, nomataj « Ĥalonoj ».

386 **Aŭto**... de si mem; **—anafilakso**; **—digesto**; **—fagio**; **—grefto**; **—hemoterapio**, elpreno de sango al malsanulo kaj al li mem tuja reinjekto; **—ĥtona** (v. loĝi); **—klavo**; **—lizo**; **kora —matismo** (G. *Selbsteuerung*); irad—matismo (F. *Automatisme ambulatoire*); **—plastiko**; **—sugestio**; **—tokseco**.

387 **Aŭtopsio** aŭ **nekropsio**, scienca esplorado de kadavro.

388 **Avitaminozo**, manko de vitaminoj.

389 **Azigos-a vejno** (G. *Ungepaart*); duon—a vejno (F. *Petite veine azygos*).

390 **Azim-a**, ne fermentita; —a pano, maco.

391 **Azot-o** aŭ **nitrogeno** (Az aŭ N, en la formuloj, laŭ la landoj); **—emio**; **—urio**, tro da ureo en urino; **hipo—urio**; **—ato**; **—ata** acido ($AzO^3H$); **—ito**; **—ita** acido (F. *Acide azoteux*).

# B

392 **Bacil-o** (L. *Bacillus*); **—a**; **—emio**, —oj en sango; **—ozo**; acido-rezista —o, t.e., kolortenanta malgraŭ azotata acido; **mikro—o**;

**—tusanto**, —tusŝprucanto, infektema tuberkulozulo; komoforma —o.

393 **Bakteri-o** (L. *Bacterium*); **—ologio**; **—ologo** aŭ **—ologiisto**; **—olizo**, —osolvo; **—oterapio**; **—otoksino**; **—odetrua** (F. *Bactéricide*); **—ofago**, mikrobo kiu glutas kaj solvas —ojn; **—ofageco**; **—ofagaj** lizinoj; kolojna —o (L. *Bacterium coli*); karbunkola —o (F. *Bactéridie charbonneuse*); **—aceo,** ano de la familio de bacilo-similaj —oj; —osimila mikrobo; **—urio**.

394 **Balan-o** aŭ **Glano**; **—ito**, inflamo de —o; **—opostito**, samtempa inflamo de la —o kaj de la prepuco.

395 **Balbut-i**, parolaĉi hezitante kaj malbone prononcante; **—o**; **—ado**; **ripet—o** (A. *Stammering*, G. *Stottern*, H. *Tartamudez*); **ripet—ulo** (F. *Bègue*).

396 **Balenblanko** (L. *Sperma ceti*, A. *Cetaceum*, G. *Walrat*).

397 **Balot-i**, balance skui; **—o**, **—ado** (F. *Ballotement*).

398 **Balzam-o** (L. *Balsamum*); kopaiva —o; Peru—o; tolu—o; opodeldok—o; trankviliga —o (F. *Baume tranquille*); —o de la Komandoro; **—a**, **—eca**; **en—igo** (L. *Balsamatio*, F. *Embaumement*).

399 **Bandaĝ-i**, ĉirkaŭvolvi vunditan parton de la korpo per vato, tola rubando, k. t. p.; **—o**; T-forma —o; neforigebla —o, t.e. kiu ne estas

movebla; forigebla-neforigebla —o (F. *Bandage amovo-inamovible*); kap—o (L. *Mitra Hippocratis*); naz—o; —**isto** (A. *Trussmaker*).

400 **Ban-o** (L. *Balneum*); man, pied, sid, sun, ŝlim, vapor —o; hidro-elektra —o; —**ujo**, —**kuvo**; —**ejo**; —**urbo,** banloko; —**gasto,** kiu momente sin kuracas en —urbo; —**ologio**; —**oterapio**; komuna banakvujo (F. *Piscine*); —**kuracisto**; —**servisto** aŭ —**servistino**.

401 **Barbitur-a** acido; **dietil—a** acido, aŭ veronalo (v.t.v.); —**ato**.

402 **Bar-i**, malhelpi la trairon, la trafluon, la traigon; —**o**, —**ado**, okluzo (G. *Verschliessung*, I. *Chiusura*); —**ita** pelvo.

403 **Bari-o**, vario de metalo; —**a** bromido; —a klorido; —a protoksido, aŭ barito.

404 **Barit-o**, baria protoksido; —**a** sulfato.

405 **Barlov'a** malsano, speco de infana skorbuto.

406 **Bartolin'-a** glando; —**ito**, inflamo de tiu ĉi glando.

407 **Basedov-a** malsano aŭ eksoftalmia kropo; —**iĝa** kropo, komuna kropo akirinta kelkajn simptomojn de la —a malsano; —a aŭ —simila simptomaro.

408 **Baston-o**; **lam—o**, sur kiu sin apogas la lamuloj. ANAT.: —**eto**, ĉe retino (G. *Stäbchen*). BAKT.: —**eto**, formo de kelkaj baciloj kaj bakterioj; —**egoforma** bakterio, en formo de —**ego** (F. *Massue*, G. *Keulen*, I. *Clava*).

409 **Bat-o** (L. *Ictus*); **kor—ado**, movoj de la koro; **kontraŭ—o, re—o**, reago, postefiko (L. *Repercussio*, G. *Gegenstoss*); **hakil—a** frakturo (F. *Fracture en coup de hanche*).

410 **Baŭhin'a valvo**, ileocekuma klapo.

411 **Bazilar-a** (L. *Basilaris*). ANAT.: Branĉoj de la —arterio al ponto (L. *Rami ad pontem*, A. *Superior cerebellar*, F. *Protubérantielles*).

412 **Bazilika** vejno (L. *Vena basilica*).

413 **Bazilikum-o, —a ŝmiraĵo** (A. *Resine ointment*, F. *Onguent basilicum*).

414 **Baz-o** (L. *Basis*), malsupra parto. ANAT.: krania —o; apoga —o (F. *Base de sustentation*); **—a** membrano. BAKT.: (A. *Strain*, F. *Souche*, G. *Stamme*); **—ofila** leŭkocito, kiu koloriĝas per bazaj koloriĝiloj. FIZIOL.: —a metabolismo. ĤEM.: substanco kiu kun acido formas salon; **bi** aŭ **di—a** acido; **tri—a** acido. METAFORE: —a, esenca.

415 **Bazotrib-io**, dispremo de la krania bazo de la infano, dum akuŝo, per speciala ilo nomita **—o**.

416 **Beladon-o** (BOT.) (L. *Atropa belladona*).

417 **Benigna**, negrava, nemortiga.

418 **Benzamido**, ĥemiaĵo el benzolo kaj amoniako

419 **Benzeno**, hidrokarbido de la aroma serio $C^6 H^6$ (F. *Benzène*).

420 **Benzilo** (F. *Benzyle*).

421 **Benzino**, likvaĵo flamigebla eltirita el petrolo.

422 **Benzonaftolo**, kombinaĵo de benzoata acido kaj de naftolo.

423 **Benzo-o**, balzamo el « *styrax benzoin* » ; **—ata** acido (L. *Acidum benzoicum*); natria —ato.

424 **Beribero**, malsano kaŭzita de nura manĝado de vitaminmankaj nutraĵoj, ekz. : de polurita rizo.

425 **Best-o** (L. *Bestia*); **—eto** (F. *Animalcule*, G. *Tierchen*); **—sekskuniĝo**.

426 **Betulo** (BOT.) (L. *Betula*, A. *Birch*, F. *Bouleau*, G. *Birke*, H. *Abedul*).

427 **Bi**, prefikso kiu signifas duobla. Ekz. :**—loba** ; **—karbonato**. (V. Di).

428 **Biceps-o**, dukapa muskolo ; braka, femura —o.

429 **Bifida** (L. *Bifidus*).

430 **Bifurkiĝ-o**, disduiĝo ; bronĥaj —oj.

431 **Bikuspida**, dupinta.

432 **Bilharzi-o**, speco de parazito (L. *Distoma haematobium*); **—ozo**.

433 **Bili...**, komenco de vorto, kiu signifas galo ; **—a** ; **—oza** ; **—fera** ; **—feika** (V. Galo) ; **—fulvo**, **—ruĝo**, **—verdo** k.t.p. galdevenaj koloroj.

434 **Bio...**, komenco de vorto kiu signifas vivo ; **—genezo** ; **—ĥemia** ; **—kinetika** ; **—logio**, scienco pri la vivo kaj la vivaĵoj ; **—logia** ; **—logo** aŭ **—logiisto** ; **—meĥanika** ; **—psio**, fortranĉo de teksaĵa peceto, ĉe malsanulo, por mikroskopa ekzameno ; **—taksio**, parto

de la biologio pri klasifiko de la vivaĵoj; **—terapio**; **—tika**.

847 **Encefal-o** (L. *Encephalum*); **—opatio**, malsano de l'—o; **—ohernio** (L. *Encephalocele*); **—omalacio**, moliĝo de l' —o; **—oida**, —osimila; **—a**; **—ito**, inflamo de l'—o; **poli-—ito**; **peri—ito**; letarga —ito. Monstroj: **sen—ulo**, kiu ne havas —on; **ekster—ulo**, kies —o estas parte aŭ tute eksterkrania.

848 **Endemi-o**, malsano konstante ekzistanta en kelkaj landoj aŭ regionoj. Ekz.: Ĥolera epidemio en Hindujo.

849 **Endodermo**, interna lameno de la blastodermo.

850 **Endodiaskop-o**, ilo por **—io**, tio estas por uzo de X-radioj elinterne-eksteren per specialaj X-tubetoj enkondukitaj en organoj. Ekz: en buŝo (metodo ne plu uzata).

851 **Endogena**, interne kreiĝanta.

852 **Endokard-o**, interna membrano de la koro; **—ito**, inflamo de la —o.

853 **Endokoriono**, teksaĵo inter la koriono kaj la amnio.

854 **Endokrin-a**, kvalifiko de glando kiu eligas, en organismon, specialan sekrecion. Ekz.: Tiroido, surrenaj glandoj, k.t.p.; —a malordo; **—aĵoj**, produktaĵoj de la diritaj glandoj.

855 **Endometr-o**, utera mukmembrano; **—ito**, ĝia inflamo.

856 **Endoskop-o**, ilo por la **—io**, t.e. la ekzameno de kavaĵoj kies aperturo estas mallarĝa, ĉefe la veziko.

857 **Endosmoz-o**, osmozo elekstere-internen.

858 **Endoteli-o**, envaza epitelio ; **—a** ; **—omo**, tumoro de l' —o.

859 **Energi-o**, vigleco, fortefiko ; **sen—o** ; **sen—a**, senfortiĝa, malvigla ; **—etika** (F. *Energétique*); **bio —etika.**

860 **Enfosigo** (ĤIR) (F. *Enfouissement*).

861 **Enigilo**, senpintaĵo aldonita al ekstremaĵo de ilo (sondilo, k.t.p.) por faciligi ĝian enkondukon en organon (F. *Embout*).

862 **Enigo**, enkonduko ; **eniĝo**, eniro ; feta eniĝo en la pelveton (F. *Engagement du fœtus dans le petit bassin*).

863 **...eno,** sufikso uzata en ĥemio por la saturataj etilenaj hidrokarbidoj, propileno, buteno, ameno, k.t.p.

864 **Enoftalmio**, stato en kiu la okuloj kuŝas tro profunde en orbitoj.

865 **Enter-o** aŭ **intesto** (v.t.v.) ;**—a** (L. *Intestinalis*). BAKT.: **—okoko** (L. *Enterococcus*). FIZIOL. **—okinazo**, solvebla fermento de la duodena sekrecio. ĤIR. : —a suturo ekstremaĵa (F. *Termino-terminale*), aŭ flanka-flanka (F. *Latéro-latérale*); **—ektomio**, forigo de parto de l' —o; **—oanastomozo** ; **—ofikso** (F. *Entéropexie*); **—oplastiko**, ĥirurgia rekalibrigo de l' —o ; **—otomo**, ilo por **—otomio**,

t.e. sekco de l' —o; —**ostomio**, artefarita aperturo de l' —o je organo aŭ je haŭto. PAT.: —**algio**, —a doloro; —**ohemoragio**; —**ohernio** (L. *Enterocele*); —**oepiplohernio**; —**ito**, —a inflamo; —ito akuta, folikla, ĥoleroforma, kronika, mukoza (F. *Glaireuse*), mukmembrana; **gastro—ito**; —**okolito**; —**optozo**; —**oŝtono** (F. *Entérolithe*); —**ospasmo**; —**ostenozo**; angula faldo (F. *Coudure*); —a barado; intususcepto aŭ invaginacio; paralizo; volvulo; koeficiento de —**otokseco**. TER.: —**oklizo**, —**olavado**; klistero.

866 **Ent-o**; malsana —o (F. *Entité morbide*).

867 **Entofito**, vegetaĵo momente vivanta en la homa korpo. Ekz.: sora mikomiceto.

868 **Entozoo**, interna parazito.

869 **Entropi-o**, enturniĝo de la palpebroj al la okulo; spasma, cikatra —o.

870 **Enukle-o** aŭ —**acio**, modo de eltranĉo ĉu de kelkaj tumoroj, ĉu de okulo (G. *Ausschälung*).

871 **Enurezo**, senvola eligo de urino, nokta —o.

872 **Enzimo**, solvebla fermento.

873 **Eozinofil-o** aŭ —**a ĉelo**, vario de leŭkocito en kiu estas granuletoj koloreblaj per eozino; —**io**, tro da —oj en sango.

874 **Eozinopenio**, malpliiĝo de eozinofiloj en sango.

875 **Epaktala osto** (L. *O. Wormianus*).

876 **Ependim-o**, epitelio de cerba kaj mjela kavoj; —**a**; —**ito**, inflamo de la —a kanalo.

877 **Epidemi-o**, disvastiĝinta infekta malsano; **—a**; **—eco**; **—ologio**, scienco pri —oj.

878 **Epiderm-o** (L. *Epidermis*); **—a**; **—simila** (L. *Epidermoïdes*); **—olizo**, tro facila disiĝo de —o el dermo; **—ofito**, parazito iom simila al triĥofito (F. *Epidermophyton*); **—ofitozo.**

879 **Epididim-o** (L. *Epididimis*); **—a** apendico (F. *Hydatide de Morgagni*); **—ito**, inflamo de l' —o; **—ektomio**, eltranĉo de l' —o; **para-—o.**

880 **Epidural-a** spaco (en la sakra kanalo ekster la meningoj); —a metodo, injektoj en la —a spaco.

881 **Epifiz-o**, dika fino de longa osto; **—a**; **—ito**, ostito doloriga sidanta sur —o.

882 **Epiforo**, senĉesa nevola eliĝo de la larmoj.

883 **Epigastr-o**, supra parto de l'abdomeno; **—a** kavaĵoè.

885 **Epiglot-o**, laringa kovrilo; **—a**; **—ito**, inflamo de l'—o.

886 **Epikanto**, haŭta faldo ĉe naza angulo de l'okulo.

887 **Epikondilo**, parto de la malsupra ekstremaĵo de la humero (L. *Epicondylus*).

888 **Epilepsi-o** (L. *Morbus sacer*); **—a** konvulsio aŭ —a atako; **—ulo**; **—ogena**, kiu estigas —ajn atakojn; **—oforma**, —osimila atako; kontraŭ-—a kuracilo; —a stato (L. *Status epilepticus*); sinsekvaj paroksismoj (F. *Etat de mal*).

889 **Epil-i**, senharigi; **—o**, **—ado.**

890 **Epiplo-o** aŭ **omento** (L. *Omentum*); **—a**; **—fikso** (F. *Omentofixation*); **—hernio** (L. *Epiplocele*); **—ito**, inflamo de l' —o; **—plastiko**, ĥirurgia riparo de l' —o.

891 **Epispadio**, malnormaĵo karakterizata de aperturo de la uretro ĉe la supra surfaco de la peniso.

892 **Epispastik-a** (L. *Epispasticus*); —a papero; —a pomado.

893 **Epistakso**, naza hemoragio.

894 **Epistrof-o** (L. *Epistrophoeus*, A. F. *Axis*); **—a** dento (A. *Odontoid process*); **atlaso—a** artiko.

895 **Epiteli-o** (L. *Epithelium*); **—a**; **—omo**, —a tumoro; —omo boranta, dornoĉela (F. *Spinocellulaire*), rondaĵetoza (F. *Lobulé*), ebena cikatra (F. *Plan cicatriciel*), kalkeca, kankroida, nevuso-ĉela, papiloza, pavimoza (ĉu bazoĉelhava (A. *Ulcus rodens*, G. *Fressendes Geschwür*), ĉu tubetoza (F. *Tubulé*), perloza; **—omozo** (F. *Epitheliomatose*).

896 **Epitroĥleo**, parto de la malsupra fino de la humero, supre de la troĥleo.

897 **Epiziorafio**, ĥirurgia parta vulvovaginfermado.

898 **Epiziotomio**, vulva entranĉo por faciligi la eliron de la feto en kelkaj akuŝoj.

899 **Epizo-o**, surhaŭta parazito; **—otio**, infekta malsano ĉe bestoj.

900 **Epooforo** (L. *Epoophoron*, F. *Corps de Rosen-Müller*).

901 **Epruveto**, glastubeto por eksperimentoj.

902 **Epuliso**, gingiva tumoro.

903 **Erekt-o** (L. *Erectio*); **—a**; **—i**; **—anta** (L. *Erector*); **—igi**; **—iĝi**; **—iĝa** (G. *Erectil*); **—iĝeco**.

904 **Eretism-o**, pliiĝo de nerva tonuseco (ekscitiĝemo) en tuto aŭ parto de l'organismo.

905 **Ereŭtofobio**, malsana timemo ruĝiĝi.

906 **Ergino**, substanco formita en organismo per influo de malsanigaj agantoj kaj kontraŭ ili aganta.

907 **Ergo**, fizika unuo de laboro kaj energio.

908 **Ergografo**, aparato por enskribi la laboron de muskolo.

909 **Ergometro**, aparato por mezuri la laboron de muskolo.

910 **Ergosterino** (F. *Ergostérine*).

911 **Ergot-o sekala** (BOT.) (L. *Sclerotium clavus*, *Claviceps purpurea*, A. *Ergot of Rye*); **—ismo**, venenado per —o; **—ino**, **inino**, **—amino**, preparaĵoj el —o.

912 **Erinjo**, hokoforma ilo uzata en anatomia sekcado (L. *Uncus*, G. *Aerigne*).

913 **Eritem-o**, vario de erupcio (L. *Erythema*); —o balzama, bronza, centrifuga, emocia, ĥrizarobina, indurata, lentoforma, multforma, nodoza aŭ tubera, papula, pelagra, pelagroforma, pernioforma, persistema, ringforma, suna; **—a**.

914 **Eritrasmo**, triĥofitozo kaŭzata de « *microsporon minutissimum* ».

915 **Eritremio** aŭ **policitemio**, tro da ruĝaj sangoglobetoj, ofte kun cianozo kaj lienego.

916 **Eritro** (BOT.), el la familio de Gentianacoj (L. *Erythraea centaurium,* A. *Centaury* F. *Petite centaurée*).

917 **Eritrocito**, ruĝa sangoglobeto kun kerno.

918 **Eritrodermi-o**, ĝenerala haŭtruĝeco; —o antaŭmikoza, denaska, deskvamiĝa aŭ pitiriaza, iĥtiozoforma, primitiva, pseŭdoleŭkemia, sekva (L. *Secundarius*).

919 **Eritroid-a**, ruĝeta (L. *Erythroïdes*); —a lupuso.

920 **Eritrolizo**, solvo aŭ detruado de la ruĝaj sangoglobetoj.

921 **Eritromelalgio**, nerva fingralgio kun ruĝeco de la ekstremaĵo.

922 **Eritromelio**, daŭra akrodermatito atrofianta.

923 **Eritrozo faca**, ruĝiĝemo (sangalfluoj) al vizaĝo pro timemo, k.t.p.

924 **Erizimo** (BOT.) (L. *Erysimum officinale*).

925 **Erizipel-o**, infekta haŭtbrulumo kaŭzita de streptokokoj; bronzkolora —o; —**a**.

926 **Erotomanio**, manio karakterizata de malĉastaj ideoj.

927 **Erozio**, supraĵa ulcer(iĝ)eto.

928 **Erupci-o**, surhaŭta apero de ruĝaĵoj aŭ de veziketoj, k. t. p. — alimenta, artefarita (A. *Artificial*), aŭtotoksa, furunkoza, kuracila, profesia, seruma, ŝajniga aŭ simulata, ŝvita; —**a** febro.

929 **Esenc-o** 1) (ĤEM.), vaporiĝema kaj aroma oleaĵo; 2) —**a** (L. *Essentialis*); —a taĥicardio.

930 **Eserino**, alkaloido de la kalabara fabo.

931 **Eskar-o**, mortiĝinta parto de haŭto (G. *Schorf*); dekubita —o, kuŝvundo; —**igi**; —**iĝi**; —**iĝo**, —formado; —**iga** (L. *Escharoticus*).

932 **Eskulapo**, greka dio de la Medicino.

933 **Eskulino**, glikozido el kaŝtanoj (L. *Aesculus hypocastanum*, F. *Marron d'Inde*).

934 **Esplor-o**, detala pririgardo; elektra —o de muskoloj, de nervoj; perfingra —o (F. *Toucher*); —**ilo**; kanala (uretra, ezofaga, k.t.p.) —ilo, aŭ buĝio.

935 **Espundio**, amerika leŝmaniozo (haŭtmalsano).

936 **Ester-o**, salo de organika acido; —**ifikado** (G. *Esterificierung*); —**acidoj** (G. *Estersäuren*). Ekz.: acida etila oksalo.

937 **Estezi-o**, sentemo, sentokapablo; **hiper—o**, troa —o; **hipo—o**, nesufiĉo da —o; **par—o**, eraroj de la sentoj; **par—a** femuralgio (L. *Meralgia paraesthesica*); —**ogenera** zono (F. *Zône esthésiogène*); —**ometro**, mezurilo por la haŭta sentokapablo; **kript—o**, kaŝita —o.

938 **Estiomeno**, malsano de la vulva mukmembrano, ofte tuberkuloza.

939 **Etan-o**, saturita hidrogena karbido; —**olo**, ĝia alkoholo; —**alo**, ĝia aldehido; —**ata**, aŭ acetata, acido.

940 **Etend-o** aŭ **ekstenso** (v.t.v.); —**igo**; —**ita**, aŭ ekvina piedo; (feta) —iĝinta kapo dum akuŝo (F. *Tête défléchie*, G. *Niedergebogener kopf*).

941 **Eter-o** (L. *Aether*): sulfurata —o; alkoholizita —o; (per)—a anestezio; —**ismo**, veneniĝo per —o; —**omanio**, malsaneca bezono kaj uzo de —o.

942 **Etilen-o** (ĤEM. : $C^2$ $H^4$); tetrajoda —o (L. *Aethylenum periodatum*).

943 **Etil-o** (ĤEM. : $C^2$ $H^5$); —acetato, —alkoholo, —bromido, —karbonato (aŭ uretano), —klorido, —morfina klorido (L. *Aethylmorphinum chlorhydricum*); —nitrito kun alkoholo (L. *Spiritus aetheris nitrosi*); —**ismo**, alkoholismo.

944 **Etiologi-o**, studo pri la kaŭzoj de la malsanoj.

945 **Etmoid-o** aŭ —**osto** (L. *Os ethmoïdale*). ANAT.: Koka kresto (L. *Crista Galli*); flanka apofizo (L. *Processus alaris*) —a labirinto; duonluna fendo (L. *Hiatus semilunaris*); paperaĵa lameno; —aj truoj; nazkonko; hokforma aŭ uncinata proceso. PATOL.: —**ito**, inflamo de l' —o.

946 **Eŭbiotik-o**, fiziologia vivmaniero por la norma, sana kaj feliĉa farto de la homa vivo; —**a**, favoranta la vivon.

947 **Eŭforbio** (BOT.) (L. *Euphorbia*).

948 **Eŭforio**, sentado de bonstato, de bonsaneco.

949 **Eŭgeni-o**, scienco pri la plej bonaj kondiĉoj por bona homa reprodukto; —**a**.

950 **Eŭkaino**, artefarita alkaloido laŭefike simila al kokaino.

951 **Eŭkalipt-o** (BOT.) (L. *Eucalyptus*); **—a** tinkturo; **—olo** ($C^{12}$ $H^{20}$ O).

952 **Eŭnuk-o**, kastrito; **—ismo** aŭ **—eco**; **—a** voĉo.

953 **Eŭritmo**, regula pulso.

954 **Eŭrofeno**, jodido de isobutilortokrezolo.

955 **Eŭstaĥa tubo** aŭ **salpingo** (F. *Trompe d'Eustache*).

956 **Eŭtanazio**, metodo kiu havigas trankvilan kaj sendoloran morton.

957 **Eventracio** (L. *Eventratio*).

958 **Eversio**, patologia eliĝo de muktuniko tra korpa aperturo (natura aŭ ne).

959 **Evolu-o**, disvolvo (L. *Evolutio*).

960 **Evonimino**, ekstrakto el « *Evonymus atropurpureus* ».

961 **Ezofag-o** (L. *Œsophagus*); —a dilato, divertiklo, stenozo; **—ito**, inflamo de l' —o; **peri—ito**; **—ismo**, —a spasmo; **—oskopo**, ilo por **—oskopio**; **—ostomio**, ĥirurgia aperturo de la —o je la haŭto por nutrado de malsanulo.

# F

962 **F**, mallongigo de : 1) Fahrenheit, 2) Faru (L. *Fiat*), en receptoj.

963 **Fabismo**, malsano kaŭzata de faboj.

964 **Fac-o**, vizaĝo. ANAT. : **—a** arterio kun branĉoj lipa suba kaj lipa supra; —a nervo. PAT. : hemi—a paralizo.

965 **Faden-o**, ma'dika fibro por ligi, k.t.p.; **—oza**, —hava; **—forma** (L. *Filiformis*); **—a** kruco, —oj kruce lokitaj en vidilo por sciigi la optikan akson (F. *Réticule*); **—eca** kompakteco (A. *Ropy consistency*, I. *Filante consistenza*).

966 **Fageden-a**, detruanta la ĉirkaŭaĵojn; **—eco** aŭ **—ismo.**

967 **Fagocit-o**, ĉelo kiu englutas kaj detruas mikrobojn, k. t. p.; granda —o (F. *Macrophage*); **—olizo**, solvigo de —oj; **—ozo**, —a agado.

968 **Fajfado laringa** (aŭ **traĥea**) (A. *Whistling*, F. *Cornage*, G. *Keuchen*, I. *Alitare*).

969 **Fajr-o** (L. *Ignis*); **—okaŭterizetoj** aŭ **—opunktetoj** (F. *Pointes de feu*); **—ofungo** (L. *Fungus chirurgorum*); **—ero**; elektra —ero samvalora aŭ koresponda (F. *Etincelle équivalente*).

970 **Fakultativ-a**, nedeviga; —a anaerobiozo.

971 **Falang-o** (L. *Phalanx*); unua, dua —o; **—eto** aŭ tria —o; **—a troĥleo** (A. *Distal extremity*); —a unga tubero (L. *Tuberositas unguicularis*).

972 **Falĉ-ilo** (L. *Falx*); cerba —ilo; **—ilforma**; (kvazaŭ) **—anta** irado ĉe kelkaj hemiplegiu'oj.

973 **Fald-o** (L. *Plica*); uteraj palmosimilaj —oj; intesta angula —o (F. *Coudure* ou *pli de l'intestin*); **re—o** (F. *Repli*).

974 **Falo,** ptozo (v. t. v.).

975 **Fals-a**, pseŭda; —a akuŝo (A. *False pains*

*labour*); **—ado** (A. *Adultération*, G. *Verfälschung*).

976 **Falt-o**, haŭta sulketo ĉe maljunuloj (F. *Ride*).

977 **Fand-i**, fluidigi per varmo; **—iĝo** (L. *Fusio*); **super—iĝo**, stato de korpo kiu momente restas fluida je temperaturo malpli alta ol tiu je kiu norme ĝi malfluidiĝas.

978 **Faner-o**. Haroj, dentoj, ungoj estas —oj.

979 **Farad-** (el Faraday, angla fizikisto) ; **—a** aŭ induktita elektra fluo; **—izo**, uzo ĉe malsanulo de —a fluo; **—o**, unuo de kapacito (v.t.v.).

980 **Farb-o**, materialo por kolorigi; **—a**, kolorigita.

981 **Farcin-o**, haŭta maleo; stumpiga **—ozo**.

982 **Faring-o** (L. *Pharynx*). ANAT.: **—a** fornikso (L. *Fornix pharyngis*, A. *Pharyngeal vault*); —a aperturo de la Eŭstaĥa tubo (A. *Eustachian orifice*); **salpingo—a** faldo (L. *Plica salpingopharyngea*); **—a receso** (F. *Fossette de Rosenmüller*); **—obazilara** fascio; —a tonsilo; muskolo supra konstrikcianta la —on; kun faskoj **pterigo—a**, **buŝo—a, milo—a**, **lango—a**; muskolo salpingo—a; muskolo suba konstrikcianta la —on, kun faskoj **tireo—a** kaj **kriko—a**; arterio —a supreniranta (L. *Art. phar. ascendens*); arterio palata supra. PATOL.:**—ito**, inflamo de —o; **rino** aŭ **nazo—ito**; **post—a** absceso. IL.: **—oskopo**, ilo por **—oskopio**, t. e. vida esploro de —o.

983 **Farmaci-o** (L. *Ars pharmaceutica*); **—a**; **—isto** aŭ **apotekisto**; **poli—ulo**, kiu receptas multajn kuracilojn. (V. Farmak).

984 **Farmak = Farmaci** (v.t.v.): **—ologio**; **—ologo** aŭ **—ologiisto**, —sciencisto; **—opeo** (L. *Pharmacopaea*); **—opea** kodekso.

985 **Fasci-o** (L. *Fascia*); —o iliaka, kribrilforma (L. *Cribrata*), lata.

986 **Fask-o** (L. *Fasciculus*); **—a**; **inter—a**. ELEKT. statika **—eto** (F. *Aigrette statique*); katoda —o.

987 **Fav-o** (L. *Favus*); **—a**; —a tineo, distingebla per siaj —aj pelvetoj (F. *Godets faviques*); **—ulo**, malsanulo trafita de —o.

988 **Faz-o**, periodo; mono—a, du—a, tri—a, poli—a elektra fluo.

989 **Febr-o** (L. *Febris*); **—a** pliiĝo aŭ akriĝo (F *Poussée de fièvre*); **sen—iĝo** (A. *Defervescence*); **—ulo**; —o aftoza, asepsa aŭ sen mikroba, erupcia, flava (H. *Vomito negro*) —o intermita ĉiutaga, ĉiutaga duobla (F. *Double quotidienne*) tercia, tercia duobla, kvartana (L. *Quartana*), kvintana, sestana, septana, k.t.p.; —o laktosekrecia, Malta, neregula (L. *Erratica*), rekuranta (L. *Recurrens*), remita, somera, tifoida, unutaga aŭ efemera; **kontraŭ—ilo**, **kontraŭ—a** kuracilo **—iga**, —odona (F. *Pyrétogène*); **sen—a** **sen—eco**, apiretikeco; rapida **sen—iĝo** (F (*Défervescence rapide*).

990 **Fek-o**, **—ado** (L. *Defecatio*); **—a**; **—aĵo**, koto; **—aĵa** (L. *Alvinus*); **—i**; **—osimila** (F. *Fécaloïdes*); **—ofaciliga** (L. *Eccoproticus*).

991 **Fekund-a**, naskopova; **mal—a**; **—eco**; **mal—eco**, senfrukteco; **—igo** (L. *Fecundatio*); **super'—igo** (F. *Superfécondation*); antaŭa —iga influo (A. *Impregnation*, G. *Buchtung*).

992 **Fekul-o** (L. *Foecula*); **—riĉa** nutraĵo (F. *Féculent*).

993 **Felandri-o** (L. *Phellandrium*); **—ino**, alkaloido de —o.

994 **Felĉero** (G. *Feldscher*), speco de flegisto (en kelkaj landoj) kiu metas kupojn, sin okupas pri klisteroj, helpas al la kuracistoj.

995 **Femur-o**, supra parto de la suba ekstremaĵo (de la kokso ĝis la genuo); **—a**; **—ingo**, proteza aparato por —o (F. *Cuissard*). ANAT.: **—osto** (v.t.v.). Muskoloj: iliopsoasa, kun partoj iliaka, psoasaj granda kaj malgranda; piriforma (L. *Piriformis*) aŭ piramida; Sartoria; kvarkapa (F. *Triceps fémoral*); rekta (L. *Rectus femoris*); vasta intermeza (A. *Crureus*, F. *Crural*); artika de la genuo (A. *Subcrureus*); gracila (F. *Droit interne*); aduktora longa, mallonga, granda, plejmalgranda (L. *Adductor longus, brevis, magnus, minimus*); kanalo de l'aduktora muskolo (A. *Hunter's canal*); lakuno aŭ longforma ingo de la vazoj; ——a triangulo (A. *Scarpa's triangle*);

ovala foveo; falĉilforma rando. Arterioj : —a (L. *Femoralis*, F. *Crurale*); epigastra surfaca; skrotaj antaŭaj; lipaj antaŭaj; ĉirkaŭfleksa flanka de la —o; supra de la genuo (L. *Art. genu suprema*, F. *Grande anastomotique*). Nervoj: haŭto —a flanka (L. *Cutaneus femoris lateralis*, A. *External cutaneous*, F. *Fémoro-cutané*); —a (L. *Femoralis*, A. *Anterior crural*). Safena vejno.

996 **Femurost-o**, osto de la femuro. ANAT. : —a kolo; foveo de —a kapo; troĥantera foveo; aspera aŭ malglata linio kun flanka kaj meza lipoj; pektena linio; gluta tubero (L. *Tuberositas glutea*, A. *Gluteal ridge*, F. *Crête du grand fessier*); interkondila foveo; interkondila linio (A. *Patellar surface*); poplita platajo (L. *Planum popliteum*, A. *Tibial surface*).

997 **Fenacetino** ($C^{10}$ $H^{13}$ Az $O^{2}$ (L. *Phenacetinum*).

998 **Fend-o**, mallarĝa laŭlonga truo; **—eto** (L. *Fissura*) : **haŭt—eto** (A. *Crack*, F. *Crevasse*, G. *Spalt, Riss*); mukmembrana —eto; **—etiĝi** (G. *Aufspringen*); **frost —eto** (A. *Chap*, F. *Gerçure*, G. *Schrunde*, I. *Spiccatura*); **fendopareco**, —a segmenta reproduktado (F. *Scissiparité*).

999 **Fenilureo**, karbanilamido (F. *Phénylurée*).

1000 **Fenkolo** (BOT.) (L. *Foeniculum dulce*, A. *Fennel*, F. *Fenouil*, G. *Fenchel*, H. *Hinojo*, I. *Finocchio*).

1001 **Fenogreko** (BOT.) (L. *Trigonella foenum graecum*, G. *Bockshorn*).

1002 **Fenol-o** aŭ **karbolo**; **—ata** acido (A. *Phenol*); **—ato** (F. *Phénate*); **—ftaleino**.

1003 **Fenomen-o**, aperaĵo; la t. n. « —o de la fingroj » ĉe la hemiplegiuloj estas streĉo de la interostaj muskoloj, en paralizita mano, kiam la malsanulo provas levi la paralizitan brakon; **epi—o**, aldona —o.

1004 **Fenosalilo**, vario de antisepsa miksaĵo.

1005 **Feripirino**, kombinaĵo de antipirino kaj de seskviklorido de fero.

1006 **Ferment-i**, malkomponiĝi sub la influo de **—ilo**, vorto uzebla ĉu por la enzimoj, ĉu por la **—igaj** mikroboj (acetacidiga bakterio, k.t.p.); **—inta** (F. *Fermenté*); **—o**, **—eco**, **—iĝo** (L. *Fermentatio*); **—igi** (F. *Faire fermenter*); **—ema**; **fibrin—o** aŭ trombazo, substanco kiu malhelpas la sangokoagulon.

1007 **Ferm-i**; **mal—o**, aperturo (L. *Hiatus*); kuracado per **mal—ita** pordo, speciala sistemo por kuraci kelkajn frenezulojn (A. *Opendoor treatment*); **mal—iĝo**, **ekmal—iĝo** (L. *Dehiscentia*).

1008 **Fer-o**; **—a**; **—ato** ($FeO^3$); **—ata** sulfato (F. *Sulfate ferrique*); —o reduktita; —a arseniato, hipofosfato, hiperklorido (L. *Ferrum chloratum*); kalia **—ocianido**; —a hidrata sulfato (L. *Sulfuratum hydratum*); —a sulfato (L. *Ferrum sulfuricum*); **—eca** tinkturo de Marto;

**—okoniozo** aŭ siderozo, kiam en pulmoj estas multe da —a polvo.

1009 **Fet-o,** antaŭnaska (enutera) ido; ŝtoniĝinta aŭ kalkiĝinta —o, litopediono; —o kun ĝiaj alpendaĵoj en utero (F. *Faix*); **—a**; —a entenaĵo, eniĝo de fekundigita ovulo en alian ovulon samtempe fekundigitan kie ĝi formas tumoron (F. *Inclusion fœtale*); **super—ado** aŭ **super—acio** (L. *Superfœtatio*).

1010 **Fetor-o,** malbonodoro, **—a.**

1011 **Fibrin-o** (A. G. *Fibrin*); **—a**; **—eca**; **—iga** (F. *Fibrinogène*); **—odiagnozo; —urio,** —o en urino; **sen—igi**, forigi la —on el la sango k. t. p.

1012 **Fibr-o**, hista fadeno; **—a**, **—eca**; **—eto** (L. *Fibrilla*); **—eta**; **—oĉela**; **—okartilago**; **—omo** (v. t. v.).

1013 **Fibrom-o,** tumoro el fibra histo; **—iomo** tumoro el fibra kaj muskola teksaĵo; **lipo—o**; **poli-—ozo**; **—ektomio**, eltranĉo de utera —o lasante la uteron (A. *Myomectomy*).

1014 **Fibul-o** (L. *Fibula*, F. *Péroné*, G. *Wadenbein*). ANAT.: Antaŭa, flanka, meza krestoj; stiloida apofizo (L. *Apex capituli fibulae*).

1015 **Fiks-i,** fari ion ne movebla; **—o, —ado, —eco; —a,** stara; **—ata; —anta** (A. *Fixating*, F. *Fixateur*); **—ada** absceso; **—adareago**; patela **ringe—(ad)o** (F. *Cerclage de la rotule*).

1016 **Filaks-o,** defenda povo de organismo kontraŭ kelkaj venenoj (ĉefe neŭrotoksinoj) aŭ arte-

farita ĉela nepenetrebleco por la venenoj; **sen—o** (F. *Aphylaxie*); **ana—o** (F. *Anaphylaxie*); sera **aŭtoana—o**; **ana—iga** injekto (F. *Injection préparante*); **antiana** aŭ **kontraŭāna—o** (F. *Antianaphylaxie*).

1017 **Filament-o,** fadenforma elemento; **—a**; **—oza**; **—oforma**.

1018 **Filari-o,** tropika parazita vermo; Medina —o (A. *Dracunculus*, F. *Dragonneau*); **—ozo.**

1019 **Filik-o** (L. *Filix*, A. *Fern*, F. *Fougère*, G. *Farnkraut*. H. *Helecho*. I. *Felse*); **vir—o** (A. *Male fern*); **—ata** acido (F. *Acide filicique*).

1020 **Filtr-i,** purigi fluidaĵon gutigante ĝin tra sorba papero, vato, k.t.p. **—ilo**; **—o**, **—ado**; **—aĵo**.

1021 **Fimbriata** aŭ franĝa korpo (L. *Fimbriatus*, F. *Corps godronné*, G. *Gefranst*).

1022 **Fimoz-o** (L. *Capistratio*, A. *Phimosis*, G. *Vorhautverengerung*); **para—o**.

1023 **Fingr-o** (L. *Digitus*); **—a**; **—ingo** (F. *Finger cot.*, F. *Doigtier*, G. *Fingerling*, H. *Dedal*, I. *Ditale*); **—oforma aĵo** (A. F. *Digitation*, G. *Fingerförmige Ausbreitung*). ANAT.: **Man—oj** : **dik—o** aŭ polekso, montra —o aŭ indekso, meza —o, ringa —o, orel—o aŭ malgranda —o. **Pied—oj** : **dikpied—o** aŭ halukso, dua, tria pied—o. Ingaj ligamentoj de la —oj (A. *Vaginal ligaments*, F. *Gaînes synoviales*). Fingraj flankaj arterioj. Muskoloj etendantaj la —ojn; abduktoroj longa kaj mallonga de la polekso, de la

halukso. Malnormaĵoj: **mikrodaktilio** aŭ **malgrand—eco**; ektrodaktilio; braĥidaktilio, denaske-nesufiĉa kreskado de unu aŭ kelkaj —oj; **mult—eco** aŭ **polidaktilio** (Ekz.: **ses—eco**; **ses—ulo**); martelforma pied—o (L. *Hallux malleus*, A. *Hammer toe*, F. *Orteil en marteau*). PATOL.: —absceso; risorta —o (L. *Digitus saltans*, A. *Trigger finger*); kvazaŭmorta —o (L. *Asphyxia digiti*, F. *Doigt mort*).

1024 **Finsenterapio**, metodo de kuracado per lumo laŭ Finsen, dana kuracisto.

1025 **Fistul-o**, malsaneca kaj mallarĝa kanalo kondukanta puson, salivon, fekaĵon, k.t.p.; —o kompleta aŭ duapertura; nekompleta aŭ unuapertura; unuapertura rektuma (F. *Borgne interne*); unuapertura haŭta (F. *Borgne externe*); **—a**, **—eca**; **—oza**, mult—a; —a vojiro (F. *Trajet fistuleux*).

1026 **Fisur-o**, fendeto; anusa —o.

1027 **Fiŝoleo**, oleo fabrikita el hepato de fiŝo, preferinde de moruo.

1028 **Fitoterapio**, kuracado per vegetaĵoj.

1029 **Fitozoo** (L. *Phytozoum*).

1030 **Fizik-o** (G. *Physik*); **—a**; **—oĥemio**; **—oterapio**, kuracado per la —aj agentoj.

1031 **Fiziolog-io** (L. *Physiologia*); **—ia**; **—o** aŭ **—iisto.**

1032 **Fizionom-io** (L. *Physiognomia*).

1033 **Fizometrio**, gaso en utero.

1034 **Fizostigm-o** aŭ Kalabara fabo (BOT.); **—ino**, ĝia alkaloido.

1035 **Flagel-o** aŭ vipeto, moviĝanta filamento de la tripanosomoj, k.t.p.; **—havaj** (F. *Flagellés*); **cilio—havaj** (A. *Ciliated flagellate*).

1036 **Flank-o**, ĉiu parto aŭ surfaco de objekto inter la supra kaj la malsupra; **—a**; **du—a** (L. *Bilateralis*); **kun—a** (L. *Collateralis*); **—aĵo**, alpendaĵo; utera **—eflekso** (F. *Latéro-flexion*); **—eversio** (F. *Latéro-version*); **—efarata** operacio (A. *Lateral operation*); toraka —o; abdomena—o (A. *Flank*, F. *Flanc*, G. *Bauchseite*).

1037 **Flar-o**, flarsento; **—ado**, olfakto; **sen—eco**, anosmio; **hipo—eco**, hiposmio; neĝusta—eco, alotriosmio; **brue en—i** (F. *Renifler*).

1038 **Flatulenco**, gasa produktado en digestaparato.

1039 **Flav-a** (L. *Flavus*); —a febro (H. *Vomito negro*); —a korpeto (L. *Corpus luteum*).

1040 **Fleb-o** aŭ **vejno**; **—ito**, inflamo de vejno; **endo—ito**; **peri—ito**; **—oŝtono**; **—otomo**, ilo por **—otomio**, t.e. sangeltiro; **—ektazio**, daŭra dilato de vejno.

1041 **Fleg-i**, zorgi pri vundulo aŭ malsanulo; **—isto**; **—istino**.

1042 **Flegmazi-o**, ŝvela inflamo; blanka doloriga —o (L. *Phlegmasia alba dolens*); **—a.**

1043 **Flegmon-o**, abscesego, etendita pusa inflamo; mallimigata —o (F. *Phlegmon diffus*).

1044 **Fleks-o** (A. *Flexion*, G. *Biegung*); **—eto** (F. *Inflexion*); **—aĵo** (A. *Flexure*, F. *Courbure*); **—anta** muskolo aŭ **—oro**; utera **antaŭ —o**, **flanke —o**, **poste—o**.

1045 **Flikten-o**, inflama veziketo sur haŭto aŭ mukmembrano; **—a**; **—forma**; **—ozo** reaparanta ĉe ekstremaĵoj, vario de haŭtmalsano; **—oza** konjunktivito.

1046 **Flok-o** (L. *Floccus*); **—eto**; **—eta** (L. *Floccosus*); **—ado**, **—ulacio**, **—etiĝo**, formado de —etoj en likvaĵo; **de—adi**, **de—uli** (G. *Deflocken*).

1047 **Florizin-o**, glukozido eltirita el radikoj de pomujo, prunujo, ĉerizujo. (F. *Phlorizine*).

1048 **Flor-o** (L. *Flos*); kontraŭtusaj —oj (F. *Fleurs pectorales*); kvar —oj por tizano, miksaĵo de malvoj, alteoj, violoj, papavetoj; **sen—igo**, malvirgigo; —a tuberkulozo (L. *Tub. floridans*).

1049 **Flugil-o** aŭ Alo (ANAT.) (A. *Ala*); nazaj —oj; **—a**.

1050 **Fluid-a** (L. *Fluidus*); **—aĵo**; **—iganta**; **—iĝi**; **mal—iĝi**, koaguli; sanga **mal—iĝo** aŭ koagulo; **mal—iga**; **mal—igeco**; **mal—aĵo**, koagulaĵo; **mal—aĵeto** (L. *Grumus*).

1051 **Fluktuado**, movado de fluidaĵo (sango, puso, k.t.p.) sub la premo de fingroj.

1052 **Flu-o** (A. *Current*, G. *Strom*); elektra —o; **aer—o**; **el—o** (A. *Flow*. *Discharge*, F. *Ecoulement*. G. *Ausfluss*. I. *Flusso*); gala **el—ego**

(F. *Débordement de bile*) ; **el—aĵo**, likvaĵo elfluinta (L. *Effusio*) ; blanka el—aĵo, leŭkoreo ; **en—o** (F. *Epanchement*) ; **for—o** (F. *Dégorgement*) ; **re—o** (L. *Reflux*) ; **al—o**, **al—ego** (L. *Affluxus*) ; **sen—eco**, stazo (H. *Estagnacion*).

1053 **Fluoresceino**, produktaĵo el rezorcino varmigita kun ftalika acido senakva.

1054 **Fluoresk-a** (A. *Fluorescent*) ; **—eco**.

1055 **Fluor-o**, ĥemia elemento: Fl ; **—ido** (F. *Fluorure*); **—hidrata** acido (F. *Acide fluorhydrique*); **—osilikato**; **—ometro**; **—oskopio**, esplorado per —eskeco.

1056 **Fobi-o**, patologia timo ; **foto—o**, lumtimo (G. *Lichtscheŭ*); **eritro—o**, timo ruĝiĝi.

1057 **Fokus-o**: 1) (FIZ.) (L. *Focus*, G. *Brennpunkt*, I. *Focolare*); **—a** (A. *Focal*); 2) (PATOL.) inflama centro.

1058 **Folikliso**, vario de haŭta foliklitaro, ankaŭ nomata papulonekrotikaj tuberkulidoj.

1059 **Folikl-o** (L. *Folliculus*); harsebuma —o (F. *Follicule pilo-sébacé*); intestaj fermitaj —oj (F. *Follicules clos*); **—ito**, inflamo de —o ; —itoj akraj, malprofundaj, pusecaj, senharigantaj, triĥofitaj, k.t.p. ; **peri—ito**.

1060 **Foment-o**, **—ado** (L. *Fomentatio*); **—aj** kompresoj.

1061 **Fonacio**, produktado de la voĉo (G. *Stimmbildung*).

1062 **Fonendoskop-o**, ilo por **—io**, t.e. aŭskultado de internaj organaj tonoj.

1063 **Fontanelo**, mola parto de kranio ĉe tre junaj infanoj.

1064 **Fonto** (L. *Fons*, G. *Brunnen*).

1065 **Forameno**, orifico aŭ kavaĵeto (L. *Foramen*).

1066 **Forceps-o**, akuŝigilo; **—brako** (F. *Branche du forceps*); **—dismezurilo** (por mezuri la interspacon de la brakoj de la —o (A. *Labidometer*. G. *Zangenmesser*).

1067 **Forig-o** (L. *Abolitio, Extirpatio*); **—i**; **antaŭ—a** (F. *Préventif*); **—anta** (G. *Entfernend*, H. *Fundente*); **—ebla** (A. *Removable*, F. *Amovible*, G. *Absetzbar*); **ne—ebla** (F. *Inamovible*); —ebla kaj ne—ebla aparato (F. *Appareil amovo-inamovible*).

1068 **Forĵet-aĵoj**, defalaĵoj, senutilaĵoj (F. *Déchets*); **—ejo**, rubejo (F. *Voirie*).

1069 **Formaldehido**, hidrido de formilo, aŭ formolo (v.t.v.).

1070 **Formalino**, solvaĵo po 40 % de formaldehido en akvo.

1071 **Formeno**, gaso de la marĉoj.

1072 **Formiat-a** aŭ formika acido (G. *Ameisensäure*); **—o**.

1073 **Formiksento**, formika tiklado (G. *Ameisenlaufen, Kribbeln*).

1074 **Formil-o** ($C^2$ $HO^2$) (G. *Formyl*): **—hidrido** aŭ formaldehido.

1075 **Form-o**, ekstera aspekto; **—ado** (L. *Formatio*); **—ogenero** (F. *Morphogénie*), **malbon—a** aŭ **de—ita**; **de—i**, aliformi, difekti; **de—o**, **de—eco**; **de—igo**; **de—iĝo**; hakilfrapforma de—o en kelkaj ostrompoj (F. *Déformation en coup de hache*); **vari—a** (F. *Protéiforme*); **mult—a**, **poli—a**; **mult—eco**, **poli—ismo**.

1076 **Formol-o** ($H^2$ CO), antisepsa gaso.

1077 **Formul-o** (L. *Formula*); **—aro**, kolekto de —oj.

1078 **Forniks-o**, arkaĵa parto: cerba, vagina —o. ANAT. de la cerba —o (F. *Trigone cérébral*); kruro de la —o (L. *Crus fornicis*); kolonoj (L. *Columna fornicis*, A. *Anterior pillars*): ekstera parto (L. *Pars libera*); interna parto (L. *Pars tecta*); diafana septumo kun ĝia kavo.

1079 **Fort-o** (L. *Vis. Potentia*); **post—o**, demalantaŭa —o (L. *Vis a tergo*); **—a**; **—iga**; **—odona**; **—igaĵo**; **re—igilo**; **sen—eco**, **mal—eco**, astenio; **mal—a** (L. *Debilis*); **ne—a** (L. *Discretus*); **sen—iga**, eluzanta la —ojn; **sen—iĝo** (L. *Debilitatio*); **sen—iĝeco**, senenergio (L. *Languor*); **tutsen—iĝo** aŭ **—elĉerpiĝo** (L. *Exhaustio*, A. *Debility*, F. *Epuisement*, G. *Erschöpfung*, I. *Rifinimento*).

1080 **Fosfeno**, lumsento per kunpremo de okulo.

1081 **Fosf-o**, mallongiĝo de fosforo (v.t.v.); **—ato**; **bi—ato**; **—ata** acido (L. *Ac. Phosphoricum*); **—ito**; **hipo—ito**; **—ita** acido (L. *Ac. Phosphorosum*); **—ido** (A. *Phosphide*, F. *Phos-*

*phure*); —**aturio**, ĉeesto de tro da —atoj en urino; **hipo—aturio**, nesufiĉe da —atoj en urino.

1082 **Fosfor-o**, ĥemia elemento: Ph (v. Fosfo); —**a**; —**eca**; —**eska**, kiu briletas malgraŭ mallumo; —**eskeco**, —**ebrileco**; kalia —**ovolframato** (F. *Phosphotungstate de potassium*).

1083 **Fosgeno**, oksiklorido de karbono (CO $CL^2$).

1084 **Fos-o**, —**eto**, —**aĵo**, kavaĵo; **en—o**, **en—igo**, kaŝo, ĥirurgia metodo por kelkaj stomak-ulceroj (F. *Enfouissement*).

1085 **Fot-o**, lumo; —**ofobio**, lumtimo (G. *Lichtscheu*); —**ometro**, ilo por mezuri la intensecon de la lumo; —**ometrio** (*Lichtmessung*); —**opsio**, perturbo de la vidado karakterizata per vido de fajreroj; —**oterapio**, kuracado per lumaj radioj (Ekz.: radioj ruĝaj, aŭ devenantaj de la voltaika arko).

1086 **Fove-o**, kavaĵeto; retina centra —o (L. *Fovea centralis*); —**eto**.

1087 **Fragment-o**, parto de io; —**a** spirado (F. *Respiration saccadée*); **mult—a** ostrompo (F. *Fracture comminutive*).

1088 **Frakseno** (BOT.) (L. *Fraxinus*, A. *Ash tree*, F. *Frêne*, G. *Esche*).

1089 **Fraktur-o**, ostrompo (v. Osto).

1090 **Frambezi-o** (F. *Pian*, G. *Framboesia*); tropika, Brazilia —o.

1091 **Frangolo** (BOT.) (L. *Rhamnus frangula*, A. *Alder Backthorn*, F. *Bourdaine*).

1092 **Franĝ-a**, fimbriata (v.t.v.).

1093 **Frankliniz-o**, kuracado per statika elektro; hertza —o; —**i**.

1094 **Frap-o** (L. *Ictus*); **sun—o** (L. *Ictus solis*); —**etado**, vario de masaĝo (F. *Tapotement*).

1095 **Frekvenc-o**, ofteco; —**a** pulso; **tre—a** aŭ **alt—a** elektro; —**omezurilo**.

1096 **Fremit-o** (L. *Fremitus*, G. *Schüttern*); kata —o ĉe koro; hidatida —o; vibra —o.

1097 **Frenez-a**, mensmalsana (L. *Demens, Amens*); —**eco** (L. *Insania*); **frua —eco** de la viriĝo, hebefrenio; —eco alterna, cirkla (laŭvice mania kaj melanĥolia), duopa (F. *Folie a deux*); melanĥolia; —eco de dubo; —**ulo** (trankvila aŭ kontraŭe furioza); —**uldomo**, —**ulejo**; —**isto** aŭ psiĥiatro; —**eto**; —**ego** (F. *Frénésie*); —**jako** aŭ perforta jako; (momenta) —a foriro (F. *Fugue*); —a kuracado per malfermita pordo, per senbridila observo (A. *No restraint*). (V. ankaŭ Psiĥozo).

1098 **Frenik-a**, kiu rilatas al la diafragmo; —a nervo; arterio —a, malsupra kun branĉoj surrenaj supraj.

1099 **Frenologi-o**, ŝajna scienco pri cerbo kaj kranio enkondukita de Gall.

1100 **Frigorio**, unuo de mezuro de malvarmigado.

1101 **Frost-o**, malvarmo; —**otremo** (L. *Rigor*, F. *Frisson*); —**oŝvelo** aŭ pernio (A. *Chilblain*, F. *Engelure*, G. *Frostbeule*); —**ovundo** (F. *Gélure*); —**iĝo**.

1102 **Frot-o**, **—ado** (L. *Frictio*).
1103 **Frukt-o** (L. *Fructus*); **sen—eco**, sterileco.
1104 **Frunt-o**, supra parto de la vizaĝo; Olimpa —o, ĉe kelkaj sifilulidoj; **—a**; —a premsento (F. *Sensation de barre frontale*). ANAT. de la **—osto** (L. *Os frontale*); supra orbita rando; —a spino; zigoma apofizo; tempiosta linio; **—osta** tubero; glabelo (L. *Glabella*): troĥlea foveo; etmoida truo.
1105 **Ftalein-o**, organika substanco, speco de kolorajô.
1106 **Ftiz-o** (L. *Phtisis*); galopanta —o; **—ulo**; **—ologio**; **—urio**, vario de kadukeco. Ekz.: ĉe kelkaj kazoj de sukera diabeto.
1107 **Fuko** (BOT.) (L. *Fucus*, A. *Seaweed*, G. *Seetang*).
1108 **Fuksino**, ruĝkolorajo el anilino.
1109 **Fulgaĵoj** aŭ **fulgonigraĵoj**, surdentaj fulgokoloraj sedimentoj.
1110 **Fulguracio**, terapio per specialaj elektraj fajreroj.
1111 **Fulm-o** (L. *Fulmen*); **—akcidentoj**; (**kvazaŭ**) **—aj** doloroj en la tabeso (A. *Lightning pains*, F. *Douleurs fulgurantes*); (kvazaŭ)—a apopleksio.
1112 **Fumari-o** (BOT.) (L. *Fumaria officinalis*, A. *Fumiter*, G. *Erdrauch*).
1113 **Fumigacio**, kuracvaporaĵo.
1114 **Fund-o**, bazo, grundo; okula —o; utera —o.
1115 **Fung-o** (BOT.) (L. *Fungus*, A. *Mushroom*, F. *Champignon*, G. *Pilz*, H. *Seta*); **—a** fibretaro (L. *Mycelium*); **fajro —o** (L. *Fun-*

*gus chirurgorum*); **—eca** aŭ **—oza** artrito tuberkulosa, sifila; **—aĵo** aŭ **—ecaĵo** (F. *Fongosité*); **—oida**; **—oidaĵo**; **—oforma**.

1116 **Funikl-o** (L. *Funiculus*); sperma —o; **—a** arterio; **—ito**, inflamo de la sperma —o; mjelaj —oj.

1117 **Funkci-o**, agado de organo; glikoziga —o; **—ado**; **hiper—ado**; **hipo—ado**; **—adhaltigo** (L. *Inhibitio*); **ek—igi**, elklikigi; (elektra) aŭtomata **ek—igilo** (F. *Déclancheur automatique*).

1118 **Furfur-o**, epiderma branaspekta skvameto; **—eca**; **de—ado**, deskvamiĝo.

1119 **Furfurolo**, oleo el brano.

1120 **Furunk-o** (L. *Furunculus*); **—ozo**, **—a** erupcio; (filamentoza) ŝlimo (L. *Ventriculus furunculi*, A. *Core*, F. *Bourbillon*).

1121 **Fuska lameno**, parto de la sklerotiko (L. *Fusca lamina*).

1122 **Fuzoform-a**, ŝpinilforma; **—aj** ĉeloj.

1123 **Fuzo-spirila** asocio (F. *Association fuso-spirillaire*).

# G

1124 **Gadinata** acido, graseca acido trovata en la morua hepatoleo.

1125 **Gadoleo** aŭ moruoleo.

1126 **Gaduino**, bruna substanco senodora eltirata el gadoleo ($C^{70}$ $H^{46}$ $H^{18}$).

1127 **Gajl-o** (L. *Galla*, A. *Nutgall*, G. *Gallapfel*); **—ata acido** (L. *Ac. gallicum*); **oksijodo—ato** de bismuto (F. *Airol*).

1128 **Galakt**... komenco de vorto kiu signifas Lakto (v.t.v. preferindan por la derivaĵoj).

1129 **Galango** (BOT.) (L. *Galanga*).

1130 **Galbano**, gumrezino (L. *Galbanum*).

1131 **Gal-o** (L. *Bilis*); **—aj** vejnoj; —aj aŭ biliferaj kanaloj; **—oza** (A. *Bilious*, G. *Gallig*); **—veziko** aŭ ĥolecisto; **—litiazo** aŭ **—ŝtonozo**; **sen-—eco** aŭ **aĥolio**, interrompo de —a sekrecio; **poli—eco** aŭ **poliĥolio**; **—fluiga**, ĥolagoga, kiu faciligas la eliminon de la galo; **—produktiga**, ĥolereza, kiu incitas la hepatajn ĉelojn al pli forta produktado de galo; **sen-—urina** iktero (F. *Ictère acholurique*); **—sanga** aŭ **bilifeika** iktero, kaŭzata de transiro en sangon de la normaj —aj elementoj; **—kanalito**, angioĥolito, inflamo de la —aj kanaloj. V. ankaŭ Bili... kaj Ĥolangito, Ĥolecisto, Ĥoledoko, k.t.p.

1132 **Galopanta**, rapidege evoluanta.

1133 **Galvan-a** (ELEKT); —a aŭ kontinua fluo; **—izi**, uzi —an fluon ĉe malsanuloj; **—izo**; **—ofaradizo**, samtempa uzo de kontinua kaj farada fluoj; **—ometro**; **—oskopo**, ilo por **—oskopio**; **—okaŭtero**, ilo por **—okaŭterizo**.

1134 **Gambo**, nerekomendinda vorto uzata k.k.f. por « femuro kaj kruro ».

1135 **Gangli-o** (L. *Ganglion nervosum*); **—oforma** plekso (F. *Plexus gangliforme*); stelforma —o (F. *Ganglion étoilé*).

1136 **Ganglion-o**, limfa adeno; **—ito** aŭ adenito, inflamo de —o; **—omo**, tumoro de —o (L. *Ganglioma*).

1137 **Gangren-o** (L. *Gangraena*); —o buŝa (F. *Noma*. G. *Wasserkrebs*), diabeta, grada de la ekstremaĵoj (F. *Gangrène progressive des extrémités*), senila aŭ maljuneca (L. *Senilis*), simetria, spontanea.

1138 **Gardenalo**, farmacia specialaĵo (fenil-etil-malonilureo).

1139 **Gargar-i**, tralavi la buŝon aŭ gorĝon per la fluidaĵo kiun la gargaranto skuas en ĝi; **—aĵo**, **—ilo**.

1140 **Gargulbruo** (A. *Rumbling*, F. *Gargouillement*, H. *Mormullo*, I., *Gorgogliamento*).

1141 **Gas-o** (FIZ.); stomaka, intesta —o; **—a** ŝveleco; **—dona** pulvoro (A. *Soda powder*).

1142 **Gasser'-a ganglio**, parto de trigemela nervo; **—ito**, inflamo de tiu ganglio.

1143 **Gast-o** (A. *Host*); provizora **—iganto** (por tiu aŭ alia parazito); senĉesa aŭ malprovizora —iganto (F. *Hôte définitif*).

1144 **Gastr....** komenco de vorto kiu signifas stomako. ANAT.: **—oduodena**, **—ohepata**, **—ointesta**, **—oomenta**. PAT.: **—algio**; **—ito**, stomakinflamo; **—oenterito**; **—ohernio**; **—opatio**;

**—optozo**; **—oragio**, stomaka hemoragio. ĤIR.: **—ektomio**, parta fortranĉo de stomako; **—ofikso** (F. *Gastropexie*); **—otomio**; **—ostomio**, starigo de stomaka daŭra haŭtaperturo; **—oenterostomio.**

1145 **Gastrul-o**, dua periodo en la kreskado de la blastodermo; **amfi—o.**

1146 **Gaz-o**, maldensa tolo; asepsa —o; zinkhiperoksida —o.

1147 **Gelaten-o** (G. *Gallert*); **—a**, **—eca**; **viand—aĵo**; **—oforma**, **—kompakteca**; **—iĝo.**

1148 **Gelozo**, kulturmedio por bakterioj, k.t.p.

1149 **Gelulo**, gelatena envolvilo por medikamentoj.

1150 **Gelsemio** (BOT.) (F. *Gelsemium*).

1151 **Genciano** (BOT.) (L. *Gentiana*, G. *Genzian*).

1152 **Gener-i**, naski, produkti; **—anto**; **—a** (L. *Genitalis*); —aj organoj viraj, virinaj; **—o**, **—ado** (L. *Generatio*); —o-urina aparato aŭ organaro; **re—o** (L. *Regeneratio*).

1153 **Genez-o**, deveno; **aŭto—o.**

1154 **Geni...** en kombinoj=mentono; muskoloj **—oglosa** (L. *Genioglossus*); **—ohioida**, **—ofaringa.**

1155 **Genisto** (BOT.) (L. *Genista*, A. *Broom*, F. *Genêt*, G. *Ginster*).

1156 **Genro** aŭ **gento**, specaro (BOT. ZOOL.) (L. *Genus*).

1157 **Genu-o** (L. *Genu*); **—ingo** (F. *Genouillère*); pozicio —brusta (F. *Position genu-pectorale*); **—eca** ganglio (L. *G. geniculatum*). ANAT.

DE LA —O : Sinovia faldo patela flanka (L. *Plica synovialis patellaris*); flugilaj faldoj (L. *Plicae alares*); ligamentoj ekstera fibula, interna tibia, poplita oblikva, poplita arkeca kaj ĝia bridilo (L. *Retinaculum*); patela tendeno; bridiloj horizontala, meza, flanka de la pateloj. Arterioj: supra flanka de la —o, supra mezaĵa, meza, suraj; artika retaĵo. PAT.: —o valguma, varuma, kurba (L. *Recurvatum*); valgumulo (F. *Cagneux*); tuberkuloza artrito de la —o, vulgare nomata «blanka tumoro».

1158 **Geofagio**, manĝado de tero.

1159 **Gerani-o** (BOT) (L. *Geranium*).

1160 **Germandro** (BOT.) (L. *Teucrium*, H. *Escordio*, I. *Camedrio*).

1161 **Gero...**, komenco de vorto kiu signifas « maljunula »; **—dermio**, haŭta stato kvazaŭ ĉe maljunuloj; **—morfismo**, formo de histo, de organo, same kiel ĉe maljunuloj; (kornea) **—rondo** (L. *Arcus senilis*).

1162 **Gest-o**, movo de mano, de brako akompananta la paroladon aŭ ĝin anstataŭanta. **Fuŝ—ado**, malordoj de **—ado** en kelkaj cerbmalsanoj; **sen—ado**, (F. *Amimie*); **—onekapableco**, neeblo fari —ojn; **—onekompreno** (F. *Amimie réceptive*).

1163 **Gigantismo**, grandegeco.

1164 **Gimnastiko** (G. *Gymnastik*).

1165 **Ginatrezio**, mallarĝeco de vagino aŭ de utera kolo.

1166 **Ginekolog-io**, studo de la malsanoj de la virinseksorganoj; **—o** aŭ **—iisto**, specialisto en —io.

1167 **Ginekomasti-o**, stato de viro kun mamoj similaj al tiuj de virino; **—ulo**.

1168 **Gingiv-o**, denta karno; **—ito**, inflamo de —o; dentelpelanta —ito.

1169 **Ginglimo**, vario de artiko (L. *Gynglimus*, A. *Hingejoint*).

1170 **Gips-o**, kalka sulfato; **—a** aparato aŭ bandaĝo.

1171 **Gir-o**, volvaĵo (de cerbo, k.t.p.) (L. *Gyrus*); **—oforma** (L. *Circumvolvitus*). Por la cerbaj giroj, v. Telencefalo.

1172 **Gisto**, fermentilo de la biero (L. *Saccharomyces cerevisiae*, A. *Yeast*).

1173 **Glabelo** (ANAT) (L. *Glabella*).

1174 **Glaci-o** (L. *Glacies*); **—igi**; **—iĝo** (F. *Congélation*).

1175 **Gland-o**, organo kiu funkcie produktas sekrecion; mama —o; **—a**; **—eca**; **—eto**; **—oforma**; beraroforma —o (A. *Cluster*, F. *Glande en grappe*, G. *Traubenförmige*, H. *Racimo*, I. *Grappolo*); tubetaroforma —o (F. *Glande tubulée*).

1176 **Glan-o** (L. *Glans*), ekstremaĵo de la peniso; **—ito** aŭ balanito (v.t.v.); malkovri la glanon (F. *Décalotter*).

1177 **Glareino**, mukaĵo konsistanta el kriptogamoj, k.t.p., kiun oni trovas en kelkaj akvoj.

1178 **Glat-a** (I. *Liscio*); —aj (muskolaj) fibroj; —a brilanta haŭteco (A. *Glossy-skin*); **mal—a**, aspera; **mal—eco** (G. *Rauheit*).

1179 **Glaŭkom-o**, nenormala pliiĝo de la intraokula premo; primara —o, kies nenia kaŭzo estas konstatebla en la okulo mem; sekundara —o; kompensita —o; **—a** kavaĵo, videbla sur retino per oftalmoskopo.

1180 **Glenoid-a** (L. *Glenoïdes*); —a kavo.

1181 **Glicerin-o** (F. *Glycérine*); **—aĵo**, kuracilo kies —o estas ekcipiento; **—ido**, etero de —o.

1182 **Glicerofosfat-o**, salo formita de fosfoglicerata acido kaj bazo.

1183 **Gliciriz-o** (L. *Glycyrrhiza glabra*, A. *Licorice*, G. *Lakritzen, Süssholz*, H. *Regaliz*); **—ino**.

1184 **Glikemio**, glikozo en sango.

1185 **Glikogen-o**, glikoznaska substanco; **—a** funkcio.

1185 *bis* **Glikoĥolato** (F. *Cholate*); **—ata** acido (F. *Acide cholique*).

1186 **Glikokol-o**, gelatensukero.

1187 **Glikolo**, duatoma alkoholo.

1188 **Glikoraĥio**, glikozo en cefalospina likvaĵo.

1189 **Glikoz-o**, vinbera sukero; **—urio**, urinado de —o; **hiper—emio** aŭ **hiperglikemio**, tro da sukero en sango; **—olizo** aŭ **glikolizo**, detruo de la —o en sango, en teksaĵo; **—ogenezo** aŭ **glikogenezo**, enkorpa produkto de —o; **—nas-**

**ka** substanco aŭ glikogeno; **—orahio** aŭ glikorahio (v.t.v.); **—ido** (F. *Glicoside*).

1190 **Gliom-o,** tumoro el nerva substanco; **—atozo,** ĉeesto de pluraj —oj.

1191 **Glob-o,** sfero; vitra —o (A. *Balloon*, I. *Matraccio*); **—oĉela epiteliomo** (F. *Epithelioma globocellulaire*); (utera) sava —o, kiam post akuŝo la utero malmoliĝas kaj rezulte hemoragio iĝis neebla; **sango—eto**; ruĝaj sango—etoj.

1192 **Globul-o** (L. *Globus*); **—a**; **—oza, —entena**; **—imetro**; **—ino,** albumino de la sangoglobetoj; **—inurio,** urinado de —ino; **para—ino; poli-—eco,** tro da ruĝaj gobletoj en sango; **hipo-—eco,** ne sufiĉe da ili; **sen—eco, sen—igo** (F. *Déglobulisation*).

1193 **Glomerul-o** (L. *Glomerulus*, G. *Knäuel*); **—onefrito.**

1194 **Glos-o** aŭ lango (v.t.v.); PAT.: **sen—eco,** denaska manko de lango; **—ito,** inflamo de la —o; —ito depapilanta, diskvama marĝena (F. *Exfoliatrice marginée*), ihtioza kvazaŭskrota, mezelozanga, sulkoza (L. *Dissecans*); **ankilo—o** (v.t.v.) ANAT. de la —ofaringa nervo : supra ganglio ŝtoneca ganglio; timpana nervo; timpana intumesko.

1195 **Glot-o,** parto de la laringo (L. *Glottis*); **—a.**

1196 **Glu-o, —aĵo,** densa fluidaĵo; **—a,—eca** (F. *Visqueux*); **—eco**; **al—eco,** alteniĝeco; **al—iĝo**; **al—iĝa** plastro, adhezo.

197 **Gluten-o** (L. *Gluten*); **—a**; **—símila**; **—olo** aŭ **formol—o** (L. *Glutol*).

198 **Glute-o**, sidvango (L. *Clunis*); **—a** muskolo (L. *Glutaeus*); **—oforma** (F. *Natiforme*).

199 **Glut-o**, **—ado, en—o** (L. *Deglutitio*); **—i**; **en—aĵo** (A. *Gulp*, F. *Gorgée*, G. *Schluck*, I. *Sorso*).

200 **Gnidi-o**, ŝelo de « *Daphne Gnidium* » (BOT.) (F. *Garou*, G. *Seidelbast*, I. *Biondella*)

201 **Gomenolo**, esenca oleo el melaleŭko.

202 **Gomfoz-o**, vario de artiko (G. *Nagelfügung*).

203 **Gonado**, diferencigita pure sekseca ĉelaro, seksglando, kiu konforme al la enhavo de ovuloj aŭ spermatozooj estas nomata ovario aŭ testiko. Ĉe la vertebruloj ili estas, kiel seksglandoj, ĉiam sur la sama loko lokitaj.

204 **Goniometro**, ilo por mezuri facan kaj kranian angulojn.

205 **Goniono**, angulo de la malsupra makzelo.

206 **Gonokok-o** (L. *Gonococcus*); **—ozo** (ĝenerala aŭ loka), malordo kaŭzita de —oj.

207 **Gonore-o** aŭ **blenoreo**, kronika gonokoka kataro.

208 **Gorĝ-o**, kavo post la buŝo; **—a** (L. *Gutturalis*). ANAT.: **—fundo**, parto de la faringo inter la tonsiloj (F. *Arrière-gorge*); glosopalata arko (F. *Pilier antérieur*); faringo-palata arko (A. *Posterior arch*); salpingopalata faldo (L. *Plica salpingo-palatina*); tonsilaj foveetoj (A. *Crypts*). Muskoloj: levanta la palatvualon, streĉanta ĝin (L. *Tensor voeli*), uvula, faringo-palata.

1209 **Gracil-a**, svelta.

1210 **Grad-o**, dividaĵo (de la termometra skalo, k.t.p.); **—aro** (L. *Scala*); —aro de penetreco de X-radioj (F. *Echelle de dureté des rayons X*); **—a**, **—e** pliiĝanta (L. *Progressivus*); elektra **—igilo** (F. *Graduateur électrique*). DER.: **de—o**; **de—ado** (L. *Degradatio*); **de—i**; **de—ulo**, malnoblulo.

1211 **Graaf'aj folikloj**, veziketoj en la ovarioj entenantaj la ovojn.

1212 **Graf...** signifas skrib...: **—ologio**, skribaĵstudado; **—omanio**, skribomanio; **aŭto—ismo**; **—ika**, skriba, linie desegna; **—iko**, **—ikaĵo** (F. *Un graphique*).

1213 **Grajn-o**, malgranda seka frukto aŭ semo; **—eca**, **—e** malglata.

1214 **Gram-o** (mallongiĝo: Grm), unuo de pezo; **centi —o**; **mili —o**.

1215 **Granat-o** (BOT.) (L. *Punica granatum*, A. *Pomegranite*, H. *Grenado*); **—ino**, manito el **—ujo**.

1216 **Grand-a** (L. *Magnus*); **—eco**; **—igo**, **pli—igo**, **pli—iĝo** (F. *Progression*, I. *Ampliazione*); **—iĝi**; **—egeco**, gigantismo; **mal—ega**, mallongkreska, nana (A. *Dwarf*, G. *Zwerg*, I. *Nano*).

1217 **Gran-o** (mallongiĝo Gr.), unuo de pezo ankoraŭ uzata en Anglujo kaj Usono (0,05 centigramoj).

1218 **Granol-o**; **sukergranol-o** (FARM); **—aĵo** (F. *Un granulé*).

1219 **Granul-o, grajneto**; grizaj —oj (F. *Granulations grises*); **—a**, **—eca**; **—oza**; **—eto**; **—omo**, pseŭdoneoplasma tumoro kies varioj estas : fava, fungoforma, kalkeca, pusa (=botriomukomo), subhaŭta, telangiektazia, triĥofita, ulcera; tuberkul—ozo (F. *Granulie*); —ozo ruĝa de la nazo (L. *Granulosis rubra nasi*).

1220 **Gras-o** (L. *Adeps*); **—eco**, **—dikeco** (F. *Embonpoint*, I. *Grassezza*); **mal—eco** (L. *Macies*); **mal—iĝo**; **mal—iĝego** (L. *Emaciatio*); **—a**, **—eca**; kora —a superŝarĝo; **—produkta**, lipogena; **mal—a**; **—iĝi**, **mal—iĝi** (v. Lip... kaj Steatozo).

1221 **Grat-i**, forskrapi; **—vundo**, **—vundeto** (F. *Egratignure*, G. *Kratzwunde*).

1222 **Grav-a** : 1), meritanta atenton; 2) danĝera; **—eco**; **pli—iĝo** (L. *Exacerbatio*, G. *Steigerung*); **pli—igaĵo** (L. *Complicatio*).

1223 **Graved-a** (L. *Gravida*); **—eco**; **—ismo**; **—iĝo** (L. *Conceptio*); **—ulino**; **—iĝinta**; neniam—iĝinta aŭ nulipara; unufoje—iĝinta aŭ unipara; unuafoje—iĝinta aŭ primipara; dufoje aŭ sekundipara, kelkfoje aŭ multipara.

1224 **Greft-o**, transplantado (aŭ enadaptigo) sur (aŭ en) vivantan korpon de peco eltirita ĉu el alia korpo, ĉu el alia parto de la sama korpo (**aŭto—o**); **—aĵo** (F. *Greffon*).

1225 **Gregarinoj**, varioj de intestaj parazitoj ĉe insektoj kaj miriapodoj.

1226 **Grenetino**, speco de pura gelateno.

1227 **Grinc-o**, **—ado**, malagrabla sono sekve de frotado de dentoj.

1228 **Grip-o** (A. *Influenza*); **—ulo**.

1229 **Grum-o** (L. *Grumus*, A. *Clod*, G. *Klumpen*); **—a**; **—eca**; **—oza**.

1230 **Grup-o**; **—itaj**, **—iĝintaj** (F. *Agminé* el« *agminari* (L).

1231 **Gubernaklo** (ANAT.) (L. *Gubernaculum*).

1232 **Gudr-o**, restaĵo post distilado de karbo, de ligno; terkarba —o aŭ koaltaro.

1233 **Guĵo** (v. Ĉizilo).

1234 **Gumiguto**, gumrezino el « *Garcinia Morella* » (A. *Gamboge*, F. *Gomme-gutte*).

1235 **Gum-o**, glua suko de kelkaj arboj; araba —o; **—rezino**; **—a**, **—eca**; **—absceso** (I. *Gomma*); skrofula —absceso.

1236 **Curĵun-balzamo** (A. *Wood oil*); **—ata** acido (F. *Acide gurgunique*).

1237 **Gust-o**, **—ado**, unu el la 5 sentoj; **tro—o** (F. *Hypergueusie*); **para—o**, nenorma —o; **sen—o**, **sen—eco**; **—iga** (H. *Gustativo*); **sen—a** (L. *Insipidus*).

1238 **Gutaperk-o**, suko de arbo iom simila al kaŭĉuko; **—a solvaĵo**, traŭmaticino.

1239 **Gut-o**, sfera ereto de fluidaĵo; **—ilo**; **— igilo**, **—kalkulilo**, **—nombrilo**; pendanta —o, pre-

paraĵo por mikroskopo pretigita laŭ speciala tekniko (I. *Goccia pendente*); **po—ilo** (F. *Goutte-à-goutte de Murphy*) por enteroklizo guto post guto; **gutenigo** (L. *Instilatio*).

1240 **Gvajak-o** (BOT.) (L. *Guaiacum officinale*); **—olo**.

1241 **Gvako** (BOT.) (F. *Guaco*).

1242 **Gvaran-o** (BOT.) (L. *Paullina sorbilis*); **—ino**, **—sema** pulvoro.

# Ĝ

1243 **Ĝemel-a** akuŝo, kiam du infanoj (aŭ pli multaj) naskiĝas dum unu akuŝo; **—eco** (L. *Gemellitas*); **tri—a** nervo (ANAT.).

1244 **Ĝemet-a** (L. *Suspiriosus*, G. *Stöhnend*); **—o**.

1245 **Ĝemin-a**, duopa (v.t.v.); **bi—a**.

1246 **Ĝerm-o**, vegetaĵo ĵus elkreskinta el semo; **—ado** (L. *Germinatio*); **—i**, **ek—i**; **—iga**.

1247 **Ĝib-o**, kurbaĵo de la dorso; **—aĵo**; —aĵoj de la kojlono (A. *Sacculi of colon*); **—etoj**, **—aĵetoj**; dentingaj —etoj aŭ reliefoj; **—a**; —aj (kojlonaj) segmentoj (RADIOL.) (F. *Segmentations haustrales du côlon*); **—ulo**.

1248 **Ĝust-a**, konforma al la reguloj; **—almeto**, reenartikigo post elartikiĝo, aŭ alkonformigo post ostrompo (L. *Coaptatio*); **—metilo**, metala aŭ kaŭĉuka tubeto por kunigi momente du partojn de aparato (F. *Ajutage*).

# H

1249 **Habitus-o** (L. *Habitus*); ftiza —o; apopleksia —o.

1250 **Hakilmanbateto**, speco de masaĝo (F. *Hachure*).

1251 **Haladz-o**, malbonodora gasa eliĝo; **—i**, eligi —on; **—eca** (L. *Mephiticus*); **—eco**.

1252 **Hal-o**, brila cirklo; —o ĉirkaŭ la papilo ĉe glaŭkomo; —o ĉirkaŭ kelkaj erupciaĵoj.

1253 **Halogena**, salproduktanta per kombino kun elektropozitiva metalo (kloro, bromo, jodo, fluoro).

1254 **Haltig-o**, **—ado**, ĉesigo de funkcio; **—a** nervo (G. *Hemmungsnerv*); **—i**.

1256 **Halucin-o**, senteraro; **—ulo**.

1256 **Haluks-o**, pieda dikfingro; muskolo abduktora de la —o. PAT.: valga, vara —o.

1257 **Hamamelo** (BOT.) (L. *Hamamelis virginica*, A. *Witch Hazel*).

1258 **Har-o** (L. *Pilus*); **kap—aro**; **aksel—aro**; **pub—oj**; **okul—oj**; trunketo de la —o (F. *Tige du poil*); **sen—igo**; **sen—eco**, kalveco (L. *Calvities*); **—streĉigo** aŭ ansera haŭto, hirtiĝo; nodoza —a rompiĝo (F. *Trichorrexie noueuse*); **—oza** (L. *Pilosus*); **sen—a** (L. *Glaber*); **sen—ulo**, kiu perdis kap—ojn; **mult—a** (L. *Capillatus*); **—eto** aŭ lanugo; **—blankeco** (L. *Canities*); **—ego** (F. *Crin*); Firenzaj —egoj (por suturoj).

1259 **Haŭstroj** (aŭ **ĝibaĵoj**) de la kojlono (L. *Haustra coli*).

1260 **Haŭt-o**, membrano kovranta la korpon; **—eto** (L. *Pellicula*); **—reago**, kutireago; **—a**; **sub—a**. ANAT.: epidermo; ĝermiga stratumo (F. *Couche de Malpighi*); —aj sulkoj; ŝvitglandoj; palpaj altaĵetoj; dermo (L. *Corium*); korpetoj bulboformaj (F. *Corpuscules de Krause*) kaj lamenecaj (*Corpuscules de Malpighi*); **—muskolo** (F. *Peaussier*). PATOL.: ansera —o, harstreĉiĝo; **—atrofio**; **—iĝo**, kiam mukmembrano fariĝis simila al —o (F. *Cutisation*); **—fendeto** (A. *Crevice*, G. *Hautspalte*); **—senkoloreco**, aĥromio; **—veziketo** (A. *Sinus*, F. *Ampoule, Bulle, Cloque*, G. *Wasserblase*).

1261 **Hebefrenio**, frua frenezeco de la viriĝo (aŭ viriniĝo).

1262 **Heberden ' aj** nodoj; ili okazas ĉe kelkaj artrituloj.

1263 **Hebet-o**, **—eco** (L. *Hebetudo*), unua grado de la stuporo; **—igi**; **—iĝi**; **—a**.

1264 **Heder-o** (L. *Hedera helix*, A. *Ivy*, F. *Lierre*, G. *Epheu*, H. *Yedra*); tera —a (L. *Glechoma hederacea*).

1265 **Hedonalo**, metilpropilkarbinoluretano.

1266 **Hektik-a** (L. *Hecticus*); —a febro; —a ruĝeco; **—eco**.

1267 **Hekzakanta**, havanta ses hokojn.

1268 **Heleboro** (BOT.) (L. *Helleborus niger*, G. *Niesswurz*, A. *Christmas rose*).

1269 **Helenolo**, kamforo de alno.

1270 **Helianto** (BOT.) (L. *Helianthus*, A. *Sunflower*).

1271 **Helik-o**, parto de l'interna orelo (A. *Cochlea*, F. *Limaçon*, G. *Schnecke*, H. *Caracol*): **—a** (L. *Cochlearis*); **—oforma** (F. *Hélicoïdal*). ANAT.: Modiolo (L. *Columella*); modiola lameno; hoko de la spirala lameno; vestibla skalo aŭ deklivo; timpana skalo; spirala modiola kanalo; **—otremo** (L. *Helicotrema*).

1272 **Helikso**, refaldo de l'orelkonko.

1273 **Helioterapio**, sunterapio.

1274 **Heliumo**, gaso en kelkaj mineralaj akvoj.

1275 **Helmint-o**, parazita intesta vermo; **—ozo**; **—ologio**; **kontraŭ—a** kuracilo.

1276 **Help-o**, ago de tiu kiu faciligas ies taskon; publika —o (F. *Assistance publique*); **—anto**; **—anta** (L. *Adjuvans*); **—isto**; **—a** (L. *Auxiliaris*); **—okesto**, kuracilaro en kesto por la urĝaj okazoj, akcidentoj (F. *Boîte de secours*).

1277 **Hem... Hemat... Hemio... Hemo...**, internacie uzataj en kombinoj = sango.

1) **Hem...**: **—afeino**, patologia sanga pigmento: **—afeina iktero** (F. *Ictère hémaphéique*); **—artrozo**, sango en artiko; **—ino**, klorhidrato de hematino.

2) **Hemat...** : ANAT. : **—io**, ruĝa sangoglobeto; **—oblasto**; **—ozoo**, besteto vivanta en

la sango. FIZIOL: **—obiozo**; **—olizo**, solvo de —ioj; **—ologio**; **—opoezo**, sangfarado; **—ozo**, aliigo de la vejna sango en arterian sangon. ĤEMIO: —a acido (F. *Acide hématique)*; **—ino**, koloriga kaj fereca substanco en sango; **—oidino**, derivo de hemoglobino; **—oporfirino**; **—ito**, ruĝa oksido de fero. PAT.: **—a** (L. *Haematoïdes*); **—emezo**, stomaka hemoragio; **—ogena**, venanta el la sango; **—iomanko**, **—ionesufiĉeco** (F. *Aglobulie*); **—hidrozo**, sanga ŝvito; **—odermito**; **—urio**, sangurinado; **—ocelo**, sangamaso; postutera —ocelo; **—omjelo**, sango en mjelo; **—omo**, tumoro el sangamaso. TER.: **—oterapio**, persangteragio. ILARO: **—imetro**, ilo por **—imetrio**, t.e. mezuro de la kvanto de hemoglobino en sango.

3) **Hemio** (La litero H estas ofte forigata): Leŭkocitemio, tro da leŭkocitoj en sango.

4) **Hemo...**: BAKT.: **—kulturo**. ĤEMIO: **—globino**; **meta—globino** (v.t.v.). FIZIOL.: **—dinamiko**, studo de la sangfluo; **—plastika**, kiu kontribuas al la produkto de la sango; **—poezo** aŭ **hematopoezo**, sangfarado. PAT.: **—diagnozo**; **—filio**, denaska emo al hemoragio; **—globinemio**; **—globinurio** esenca, paroksisma aŭ postmalvarmiga; **—hidartrozo**; **—ĥromatozo**, bronza koloro de haŭto kaj organoj per pigmento eltirita el hemoglobino; **—klazio**; **—lizo**, liberigo de hemoglobino

sekve de difekto de la parioj de la ruĝaj globetoj; **—lizita** sango; **—lizino**, substanco detruanta la hematiojn; **—ptizo** (L. *Haemoptysis*); **—ragio**, sangelfluo; **—roido**, dilatiĝinta rektuma vejno; fibreca **—roida** saketo (L. *Marisca*); **—torako**, enpleŭra sango. TER.: **—terapio**; **aŭto—terapio**; **—stazo**, sanghalto; **—stazigo**, sanghaltigo; **—staziga** prenilo; —staziga kuracilo. ILARO: **—dinamometro**, sangopremo-mezurilo; **—dromometro** (G. *Blutschnelligkeitsmesser*); **—globinometro**, ilo por **—globinometrio**; **—ĥromometro**, mezurilo de —globino per komparo de sangsolvaĵo en akvo kaj de —globino en akvo.

1278 **Hemeralopio**, malbona vidado aŭ nevidado dum la nokto.

1279 **Hemi**, en kombinoj povas signifi: 1) « En (aŭ sur) duono de la korpo »; **—anestezo**; **—anopsio**; faca **—atrofio**; **—ĥoreo**; **—kranio**, migreno; **—plegio** (v.t.v.). 2) « Duone »: **—melo**, speco de monstro kun membrostumpoj; **—paĵo**, duobla monstro kuniĝinta per torako kaj kolo, ĝis la buŝo; **—sfero**, duonglobo; **—sistolo**.

1280 **Hemiplegi-o**, unuflanka paralizo; alterna —o, faca paralizo kaj paralizo de aliflankaj membroj.

1281 **Hemo...** (V. Hem).

1282 **Hepat-o**, glando produktanta la galon. ANAT.: —**a** aŭ —**ika** kanalo; galvezika kanalo; ĥoledoko (v.t.v.); foveo de la galveziko; foveoj de la kava vejno, de la umbilika vejno, de la vejna kanalo; vejna ligamento (A. *Round ligament*, F. *Ligament d'Arazi*); —a hilo (L. *Porta hepatis*); vostforma lobo; papiloforma proceso (A. *Tuber papilare*); vostforma proceso (L. *Processus caudatus*); fibreca ŝelo (A. *Capsule of Glisson*). PAT.: —**algio**, —a doloro;—**algia** febro; —**ito**, inflamo de la —o; **peri—ito**; **pus-—ito**; —a cirozo atrofia, hipertrofia, duagrada (L. *Secundarius*); —a absceso, adipozo, ameloidozo, kongesto, sifilo; —**optozo**, malsupreniĝinta —o; (kvazaŭ) laĉita —o (F. *Foie ficelé*, G. *Schnüleber*); —a hiposekrecio; —**ohernio** (F. *Hépatocèle*); —**ego**, —**omegalio**; —**iĝo**, modifo de la pulma teksaĵo. ĤIR.: —**ofikso** (F. *Hépatopexie*); —**ektomio**, parta fortranĉo de la —o; —**ikostomio**, konduko de la fino de la —ika kanalo al la haŭto por ekstera elfluo de la galo; —**ikogastrostomio**.

1283 **Hered-o,** —**eco,** ricevo de karakterizaĵoj, malsanoj, temperamento el gepatroj; samtempa —eco (F. *Hérédité homochrone*);—**osifilo**.

1284 **Hermafrodismo** aŭ **Hermafroditeco** (v. ĉi sube).

1285 **Hermafrodit-o**, duseksulo; —o pli virina ol vira (F. *Gynanthrope*), pli vira ol virina; —**eco**; parta **pseŭdo—eco** ĉe la virino (F. *Gynandrie*); —eco transversa flanka (L. *Lateralis*).

1286 **Hermofenilo**, hidrargo-fenoldisulfonato de natrio.

1287 **Herni-o** (L. *Hernia,* A. *Rupture,* G. *Bruch*); kolo de la —a sako. VAR.: Laŭ enhavo: intesta —o; intestoepiploa —o; grasa —o (F. *Lipocèle*); laŭ loko: epigastra, ingvena, umbilika; —o ventra (A. *Eventratio*). PAT.: Ekobstrukco (F. *Engouement*); —a tordeco, streĉeco; ĉirkaŭpremita aŭ entordita —o. ĤIR.: —**otomio** (A. *Kelotomy.* G. *Bruchschnitt*); —a tuta rebonigo (F. *Cure radicale*); —a bandaĝo.

1288 **Heroino**, diacetata etero de morfino.

1289 **Herpet-o**, speciala vario de veziketoj, kutime tre lokalizataj. VAR.: buŝa, cirkloforma (L. *Circinatus*), genera (L. *Genitalis*), gravedeca, irisoforma (F. *Herpès iris de Bateman*), kreteca, tonsuriga, triĥofita, vakcinforma, zona; —**a**; —**ismo**; —**oforma**; —**ido**, haŭta erupcio kiu ŝajnas rilati al —ismo; —ido negrava, danĝera, distavoletiĝa (A. *Exfoliative*).

1290 **Hetero**... signifas «de iu alia»; —**gena**, alispeca; —**genezo**; —**hemoterapio**, elpreno de sango el sanulo kaj enmuskola injekto al malsanulo; —**metrio**, kreskado de teksaĵo ekstere de ĝia norma formado; —**zigoto**, individuo ĉe kiu ekzistas paro da kontrastaj karakteroj devenintaj de gepatroj (laŭ *Mendel*'a principo de heredeco).

1291 **Hialina**, travidebla.

1292 **Hialoid-a**, vitrosimila; **—o**, membrano ĉirkaŭ la vitreca korpo.

1293 **Hiato**, fendo (L. *Hiatus*).

1294 **Hibrid-a**, bastarda, miksita, mikskaraktera.

1295 **Hidantoata** acido, produktata per ago de amoniako sur bromacetilureo (F. *Acide hydantoïque* aŭ *glycolurique*).

1296 **Hidartroz-o**, akvaĵo en artiko; **hemo—o**, sango kaj seraĵo en artiko.

1297 **Hidatid-o**, veziketo formita per enkistiĝo de eĥinokoko; **—oza** kisto, kiu entenas —ojn; **—oforma**; **—a vibreco**.

1298 **Hidr...**, **Hidro...**, internacie uzataj en kombinoj, signifas « akvo ».

1) **Hidr...**: **—a** aŭ **—ata** (A. *Hydrated*). ĤEM.: **—ato**, korpo formita el akvo kaj metala oksido aŭ kelkaj aliaj komponaĵoj; **—ido**, kombinaĵo de simpla korpo kun hidrogeno (F. *Hydrure*); **—okso** (ĤEM.: OH) (F. *Hydroxile*); **—oksido**; **—ado** (L. *Hydratatio*); **de—ado**, **sen—ado**, **de—iĝo**, malakveco, senakviĝo; **de—i**; **de—adi**. Hidr... estas ankaŭ uzata en ĥemio inter la radiko kaj la sufikso **ata** aŭ **ita**, por nomi kombinaĵon de metaloido kun hidrogeno. Ekz.: Klor—ata acido (HCl). PATOL.: **—amnio**, amnia hidropso; **—emio**, tro da akvo en sango; **—encefala** (v. Meningito); **—urio**, tro akvoza urino. (V. ankaŭ Hidradenomo, Hidragoga.)

2) **Hidro...**: **—adenito**, inflamo de ŝvitaj glandoj ofte en akselo; **—aera**, konsistanta el aero kaj akvo; **—cefalo** aŭ **—cefaleco**, akvo en cerbo; **—cefalulo**, malsanulo pro —cefalo; **—celo**, skrota akvotumoro (G. *Wasserbruch*); **—fila**, akvosorba; **—fobio**, timego al la akvo; **—ftalmio**, okula hidropso; **—kistomo**, seroza kisteto; **—lato**, akvo distilata el....; **— lizo**; **—logio**, scienco pri akvoj; **—nefrozo**, disstreĉiĝo de kaliketoj, pielo; uretero per asepsa urino; **—perikardo**; **—pso** (v.t.v.); **—reo**, elfluo de akvaĵo; **—terapio**, kuracado per akvo; **—terapiisto**; **—torako**, enpleŭra transsudaĵo. V. ankaŭ Hidrokarbido, k.t.p.

1299 **Hidradenomo**, adenomo entenanta kistojn.

1300 **Hidragoga**, kiu elfluigas la seraĵojn.

1301 **Hidrarg-o**, fluida metalo (Hg); **—a**; **—ismo**, venenado per —o; —a monoklorido (per vaporo) aŭ kalomelo; —a bi- aŭ diklorido aŭ sublimato; —a jodido, bi- aŭ dijodido; —a acida nitrato; —a flava, ruĝa, oksido; —a baza sulfato (L. *Subsulfuricum*); —a sulfido (L. *Sulfuratum*); —a tanato.

1302 **Hidrast-o** (BOT.) (L. *Hydrastis canadensis*, A. *Golden seal*); **—ino**; **—inino**.

1303 **Hidrogeno**, ĥemia elemento (H).

1304 **Hidrokarbido**, karbido de hidrogeno.

1305 **Hidrokarbono**, hidrogeno kaj komponaĵo de karbono.

1306 **Hidrokelo**, kkf uzata por hidrocelo (v. Hidro).
1307 **Hidrokotilo** (BOT.). VAR.: Azia (L. *Hydrocotyle asiatica*), k.t.p.
1308 **Hidroo**, vario de haŭtmalsano (F. *Hydroa*).
1309 **Hidrops-o**, akvoza ŝvelaĵo ne inflama en histoj, aŭ eksudato ne inflama en kavaĵoj; **—a**; **—ulo**; nefrito **—iga**, kiu produktas —on; universala —o = anasarko.
1310 **Highmore** (Elp.: Hajmor), ang'a kuracisto; —'a kavaĵo, aŭ makzela sinuso.
1311 **Higien-o**, scienco pri sano; **—a**; **—isto**; **—postenaro** aŭ **kontrola linio** (F. *Cordon sanitaire*).
1312 **Higromo**, subhaŭta serozburso.
1313 **Higroskop-a** (L. *Hygrometricus*).
1314 **Hil-o**, punkto de parenĥima organo kien eniras la vazoj; hepata, pulma —o; **—a**.
1315 **Himen-o**, membrano je la vulvo ĉe la virgulinoj.
1316 **Hioglos-o**, muskolo kuniganta langon kun hioidosto; **—a** nervo.
1317 **Hioid-osto** (L. *Hyoïdes*); **super—a** (F. *Sus-hyoïdien*); muskoloj **—ofaringa**, **—ouvula**.
1318 **Hiosciam-o** aŭ **hiskiamo** (v.t.v.); **—ino**, alkaloido de —o.
1319 **Hioscin-o**, unu el la alkaloidoj de « *Hyoscyamus niger* »; **—ata** acido (F. *Acide hyoscinique*).
1320 **Hiper...**, prefikso signifanta « pli ol normale », « laŭ ekscesa, pli aktiva maniero ». Ekz.: **—emio**, alfluego de sango; **—estezio**, troa sentemo; **—febreco** (F. *Hyperpyrexie*); **—funkciado**; **—genezo**, troa kreskado; **—gli-**

**kemio**, troa glikozeco en sango; **—globulio**; **—hidrozo**, troa ŝvitado; **—ĥromio**, tro da koloro; **—kinezio**, troa movado; **—klorhidreco**, troa acideco en stomako; **—klorurio**; **—krinio**, troa sekrecio; **—krizo**; **—metropa** v.t.v.); **—oreksio**, bulimio; **—osmio**, troa flarado; **—ostozo**; **—pepsio**; **—plazio**; **—sekrecio**; **—tensio**; **—tiroideco**; **—triĥozo**, tro da haroj; **—trofio**, superkresko; **—uratemio**, tro da urata acido en sango. En ĥemio se ekzistas acido pli oksigenata ol la ...ata acido oni uzas per aŭ hiper. Ekz.: hiperjodata acido.

1321 **Hiperiko** (BOT.). VAR.: traborata (L. *Hypericum perforatum*, A. *St-John's wort*, F. *Millepertuis*, H. *Corazoncillo*), k.t.p.

1322 **Hipermetrop-a** okulo, en kiu la optika akso estas tro longa; **—eco**; **—ulo**, malproksime vidanta.

1323 **Hipnot-o**, arte kaŭzita dormo en kiu la dormanto obeas al la dormiganto; **—a**; **—i**; **—ismo**; **—anto**; **—isto**.

1324 **Hipo...** : 1) Prefikso signifanta «malpli». Ekz.: **—azoturio**; **—estezio**; **—globulio**, ne sufiĉe de sangoglobetoj; **—klorhidreco**, ne sufiĉe da klorhidrata acido en stomaka suko; **—pepsio**; **—plazio**; **—stazo**, (L. *Hypostasis*); **—tonio**; **—trofio**. 2) Prefikso signifanta «sub». Ekz.: **—derma**, subhaŭta; **—dermoklizo**. 3) En ĥemio, se ekzistas acido malpli oksigenata

ol la ...ita acido oni uzas Hipo Ekz.: **Hiposulfita** acido ($S^2$ $O^3$ $H^2$); se la acido estas malpli oksigenata ol la ...ata acido sed pli ol la ...ita acido, oni ankaŭ uzas Hipo, sed kun ...ata, ...ato. Ekz.: **Hiposulfata** acido; **hiposulfato** (L. *Hyposulphas*).

1325 **Hipofiz-o** (L. *Hypophysis cerebri*, A. *Pituitary body*). ANAT.: —a lobo, antaŭa, posta; —a foveo, aŭ turka selo.

1326 **Hipofosfit-o** (F. *Hypophosphite*); kalcia, fera, natria —o.

1327 **Hipogastr-o** (L. *Hipogastrium*); **—a.**

1328 **Hipoglos-o**, aŭ **—a** nervo (L. *Hypoglossus*).

1329 **Hipoĥondr-o** (ANAT.), spaco sub la ripaj arkoj; **—io** (PAT.); **—iulo.**

1330 **Hipokampo** (ANAT.) (I. *Corno d'Ammone*).

1331 **Hipokrat-o**, fama kuracisto (460-377 antaŭ Kristo); **—a** fingro, ĉe malsanuloj je respirorganoj; —a vizaĝo (L. *Facies hipocratica*).

1332 **Hipopio**, puso en la antaŭa okulkamero.

1333 **Hiposfiksio**, sindromo karakterizata de malrapida sangirado, malforta pulso, troplenigo de vejnoj, troglueca sango.

1334 **Hipospadi-o** (L. *Hypospadia*); **—ulo.**

1335 **Hipotenaro** (ANAT.), parto de la manplato.

1336 **Hipurat-a** acido, kiu ĉiam troviĝas en la urinoj de la herbomanĝantaj bestoj; **—urio** aŭ **hipurio**, tro da —a acido en la urino.

1337 **Hirsutismo**, sindromo karakterizata de hipertriĥozo, adipozo, viriĝo ĉe virino.

1338 **Hirudo** (ZOOL.) (L. *Sanguisuga*, A. *Leech*, F. *Sangsue*, G. *Blutegel*).

1339 **Hiskiamo** aŭ **Hiosciamo** (v.t.v.) (BOT.) (L. *Hyosciamus niger*, A. *Henbane*, G. *Bilsenkraut*, H. *Heleno*, I. *Guisquiamo*).

1340 **Hisopo** (BOT.) (L. *Hyssopus*).

1341 **Histeri-o**, nerva malsano; **—a**; **—ulo**; **—ulino**; **—formaj** konvulsioj.

1342 **Histioid-aj** ĉeloj, diversspecaj diferencigataj ĉelegoj; —aj tumoroj (F. *Tumeurs du tissu conjonctif*, G. *Tumoren des Bindegewebes*).

1343 **Hist-o**, teksaĵo; **—ogenezo**, modoj de kreskado de —oj; **—oĥemio**; **—olizo**, senĉesa detruo de la teksaĵoj konsekvence de la vivaj interŝanĝoj; **—ologio**, studo de —oj de vivaj estaĵoj; **—poezo**, ĥemio de la teksaĵa kreskado.

1344 **Hok-o** (L. *Uncinus*, F. *Crochet*); **—oforma**; **—osto** aŭ **—oidosto** (L. *Os hamatum*, A. *Unciform bone*, F. *Os crochu*).

1345 **Holoblastika** (ovo), kies tuto segmentiĝas.

1346 **Holokaino** (ĤEM), loka anestezaĵo, surogato de kokaino.

1347 **Holokrina** (glando), kies sekrecio konsistas el epiteliaj ĉeloj liberigitaj.

1348 **Homeopati-o**, kuracmetodo per malgrandegaj dozoj de medikamentoj.

1349 **Hom-o** (L. *Homo*); **mult—a** (F. *Populeux*); **sen—a**, dezerta; **sen—iĝo, malmult—iĝo,**

malpliiĝo de la nombro de la loĝantoj de lando.

1350 **Homogen-a**, kiu havas ĉiujn partojn samspecajn; **—eco**.

1351 **Homoĥron-a**, samtempa; —a heredeco (v. 1283).

1352 **Homolog-a**, samforma, samstruktura aŭ samformula (ĤEM); **—eco**.

1353 **Homotip-a**, samtipa; **—eco**.

1354 **Homozigoto**, individuo en kiu, laŭ **Mendel**'a principo de heredeco, adiciiĝas du samspecaj karakteroj; tian kazon oni nomas « returna parigo ».

1355 **Honorario**, salajro en kelkaj profesioj, kuracistarto, k.t.p.

1356 **Hont-a** (L. *Pudendus*); —a plekto; —a nervo.

1357 **Horde-o** (BOT.) (A. *Barley*, F. *Orge*, G. *Gerste*, H. *Cebada*, I. *Orzo*); **—ino**; **—oformaj** eroj (F. *Grains hordéiformes*).

1358 **Hordeolo**, palpebra furunketo.

1359 **Hormon-o**, aktiva endokrina substanco el organo havanta specifan agon sur alian organon. Ekz.: adrenalino, insulino, sekretino, k.t.p.; —oj akcelantaj la materiŝanĝojn; **par—o**.

1360 **Horsepokso** (A. *Horse-pox*).

1361 **Hospital-o**, malsanulejo.

1362 **Humer-o** (L. *Humerus*). ANAT.: —a kolo; deltoida tubero; intertubera sulko (A. *Bicipital groove*); olekrana foveo; koronoida foveo. PATOL.: Frakturoj epikondila, superkondila

(F. *Sus-condylienne*); enŝela (ĉe anatomia kolo) aŭ eksterŝela (ĉe ĥirurgia kolo), k.t.p.

1363 **Humor-o**: 1) Fluidaĵo de l'organismo; **—a**; **—ismo**, teorio pri la —aj difektoj dum la malsanoj; **nigr—o**, kiun oni trovas postmorte en surrenaj kapsuloj (L. *Atrabilis*). 2) Stato de animo; bona —o.

1364 **Hundherbo** aŭ **Agropiro** (v.t.v.)

# Ĥ (Tre ofte anstataŭebla per K)

1365 **Ĥalazio**, seba kisteto de palpebro.

1366 **Ĥalono**, endokrinaĵo kiu haltigas aŭ malpliigas la funkciadon de alia organo (F. *Chalone*).

1367 **Ĥemi-o** (L. *Chymia*, G. *Chemie*, H. *Quimia*); **—a**; **—isto**; stomaka **—ismo** (Ekz.: stato de la stomaka suko ĉe iu); **—otaksio**, kvalito de protoplasmo kiu estas altirata aŭ forpelata de iaj —aj substancoj, speciale de mikrobaj toksaĵoj; **—oterapio**.

1368 **Ĥenopodium-oleo** (F. *Huile de Chénopodium*), vermoforigilo.

1369 **Ĥiasmo**, interkruciĝo.

1370 **Ĥil-o** (L. *Chylus*, G. *Milchsaft*); **—ifera** aŭ **—portanta** kanalo; **—urio**; **sen—eco** (F. *Achylie*).

1371 **Ĥimo** (L. *Chymus*).

1372 **Ĥino** aŭ **Kino** (v.t.v.).

1373 **Ĥirurg-io** (A. *Surgery*); **—ia** ilaro aŭ aparataro; **—iisto** aŭ **—o.**

1374 **Ĥloasmo**, pigmentita haŭto ĉe gravedulinoj, kaĥeksiuloj, k.t.p.

1375 **Ĥloro-anemio**, malsanstato parte samnatura kiel samtempe ĥlorozo kaj anemio.

1376 **Ĥlorocito**, ruĝa sangoglobeto perdinta grandan parton de ĝia koloro.

1377 **Ĥloroform-o** (G. *Chloroform*) aŭ triklormetano.

1378 **Ĥloromo**, kancera formo de akuta leŭkocitemio.

1379 **Ĥlorozo**, malpliiĝo de hemoglobino kaj de ruĝaj globetoj (L. *Chlorosis*).

1380 **Ĥoanoj**, postaj aperturoj de la nazaj kavoj.

1381 **Ĥolagoga**, galfluiga, kiu faciligas la eligadon de la galo.

1382 **Ĥolangito**, angioĥolito, inflamo de la galkanaloj.

1383 **Ĥolecist-o**, galveziko; **—ito**, inflamo de la —o; **—otomio**, entranĉo de la —o; **—ektomio**, fortranĉo de —o; **—ostomio**, ĥirurgia daŭra aperturo de —o; **—oskopio**, **—ografio**, vidigo de —o per X Radioj; **—ogramo**, fotografaĵo de —o per X Radioj.

1384 **Ĥoledok-o**, **—a** kanalo (L. *Choledochus*); **—otomio**, entranĉo de la —o; **—ostomio**, buŝforma fiksado de —o al la haŭto; **—oduodenostomio**, ĥirurgia daŭra aperturo de —o en duodenon.

1385 **Ĥolelitiazo**, galŝtonozo.

1386 **Ĥolemi-o**, galo en la sango; familia —o.

1387 **Ĥolereza**, galproduktiga.

1388 **Ĥoler-o** (L. *Cholera*); nialanda —o; hinda —o; **—eto** (I. *Colerina*); **—a**; **—ulo**; **—oforma** lakso.

1389 **Ĥolesteatomo** (L. *Cholesteatoma*).

1390 **Ĥolesterin-o** (G. *Cholesterin*); **—emio**, amasiĝo de —o en sango.

1391 **Ĥolino**, hormono (?) verŝajne produktata en surrenaj glandoj, antagonisto de adrenalino, ekscitanta la parasimpatikan nervon.

1392 **Ĥoluri-o**, galo en urino; **aĥoluria** iktero, iktero sen galo en urino.

1393 **Ĥondr-o**, kartilago; **—ito**, inflamo de —o; **—omo**, tumoro el —o; **en—omo**, interna —omo (F. *Enchondrome*); **ek—omo**; **—a** distrofio; **—osimila**, kazaŭ —a (F. *Chondroïde*); **peri—o**; **—ino**.

1394 **Ĥore-o**, malsano karakterizata per senĉesaj neregulaj, senvolaj movoj; —o elektra, falsa, fibretaria (F. *Fibrillaire*), graveda, hereda, histeria, paraliza (F. *Chorée molle*); **—oforma,** kvazaŭ—a.

1395 **Ĥoriono**, viloza kovraĵo de l'embrio.

1396 **Ĥoroid-o** (L. *Choroïdes*); vaza lameno de la —o (L. *Lamina vasculosa*); **—ito**, inflamo de —o; **—oretinito**.

1397 **Ĥrisarobin-o** ($C^{30} H^{26} O^{7}$) **—a** aŭ **—ata** acido.

1398 **Ĥrizofanika** acido, devenaĵo de rabarba radiko.

1399 **Ĥrom...**, komenco de vorto ofte uzata en medicina internacia lingvo anstataŭ koloro; **—afina** ĉelo, kolorigebla per kromaj saloj; **—atika**,

kiu rilatas al koloroj; **—atino**, kolorigebla substanco de la ĉela kerno; **—atinolizo** (F. *Chromolyse*); **—atismo** (F. *Chromatie*); **—atoforo** aŭ melanocito, ĉelo entenanta pigmenton; **—optometro**, **—atopsiometro**, aparato por esplori la aĥromatopsion (v. 68) aŭ la disĥromatopsion (v. 705); **—hidrozo**, kolora ŝvito; **hiper—io**, troa pigmenteco; **hipo—io**; **sen—io**, senkoloreco (F. *Achromie*); **—oblasto**, derma pigmenta ĉelo; **—ofila** substanco; **—ogenera**, kiu povas doni kolorajn produktaĵojn (I. *Cromogeno*); retina **—olizo**, senkoloriĝo de la retino; **—ometro**, hemoglobinmezurilo por **—ometrio**, t.e. kolormezuro de la sango; **—opara** mikrobo, kiu sekrecias solveblan pigmenton; **—oradiometro**, aparato por mezuri la Radiojn X laŭ ilia influo sur koloraj substancoj; **—osomoj**, kolorigeblaj organetoj de la ĉelo; **—oterapio**, terapio per kolora lumo; **meta—ata**; **meta—atismo** (G. *Verfärbung*).

1400 **Ĥrom-o** (Ĥem. : Cr.) Preferu Kromo (v.t.v.).

1401 **Ĥronaksio**, koeficiento de elektra ekscitebleco (F. *Chronaxie*).

1402 **Ĥronik-a** (v. Kronika).

# I

1403 **Ibogain-o**, alkaloido eltirita el « *Tubernanthe Iboza* »; **—a** klorhidrato.

1404 **Idiopati-o** (L. *Idiopathia*); **—a.**

1405 **Idiosinkrazi-o** (L. *Idiosyncrasia*); **—a.**

1406 **Idiot-a**, neinteligenta; **—ulo**; **—eco.**

1407 **...ido**, sufikso uzata en Ĥemio; oni aldonas ĝin al la elektronegativa ŝtofo, en la kombinaĵoj (sen oksigeno) de metaloido kun alia metaloido, aŭ kun metalo. Ekz.: klorido de karbono ($C\ Cl^4$); plumba sulfido (Pb S).

1408 **Igasurino**, unu el la alkaloidoj de la Ignacia strikno (L. *Strychnos Ignatii*).

1409 **Ignipunkturo**, termopikado.

1410 **Iĥoro**, pusa seraĵo (L. *Ichor*).

1411 **Iĥtiokolo**, fiŝgluaĵo.

1412 **Iĥtiolo**, sulfureca substanco eltirita el ŝtonoj formitaj de fosiliaj fiŝoj.

1413 **Iĥtioz-o**, skvama haŭtmalsano. VAR.: ansera (aŭ hara simpla keratozo), folikla, korneca, krokodila (F. *Sauriasis*), maljuneca (aŭ ĉe maljunuloj), sebeca; **—oforma, —osimila.**

1414 **Iĥtoformo**, surogato de jodoformo.

1415 **...ika.** En Ĥemio, kiam metalo donas du seriojn de saloj kun malsimilaj oksidoj, la sufikso ika estas uzata por la maksimumaj saloj. Ekz.: Ferika sulfato, Kuprika sulfato.

1416 **Iksodo** (ZOOL.) (L. *Ixodes*).

1417 **Ikter-o** (L. *Icterus*). VAR. : bilifeika (v. Galo), infekta, katara, maligna, obstrukca, simpla; **—a**; **—ulo**.

1418 **Ikt-o**, malsana atako subita kiel ekbato (A. *Fit, Stroke*, G. *Anfall, Schlag*); apopleksia —o; elektra —o; suna —o.

1419 **Ileo**, parto de intesto; **—a**; **—ocekuma**; **—okojlona**; —a baro (ileuso aŭ volvulo, k.t.p.); **—osigmoidostomio**, anastomozo de —o kun sigmoida intesto.

1420 **Ileuso** aŭ volvulo, vario de ilea baro (A. *Ileac passion*, G. *Darmverschluss*).

1421 **Iliak-a** (L. *Iliacus*). ANAT.: —a psoaso; **—osto** —koksosto (v.t.v.). Arterioj : —a komuna; —a interna (aŭ hipogastra); —a ekstera. Branĉoj de l' —a interna arterio: obtura (kun branĉetoj puba kaj acetabla); glutea suba (F. *Ischiatique*); hontoza interna; perinea; skrotaj postaj; art. de la bulboj uretra kaj vestibla; art. profunda de la peniso (L. *Cavernosa*). Branĉoj de l'—a ekstera arterio; epigastra suba aŭ malsupra (kun branĉetoj puba obtura, sperma ekstera); ĉirkaŭfleksa —a profunda; femura (F. *Artère crurale*). Vejnoj: —a komuna; interna aŭ hipogastra; ekstera; gluteaj subaj (F. *Veines ischiatiques*).

1422 **Ilicio**, stelanizo (v.t.v.).

1423 **Iliofemura**, **iliolumba**, **iliopektena**, kiu rilatas al koksosto kaj aliparte femuro, lumboj aŭ pekteno.

1424 **Iliumosto** (v. Koksosto).

1425 **Il-o** : 1) Instrumento, aparato; ĥirurgia **—aro**; **—ujo** (G. *Besteck*, H. *Navajero*). 2) Radikalo en Ĥemio. Ekz.: Azolilo (Az $O^2$), Okshidrilo (OH).

1426 **Iluminismo**, halucinacio kun falsa sento de (aŭ parolo kun) supernaturaj estaĵoj.

1427 **Imbib-i**, ensorbigi.

1428 **Imersi-o**, enakvigo, mergo; **—a**, objektlenso (oni devas enmeti la ekzaminotaĵon en guton de fluido sur vitron por ĝin ekzameni).

1429 **Imobil-a**, senmova; **—igi**, fari senmova.

1430 **Impakt-o** (L. *Impactio*); **—a** loko en radiologio (F. *Point d'impact*).

1431 **Impetig-o**, vario de haŭtmalsano, ofte ĉe infanoj. VAR.: buŝa, herpetoforma, komunikiĝema aŭ kontaĝia, miliosimila (F. *Miliaire*), sifila, stafilokoka, streptokoka, veziketoforma; infana; **—aĵoj** (F. *Gourmes*); **—a** (L. *Impetiginosus*).

1432 **Impotent-o**, **—eco seksa**, nekapablo por sekskuniĝo; **—a**.

1433 **Impregnacio**. 1) Influa heredeco (G. *Befruchtung*). 2) (Mikroskopio) koloriĝo de teksaĵoj per kelkaj metalaj saloj.

1434 **Impres-o**, influo de korpo sur alian korpon (L. *Impressio*); **—ebla**; **—ebleco** (F. *Impressibilité*); **mal—ebligo** (F. *Désensibilisation*); **—ebla** aŭ **—ebliĝa** filmo por radiogramoj.

1435 **Impuls-o** (L. *Impulsio*); **—ema**, ne sin reganta; **—i**, doni instigon.

1436 **Imun-a**, ŝirmita kontraŭ; **—eco**; **—korpo**; **—sero**; **—igi**; **—igo**; **—iĝo** (F. *Immunité acquise*); **—oreago**; **—oterapio**.

1437 **Inanicio**, malsatego, stato kaŭzita de manko de nutrado.

1438 **Incid-o**, direkto laŭ kiu korpo aŭ linio atingas alian. RADIOL.: **—a** aŭ **—anta** radio; —a angulo; —a ebeno; —a punkto; —a montrilo (F. *Indicateur d'incidence*).

1439 **Incit-o** (L. *Irritatio*); **—eco**; **—emo**; **—iĝemo** (L. *Irritabilitas*); **—ema** (F. *Agaçant*); **iĝema**; **—ebla**.

1440 **Inciziv-o** aŭ **—a dento**, antaŭa tranĉa dento.

1441 **Incizur-o**, sulketo, entranĉaĵeto (A. *Notsch*, G. *Ausschnitt*).

1442 **Indeks-o**, montra fingro.

1443 **Indikan-o** ($C^{52}H^{31}NO^{34}$); **—urio**, —o en urino.

1444 **Indik-o**, informaro kiu instigas al tiu kuracado, aŭ al alia, aŭ al sindeteno; ĉefa —o; **kontraŭ—o**.

1445 **Indol-o** ($C^{8}H^{7}N$); **—ino**.

1446 **Indukt-o** (ELEKTR.) (A. *Induction*); **aŭto—o** —a bobeno; **—ilo**; **—oro**; **—ora** aŭ **—anta** fluo; **—ato** (F. *Induit*).

1447 **Indurata**, malmoliĝinta.

1448 **Inerma**, sendorna, senpikileta.

1449 **Inert-a**, senmova, neagema; **—eco**.

1450 **Infan-o** (L. *Infans*); **suĉ—o** (L. *Lactans*, A. *Nursling*, F. *Nourrisson*, G. *Säugling*, H. *Hijo de leche*, I. *Allievo*); **—eto** (A.

*Baby*); **—etejo** (F. *Crêche*); **—ete** ĝemeti, krieti; **—a**; **—eco**; **—ismo**, malnorma aŭ trodaŭra —eco (F. *Infantilisme*); **—kulturo** (F. *Puériculture*); **—mortigo** (F. *Infanticide*).

1451 **Infarkt-o**, parto de parenĥimo senigita el sango pro flubaro de sangvazo; pulma —o; kriptogena —o, kiu estas de malklara deveno.

1452 **Infekt-o**, **—ado** (L. *Infectio*); **—a**; **—ema**, kontaĝia; **—anta**, kiu transdonas la ĝermon de malsano; **des—o** aŭ **sen—igo**; **aŭto—o**; **re—o**, nova —o ĉe estulo antaŭe **—ita**; **malpli—emo**, malpliiĝo de agemo de bakterioj (F. *Atténuation des bactéries*); ŝtopado de **—ofontoj**; **—ilo**, kontaĝiaĵo.

1453 **Infibulacio**, kunigo, per ringo, aŭ per kunkudro, de generaj organoj ĉe individuo por malebligi la sekskuniĝon.

1454 **Infiltr-o**, trasorbigo, tragutado iom post iom penetrado; salvarsan **—aĵoj** en la ĉirkaŭvejnan teksaĵon, post nesukcesa envejna injekto; **—i** (F. *S'infiltrer*).

1455 **Inflam-o**, brulumo; **pli—i** (F. *Irriter*); **—iĝi**; **—etiganta**; **sen—iga**, **kontraŭ—a**, antiflogistika.

1456 **Influenco**, gripo.

1457 **Influ-i**, havi efikon je; **—ebleco**, impresebleco (A. *Susceptibility*, G. *Empfänglichkeit*); **ne——ebla** (F. *Réfractaire*).

1458 **Influks-o** (L. *Influxus*), nerva agmaniero de centra nervaro.

1459 **Infra**, internacia prefikso kiu signifas « sub », malsupre; —**ruĝaj** radioj.

1460 **Infundibulo**, funelforma parto.

1461 **Infuz-i**, surverŝi varmegan akvon sur sekajn herbojn, sur teon, k.t.p.; —**ado**; —**aĵo**.

1462 **Infuzoro**, speco de protozoo.

1463 **Ing-o** (A. *Sheath*, G. *Scheide*, H. *Vaina*; I. *Guaina*); tendena —o, kvazaŭ poŝa longforma —o, ĉirkaŭ kelkaj tendenoj.

1464 **Ingrediento**, ĉiu substanco kiu kuŝas en kuracilo, en formulo.

1465 **Ingven-o** (A. *Groin*, F. *Aine*, G. *Leiste*, H. *Ingle*); —**a** (L. *Inguinalis*). ANAT.: Ligamentoj; —a (F. *Ligament de Poupart*); —a falĉiloforma (L. *Falx aponeurotica*); —a refleksita (A. *Triangular fascia*, F. *Ligament de Colles*); —a ringo subhaŭta, kun kolonoj supra kaj malsupra; —a ringo enabdomena.

1466 **Inhal-o**, —**ado**, enspirado de vaporoj en pulmojn; —**aĵo**; —**i**; —**ilo**.

1467 **Inhibicio**, ĉesigo de funkcio.

1468 **Inio** (ANAT.), okcipita ekstera reliefo.

1469 **Injekt-o**, enkonduko de fluidaĵo aŭ de gaso subhaŭten, aŭ en korpokavaĵon per speciala ilo; —**aĵo**; —**i**; —**ilo**, enspruĉigilo (F. *Injecteur*); —**ileto** (F. *Petite seringue à injections*). VAR.: —o anafilaksa, anesteza aŭ sen-

doloriga, enhaŭta, enmuskola, envejna, estiganta akcidentojn. (Ekz. : ĉe anafilaksitaj bestoj) (F. *Injection déchaînante*), intraderma, profilaksa, subhaŭta.

1470 **Inklino**, emo, tendenco.

1471 **Inkompatibl-a**, ne akordiĝanta (kun) ; **—eco** (G. *Unverträglichkeit*).

1472 **Inkret-o**, interna eligaĵo de kelkaj glandoj. Ekz. : tiroidino (el tiroido), adrenalino (el surrenaj glandoj), pituitrino, el hipofizo) ; **—ado**, interna eligado ; **funkci—aflanke**, flanke de interna eligado, koncerne internan eligadon.

1473 **Inkub-i**, meti en **—ilo**, t.e. ujo uzata por kreskigi mikrobojn, k.t.p., aŭ kovi ovojn ; **—o**, **—ado** ; —ado de febro, ĝia komenca kaŝita elvolviĝo.

1474 **...ino**, finiĝo en Ĥemio de la nesaturataj hidrogenaj karbidoj acetilenaj : butino, etino, propino, k.t.p.

1475 **Inodulara**, cikatra.

1476 **Inokul-o**, enkonduko en organismon de ĝermo per tranĉeto, skrapo, injekto aŭ piketo ; **aŭto —o**; **—i**; **—ebla**; **re —ebla**; **re —ebleco**; **nere—ebleco** (F. *Irréinoculabilité*).

1477 **Inosit-o**, vario de organ-ĥemia substanco kies formulo estas $C^6H^{12}O^6$; **—urio**, —o en urino.

1478 **Inoskopio**, serĉo de baciloj de la tuberkulozo post artefarita digesto de fibrecaj flokoj, aŭ de

koagulaĵoj vole okazigitaj en puso, sango, pleŭra likvaĵo, k.t.p.

1479 **Insekt-o** (L. *Insectum*); **—aro**, **—araĉo**, parazitaro (F. *Vermine*).

1480 **Insensibil-a**, nesentema; **—eco**; **—igo**; **—iĝo**; **—igi**; **—iĝi**.

1481 **Insert-o**, alfiksiĝo; muskola, ligamenta, surosta —o; **—i**, almeti, enmeti; **—ita**, en- aŭ surfiksa.

1482 **Insida**, neatendite danĝera.

1483 **Insolacio**, sunfrapo, sunikto.

1484 **Insomnio**, sendormo.

1485 **Inspekt-o**, rigardo; **—isto** aŭ **—oro**.

1486 **Instepo** (G. *Rist*, H. *Gurganta*, I. *Collo del piede*).

1487 **Instil-i**, gutenigi; **—o**.

1488 **Instinkt-o** (F. *Instinct*); **—a**.

1489 **Instrument-o**, ilo por (kuracarto,k.t.p.); ĥirurgia **—aro** (F. *Arsenal chirurgical*).

1490 **Insuficienc-o**, nesufiĉeco; mitrala —o.

1491 **Insuflacio**, enblovo, enblovado (v. Blovo).

1492 **Insulino**, ekstrakto el pankreasaj insuletoj de *Langerhans*, uzata kiel rimedo kontraŭ sukera diabeto.

1493 **Insul-o** (ANAT.) (L. *Insula*); pankreasaj **—etoj** (F. *Ilots de Langerhans*); **Reil'a** —o ĉe telencefalo (v.t.v.).

1494 **Intens-a**, forta; **—eco**; **re** aŭ **pli** **—iĝo** (G. *Recrudescenz*).

1495 **Inter...**, internacia prefikso kiu ofte signifas

« havante de unu flanko unu objekton kaj de alia flanko unu similan alian objekton » aŭ « meze de » ; ĝi ankaŭ povas esprimi la reciprokecon : —a (L. *Intermedius*); —**aldonita** (L. *Intercalaris*) ; —**alveola** ; —**aritenoida** ; —**artika** ; —**ĉela** ; —**faska** ; — **krucIĝo** (F. *Entrecroisement,* G. *Durchkreuzŭng*) ; —**kuranta**, kiu okazas kiam alia malsano ĉeestas ; —**meto** (L. *Interpositio*); —**plektata** aŭ —**krucigata** aŭ **kruciĝanta**; —**osta** ; —**ripa** (L. *Intercostal's*); —**spaca** (L. *Interstitialis*); —**translokigo** ; —**translokiĝo** ; —**ventrikla** ; —**vertebra**, k.t.p.

1496 **Interferenco**, modifoj (ofte malpliiĝo) de la lumaj radioj kiam ili renkontiĝas.

1497 **Intermit-a**, interrompata, fragmenta, spasmeca, kiu haltas kaj rekomenciĝas post intertempoj ; —**a febro** (v. 989) ; —a spirado ; —**o** ; —**eco**.

1498 **Intern-a** (L. *Internus*); —**ulo**, asistanto (Fr. *Interne d'hôpital*); —**isto**, kuracisto specialisto por internaj malsanoj.

1499 **Interromp-i**, rompi kontinuecon ; elektra —**ata** fluo ; **spasme —ita** (F. *Saccadé,* G. *Stossend*); **ne—ita rando** (F. *Bord continu*); elektra —**ilo** ; atonia —ilo (t.e. preskaŭ sen propra vibrado); **metronom—ilo** ; rektiga —ilo (F. *Interrupteur redresseur*); —**ileto** (F. *Petit trembleur électrique*); **sen—a**, daŭra, kontinua.

1500 **Intertrigo**, speciala haŭtmalsano sur interkontaktaj partoj.

1501 **Intest-o** aŭ Entero (v.t.v.). ANAT.: maldika —o, konsistanta el duodeno, jejuno, ileo; cirklaj faldoj (F. *Valvules conniventes*); —aj glandetoj (F. *Glandes de Lieberkühn*); arigitaj kaj dissemitaj, limfaj folikloj; dika —o, konsistanta el cekumo, kojlonoj, rektumo.

1502 **Intra**, internacia prefikso kiu signifas en; **—abdomena**; **—dermoreago**; **—muskola** aŭ **enmuskola**.

1503 **Intumesk-o**, plidikiĝa parto de organo; lumba —o de la mjelo.

1504 **Intususpecto** (L. *Intussusceptio*).

1505 **Inul-o** (BOT.) (L. *Inula campana*, A. *Helenium elecampane*, F. *Aunée*, G. *Alant*).

1506 **Invad-o**, komenco de malsano pro eniro de ĝermo en organismon.

1507 **Invaginado intesta**, eniro de intesta parto en sian apudan parton.

1508 **Invalid-o**, kriplulo, malsanulo senigita el laborpovo parte aŭ tute; **—eco**.

1509 **Invers-o**, kontraŭo de normo, de ordinaro; elektra **—a** ondo; **—ondhaltigilo** (RADIOL.) (F. *Soupape*); **—igo**, renverso; **—igi**; **—igilo** (F. *Inverseur*).

1510 **Involuo**, malkresko ofte kontraŭo de evoluo; utera **—o**.

1511 **Ipeko** aŭ **Ipekakuano** (L. *Ipecacuanha*).

1512 **Ipuso**, senĉesa kaj rapida sinsekvado de midriazo kaj miozo.

1513 **Ir-i**; **supren—anta**; **—adô** de malsano (F. *Cours d''une maladie*).

1514 **Iridino**, oleorezino eltirata el radikoj de irido.

1515 **Iridium-o** (ĤEM.), vario de metalo; simbolo Ir.

1516 **Irid-o** (BOT.) (L. *Iris*, A. *Flag*, G. *Schwertlilie*); **—ino** (v.t.v.).

1517 **Irig-o** (aŭ **Irigaci-o**); **—ilo** aŭ klisterilo.

1518 **Iris-o**, parto de l'okulo; **—a** granda ringo (L. *Annulus iridis major*); **—oforma** diafragmo, uzata en mikroskopio, radiologio, k.t.p. PATOL.: **—ito** aŭ **irito**, inflamo de —o; **sen—o**, denaska manko de —o; **—ocelo** hernio de l'iriso; **—ociklito**; **—odializo**; **—ektomio**, ablacio de parto de iriso; **—okoroidito**; **—optozo**; **—otomio**, k.t.p.

1519 **Irit-o** aŭ pli bone **Irisito**, inflamo de l'iriso.

1520 **Isĥemio**, stato de korpa parto en kiun la sango ne plu alvenas.

1521 **Isĥi-a** (A. *Ischiatic*, *Sciatic*); —a nervo aŭ **—atiko** (v.t.v.); —a hernio; **bi—a** diametro; **—osto** au **sidosto**; suba parto de la koksosto; **—okavernoza**; **—oklitora**; **—okoksiza**; **—orektuma**.

1522 **Isĥiatik-o**, isĥia nervo (L. *Ischiaticus*); **—a** neŭralgio; —a neŭrito.

1523 **Isĥiopaĵo**, duobla monstro umbilike kaj hipogastre kuniĝinta.

1524 **Isĥiurio**, malpliiĝo de la urina funkcio.

1525 **Istm-o**, mallarĝa parto kuniganta du pli larĝajn partojn ; gorĝa —o.

1526 **...ita**, **...ito**. En Ĥemio, se simpla ŝtofo formas du anhidridojn aŭ acidojn, oni uzas « **ita** » por tiu kiu enhavas malpli da oksigeno. Ekz. : Fosfita anhidrido ($P^2O^3$) ; « **ito** » montras sa'on formitan el ...ita acido kaj bazo. En patologio, la sufikso « ito » signifas ofte inflamo ; bronĥito, inflamo de bronĥoj, k.t.p.

1527 **Iz-**, sufikso uzata kelkafoje por indiki aplikadon de metodo aŭ de io sur ion : Elektrizi, Darsonvalizi, Radiizi, k.t.p.

1528 **Izol-i**, apartigi ; —**eco**, —**iteco** ; —**a**, —**ita** ; —**ilo** (I. *Isolatore*); —**igo**, apartigo ; **trud—ado**, uzata por frenezuloj (F. *Séquestration*).

1529 **Izolizino**, hemolizino kapab'a detrui la hematiojn de samspeca estaĵo.

1530 **Izomer-a**, kiu havas saman ĥemian konstruon sed malsamajn fizikajn kaj ĥemiajn ecojn.

1531 **Izomorf-a**, samforma.

1532 **Izotoni-o**, stato de likvaĵoj kiuj havas la saman molekulan ekvilibron ; —**a**, je sama osmoza tensio.

# J

1533 **Jaborando** (BOT.) (L. *Pilocarpus Jaborandi*).

1534 **Jalap-o** (BOT.) (L. *Jalapa*); —**ino**.

1535 **Jambulo** (BOT.) (L. *Eugenia jambolana*).

1536 **Jejun-o**, dua parto de la maldika intesto; **—ostomio**, daŭra ĥirurgia aperturo de —o, ĉu en alia parto de l'intesto, ĉu je la haŭto.

1537 **Jekorino**, albumino el hepato.

1538 **Jodipino**, jodentenanta sesamoleo.

1539 **Jod-o** (ĤEM.) (L. Iodium); **—a**; —a (—entenanta) tinkturo; **—ato**; **—ata** acido (F. *Acide iodique*); **—ido** (F. *Iodure*); **kali—ido**; hidrarga **bi—ido**; **—ida** acido (L. *Ac. Hydriodicum*); **—ismo**, simptomaro kaŭzita de —o kaj precipe de —idoj; **—erupcioj** (F. *Iodides*); antraksoforma **—akno** (L. *Iododerma tuberosum*); **—okresolo**, kombinaĵo de —o kaj kresolo (F. *Traumatol*); **—otirino** aŭ **—otiroidino**; **—otanina** (F. *Iodotannique*); **—oformo**; **di—oformo**; **—olo**, tetrajodopirolo.

1540 **Jogurt-o**, speco de fermentita lakto.

1541 **Johimb-o**, afrika arbo (F. *Yohimbe*); **—ino**, alkaloido de —o.

1542 **Jon-o**, molekulo momente sarĝita per elektra energio; **—izado** (F. *Ionisation*); **—a** acideco (simbolo pH); **—oterapio**.

1543 **Jugland-arbo** (L. *Juglans regia*, A. *Walnut tree*, F. *Noyer*, G. *Walnuss*, H. *Nogal*, I. *Noce*); **—o**, ĝia frukto; **—ino**, amara devenaĵo de —arba ŝelo.

1544 **Jugular-a** aŭ **jugul-a**; —a arterio; —a vejno. Anat. de la —a vejno: 1) Interna (bulboj supra kaj suba; sublanga vejno; vejno akompananta

la hipoglosan nervon); 2) Ekstera (vejno okcipita; —a vejnarko, vejno transversa de la skapolo).

1545 **Juĝeja** aŭ **Jura** (v.t.v.).

1546 **Juk-o,** —**ado,** prurito (v.t.v.); —**i**; —**a**; —**iga** (A. *Pruriginous*); —**emo.**

1547 **Julepo** (FARM.), kvietiga trinkaĵo.

1548 **Juniper-o** (BOT.) (L. *Juniperus communis*, F. *Genévrier*); oksicedra —o (L. *Juniperus oxycedrus*); gudroleo de —o, oleo de oksicedra —o, kadoleo (F. *Huile de Cade*); —**a** (Fr. *Cadique*).

1549 **Jur-a** (aŭ **Leĝa**) **medicino**; —a medecinisto, al kiu sin turnas la juĝistoj pri medicinaj temoj (F. *Médecin légiste*).

# Ĵ

1550 **Ĵekirito** aŭ **Abro** (v.t.v.).

1551 **Ĵeleo,** gelatenaĵo, gelatensimilaĵo.

1552 **Ĵulo,** unuo de elektra laboro en kelkaj landoj (F. *Joule*).

# K

1553 **Kadavr-o,** korpo de mortinto; —**a,** —**eca**; —a rigideco; —aj, aŭ postmortaj makuloj (Fr. *Lividités cadavériques*); —**ejo** (F. *Morgue*).

1554 **Kadmi-o** (ĤEM.: Cd) (F. *Cadmium*).

1555 **Kadoleo**, oleo de oksicedra junipero (v.t.v.).

1556 **Kaduk-a**, malsanema pro diversaj kaŭzoj, maljuneco, k.t.p.; —**eco**; —**egeco**, —a senkonscienco (F. *Gâtisme*); —**ulejo**.

1557 **Kafeino** (G. *Coffein*, H. *Cafeino*).

1558 **Kaĥeks-io**, grava difekto de nutrado; strumipriva —io aŭ postoperacia miksedemo; —**ia**; —**iulo**.

1559 **Kairino**, artefarita alkaloido, devenanta de kinoleino.

1560 **Kajeputo**, esenco el « *Melaleuca cajeputi* ».

1561 **Kaka-o**, grajnoj de la —**ujo**; —**a** butero.

1562 **Kakodil-o** (ĤEM.: As $(CH^3)^2$) —**ato**; —**ata** acido.

1563 **Kakosmio**, perversio de flarsento karakterizata per kutima sento (aŭ ŝato) de malbona odoro.

1564 **Kala-Azaro** aŭ **Nigra febro**, vario de leŝmaniozo.

1565 **Kalabara fabo** aŭ **Fizostigmo** (v.t.v.).

1566 **Kalamo skriptoria** (ANAT.) (L. *Calamus scriptorius*).

1567 **Kalcin-i**, cindrigi, tre varmigi kelkajn nefandeblajn substancojn; —**ita** magnezio; —**o**, —**ado**.

1568 **Kalci-o**, ĥemia elemento : Ca; —**a** bromido, glicerofosfato, klorhidrofosfato (L. *Chlorhydrophosphas calcis*), hipofosfito, hipoklorito, karbonato, klorido (L. *Ca. chloratum*), laktato, laktofosfato, **mono** aŭ **di** aŭ **tri—a** fosfato,

oksido, sulfato (L. *Ca. sulfuricum*), sulfido (L. *Ca. oxysulfuratum*).

1569 **Kalefakcio**, fenomeno kiu produktiĝas kiam fluidaĵo falas sur tre varman surfacon.

1570 **Kalik(et)oj renaj** (L. *Infundibula renis*).

1571 **Kali-o** (L. *Potassium*); *—a* acetato, bromido, karbonato, dikarbonato, dikromato; —a fera tartrato (L. *Kalium ferro-tartaricum*); —a hipermanganato; —a jodido; **natri—a** tartrato; —a silikato; —a trisulfido (L. *Kalium sulfuratum*).

1572 **Kalkane-o** aŭ **Kalkanosto**. ANAT.: Subteno de la talo (L. *Subtentaculum tali*); sinuso de la tarso aŭ **—a** kanalo.

1573 **Kalkan-o**, posta parto de la piedo; **—osto** aŭ **—eo** (v.t.v.); **—doloro** aŭ **talalgio**.

1574 **Kalk-o** (ĤEM.: CaO); **—a**; **—eca**; **—oza**; **—igo**; **—iĝo**; **—iĝi**; **sen—iĝinta** osto, kiam —aj saloj estas parte aŭ tute forigitaj; **re—igo** (F. *Recalcification*); **—osulfatoza** akvo (F. *Eau séléniteuse*).

1575 **Kal-o**, **—aĵo**, loka malmoliĝo de la haŭto; **pied—o**; interpiedfingra —o (F. **Œil de** *perdrix*); metatarsa —o, sur la haŭto kovranta la unuan metatarson (L. *Tubera verrucosa*, A. *Bunion*, F. *Oignon*, G. *Schwiele*); **—eca** aŭ **—oza** stomaka ulcero; (v. ankaŭ Kaloza korpo).

1576 **Kalomel-o**, hidrarga protoklorido.

1577 **Kalori-o**, unuo de varmo; **—metro**, aparato por mezuri la —ojn.

1578 **Kaloz-a korpo** (L. *Corpus callosum*). ANAT.: Rando; sulko; cingula sulko (A. *Calloso-marginal fissure*), kun subfrunta parto kaj marĝena parto (A. *Posterior part*); rostro; splenio aŭ tuberoringo (L. *Splenium*, F. *Bourrelet*); **sub—a** giro; mezaĵaj kaj flankaj laŭlongaj strioj; radiaĵo de la —a korpo kun frunta kaj okcipita partoj.

1579 **Kaluso**, loka hipertrofio post ostrompo (L. *Callus*).

1580 **Kalv-a**, sen(kap)hara; **—eco**, alopecio; **—iĝi**.

1581 **Kamer-o**, senfenestra aŭ malgrandfenestra ĉambro; **okul—o** (G. *Augenkammer*); malluma —o; pordesegna —o (F. *Chambre claire*).

1582 **Kamfor-o**, densa esenco el « *Laurus camphora* »; **—a** monobromido; **—ata** acido (F. *Acide camphorique*).

1583 **Kamomil-o** (BOT.) (L. *Matricaria Chamomilla*, H. *Manzanilla*).

1584 **Kamp-o**, areo; **vidad —o** (F. *Champ visuel*) operacia —o; (malebena) **—okuracado**, uzata ĉe kelkaj kormalsanuloj (F. *Cure de terrain*); **—imetro**, aparato por mezuri la vidadkampon.

1585 **Kamptodaktilio**, afekcio karakterizata per senĉesa flekso de unu aŭ du fingroj.

1586 **Kamptokormio**, kurbeco de la dorso kun flekso de la koksoj kaj limigo de movoj dum staro.

1587 **Kanab-o** (BOT.) (L. *Cannabis*); hinda —o;

**hinda—ismo**, aŭ haŝiŝismo; **hinda—ino** aŭ haŝiŝino.

1588 **Kanada balzamo** (I. *Balsamo del Canada*).

1589 **Kanal-o**, speco de tubo en organismo; **—eto** (L. *Canaliculus*). RADIOL.: **—aj radioj** (G. *Kanalstrahlen*).

1590 **Kancer-o** = **Kankr-o** (v.t.v.).

1591 **Kanelita**, sulke striita.

1592 **Kanin-o**, dento inter la incizivoj kaj la antaŭmuelaj dentoj.

1593 **Kankr-o**. 1) Tumoro; epitelia —o; —o de fumintoj; kirasforma —o; **—aj** dissemaĵoj (F. *Noyaux cancéreux*); malproksima **—aĵo** (F. *Noyau erratique*); **—oido**. 2) Speco de krustulo; —aj ŝtonetoj (A. *Crab's eyes*, F. *Yeux d'écrevisse*).

1594 **Kantarid-o** (ZOOL.), skarabeto kies veneno aplikita sur homan haŭton kaŭzas vezikadon; **—ino**.

1595 **Kantoplastiko**, eltranĉo de l'ekstera angulo de la palpebro por pligrandigi la palpebran aperturon.

1596 **Kanul-o**, **—eto**, tubo. Ekz.: tiu, kiun oni aligas al ŝprucigilo, aŭ tiu, kiun oni uzas en kelkaj operacioj, traĥeotomio, k.t.p.

1597 **Kapacit-o** (ELEKTR.), kvanto da elektro necesa por ke iu korpo posedu unuon de potencialo; la unuo de —o estas « farado ».

1598 **Kapilar-a**, harforma (L. *Capillaris*); **—oj**, —aj

(sang) vazoj; **inter—a**; **—eco** (FIZ.); **—oskopio**.

1599 **Kap-o** (L. *Caput*); *—a* (L. *Cephalicus*); **du—a** (F. *Bicéphale*); **—hava** osto (L. *Os capitatum*); **—balanco** (L. *Nutatio*); **—doloro**, cefalalgio; **—turno**, **—turniĝo** (L. *Vertigo*, A. *Giddyneess*, G. *Schwindel*); apopleksia, nerva, orela, stomaka, voltaika —turno; **sen—ulo**, acefalo (v.t.v.); **sen—igo**, tranĉo de la kolo de mortinta feto en kelkaj malfacilaj akuŝoj; **sen—iga** tondilo; sen—iga hoko (F. *Crochet pour détroncation*). ANAT.: muskoloj de la —o. epikrania, frunta, okcipita, piramida (L. *Procerus*), naza kun transversa kaj flugila partoj, mallevanta la septumon (F. *Myrtiforme*); orbeca de l'okulo kun partoj palpebra, orbita, larma; orbeca de la buŝo; triangula; transversa de la mentono; zigoma (A. *Zigomaticus major*); kvadrata de la supra lipo, kun zigoma parto (A. *Zigomaticus minor*); kvadrata de la suba lipo; mentona.

1600 **Kapretremad-o**, tremado de la voĉo. (A. *Bleating*; G. *Meckern*); **—a** (F. *Chevrotant*).

1601 **Kapselo** (FARM.) macaĵeto aŭ pref. kavmaco (F. *Cachet*).

1602 **Kapsiko** (BOT.) (L. *Capsicum*).

1603 **Kapsul-o**. 1) (FARM.) (gelatena) —o (L. *Capsula gelatinosa*). 2) (ANAT.). Aŭ organo: surrenaj —oj aŭ glandoj. Aŭ parto de cerbo: interna —o (apudoptika tavolo). Aŭ ĉirkaŭ-

kovraĵo aŭ perifera parto de multaj organoj. DERIV : sen—igi, forigi la ĉirkaŭkovraĵon. (Ekz. : de reno); lenta —**ito**, inflamo de la —o de okula lento; —**otomio**, tranĉo de la antaŭa kapsulo en operacio por katarakto; —**ektomio** (F. *Kystectomie*); —**tranĉilo** (G. *Cystotom*); **ekster—a**.

1604 **Kaptit-a**, trafita. Ekz. : malsanulo —a de febro.

1605 **Karabeo** = Sukceno (v.t.v.).

1606 **Karageno** (BOT.) (L. *Chondrus crispus*), speco de algo.

1607 **Karb-o** (L. *Carbo*); **ter—o**; **ter—a** gudro, aŭ koaltaro; vegetaĵa —o; besta —o; —**ido** (v. Karbono).

1608 **Karbolo** = **Fenolo** (v.t.v.).

1609 **Karbon-o** (ĤEM. : C); —**ato**; —**ata** acido (A. *Carbonic acid*); —**ido** (mallongiĝo : karbido) (F. *Carbure*); natria bi aŭ di —ato (A. *Sodic bicarb.*); —**ilo**, ĥemia radikalo, aŭ —**oksido** (CO); —**a sulfito** (L. *Carbo sulfuratus*); —**hidrato.**

1610 **Karbunkol-o** aŭ **Karbunk-o** (L. *Carbunculus*), infekta malsano karakterizata de maligna pustulo; —**a** bacilo (F. *Bactéridie charbonneuse*).

1611 **Karcinom-o**, vario de kankro; —**ozo** (F. *Carcinomatose*).

1612 **Kardamomo** (BOT.) (L. *Fructus cardomomi*).

1613 **Kardi-o**, enira aperturo de la stomako; —**o-spasmo**.

1614 **Karen-o** (L. *Carina*) ; uretra —o de la vagino; **—oforma** frunto, torako.

1615 **Karfologio**, nerva kaj daŭra maltrankvilo de la manoj por ekkapti kovrotukon (ĉe kelkaj gravaj malsanuloj enlite kuŝantaj).

1616 **Kari-o**, osta aŭ denta malkomponiĝo aŭ putriĝo; **—a**, **—eca**, **—ita**; **—i**; **—iĝi**.

1617 **Kariofilo** (BOT.) (L. *Caryophyllum*, A. *Clove*, F. *Clou de girofle*, G. *Gewürznelke*, H. *Clavo*, I. *Garofano*).

1618 **Kariokinez-o**, modo de dividiĝo de la ĉelkerno; **—a**.

1619 **Karminativ-a**, kontraŭgasa; —a kuracilo.

1620 **Karn-o** (L. *Carno*); **—a** dieto; **—ecaj** burĝonoj sur kelkaj vundoj; **—iĝo** (L. *Carnificatio*); **dento—o**, gingivo; (operacia) osta **dis—igo** (L. *Denudatio*) ; **en—iĝinta** ungo; **—ivora**, karnon manĝanta.

1621 **Karotid-o** (L. *Carotis*); **—aj** arterioj komuna, interna, ekstera.

1622 **Karpe-o**, ostaro de la manradiko, t.e. naviklosto, lunosto, triketrosto (L. *Triquetrum os*, F. *Pyramidal*), multangula osto granda (F. *Trapèze*), malgranda (F. *Trapézoïde*), kaphava aŭ granda osto (L. *Os capitatum*), hokosto aŭ hokojdosto (L. *Os hamatum*). Ligamentoj: transversa de la —o (antaŭe) ; radio—a (dorse), flanka radiusa de la —o; flanka ulna.

1623 **Kartilag-o** aŭ Ĥondro (v.t.v.); —a, —**eca**; **fibro—o**.

1624 **Karunkl-o** (L. *Caruncula*); larma —o; mirtformaj —oj aŭ himenrestaĵoj; papilaraj —oj; uretra —o (G. *Fleischwarze des Harnkanals*).

1625 **Karvio** (BOT.) (L.*Carum Carvi*; A. *Caraway*).

1626 **Kassifoli-o** (BOT.) (L. *Cassia senna*, A. *Senna leaves*, G. *Sennesblätter*); —**aj** folikloj.

1627 **Kasi-o** (BOT.) (L. *Cassia fistula*, F. *Casse*, G. *Kassie*).

1628 **Kaskarilo** (BOT.) ŝelo de « *Croton Cascarilla* ».

1629 **Kaskaro** aŭ **Kaskarsagrado** (BOT.) (L. *Cascara sagrada*).

1629 **Kask-o**, armaĵo por la kapo; vibriga —o, iam uzita en elektroterapio (F. *Casque vibratoire*); —**osento** ĉe neŭrasteniuloj.

1631 **Kastr-i**, forigi la seksajn glandojn; vira —**o**, —**ado** (F. *Emasculation*); —**itulo** aŭ —**ito**.

1632 **Kaŝit-a**, nevidebla, netrovebla; —**kaŭza** aŭ kriptogena; —**testikeco** aŭ kriptorkidio; —**toksa** aŭ kriptotoksa (v. Kripto).

1633 **Kataforezo**, enkonduko de kuracilo en organismon per kontinua elektra fluo.

1634 **Katakrot-a**, kiu sur sfigmogramo rilatas al la malsupreniranta parto; —**eco** aŭ —**ismo**, ĉeesto de plialtiĝo sur la supredirita parto.

1635 **Katalepsi-o**, nerva stato karakterizata per korpa rigideco kaj nekapableco de memvolaj movoj.

1636 **Kataliz-o**, speco de ĥemia agado; —**a** ago; —**igo**; —**emaĵoj**; —**ilo**.

1637 **Kataplasm-o**, kompreso sursinr.faldita en kiu estas kuiritaj semoj, aŭ faruno, k.t.p., por maturigi absceson, forigi doloron, k.t.p.

1638 **Katarakt-o**, maldiafaneco de kristalina lento; maljunaĝa —o; —**a** maturiĝo. ĤIR.: v. Kapsulo.

1639 **Katar-o**, pliiĝo de la sekrecio de mukmembranoj pro inflamo; —**ulo**; —**ema**; **anti—a** aŭ **kontraŭ—a**.

1640 **Katarik-a** (L. *Catharicus*); —a acido.

1641 **Katatonio** (G. *Attonität*), melankolio kun stuporo.

1642 **Kateĉuo** (BOT.) (L. *Areca Catechu*, F. *Cachou*, G. *Kaschu*, I. *Caccia*).

1643 **Kater-o**, stato sekvanta la ebriecon; rentgena —o, simptomoj iafoje aperantaj post rentgenradiado, t.e. vomoj, malfortiĝo, k.t.p.

1644 **Kateter-o**, estas ĉu esplorilo, ĉu sondilo, ĉu dilatilo (F. *Béniqué*); —**izo**, enkonduko tra uretra aŭ alia kanalo de —o; —**izi**.

1645 **Katgut-o**, fadeno pretigita el katintesto, uzata de ĥirurgoj.

1646 **Katmurmura vibradeto** ĉe kordifektoj (F. *Frémissement cataire*).

1647 **Katod-o** (ELEKT.), negativa poluso; —**a** bombardo, fasko (RADIOL.); —a jono (F. *Cathion*); —aj korpetoj aŭ atomoj; **anti—o** aŭ anodo.

1648 **Kaŭdata**, vosthava.

1649 **Kaŭsalgio**, brulsentado kun trosenteco de haŭto kaj variaj haŭtdifektoj (A. *Burning pains*).

1650 **Kaŭstik-a**, bruleca, kaŭteriza; **—eco**; **—ingo** (F. *Porte caustique*).

1651 **Kaŭter-o** aŭ **—izilo**, ilo por **—izo**, modo de kuracado kiu konsistas en brulvundo per fajro aŭ ĥemiaj rimedoj; **—izi**; **fair—izetoj** aŭ **kaŭterpunkt(et)oj** (F. *Pointes de feu*); **for—izi** (A. *To remove by caustic*).

1652 **Kaŭz-o**, kialo; **laŭ—a**, aŭ etiologia terapio.

1653 **Kava-o** (BOT.) (L. *Piper methysticum*, F. *Cava*); **—ino** (F. *Méthysticine*).

1654 **Kavern-o**, kavaĵo; timpana —o (L. *Antrum tympanicum*); **—(ec)a** blovo, stertoro; **—oza** korpo, parto de peniso.

1655 **Kav-o**, **—aĵo**, malplenaĵo en korpo aŭ en organo; artika —o; ventra —o; nazaj —oj; **post—aĵo** (F. *Arrière-cavité*); **—igo**; **—iĝo**; **—a**. NAT.: **—a vejno** (G. *Hohlader*); —a vejno suba (kun branĉoj: frenika suba vejno, hepataj vejnoj); —a vejno supra. ĤIR.: **el—igo** (F. **Evidement,** G. *Aushöhlung*); —a skrapilo (A. *Curette*, G. *Blasenräumer*, I. *Cucchiaja*).

1656 **Kaze-o**, koagulema parto de lakto; **—ado**; **—aĵo**; **—a**, **—eca**; **—ino**; **—igi** (F. *Cailler*, G. *Gerinnen*); **—igita** lakto; **—iĝi** (F. *Se cailler*); **—osimila** (L. *Caseosus*); **—osimiliĝo** (F. *Dégénérescence caséeuse*).

1657 **Kaz-o** (A. *Case*, F. *Cas*, G. *Fall*); benigna —o; danĝera aŭ maligna —o; **—uistiko**, kazaro de iu malsano.

1658 **Kefal-o**, kelkfoje uzata anstataŭ Cefal-o (v.t.v.).

1659 **Kefir-o**, bovina lakto acidigita per speciala fermento; unu-, du-, tritaga —o.

1660 **Keloid-o**, speco de kreskema malmola tumoro eliĝanta k.k.f. el cikatro.

1661 **Kelotomio**, hernioperacio.

1662 **Kemio** (v. Ĥemio).

1663 **Kerat-o**, korneca parto de l'epidermo; **—ino**, substanco eltirita el kornoj, haroj, epidermo, k.t.p.; **—iĝo** (F. *Kératinisation*); **—iga**, **—oplastika**, kiu helpas al la —iĝo; **—odermio** aŭ **—ozo** (v.t.v.); **—ogena**, kiu naskas —on; **—oida**, **kvazaŭ—a**; **—olizo**, solvo de —o; **—oliziga** (F. *Kératolytique*); **—omo**, tumoro el —o.

1664 **Keratoz-o** aŭ **Keratodermio**, hipertrofio de kerato; —o arsena, folikla, hara simpla (F. *Lichen pilaire, Ichtyose ansérine*), hara ruĝa atrofiiga (F. *Kératose pilaire rouge atrophiante*), punktata, senila (t.e. kerata surkresko ĉe maljunuloj) (F. *Crasse sénile*); **hiper—o**; **para—o**; **poro—o** de Mibelli; **eritro—o**; **dis—o**.

1665 **Kerion-o**, vario de triĥofitozo de la krania haŭto kun puso, haŭtdikiĝo, k.t.p. (L. *Kerion Celsi*).

1666 **Kermeso**. 1) Besta (L. *Coccus ilicis*); 2) Minerala, kiu estas antimona oksisulfito.

1667 **Kerno**, enĉela korpeto ĉirkaŭata de protoplasmo.

1668 **Keton-o**. En organika ĥemio, oni uzas la sufikson « ano » por la —oj : Propano, Butano, k.t.p. ; **—aj** korpoj.

1669 **Kilaj-o** (BOT.) (L. *Quillaya*); **—a** ŝelo (F. *Ecorce de Panama*).

1670 **Kilovato**, elektra mezuro de potenco.

1671 **Kinaz-o**, speco de solvebla fermento ; **entero—o**.

1672 **Kinez-o**, movado ; **—a** ; **—iga**, aŭ moviga, nervo ; **—oterapio**, terapio per masaĝo, gimnastiko, k.t.p. ; **kario—o** (v.t.v.) ; **—ismo**, venenado pro troa laceco ; **a—o**, senmova tempo inter la korsistolo kaj la kordiastolo ; stomaka **hiper —o**, troa movado de stomakaj parioj.

1673 **Kinĥon-o**, Cinĥono aŭ Kino (v.t.v.) (L. *Cinchona*); **—ino**, alkaloido eltirita el griza kino ; **—idino**, fenil—onitrata acido (L. *Ac phenylcinchonicium*), uzata en Usona farmakopeo.

1674 **Kinin-o** (L. *Chininum*) ; **—a** monoklorhidrato, diklorhidrato, baza sulfato (L. *Subsulfuricum*), neŭtrala sulfato (L. *Sulfuricum*), tanato, valerato; **—ismo** aŭ **kinismo** (v. Kino).

1675 **Kin-o** (L. *Chinchona*); **—ato** ; **—ata** acido ; **—ino** (v.t.v.) ; **—ismo**, difektoj sekve de uzo de —ino ; **—iumo**, alkohola ekstrakto de —o ; **—idino**, unu el la alkaloidoj de —o.

1676 **Kinosolo**, kalia oksikinolinsulfonato, vario de desinfektilo.

1677 **Kirurgi-o** (v. Ĥirurgio).

1678 **Kisticerk-o** (L. *Cysticercus*); ĉela **—ozo**, malsano kaŭzata de « *Cysticercus cellulosa* ».

1679 **Kist-o,** tumoro ĉirkaŭata de membranoj kaj entenanta likvaĵon, aŭ grasaĵon, k.t.p. : folikla aŭ sebuma —o; sinovia —o; **—iĝo** (F. *Enkystement*, G. *Absackung*); **—iĝinta** ; **—omo** ; **—a, —oza** aŭ **—oplena** tumoro ; —oza mano, reno, testiko ; **—osarkomo** ; rana aŭ sublanga —o (A. *Ranula*, F. *Grenouillette*).

1680 **Kladotriksa bakterio** (L. *Cladothrix*).

1681 **Klaft-o**, statura mezurilo.

1682 **Klakbru-o**, seka mallonga sono ; klapa —o ĉe kelkaj kormalsanuloj.

1683 **Klampo,** ĥirurgia prenilo-premigilo kun longaj teniloj (F. *Clamp*, G. *Klemmpinzette*).

1684 **Klangora bruo**, metala resonado de kora bruo en kelkaj malsanoj.

1685 **Klap-o,** valvo ; **kor—oj** (L. *Valvulae cordis*); mitrala aŭ dupinta —o; trikuspida aŭ tripinta —o; **—difekto** ; **—nesufiĉeco.**

1686 **Klar-a,** travidebla (L. *Limpidus*); **ne—a** ; **mal—a** ; **mal—iĝo** (F. *Louchissement*, G. *Trübung*).

1687 **Klasifiko**, klasigo.

1688 **Klasmatocit-o**, vario de ĉelo en la sango.

1689 **Klaŭstrofobio**, neŭrastenia simptomo, timo ĉe fermitaj pordoj, en fermita spaco.

1690 **Klavikl-o** (L. *Clavicula*). ANAT. : ekstremaĵoj sternuma, akromia; **sterno—a** artiko ; artika ligamento aŭ kapsulo ; **sub—a** arterio ; **super-**

—**a** kavaĵo. ĤIR. : —**aj** elartikiĝoj aŭ luksacioj : superakromia, subakromia, antaŭ- aŭ poststernuma.

1691 **Kleptomani-o**, patologia ŝtelemo.

1692 **Klimakterio** (G. *Welchseljahre*), aro da simptomoj ĉe virinoj kiam ĉesas menstruacio.

1693 **Klimat-o** (L. *Clima*); —**a**; —**ologio**; —**oterapio**; **al—igo** (F. *Acclimatation*); **al—iĝo** (F. *Acclimatement*).

1694 **Klinik-o**. 1) Vunditejo, malsanulejo. Ekz. : —o por malsanaj infanoj; poli—o. 2) Individua ekzameno de iu malsanulo, de iu vundítulo; —**a** (L. *Clinicus*); —**isto**.

1695 **Klinoidaj** apofizoj ĉe la sfenoidosto (L. *Clinoïdes*).

1696 **Klinoterapio**, terapio de psiĥozo per la enlitigado.

1697 **Klister-o**, injekto en la rektumon de fluidaĵo kutime uzata por elvoki fekadon, pli malofte por nutri aŭ por kuraci (medikamentaj —oj); —**ilo**, —**pumpilo**.

1698 **Klitor-o** (L. *Clitoris*). ANAT. : Kruro (A. *Crus*, F. *Racine*); prepuco; kaverneca septumo.

1699 **Kloasmo** (v. Ĥloasmo).

1700 **Klon-o**, serioj da mallongdaŭraj, rapidaj muskolaj ekskuoj senvolaj; —**a**; pieda —o, fenomeno observata ĉe piedo kiam estas troaj refleksoj; —**ismo** aŭ —**eco**.

1701 **Kloraceta** acido, acetata acido en kiu kloro anstataŭas hidrogenon.

1702 **Kloral-o**, komponaĵo de kloro kaj alkoholo; hidrata —o; —**glikozo** (F. *Chloralose*); —**ismo**, venenado pro trouzo de —o.

1703 **Kloretilo**, etilklorido.

1704 **Klor-o** (ĤEM.) simpla korpo: Cl; —**eca** aŭ —**oza** akvo; **per—(ec)akva purigo** (F. *Javellisation*); —**ato**; —**ata** acido (F. *Acide chlorique*); —**ido** (A. *Chloride*, F. *Chlorure*); **bi-** aŭ **di—ido**; **tetra—ido**; —**idemio** aŭ —**uremio**, tro da —idoj en sango; **malpli-** aŭ **sen** —**idigo**, **deklorurado** (F. *Déchloruration*); —**ida rilato**, kalkulo de la kvanto da —ido eliminata per urino rilate al la glutita kvanto; —**opeksio** (v.t.v.); —**opeino** (v.t.v.); —**hidrato**; —**hidrata** acido (HCl); —**hidrofosfato**; —**ometrio**, —dozado; **hiper—hidreco**, tro da —hidrata acido; **hipo—hidreco**, **sen—hidreco**; **hipo—ito**, kloridoj de oksidoj malinfektantaj kaj senkolorigaj.

1705 **Klorocito** (v. Ĥloro).

1706 **Kloropeksio**, rilata amasiĝo de natria klorido en teksaĵo (F. *Chloropexie*).

1707 **Kloroform-o** (G. *Chloroform*); —**ado** aŭ —**izo**, anestezo per —o; —**i** aŭ —**izi**.

1708 **Kloromo** (v. Ĥloromo).

1709 **Kloropeni-o**, nesufiĉa kvanto de natria klorido en sango aŭ teksaĵo (F. *Chloropénie*).

1710 **Kloroz-o** (v. Ĥlorozo).

1711 **Kloruremio**, kloridemio (v. Kloro).

1712 **Knebel-o**, denta aparato por iom post iom reĝustigi dentaron.

1713 **Knedi** (L. *Mollire, Subigere*, A. *To malaxate*, G. *Kneten*, I. *Impastare*).

1714 **Kniko benita** (BOT.) (L. *Cnicus benedictus*).

1715 **Koagul-o**, **—ado**; malfluidiĝo de sango, lakto; **—i**, malfluidiĝi; **—igi**; **—kapablo**; **sang—o-tempo**; **sang—aĵo**; **—ema**; sanga **tro—emo** (F. *Inopexie*).

1716 **Koalesko** (L. *Coalescentia*).

1717 **Koaltaro**, terkarba gudro.

1718 **Kobajo** (A. *Guinea pig*, F. *Cobaye*, G. *Meerschwein*).

1719 **Kodein-o**, unu el la alkaloidoj de l'opio; **apo—o**.

1720 **Kodeks-o**, farmakopeo.

1721 **Koher-a**, kunteniĝanta; **—eco**, kunteniĝemo (F. *Cohésion*).

1722 **Koiloniĥio**, atrofiaj ungoj kun kavaĵetoj (F. *Koïlonychie*).

1723 **Koit-o**, sekskuniĝo; **—i**.

1724 **Kojlon-o** aŭ **Kolon-o**, dikintesta parto. ANAT.: —o supreniranta, transversa, malsupreniranta, sigmoida; fleksaĵo dekstra, maldekstra; ĝibaĵoj aŭ haŭstroj (L. *Haustra coli*); omenta rubandeto (L. *Taenia omentalis*, F. *Bandelette antér.*); libera rubandeto. PATOL.: **—ito** (mallongiĝo=**kolito**), inflamo de —o; **para—ito**; mukmembrana —ito; —a ektazio, hipertrofia denaska dilato; **mega-—o**, trogranda —o; **—opatio**. ĤIR.: **—ofiks-**

**ado** (F. *Colopexie*); **—otomio**; **—ektomio**, fortranĉo de parto de —o; **—ostomio**, rundekunigo de parto de —o kun haŭto por fari nenaturan anuson; —a refaldigo, krispigado de —o por malpliigi ĝin (F. *Coloplication*).

1725 **Kojn-o** (G. *Keil*); **—oforma**; —oforma osto (L. *Cuneiformis*); utera **en—iĝo** aŭ **—fiksiĝo**, kiam graveda utero pro retroflekso plenigas la malgrandan pelvon kaj ne povas kreskadi; kapa en—iĝo aŭ kapa enadapto, en kelkaj akuŝoj. (A. *Enclosing*, G. *Einkeilung*, H. *Enclaviamento*).

1726 **Koka-o** (L. *Erythroxilum coca*); **—ino**; **—inismo**; **—inomanio**; **—inado** aŭ **—inizo**, sensentigado per —ino.

1727 **Korcid-o**, parazito el la grupo de ovoformaj psorospermoj; **—ozo**, simptomaro kaŭzita de —oj ĉe individuo.

1728 **Kokcig-o**, lasta vertebro; **—a**; **—algio** (F. *Coccygodinie*); **—ektomio**, fortranĉo de —o.

1729 **Kokleario** (BOT.) (L. *Cochlearia*). VAR.: apoteka (L. *Officin.*), nekultura (v. Kreno), k.t.p.

1730 **Kokluŝ-o**, infekta malsano karakterizata per konvulsia tuso; **—simila** tuso (F. *Toux coqueluchoïde*).

1731 **Kok-o**, bakterio en formo de ronda grajno (L. *Coccus*); **—obacilo**.

1732 **Koks-o** aŭ **—a** artiko (L. *Coxa*). ANAT.: Glenoida ĉirkaŭrando (L. *Labium glenoïdale*); orbeca zono (L. *Zona orbicularis*); ligamenoj

isĥio—o kapsula, pubo—o kapsula. PATOL. : **—algio,** —a doloro; **—opatio,** —a malsano (ĝenerala termino); histeria —opatio; maljuneca —opatio (L. *Morbus coxae senilis*); **—ito,** akuta inflamo de la —o; —a tuberkulozo; —a denaska elartikiĝo aŭ luksacio; plata —o, supra epifizo de femurosto platiĝinta (F. *Coxa plana*); valga —o, rektiĝo de la femurosta kolo; vara —o, la angulo de la kolo kaj de la femurosta diafizo estas malpliiĝinta; **—olamec(et)o** (F. *Déhanchement*); resortsimila —o.

1733 **Koksosto,** iliumosto (L. *Os coxae*). ANAT. : obturata truo; acetablo; acetabla foveo; acetabla incizuro (A. *Cotyloid noch*); lunoida surfaco (L. *Facies lunata*); paraglenoidaj sulkoj; arka kaj glutea linioj.

1734 **Kolageno,** kiu produktas gluaĵon, gelatenaĵon.

1735 **Kola-o** (BOT.) (L. *Kola acuminata*).

1736 **Kolaps-o** (L. *Collapsus*); cerba, kora —o, algida —o; **—oterapio,** ĥirurgia metodo kiu konsistas en artefarita pneŭmotorako por premi tuberkulozan pulmon.

1737 **Kolargolo,** arĝenta ĥemia preparaĵo.

1738 **Kolateral-a,** flanka (L. *Collateralis*).

1739 **Kolĉik-o** (BOT.) (L. *Colchicum*); **—enhava** aŭ **—oza** kuracilo, t.e. entenanta —on; **—ino** (F. *Colchicine*); **—eino** (F. *Colchicéine*).

1740 **Koldkremo,** vario de haŭtŝmiraĵo (L. *Unguentum leniens*, A. *Cold cream*).

1741 **Kolecist-o** (v. Ĥolecisto).

1742 **Koledoko** (v. Ĥoledoko).

1743 **Kolemio** (v. Ĥolemio).

1744 **Kolesterino** (v. Ĥolesterino).

1745 **Kolibacil-o** (L. *Bacillus coli communis*); **—ozo**; **—urio.**

1746 **Kolikvativa**, estas dirita pri fluego (lakso, ŝvito) aŭ pri febro kiu tute senfortigas malsanulon.

1747 **Kolik-o**, ventra doloro; intesta, hepata, rena —o; **—egoj** (L. *Tormina*, F. *Tranchées*, G. *Grimmen*).

1748 **Koliri-o**, medikamento uzata ĉe la konjunktivo.

1749 **Kolito**, vorto uzata kiel mallongiĝo de kojlonito (v. Kojlono).

1750 **Kolizi-o** aŭ **ŝoko** (A. *Shock*), renkonto de kontraŭaj agoj; anafilaksa —o (F. *Choc anaphylactique*); anafilaksoforma —o; indukta —o (F. *Choc d'induction*).

1751 **Kolkrispaĵeto**, epiderma iomete plialtiĝinta ringo ĉirkaŭ kelkaj haŭtsifilaĵoj (F. *Collerette de Biett*).

1752 **Kol-o** aŭ cerviko (v.t.v.). 1) Parto de la korpo inter la kapo kaj la torako (L. *Collum*). ANAT. : Kolaj muskoloj : haŭta muskolo aŭ platismo (L. *Platysma*, F. *Peaucier*); muskolo longa de la kapo; muskolo rekta de la kapo. Nervoj de la kola plekso : okcipita malgranda, orela granda, haŭta de l' —o. 2) Mallarĝa parto de kelkaj ostoj aŭ organoj; femurosta

—o; humera —o; utera —o. PATOL.: venera —ringo ĉe sifiluloj.

753 **Kolobom-o,** okulnenormaĵo karakterizata de fendeto de palpebro, iriso, koroido aŭ retino.

754 **Kolodi-o**, solvaĵo de piroksilino en etero; fleksebla —o (L. *Collodium elasticum*).

755 **Kolofon-o**, restaĵo el distilado de terebintoleo; **—olo** (F. *Rétinol*).

756 **Koloid-o**, nekristaligebla korpo kies disvastiĝo malbone efektiviĝas trans la dializilo; **—a**; **—oklazio**; miliuma —omo, erupcieto kaŭzita de —a degenerado de dermo.

757 **Kolokint-o** (BOT.) (L. *Colocynthis*).

758 **Koloni-o**, kolekto aŭ arokulturo; —o de bakterioj, k.t.p.

759 **Kolon-o**. 1) (L. *Columna*); grizaj —oj de la mjelo; vagina —izo aŭ —forma tamponado (F. *Columnisation du vagin*). 2) Parto de dikintesto (v. Kojlono).

760 **Kolor-o** (L. *Color*); **divers—a** (L. *Versicolor*); **—i**; **—igi**; **—igo** de mikroboj per **—ilo**; **haŭtsen—iĝo, haŭtsen—eco**, **aĥromio**. (V. Ĥrom...).

761 **Kolostro**, lakto de virino ĵus akuŝinta.

762 **Kolp...**, komenco de vorto kiu signifas vagino; **—otomio**, vagintranĉo; **—ocistotomio**, transvagina veziktranĉo; **—outerektomio**, transvagina uterfortranĉo; **—outerofikso** (F. *Colpopexie*); **—orafio**, riparo de la ŝiritaj vaginlipoj; **—operineorafio**, vaginperineoriparo;

**—ocelo**, vaginhernio; **—erinto**, kaŭĉuka **—o-dilatilo** uzata en kelkaj malfacilaj akuŝoj

1763 **Kolumbo** (BOT.) (L. *Cocculus palmatus*, A. *Calumba*).

1764 **Kolutori-o**, medikamento por ŝmiri la buŝan mukmembranon. Ekz.: natriborata —o.

1765 **Komat-o** aŭ **Komao**, malsaneca dormo kun malesto de sentokapablo kaj de memvola movkapablo; —o diabeta, dormega, duondelira (F. *Coma vigil*); **—a**.

1766 **Kombin-i**, kunmeti; **—o**; **—aĵo**; **—iĝemo** (L. *Affinitas*); **mal—o** (L. *Decompositio*); Watteville'a elektra **—ilo** (F. *Combinateur de Watteville*. Elp.: Uatvil).

1767 **Komedon-o**, akna nodeto kun nigra punkto je la aperturo de la foliklo.

1768 **Komisur-o**, punkto kie du similaj partoj kuniĝas; lipa, palpebra —o.

1769 **Komoci-o**, ekskuo; cerba —o, haltigo de cerbaj funkcioj. (Ekz.: post falo kapantaŭen).

1770 **Komoforma** (BAKT.), laŭ formo de komo (I. *a virgula*).

1771 **Kompakt-a**, densa; **—eco** (L. *Consistentia*); **mal—eco** (L. *Laxitas*); **—igita**, **—iĝinta** (A. *Agglomerated*).

1772 **Kompar-a** (L. *Comparativus*); —a anatomio.

1773 **Kompens-i**, fari ion por anstataŭi perdon; **—o**; **—ata**; **—anta** hipertrofio en kelkaj kormalsanoj.

1774 **Kompleksio**, aro de la fizikaj ecoj de iu (L. *Complexio*).

1775 **Komplekso**. 1) (ANAT.) granda —o kaj malgranda —o estas muskoloj de la kolo. 2) Aro da lezoj kaj da dependaj simptomoj (F. *Complexus morbide*).

1776 **Komplement-o**, aŭ Aleksino (v.t.v.) (Serologio); estas korpoj devojiĝantaj, aŭ fiksantaj la —on.

1777 **Komplik-o**, **—aĵo**, malsano aldonita al alia; **—i**; **—ita** frakturo.

1778 **Kompon-o**, kunmeto; **mal—o** (L. *Decompositio*).

1779 **Kompres-o**, tolaĵo por bandaĝoj (L. *Compressa*).

1780 **Komunik-o**, transdono de unu al alia; **—aĵo**, **—ilo** (L. *Contagium*); **—ebla** (L. *Contagiosus*); **—anta**; **—igi** (F. *Contagionner*); **inter—iĝa** (G. *Verbindend*, H. *Comunicante*).

1781 **Komut-i**, ŝanĝi. Ekz.: —i la direkton de l'elektra fluo; **—ilo** aŭ **—atoro**; **—aparato** (F. *Commutatrice*).

1782 **Koncentr-i**, plidensigi; **—ita** solvaĵo; **—igi**; **—igo** (A. *Concentration*).

1783 **Koncev-o**, gravediĝo; virina **—emo**; **kontraŭ—ilo.**

1784 **Kondens-i**, amasigi; **aŭto —o**; **lum —atoro** aŭ **lum —ilo**; (ELEKTR.) **—atora** lito.

1785 **Kondil-o**, osta apudartika tuberaĵo (L. *Condylus*); **—a**; **—oforma.**

1786 **Kondilomo**, apudanusa (aŭ apudvulva) tumoreto kaŭzita de derma hipertrofio.

1787 **Kondom-o**, kaŭĉuka protektilo por la viro kontraŭ seksaj malsanoj aŭ kontraŭ gravedigo de la virino.

1788 **Kondro** (v. Ĥondro).

1789 **Konduk-i**, doni la direkton al; **en—o**, enigo; (ELEKTR.) **—ilo**; **aŭto—o** (F. *Autoconduction*); **—ema**, kiu ebligas transiradon de elektro; **—emeco** (L. *Conductibilitas*); **—tubo**, kanalo (L. *Ductus*).

1790 **Kondurango** (BOT.) (L. *Gonolobus condurango*).

1791 **Konekt-i**, interligi; **—o** (L. *Connectio*).

1792 **Konfuz-o**, malordo de l'intelekto; **—a**; **—i**; **—igi**; **—iĝi**.

1793 **Konglomer-i**, densamasigi; **—itaj** glandoj.

1794 **Kongest-o**, sangalfluo; **—a**; **—i**; **—igi**; **—iĝi**.

1795 **Konĥ-o** (L. *Concha*); orel—o; naz—oj supera, meza, suba. (ĤIR.) : **naz—ektomio**, ablacio de parto de naz—o.

1796 **Kon-i** (F. *Connaître*); **senre—povo** (F. *Agnoscie*).

1797 **Koni-o**. 1) Polvo. A—o, senpolveco; **—ozo**, ĉeesto de multe da karba, fera.... polvo en organo. Ekz. : karba **pulmo—ozo**. 2) Vario de cikuto (granda aŭ makula).

1799 **Konjunktiv-o**, okulmuktuniko; **—a** fornikso (L. *Fornix*, F. *Cul-de-sac conjonctival*); palpebra —o; **—ito**, inflamo de —o; —ito akuta, difteria, folikla, gonokoka, grajneta aŭ traĥoma, katara, kronika, printempa, skrofula; **kontraŭ—ita** metodo, profilaksa metodo laŭ

Credé por eviti —iton ĉe la novnaskitoj (engutado de solvaĵo de arĝentnitrato sur —ojn).

1800 **Konkav-a**, duonsfere kava, malkonveksa; **bi—a.**

1801 **Konkremento**, malmola korpo, ofte kalkeca, kiu estiĝas post kelkaj kronikaj inflamoj.

1802 **Konkret-a**. 1) Esprimanta realaĵon; perceptebla per la sentumoj. 2) Solida aŭ preskaŭ; —a puso; **—aĵo** (L. *Concretio*).

1803 **Konsci-o**, plena regado de siaj sentoj; **sen—a, duon—a**; **sen—o**, **sen—iĝo**; epilepsia sen—o (F. *Absence épileptique*); momenta sen—iĝo (L. *Lipothymia*).

1804 **Konservant-a kuracado**, ĥirurgia metodo per kiu oni konservas, plej eble, tuton aŭ parton de organo. Ekz.: de ovario.

1805 **Konstant-o**, senŝanĝa proporcio; —o de Ambard (ĉe la sanulo la rilato de l'ureo estas proporcie la sama en sango kaj en urino); **ne—a**, nefirma (L. *Instabilis*).

1806 **Konstip-i**, mallaksigi; **—iĝi**, estiĝi mallaksa; **—o**, **—ado**, **—eco**.

1807 **Konstituci-o**, korpa kondiĉaro; forta, aŭ kontraŭe, malsanema —o.

1808 **Konstrikci-o**, ĉirkaŭpremo; **vazo—a** nervo.

1809 **Konsult-o**, prikonsiliĝo; **—i**, peti —on de iu; **—anto**, tiu kiu **—as** la **—donanton**; **inter—o**, interkonsiliĝo inter du aŭ kelkaj —donantoj.

1810 **Konsum-i**, formanĝi, iom post iom detrui; **—iĝi** (F. *Dépérir*); **—iĝo**, **—iteco** (L. *Consumptio*).

1811 **Kontaĝi-o**, infekto; **—ema**; **—i**; **—a**, **—eca**, komunikebla; **—aĵo** (L. *Contagium*).

1812 **Kontakt-o**, stato de objektoj kiuj tuŝas unu la alian; (ELEKTR.) : aparato je turnanta —o (uzata en Radiologio).

1813 **Kontinu-a**, senĉesa; (ELEKTR.) —a fluo, t.e. neinterrompata; **mal—a** (F. *Discontinu*); **—eco**.

1814 **Kontraktur-o**, muskola kuntirado, rigidiĝo.

1815 **Kontraŭ...**, prefikso kiu havas ofte la saman signifon kiel male al, anti; **—febra**, **—inflama**, **—tusa**; **—a**, **—iga** (L. *Opponens*); **—eco**; **—igeco** (L. *Opposition*); **—indiko**, malindiko (G. *Gegenanzeige*); **—stari**, rezisti al...

1816 **Kontuz-o**, lezo sekve de bato aŭ falo; **—i**; **—iĝi**; **—ita**; **—makulo**, eĥimozo.

1817 **Konus-o**, geometria formo; **—oforma** (L. *Conoïdeus*); ekstrema —o de la mjelo (F. *Cône terminal*).

1818 **Konval-o** (BOT.) (L. *Convallaria Majalis*, A. *Lily of the valley*, F. *Muguet*, G. *Maiblume*); **—ino** (F. *Convallarine*); **—marino** (F. *Convallamarine*).

1819 **Konveks-a**, malkonkava; **bi—a**.

1820 **Konverĝ-i**, celi la saman punkton; **—a** enigo de radioj (F. *Méthode radiologique des feux croisés*); **mal—i** aŭ **diverĝi**; **mal—osigno**, la piedfingroj, ĉe kelkaj paralizuloj, malkonverĝas, kiam oni fleksas, kaj etendas alterne, la

trunkon rilate al la pelvo (F. *Signe de l'éventail*) ; **mal—iga** aŭ **diverĝiga** (G. *Divergierend*).

1821 **Konvulsi-o,** kontraŭvolaj streĉoj de muskoloj kun movoj; **—a**; **—iga,** kiu kaŭzas —ojn.

1822 **Kopaiv-o** (BOT.) (L. *Copaifera*); **—a** balzamo.

1823 **Kopro...,** komenco de vorto kiu signifas ekskremento; **—fagio, —manĝo**; **—fagiulo**; **—lalio,** emo maldece paroli; **—lito,** ekskrementa ŝtono; **—stazo,** ekskrementa senmoveco en intesto.

1824 **Kopulacio,** seksa kuniĝo.

1825 **Korakobrakiala,** kiu iras de la korakoida apofizo al la brako. Same : Korakoklavikla, korakohumera, korakohioida, kiu iras de... al la klaviklo, la humero, la hioidosto.

1826 **Kord-o,** fadeno; timpana —o (L. *Funiculus tympani*); dorsa —o aŭ **noto—o** ĉe embrio; **noto—omo,** tumoro devenanta el restaĵo de la noto—o; **voĉ—ito,** inflamo de la voĉaj —oj; **—iĝa** aŭ **—oforma** blenoragio (F. *Chaude-pisse cordée*).

1827 **Kordon-o,** funiklo, ŝnuro; rondoj de l'umbilika —o (F. *Circulaires du cordon*), **—falo** (L. *Funiculi procidentia*).

1828 **Korekt-i,** plibonigi; **—anta** vitro en vidad-difektoj.

1829 **Korelizio,** operacia rompo de alteniĝoj de iriso al la kristalina lenso.

1830 **Koriz-o**, inflamo de la muktuniko de la nazo.

1831 **Korne-o**, travidebla antaŭa membrano de l'okulo; —**a**; —a reflekso. ANAT.: —a verto; antaŭa kaj posta, elasta lameno. PATOL.: —**ito**, inflamo de la —o; —ito fliktena, konusoforma, pusa, traĥoma; —a ulcero; maljunula —a rondo, aŭ gerorondo; maldiafaneco de la —a periferio ĉe la maljunuloj; —**ohernio** (F. *Kératokcèle*); —**okonjunktivito**; —**omalacio**, grava —ito ĉe atrepsiaj novnaskitoj; —a makulo (A. *Pin,* F. *Taie,* G. *Hornhautfleck*). ĤIR.: —a grefto (F. *Kératoplastie*); —**otomo** (G. *Keratotom*), ilo por la —**otomio**, tranĉo de la —o; —**oskopo**, ilo por la —**oskopio** (F. *Kératoscopie*); —**ektomio**, parta fortranĉo de la —o.

1832 **Korn-o** (L. *Cornu*); —**aĵo**; —**a**, —**eca**; —**iĝo**.

1833 **Kor-o** (L. *Cor*); —**a**; **antaŭ—a** (L. *Praecordialis*).

ANAT.: —**ventriklo**; interventrikla septo; —**vestiblo** (L. *Atrium cordis*, F. *Oreillette*); —**aŭriklo** (A. *Auricular appendix*); intervestibla septo, kun Botal'a truo ĉe la feto; vestiblo-ventriklaj orificoj; vejna truo (L. *Ostium venosum*); arteria truo (L. *Ostium arteriosum*); karnecaj trabekloj; —a vortiko (Angl. *Whorl*, F. *Tourbillon de Gerdy*); tendenecaj kordoj; plej malgrandaj vejnoj de la —o (A. *Smallest cardiac v.*, F. *Veines de Thébésius*). En dekstra vestiblo: rando de l'ovala

foveo (L. *Limbus fossae ovalis*) ; intervejna tubereto; klapo de la suba kavvejno; klapo de la koronaria sinuso (F. *Valve de Thebesius*) ; truetoj de la malgrandaj vejnoj (L. *Foramina Thebesii*). En maldekstra vestiblo: klapo de l'ovala truo (F. *Repli semi-lunaire*). En dekstra ventriklo : tripinta klapo (A. *Tricuspid valv*) ; supra ventrikla kresto (F. *Eperon de Wolf*); arteria konuso (L. *Infundibulum*); duonlunaj klapoj (A. *Sigmoid valv*) kun nodetoj. En maldekstra ventriklo: mitrala aŭ dupinta klapo.

FIZIOL. : Unu periodo de la —a ritmo (F. *Une révolution cardiaque*).

PATOL.: Akcelo de la —a ritmo; sentitaj **—batoj**; **taĥikoreco**, —a rapideco; **bradikoreco**, —a malrapideco; (momenta unuopa) batmanko (F. *Faux pas*); —a alterneco (forta bato regule sekvata de malforta); duobliĝo de la dua bruo;**—opatio**, —a difekto (L. *Cardiopathia*); endokardito; tripinta stenozo; mitrala insuficienco aŭ nesufiĉeco; miokardito; **—adipozo**; perikardito; bova —o (L. *Cor bovis*); biera —o, dilatiĝo ĉe homoj drinkadintaj tro da biero; **—angero**, **—premeco**; **—algio, —doloro**; **—spasmo**; **sen—(ec)o**, malnormaĵo (F. *Acardie*); **sen—ulo**; dekstra —eco aŭ **dekstrokardio**; **—ogramo** aŭ **—ografiko**; **—ogramilo** aŭ **—ografikilo** (F. *Cardiographe*); **—blokado** (F. *Blocage du cœur*, G. *Herzblock*).

1834 **Korod-a**, kaŭstika, mordema; **—o**; **—aĵo**; **—i**.

1835 **Koroid-o** (v. Ĥoroido).

1836 **Koronari-a** (L. *Coronarius*); **—ito**, inflamo de la —aj arterioj.

1837 **Koronoid-a** (L. *Coronoïdes*); —a apofizo.

1838 **Korp-o**. 1) Aro de la materiaj partoj ĉe homoj kaj bestoj; **—a** aspekto. 2) Aro da materiaj eroj (organikaj aŭ ne); lutea aŭ flava —o (L. *Corpus luteum*); striita —o (L. *Corpus striatum*); fremda —o; **en—igo** (L. *Incorporatio*); **en—iĝo**; **anti—o** (F. *Anticorps*); **—eto** (L. *Corpusculus*).

1839 **Kortik-o**, ŝelo; **—a**.

1840 **Korugaci-o**, haŭta krispigo; **—anta** muskolo (A. *Corrugator*, G. *Augenbrauenrunzler*).

1841 **Kotiledon-o**. 1) Parto de kelkaj vegetaĵaj embrioj; 2) Parto de placento.

1842 **Kovil-o**, aparato por varme gardi ion aŭ estaĵon (Ekz.: antaŭtempenaskitan infanon).

1834 **Kraĉ-i**, sputi; **—o**; **—ado**; **—aĵo**; monerforma (L. *Nummularius*) —aĵo ĉe kelkaj tuberkulozuloj; **el—i**, sputotusi, ekspektori; **—ujo**.

1844 **Kraket-o**, sono kiel post ĵeto de salo en fajron; **—anta** stertoro (L. *Rhonchus crepitans*); **duon—anta** (F. *Sous-crépitant*); —anta (tendena) sinoviito (F. *Aï douloureux*).

1845 **Krajon-o** (FARM.), cilindretforma preparaĵo; arĝentnitrata —o; porutera —o.

1846 **Krampf-o**, speco de spasmo kun subita kaj dolora kuntiriĝo de muskolo,

1847 **Krani-o** (L. *Cranium*); **—a** haŭto (F. *Cuir chevelu*, G. *Kopfhaut*); —a aponeŭrozo; —a kesto; —aj suturoj; **—ologio** aŭ **frenologio**; **pint—a** homo, akrocefalulo; **—omezurado** (F. *Craniométrie*). PATOL.: **—otabeso**, —a raĥita plimoliĝo; **sen—eco**, denaska manko de —o. ĤIR.: **—otraborilo**; **—otomo**, ilo por **—otomio**; **—ektomio**, ablacio de parto de —o.

1848 **Kratag-o** (BOT.) (L. *Alba spina*, A. *Hawthorn*, F. *Aubépine*, G. *Weissdorn*, H. *Espina blanca*).

1849 **Kraterform-a** (L. *Craterformis*); —a ulcero.

1850 **Kraŭroz-o**, skleroziĝo; anusa, vulva —o.

1851 **Kravokravo**, vario de afrika haŭta malsano (A. *Craw Craw*).

1852 **Kraz-o** (L. *Crasis*); sanga —o; **dis—o**, malbona temperamento (L. *Dyscrasia*).

1853 **Kreatin-o**, produkto devenanta el viando; **—ino**; **—hemio**, kiam en sango, pro nesufiĉa brulkonsumado, estas —o, tirozino, k.t.p.

1854 **Kremaci-o**, bruligo de mortinto; **—ejo**, krematorio.

1855 **Kremaljer-o**, dentita stangeto; —o de la mikroskopo.

1856 **Kremastro**, muskolo ĉe skroto.

1857 **Krem-o** (L. *Cremor*, G. *Rahm*).

1858 **Krenat-o**, salo kiu ĉeestas ĉe kelkaj mineralaj akvoj (F. *Crénate*); **—a** acido (G. *Quellsäure*).

1859 **Kren-o** (BOT.), vario de nekultura kreskaĵo (L. *Cochlearia armoracia*, F. *Raifort sauvage*).

1860 **Krenoterapi-o**, terapio per la mineralakvoj.

1861 **Kreolin-o**, devenaĵo de kreozoto.

1862 **Kreozoform-o**, produktaĵo per kondenso de kreozoto kaj formolo.

1863 **Kreozol-o** ($C^{16}$ $H^{10}$ $O^{4}$) (F. *Créosol*); **—ato**.

1864 **Kreozot-o** (A. *Creosote*); **—a karbonato** (Fr. *Créosotal*); **—a tanato** aŭ **Kreozolo** (v.t.v.).

1865 **Kresk-i**, fariĝi pli granda aŭ plimultnombra; **—o**, **—ado**; **tro—ado**; **—(ad)a febro**; **—(ad)halto** (F. *Arrêt de développement*); **—aĵo**, planto, vegetaĵo; **el —aĵo** aŭ **sur —aĵo** (A. *Excressence*, G. *Auswuchs*);**el—igi** (A. *To produce vegetations*); medicinaj —aĵoj (BOT.) (F. *Simples*); **—aĵapotekisto** (F. *Herboriste*, G. *Dürrkräutler*); **mallong—a**, malgranda, nana; **mallong—ulo**; **plen—into**, **plen—ulo** (F. *Adulte*).

1866 **Kresto**, longforma e'kreskaĵo (L. *Crista*).

1867 **Kreten-o**, idioto, ofte kropulo; **—eco** aŭ **—ismo**. **—simila** (F. *Crétinoïde*).

1868 **Krezolo** ($C^{14}H^{8}O^{2}$) (F. *Crésol, Crésylol*).

1869 **Kri...**, komenco de vorto ofte uzata internacie en kombinaĵoj por malvarmo; **—estezio**, trosenteco de malvarmo; **—okaŭterizilo**, kaŭterizilo per malvarmaĵo; **—oskopio**, esploro de la temperatura grado necesa por glaciiĝo de solvaĵo; **—oterapio**, terapeŭtiko per malvarmaj aplikadoj.

1870 **Kribr-i**, traboretadi; —**ita**; —**ilo**; —**ilforma**.

1871 **Krikoid-a**, ringforma; —a kartilago. Mallongiĝo: kriko. Muskoloj **kriko-aritenoida, kriko-faringa, kriko-tiroida.**

1872 **Kripl-a**, malbonforma; milita —**ulo** (F. *Mutilé de guerre*); **brak—ulo**, brakostumpulo; —**igi** (F. *Estropier*, G. *Verkrüppeln*); —**aĵo** (Fr. *Infirmité*).

1873 **Kript-o**, kaŝejo (L. *Crypta*); tonsilaj —oj; —**orĥidio**, denaska enabdomena testiko; —**ogena**, kaŝitkaŭza; —**otoksa** substanco, ŝtofo de normala sango kiu, eltirita el la kombinaĵo en kiu ĝi estas, per modifo de la koloida stato, povas toksiĝi.

1874 **Krispigo**, kuntiro en faldojn (L. *Crispitudo*).

1875 **Kristalin-o** aŭ —**a lenso** (L. *Lens crystallina*); —a malacio (F. *Phacomalacie*); —a sklerozo (F. *Phacosclérose*).

1876 **Krizarobino** aŭ **Ĥrizarobino** (v.t.v.).

1877 **Kriz-o**, ŝanĝiĝo subite okazanta dum malsano; —**ego**, **hiper—o**; —**a**, danĝera, decidiga.

1878 **Krom-o** (ĤEM.: Cr) (L. *Chromum*); —**ato**; —**ata** acido (F. *Acide chromique*).

1879 **Kronik-a**, longedaŭra; —**eco**.

1880 **Kron-o** (L. *Corona*); seborea —o kaj venera —o estas fruntaj erupcioj.

1881 **Kronotrop-a**, kiu rilatas al la reguleco de ritmo. Ekz.: la —a funkcio reguligas la koran ritmon.

1882 **Krop-o**, strumo, tumoro de la tiroida glando; —o

eksoftalmia, endemia simpla; **—ulo** (F. *Goîtreux*); **—ektomio**, ablacio de —o; **—ito**, inflamo de —o.

1883 **Kroton-o** (BOT.) (L. *Croton*); **—ato**; **—ata** acido; **—oleo.**

1884 **Kruc-o** (L. *Crux*); **—itaj**; **—iĝintaj**, interplektitaj; **—oforma**; **inter—iĝo** (L. *Decussatio*); **turn—o** (I. *Torcular*), iama ĥirurgia aparato por haltigi hemoragiojn.

1885 **Kruor-o**, ruĝa parto de sangkoagulaĵo; **—a** malpliiĝo (F. *Acruorie*).

1886 **Krup-o**, malsano karakterizata per membranoj en la laringo kun sufokado; difteria —o; ĉe falsa —o ne estas membranoj.

1887 **Krur-o**, anatomia parto de la genuo ĝis la piedo; artefarita —o; kurb—o ĉe valgumaj genuoj, aŭ valgumulo (F. *Bancal*); **—ingo** (F. *Jambière*). ANAT. : Muskoloj : tibia antaŭa; longa etendanta la piedfingrojn; fibula tria aŭ antaŭa; fibula longa; trikapa de la suro; gastroknemia; solea; tibia posta; mallonga etendanta la piedfingrojn; planda; kalkanea aŭ Aĥila tendeno.

1888 **Krust-o**, patologia formaĵo el sekiĝo de sero, puso, sango.

1889 **Ksantelasmo**, haŭtaj flavaj plataĵoj, ofte sur la palpebroj.

1890 **Ksantin-o** ($C^5H^4Az^4O^2$); **uro—o**.

1891 **Ksantom-o**, tubera ksantelasmo; **—osarkomo**.

1892 **Ksantopsio**, flava vidado.

1893 **Kserazo** (L. *Xerasia*) malsano de haroj kiuj similiĝas al lanugo kvazaŭ per polvo kovrita.

1894 **Kseroderm-o**, pigmenta haŭta distrofio denaska (L. *Atrophoderma pigmentosum*); **—eco**, haŭtsekeco kun iom da skvamado.

1895 **Kseroftalmi-o**, sekeco de okulkonjunktivo

1896 **Ksifoida proceso**, suba parto de sternumo (L. *Processus xyphoïdeus*).

1897 **Ksifopaĵ-o**, duobla monstro kun kuniĝo de sternumoj.

1898 **Ksilen-o**, hidrogena karbido (L. *Xylenum*).

1899 **Ksilol-o**, dimetilbenzeno.

1900 **Kubeb-o** (BOT.) (L. *Cubeba*); **—a** pipro.

1901 **Kuboid-o**, **—osto**, unu el la tarsaj ostoj.

1902 **Kubut-o**, anatomia parto inter la brako kaj la antaŭbrako. ANAT. : Ligamentoj flanka ulna, flanka radiusa ; sakforma receso (L. *Recessus sacciformis*); interosta membrano; arteria artika retaĵo; **—a** faldo.

1903 **Kufo**, parto de membranoj kiuj kovras iafoje la kapon de novnaskito je la momento de l'elpelo.

1904 **Kukurbo** (BOT.) (L. *Fructus cucurbitae*).

1905 **Kulis-o** (ANAT.) sulkaĵo kie povas gliti kelkaj tendenoj.

1906 **Kulmin-o**, plejsupro (L. *Culmen*) ; febra **—o**.

1907 **Kulombo**, unuo de elektra kvanto (F. *Coulomb*).

1908 **Kultur-o**, **—ado** (BAKT.) ; **—i** ; **—a** medio ; —o diskreskanta, ṛ'ka, plata, skua, streka; **hemo—o**.

1909 **Kumarin-o**, speco de kamforo el Tonka fabo; **—ata** acido.
1910 **Kumis-o**, fermentita ĉevalinlakto.
1911 **Kumulus-o ovaria** (L. *Cumulus oophorus*, A. *Discus proligerus*).
1912 **Kunestanta** (L. *Concomitans*).
1913 **Kunflu-i** (L. *Confluere*); **—anto** (L. *Confluens*); Herofila **—ejo** (L. *Torcula Herophili*, F. *Pressoir d'Hérophile*, G. *Hirnkelter*).
1914 **Kunîg-o**, algluiĝo; —o de vundrandoj senpera aŭ unuagrada, posta aŭ duagrada; **—a** truo (F. *Trou de conjugaison*); **—emeco** (L. *Affinitas*); —a teksaĵo (F. *Tissu conjonctif*); **mal—o** (L. *Dissociatio*); **seks—o**.
1915 **Kunkudr-o**, suturo; **—i**; **—ero** (F. *Point de suture*).
1916 **Kunten-a**, **kunteniĝanta** (L. *Cohoerens*); —a erupcio, en kiu la eroj preskaŭ sin tuŝas reciproke.
1917 **Kuntir-o** (L. *Contractio*, G. *Zusammenziehung*); **ek—o**, subita mallonga kuntiro de muskolo (F. *Secousse musculaire*); **—ado**, kontrakturo (v.t.v.); **—iĝo** (L. *Retractio*); fibretaj **—etoj** de l'aŭriklo (F. *Fibrillation auriculaire*); **—eco**, **—ebleco** (A. *Contractility*); **—ebla**; **—iĝinta** vizaĝaspekto (F. *Faciès grippé*); muskola **sen—o** (F. *Résolution musculaire*); **sen—iĝemo** (F. *Flaccidité sans contractilité*).
1918 **Kuperoz-o**, vizaĝa kapilara dilatiĝo, ofte kun ruĝakno.

1919 **Kup-o**, vazeto kiun oni almetas al la haŭto por kaŭzi lokan alfluon; sekaj, aŭ kontraŭe sangaj, —oj.

1920 **Kupokso**, erupcio sur mamo de bovinoj entenanta la kontraŭvariolan vakcinon.

1921 **Kupr-o**, ĥemia elemento: Cu (L. *Cuprum*); **—a** acetato (F. *Verdet*); —a nigra oksido, sulfato.

1922 **Kupul-o**, kaliketoforma aĵo; radiusa —o.

1923 **Kurac-o** (L. *Curatio*); **—ado**; **sun—ado**; **altaĵ—ado**; **malebenaĵ—ado** (F. *Cure de terrain*); **—a**; **—i**; **—ata**; **—ilo**, sanigilo, medikamento; **—isto**, medicinisto; milita —isto; milita **—servo** (F. *Service de santé*); familia —isto; **—istaĉo** (I. *Médicastre*); sendiploma —istaĉo (F. *Rebouteux*); **—ejo**, loko, aŭ domo, aŭ urbo, kie oni kuracas; **—eblo** (v. Sano) (A. *Curability*, G. *Heilbarkeit*); **—ebla.**

1924 **Kuraĝ-o**, fortanimeco; tuta **sen—iĝo** (F. *Anéantissement*).

1925 **Kurar-o**, saga veneno, eltirata el kelkaj kreskaĵoj; **—ino.**

1926 **Kurb-o** (F. *Courbe*); temperatura **—a** linio; **—aĵo**; **—eco.**

1927 **Kuskut-o** (BOT.) (L. *Cuscuta*).

1928 **Kus-o**, floro de « *Habenia abyssinica* » (F. *Kousso*), tenioforigilo.

1929 **Kutiklo** (L. *Cuticula*, G. *Häutchen*).

1930 **Kutireago**, haŭtreago.

1931 **Kvadrat-a** (L. *Quadratus*); —a muskolo; —a (hepata) lobo.

1932 **Kvadriplegi-o**, paralizo de la kvar membroj.

1933 **Kvaranten-o**, deviga restado en izolita loko pro suspekto pri infekta malsano (F. *Quarantaine*); **—ejo**.

1934 **Kvarco**, silica ŝtono.

1935 **Kvarĝemelaj korpoj**, parto de cerbo (L. *Corpora Quadrigemina*).

1936 **Kvarlater-a**, kiu havas kvar flankojn; —a lameno de la sfenoido.

1937 **Kvartana febro**, kiu estas karakterizata de du senfebraj tagoj inter du atakoj.

1938 **Kvasi-o** (L. *Quassia amara*); **—ino** (L. *Quassinum*).

1939 **Kvaternara** (ĤEM.), formata el kvar simplaj korpoj.

1940 **Kvazaŭ...**, iom simila al... Ekz.: **—rido** (Fr. *Rictus*).

1941 **Kvebraĥ-o** (BOT.) (L. *Aspidosperma Quebracho*); **—ino**, ekstrakto de —o, surogato de kinino.

1942 **Kvietig-a**, kiu plimildigas; —a rimedo.

1943 **Kvilajo** (BOT.) (L. *Quillaya saponaria*).

# L

1944 **Labil-a**, ofte interrompata, malfiksa; —a elektra fluo.

1945 **Labirint-o**, parto de l'interna orelo; **—a**; **—oforma**; **—ito**, inflamo de la —o. ANAT.:

1) Membrana —o; membrana ampolo; ampola kresto; kuniga kanalo (L. *Ductus reuniens*); bazilara (L. *Vestibularis*) membrano; spirala elstaraĵo. 2) Osta —o; *a*) Vestiblo : sfera, elipsa, helika foveo (L. *Recassus sphericus, ellipticus, cochlearis*); *b*) Heliko (v.t.v.); *c*) Interna akustika meato : akustika interna aperturo; transversa kresto; areo de la faca nervo; helika areo; spirala truita traktuso; vestibla areo; singulara forameno.

1946 **Lab-o**, labfermento, fermento kiu koaguligas la lakton

1947 **Laboratori-o**, specifa laborejo, bakteriologia, ĥemia, k.t.p.

1948 **Labor-o** (L. *Labor*); **tro—o** (F. *Surmenage*); **tro—i** (F. *Se surmener*).

1949 **Lac-eco** (L. *Fatigatio*); **—ecego** (F. *Accablement*); **—doloro** (L. *Acerba lassitudo*); **tro—eco**; **tro—igi** (F. *Surmener*); **tro—iĝo**.

1950 **Laĉo**, ŝnuro (A. *String*).

1951 **Lagoftalmio**, leporokuleco.

1952 **Lakmus-o** (BOT.) (L. *Crozophora tinctoria*, A. *Litmus*, F. *Tournesol*); **—a** papero, uzata en analizo.

1953 **Laks-o**, eligado de fluidaj ekskrementoj; **—a**, **—iga**, **—etiga** (L. *Laxativus*); **—i**, esti trafita de —o; **—igi**, kaŭzi —on; **—igo** (L. *Purgatio*); **—igilo**; **mal—o**, konstipo; postmanĝa —o (F. *Diarrhée prandiale*), maldigestaĵa —o; **kontraŭ—a** (**mal—iganta**) kuracilo.

1954 **Lakt-o** (L. *Lac*); **—aĵo** (F. *Laitage*); **—acio**, —a sekrecio. ANAT. : **—ifera** kanalo, **—oportanta** konduktubo. FIZ. : **—osimila** (L. *Lactescens*); **—oskopo**, ilo por mezuri la maldiafanecon de la —o. ĤEM. : **—albumino**; **—ato**, salo el **—ata** acido kaj bazo; **—obutermetro**; **—odensimetro**; **—ofenino** (v.t.v.); **—ofosfato**; **—oglobulino**; **—ozo** (v.t.v.). PAT. : **sen—acio** (L. *Agalactio*); **—oreo**, —a propramova elfluo; **—athemio**, —ata acido en sango; **—okisto** (F. *Galactocèle*); **—osimileco** (F. *Lactescence*); **—urio**, eligo de **—osimilaj** urinoj. TER. : **anti—iga** kuracilo; —a dieto (F. *Régime lacté*), —a faruno por infanoj; **—ogena**, **—ogenera** aŭ **—opliiga** rimedo; **—ogeno.**

1955 **Laktofenino**, fenacetino en kiu la laktata acido anstataŭas la acetatan acidon.

1956 **Laktoz-o**, laktosukero; **—urio**, —o en urino.

1957 **Laktuk-o** (BOT.) (L. *Lactuca*, A. *Lettuce*); **—ario**, —osuko.

1958 **Lakun-o**, malplenaĵo; **—a**; **—hava** ligamento, ĉe la ingveno (A. *Cumbernat's lig.*).

1959 **Lambd-o**, okcipita angulo je la renkonto de la kraniaj kunartraĵoj sagitala kaj **—oidaj**.

1960 **Lamblio**, vario de protozoo (L. *Lamblia intestinalis*).

1961 **Lamen-o**, maldika tavolo; **—a**; **—ektomio**, fortranĉo de vertebraj lamenoj; (vitra) **—eto** por la mikroskopaj ekzamenoj; **—eta**; **—et-**

**eca**, —**etoza** (L. *Laminosus*); —**etforma**; sifil-aj mukmembranaj —etoj (F. *Plaques muqueuses*); Peyer'aj —oj en intesto.

1962 **Lam-i**, malbone paŝi pro kriplaĵo, doloro, k.t.p.; —**igi**, kaŭzi —on; —**eti** (A. *Halt*, F. *Boitiller*); —**ado**, —**eco** (L. *Claudicatio*); intermita aŭ isĥemia —ado; —**ulo**; —**bastono** (F. *Béquille*, G. *Krücke*).

1963 **Laminario**, alga radiko ŝveliĝanta per akvaĵo.

1964 **Laminoz-a** (L. *Laminosus*); —a, aŭ kuniĝa, tek-saĵo; —**ito** aŭ celulito (v.t.v.).

1965 **Lamio** (BOT.) aŭ **blanka urtiko** (L. *Lamium album*, A. *White dead nettle*, F. *Ortie blanche*).

1966 **Lancen-o** (L. *Lancinatio*); —**i**; —**anta**.

1967 **Lancet-o**, tranĉileto; **streĉ—o** (A. *Fleam*, I. *Saetta*); —**oforma** (L. *Lanceolatus*).

1968 **Lang-o** aŭ **Gloso** (v.t.v.) (L. *Lingua*); —**a**; —**omallevigilo**; —**otenilo**. ANAT.: Franĝa faldo (L. *Plica fimbriata*); kalikoidaj papiloj; blinda truo (L. *Foramen caecum*); —a mus-kolo laŭlonga, supra, suba; —a arterio; pro-funda arterio de la —o (F. *Artère ranine*). PAT.: —o faldoza, geografia, nigra, seka, sekega, viloza; —o kun spacoj glataj kaj senpapilaj; —hipertrofio.

1969 **Lanolin-o**, langraso (G. *Wollfett*), speco de graso emanta ensorbi akvon.

1970 **Lanugo**, delikataj maldikaj haroj.

1971 **Laparocel-o**, lumba hernio.

1972 **Laparotomi-o**, ĥirurgia malfermo de la ventra pario ;—**a** disigilo aŭ laparostato, ilo por teni malfermita la abdomenon dum la —o (F. *Laparostat*).

1973 **Lapis-o**, kaŭstika ŝtono farita el arĝentnitrato ; —**a** krajono.

1974 **Lardsimila** (A. *Lardaceous*, G. *Speckig*).

1975 **Larĝ-a** ; **mal—iĝo** (L. *Coarctatio*, F. *Rétrécissement*).

1976 **Laring-o** (L.*Larynx*) ; —**a**. ANAT. : **antaŭ—a** aŭ antaŭkola elstaraĵo (A. *Adam's apple*) ; tiroida kartilago kun lamenoj dekstra kaj maldekstra, suba tuberklo, oblikva kresto ; tritikoida (L. *Triticia*, F. *Hordéiforme*) kartilago ; krikoida kartilago kun arko kaj lameno ; krikotiroida meza ligamento ; aritenoida kartilago kun ovala foveeto ; epiglota petiolo ; kojnoida kartilago (A. *Cartilage of Wrisberg*). Muskoloj ventrikla (F. *Thyro-aryépiglottique*), voĉa (F. *Thyro-aryténoïdien inférieur*), mallevanta la —on. Arterio —a suba. En la —a kavaĵo : epiglota valeto, voĉa lipo kun voĉa faldo ; voĉa ligamento (F. *Ligament thyro-aryténoïdien inférieur*) ; gloto ; glota fendo ; intermembrana, interkartilaga partoj ; ventrikla faldo (F. *Corde vocale supérieure*) ; elasta —a membrano, kun elasta konuso ; interaritenoida incizuro. DERIV. : —**ologio** ; —**ologo** aŭ —**ologiisto** ; —**oskopo**, ilo por la —**oskopio** ; —**ofantomo**, artefarita —o por

ekzerci la studentojn pri la —oskopio. ĤIR.: **—otomio**; **—ektomio**. PATOL.: **—ito**; akuta, kronika, stridula —ito; —a paralizo, **—ohernio** (F. *Laryngocèle*).

1977 **Larm-o** (L. *Lacryma*); **—ado**; **—etado**; **—a**; nevola senĉesa —a fluo (v. Epiforo); **—iga** gaso. ANAT.: —a aparato, glando, sako; ampolo de la —a kanalo; fornikso de la —a sako; **—osto** (L. *Os lacrymale*, F. *Os unguis*) kun posta kresto, kaj hoko. PAT.: **—saka** tumoro; —a ŝtono (F. *Dacryolithe*). (V. ankaŭ Dakrioadenito, Dakriocistito.)

1978 **Lata fascio** (L. *Fascia lata*).

1979 **Latenta**, kaŝita, nevidebla, sensimptoma.

1980 **Latir-o** (BOT.) (L. *Lathyrus*, A. *Sweet peas*, F. *Gesse*, G. *Platterbse*, H. *Arveja*, I. *Cicerchia*); **—ino**; **—ismo**, venenado per —oj.

1981 **Laŭdan-o**, opia alkoholaĵo; Rousseau'(Elp: Ruso) —o; Sydenham' —o.

1982 **Laŭr-o** (BOT.) (L. *Laurus*, G. *Lorbeer*); **—oĉerizo** (L. *Prunus Laurocerasus*).

1983 **Lavendo** (BOT.) (L. *Lavandula vera*).

1984 **Lazareto**. 1) Vunditejo por unua helpo; 2) K.k.f. kvarantenejo.

1985 **Lecitin-o**, fosforeca graso, kiu estas en la flavparto de l'ovo.

1986 **Lejomiomo**, tumoro el glata muskolo.

1987 **Lemnisko**, fasko da nervoj inter la ringa protuberanco kaj la cerbo (F. *Ruban de Reil*).

1988 **Lens-o**, rondforma optika vitro limigita per unu aŭ du kurbaj surfacoj; **—ometro**, ilo por mezuri la dioptikan povon de la —oj de la okulvitroj (F. *Phacomètre*).

1989 **Lent-o**, vario de legomo (L. *Ervum lens*); **—oforma** (L. *Lenticularis*).

1990 **Lentugo**, flavruĝaj makuloj de la haŭto de la vizaĝo aŭ de la manoj (L. *Lentigo*).

1991 **Leontiazo**, faca hipertrofio ĉe k.k. haŭtmalsanoj.

1992 **Leontodo** (BOT.) (L. *Leontodon*, A. *Dandelion*, F. *Pissenlit*).

1993 **Lepotrikso**, malsaneto karakterizata per ŝtonaĵetoj sur la pubaj, akselaj haroj.

1994 **Lepr-o**, malsano kaŭzita de Hansen'a bacilo; makula anesteza lepro; **—ulo**; **—ulejo**; **—omo**, **—a** tumoreto; **—idoj**, —aj haŭtafekcioj.

1995 **Lepto aŭtumna**, larvo de silka trombiliono (Fr. *Rouget*, *Aoutat*).

1996 **Leptomeningito**, inflamo de la piamatro.

1997 **Leptotriko**, vario de bakterio (L. *Leptothrix*).

1998 **Leŝmani-o**. Leishmannia protozoo; **—ozo**, malsano kaŭzata de —oj; Espundio estas amerika —ozo.

1999 **Letalito**, kondiĉaro kiu faras mortigaj malsanojn kaj vundojn (L. *Lethalitas*).

2000 **Letargi-o**, profundega mortŝajna dormo; **—a** encefalito.

2001 **Leŭcin-o** ($C^{15}H^{13}AzO^{2}$) (G. *Leucin*).

2002 **Leŭk...**, komenco de vorto internacie uzata por « blanka »; **—emio**, mallongiĝo de leŭkocitemio, malsano karakterizata de tro da blankaj globetoj en sango; medologeneza —emio (Fr. *Leucémie myélogène*); **sen—emio** (F. *Aleucémie*); **sen—emia limfadenio** (F. *Lymphadénie aleucémique*); **—ocito**, blanka disketo aŭ globeto en sango, puso, k.t.p.; **—ocita** rilato, rilato inter la varioj de leŭkocitoj en la sango dum malsano (F. *Formule leucocitaire*, G. *Blutbild*); **—ocitemio** aŭ **—emio** (v. supre); liena, limfa, pseŭda —ocitemio; **—ocitolizo** aŭ **—olizo**, malapero aŭ detruado de —ocitoj; **ocitopenio** aŭ **—openio**, **—ocitomalpliiĝo**; **—ocitozo**, momenta leŭkocitopliiĝo; **—odermio**, lokalizita blankiĝo de la haŭto post kelkaj malsanoj, sifilo, sklerodermio, k.t.p.; **—odiapedezo**; **—oplakio** aŭ **—oplazio** (L. *Psoriasis buccalis*), blankaj makuloj sur mukmembranoj; **—olizino**; **—omaino**, alkaloido produktita ĉe viva estaĵo per aliiĝo de albuminoidaj substancoj; **—omelanodermio**, haŭta difekto karakterizata de samtempa ĉeesto de hiper- kaj hipoĥromio; **—ometrio**, nombrado de —ocitoj; **—omjelito**, inflamo de la blankaj mjelaj funikloj; **—omo**, blanka makulo restanta k.k.f. post kornea ulcero; **—oreo**, eliĝo de blanka fluo tra la vulvo; **—otriĥio**, denaska harblankeco.

2003 **Lev-o**, suprenmovo; —**i**; —**anta** muskolo aŭ —**atoro**; —atoro de la skapula angulo; —**ilo** (L. *Vectis*, F. *Levier*, G. *Hebel*); **mal—anta**, malsupreniganta (F. *Abaisseur*, G. *Herabzieher*); **mal—igilo**.

2004 **Levuloz-o**, speco de sukero; —**urio**, —o en urino.

2005 **Levur-o**, bierfermentilo (L. *Spuma cerevisiae*). Analogie oni nomis levuroj la blastomikojn, Ekz.: « *Saccharomyces albicans* » aŭ **Soro** (v. t.v.), « *Saccharomyces niger* », k.t.p.

2006 **Lez-o**, postvunda aŭ postmalsana difektaĵo aŭ ŝanĝo (L. *Laesio*); —**i**, fari —on.

2007 **Liantralo**, ekstrakto de karba gudro per benzolo.

2008 **Liatris-o** (BOT.) (L. *Liatris*).

2009 **Liberig-o**. 1) TOKOL.: kapa —o (F. *Dégagement de la tête*); —o de membroj; 2) ĤEM.: —o de gaso, de vaporo.

2010 **Libido**, instigforto kaj malsato al seksa impulso laŭ Freud.

2011 **Lici-o** (BOT.) (L. *Lycium*).

2012 **Lien-o** (ANAT.) (L. *Lien*, A. *Spleen*, F. *Rate*, G. *Milz*, H. *Bazo*); —**iĝo**, —similiĝo; —**ino** (v. ankaŭ Spleno).

2013 **Ligament-o**, fasko de fibreca teksaĵo; —**a** surtuto, ĉe vertebraro.

2014 **Ligatur-o**, stringo (G. *Unterbindung*); —**i**, interligi.

2015 **Ligulo** (ANAT.) (L. *Ligula*).

2016 **Likantropio**, manio de tiu, kiu kredas sin lupo.

2017 **Liken-o**. 1) Vario de vegetaĵo (v. Cetrario); **—ino**, **—a** fekulo; 2) Vario de haŭtmalsano: —o dornetoza aŭ spinuloza, ebena aŭ plana, jukeganta, moniliforma, multforma, pinta papuloza (F *Lichen acuminé*), plana atrofia, ringforma (L. *Annulatus*), ruĝa (L. *Rubra*), serpigina; **—ado** (F. *Lichénisation*); **—iĝo**, —similiĝo (F. *Lichénification*).

2018 **Likopod-o** (BOT.) (L. *Lycopodium*).

2019 **Liksiviacio**, farmacia metodo de delokigo en preparado de kelkaj alkoholaj tinkturoj.

2020 **Likv-a**, fluida; **—aĵo** (Ekz.: cerbospina —aĵo); **—igi**; **—iĝi**; **mal—eco**, malpligranda kvanto da likvaĵoj en la korpo (F. *Déplétion*).

2021 **Lilio** (BOT.) (L. *Lilium*).

2022 **Limfadeni-o**, malsano kiu povas esti ganglionа (nomata ankaŭ adenio), liena, entera, haŭta (nomata ofte fungoida mikosizo), senleŭkemia (vario de —o sen leŭkocitemio).

2023 **Limfangito**, inflamo de limfaj vazoj.

2024 **Limf-o**, norma likvaĵo en —aj vazoj; **—ogenera**, kiu produktas —on. ANAT.: **—aro**, —a aparato (L. *Systema lymphaticum*) kun ŝila cisterno (F. *Citerne de Pecquet*); —a kanalo dekstra kaj —aj glandoj aŭ ganglionoj; —a foliklo; endo—a. PAT.: **—adenio** (v.t.v.); **—adenomo**; pseŭda —adenomo; **—angito** (v. t.v.); **—angiomo**; **—atismo**, emo al —aj malsanoj; **—atocelo**, amasiĝo de —o en —a vazo aŭ en —a glando; **—avazektazio**, dilato de la

—a vazo; **—ocito**, ĉefa leŭkocito en la —o; **—ocitomo**; **—ocitozo**; **—odermio**, haŭtaj —aj difektoj; **—ogranulomo**; **—ogranulomatozo** aŭ Hodgkin malsano; **—omatozo**, aro da malsanoj kaŭzitaj de kreskado de —aj glandoj kaj de adenoidaj organoj; **—osarkomo**; **adeno-—ocelo**, hipertrofio de limfaj glandoj kaj dilatiĝo de limfaj vazoj.

2025 **Liniment-o**, likva aŭ nedensa kuracilo por ŝmiri aŭ froti; —o amoniaka kun kamforo; —o oleokalka, terebenta.

2026 **Lini-o** (L. *Linea*); subteno de la blanka —o ĉe abdomeno (I. *Adminiculum lineae albae*); haŭta blanka —o ĉe superrenaj nesufiĉuloj; malglata aŭ raspa —o de la femuro.

2027 **Linit-o** (L. *Linitis*), vario de stomaka malsano; —o kankra, plastika, skleroza.

2028 **Lin-o** (BOT.) (L. *Linum*); faruno de —semo; **—ino**, substanco eltirita el « *Linum Catharticum* ».

2029 **Lint-o**, kanaba aŭ lina teksaĵo por bandaĝoj (A. *Lint*).

2030 **Lip**..., komenco de vorto kiu internacie en kelkaj medicinaj vortoj signifas « graso »: **—azo**, fermento kiu saponigas la grasaĵojn; **—emio**, ĉeesto de graso en la sango; **—ocelo**, grasa hernio; **—ofibromo**; **—ogena**; **—oĥromo**, grasaĵo en nervaj ĉeloj; **—oido** (v.t.v.); **—olizo**, kvazaŭsolvo de la grasoj; **—omo** (v.

t.v.) ; —**ovakcino** ; —**urio**, ĉeesto de graso en urino.

2031 **Lipemani-o**, melankolio.

2032 **Lip-o** (L. *Labium*); —**a**. ANAT. : Supra kaj suba lipoj ; —a komisuro aŭ angulo ; muskolo mal-levanta la angulon de la lipoj ; muskolo mal-levanta la suban lipon ; —a arterio supra, suba. PAT. : **Lepor—o,** denaske fendita —o ; —**oriparo** (F. *Chiloplastie*); —**oduonmaĉado** (F. *Choilophagie*); **sen—eco**, denaska manko de lipoj (F. *Achélie*); —a distiriĝo, ridaĉo (F. *Rictus*).

2033 **Lipoido**, substanco, kiun oni eltiras el korpaj teksaĵoj per la samaj solvantaj substancoj kiel tiuj, kiuj solvas la grasaĵojn ; same kiel gras-oj, la lipoidoj entenas Ca, O, H, sed plie Ph kaj k.k.f. S.

2034 **Lipom-o**, tumoro el graso ; pseŭda —omo ; —**ozo**, ĉeesto de multaj —omoj ; simetria adeno-—ozo.

2035 **Lisidin-o,** metilglioksalidino, kontraŭpodagra rimedo.

2036 **Lisoform-o,** formoleca antisepsaĵo.

2037 **Lisol-o**, antisepsaĵo, surogato de fenolo (L. *Lysolum*).

2038 **Litargiro**, plumboksido.

2039 **Litiaz-o** aŭ **Litozo**, malsano karakterizata de ĉeesto de ŝtonoj ; rena, vezika —o ; gala —o ; —**ulo** (L. *Calculosus*).

2040 **Lit-io**, vario de metalo : Li (L. *Lithium*) ; **—la** benzoato, bromido, karbonato, k.t.p. ; **—ino**, oksido de —io.

2041 **Lito...**, komenco de vorto internacie uzata por ŝtono ; **—labo**, ŝtonkaptilo ; **—lapaksio**, vario de rapida **—tricio**, t.e. ŝtondispecigo en la veziko ; **—lizo**, ŝtonsolvo ; **—tomo** ; **—malaclo**, spontanea plimoliĝo de kelkaj ŝtonoj ; **—pediono**, kalkeciĝinta feto ; **—skopo**, ilo por vidi kaj mezuri ŝtonon en veziko ; **—triciilo**, ilo por **—tricio** ; **—zo** aŭ **litiazo** (v.t.v.).

2042 **Livedo**, violeta haŭta reto.

2043 **Liz-o**. 1) Solvo, detruo ; **aŭto—o**, teksaĵa aŭtodigesto de mikroboj ; **aŭto—ino** ; 2) Favora krizo (L. *Lysis*); **—a** febrofalo, regula foriĝo de febro, iom post iom.

2044 **Lobeli-o** (BOT.) (L. *Lobelia*); **—ino**.

2045 **Lob-o**, parto iom globforma de iaj korporganoj. Ekz. : de cerbo,, pulmo, k.t.p. ; **—a** : **—oza** (L. *Lobatus*); **inter—a**; **—eto**; **—etoza**; (L. *Lobatus*); **bi—a** aŭ **du—a**.

2046 **Lofotrika** bacilo, kiu havas vibrajn ciliojn ĉe unu ekstremaĵo.

2047 **Loĝ-i**, resti en unu loko ; **—ado** ; **—ejo** ; **—loko** (A. *Habitat*, G. *Standort*); **—antaro** (L. *Populus*) ; **pra—anta** aŭ **aŭtoĥtona**, indigena.

2048 **Loĥioj**, utera elfluo dum la tagoj post la akuŝo.

2049 **Lokaliz-i**, determini la lokon ; **—o**, **—ado** ; **—ilo**.

2050 **Lok-o**, parto de la spaco; elektinda loko por punkcio (F. *Lieu d'élection*); **aer—ado**, loki mal-

sanulon ekstere de lia kutima domo; —**ŝanĝema** (L. *Ambulans*); **de—igo, de—iĝo** (F. *Déplacement*); paralela de—iĝo aŭ surmetiĝo, en kelkaj ostrompoj (L. *Superpositio*, F. *Chevauchement*, G. *Uebergreifen*, H. *Accavallamento*); denta **re—igo** (F. *Réimplantation*); **intertrans—o, —ado, —igo, —iĝo** (L. *Transpositio*); embria limita —o (F. *Aire embryonnaire*); **bi—a** aŭ **du—a**, aŭ dufaka utero; —**iĝi**, esti. Ekz.: Brulvundo —iĝis ĉe antaŭa parto de la torako.

2051 **Long-a** (L. *Longus*); **—o**; **—eco**; **—kreskulo**; **—igado**; **pli—igaĵo** (F. *Prolongement*); —a vivdaŭro (L. *Longevitas*).

2052 **Looĥ-o**, sirupsimila gumeca medikamento; migdala —o; oleeca —o.

2053 **Lordozo**, troa antaŭenkurbiĝo de la lumba vertebraro.

2054 **Loretino**, derivato de kinoleino.

2055 **Lueso**, vorto k.k.f. uzata anstataŭ sifilo, kiam oni ne volas uzi tiun ĉi vorton malbone faman.

2056 **Luksaci-o**, elartikiĝo; **sub—o**, **duon—o**; recidiva aŭ reaperanta —o; **—a** redukto.

2057 **Lumb-oj** (L. *Lumbi*); **—a** (L. *Lumbalis*); **endo—a**, interne de —oj; **—algio** aŭ **—ago** (internacie uzata), —a doloro; **—artritaro**, kronika reŭmatismo de —aj vertebroj; **—similiĝo**, anomalio de la unua sakra vertebro kiu similas al la kvina —a vertebro. ANAT.: —a triangulo. (F. *Triangle de Petit*). Nervoj de la

—a plekso: ilio-hipogastra; ilio-ingvena; genero-femura kun branĉoj ingvena kaj sperma ekstera; haŭta femura flanka, femura (L. *Nervus cruralis*) kun antaŭaj branĉoj, safena, subpatela, mezaj haŭtaj branĉoj (F. *Branches jambières*).

2058 **Lumbrik-o**, speco de vermo; **—oida**, **—simila**; **—aj** muskoloj. (ANAT.).

2059 **Luminalo**, feniletilmalonilureo (F. *Luminal, Gardénal*).

2060 **Lum-o** (L. *Lux*); **—eco**; **—igo** (A. *Lighting*, G. *Beleuchtung*, I. *Illuminazione*); **flanke—igo** (F. *Eclairage latéral*); **Abbe'a—igo**; **—igi** (F. *Eclairer*); **—kondensilo** aŭ **—kondensatoro**; **—trairebla**, diafana; **—unuo**, unuo de —o (F. *Un lux*).

2061 **Lun-o** (L. *Luna*); **—eto**, blanka makulo je la bazo de la ungoj (L. *Semilunula unguium*); **—osto** (L. *Os lunatum*, A. *Lunar bone*); **semi—aj** kartilagoj en genuo.

2062 **Lupeo**, konverĝiga lenso (G. *Vergrösserungsglas*).

2063 **Lupol-o** (BOT.) vegetaĵo uzata por la bierfabrikado; **—ino**; flava polvo el —o; **—ito**, amara deveno de —ino (F. *Lupulite*).

2064 **Lupus-o**, vario de kronika haŭtmalsano; —o boranta (L. *Terebrans*), ĉirkaŭmanĝanta (L. *Vorax*), ekzantema, elefantiaza, eritema, perniosimila (A. *Chilblain lupus*), vespertoforma (L. *Vespertilio*); **—a** (F. *Lupique*); **—omo** aŭ

**lupomo**, **—a** tuberkulomo ; **—oidoj** aŭ **lupoidoj**, erupcioj kompareblaj al —o.

2065 **Luŝka**, germana anatomiisto ; **—glando**.

2066 **Lute-a**, flava ; —a korpo, parto de l'ovario.

2067 **Lut-o** (F. *Soudure*); **—aĵo** (L. *Lutum*) uzata de apotekistoj, ĥemiistoj, por kunigo, por algluiĝoj.

# M

2068 **Macaĵeto**, **kavmaco** aŭ **oblato**, maca envolvilo por medikamentoj (F. *Cachet*).

2069 **Macer-i**, lasi kreskaĵon en likvaĵo per eltiri el ĝi solveblajn principojn ; **—o**, **—ado** ; **—aĵo**.

2070 **Maĉ-o**, **—ado** (L. *Masticatio*); **—i**, **—adi** ; **—ilo** (F. *Masticateur*); **—igaĵo** (A. *Masticatory*, G. *Kaumittel*) ; **duon—o**, **duon—ado** (F. *Mâchonnement*); **kvazaŭ—ita** vundo (F. *Mâchure*);**re—i**, maĉi denove la antaŭe englutitajn manĝaĵojn ; **re—o**, **re—ado**.

2071 **Madura piedo**, parazita hipertrofio de piedo.

2072 **Magdaleo** (FARM.), cilindroforma konservita medikamento, precipe plastro.

2073 **Magmo**, densa restaĵo (L. *Magma*, A. *Grounds*, G. *Teig*).

2074 **Magnet-o**. 1) Fera peco altiranta feron ; **—a**, **—eca** ; **—eco** ; **—oelektra** aparato ; **—oterapio** ; 2) **—ismo**, speciala influo de unu per-

sono sur alian, eltrovita de Mesmer; **—izi** (A. *To magnetise*); **—izanto**; **—izisto**.

2075 **Magnez-o**, vario de metalo: Mg; **—io**, hidr-oksido de —o; **—ia** citrato eferveska; —ia hidrokarbonato; kalcinata (aŭ usta) —io; —ia silikato (v. Talko); —ia sulfato.

2076 **Maiz-o** (BOT.) (L. *Zea maïs*); **—ismo**, venedado per —o (F. *Zéisme*).

2077 **Majstra** (L. *Magistralis, Extemporaneus*).

2078 **Makro...**, komenco de vorto kiu signifas ampleks-eco, grandeco, longeco. Ekz.: **—biotiko**, metodaro por plilongigi la vivon; **—cefalio**, ampleksakapeco; **—cefalo** aŭ **—cefaliulo**; **—cito**, tre granda ruĝa sangoglobeto; **—fago**, ĉelo kiu englutas kaj digestas mikrob-ojn, hematiojn, k.t.p.; **—gloseco** aŭ **—lang-eco**; **—melio**, troa longeco de la membroj; **—skopa**, okule videbla sen lenso aŭ sen mikroskopo.

2079 **Makul-o**, alikolora loko sur haŭto, ne leviĝanta rilate al la ĉirkaŭaĵo; **—eto**; **—ego** (F. *Plaque, placard*); mongola (blua sakra) —o; **—a**; **—hava**, kiu havas kelkajn —ojn; **—oza**, kiu havas multajn —ojn; **—i**, malpurigi.

2080 **Makzel-o**, tuto de la makzelosto (supra parto de la —o) kaj de la mandiblo (v.t.v.); **inter—a osto** (L. *Os intermaxillare*) ĉe feto; **—aj** arte-rioj interna, ekstera. ANAT. de la —osto (L. *Maxillaris superior*); —a sinuso, kies ĥirurgia malfermo estas nomata antrotomio

(v.t.v.); aperturo de sinuso (L. *Hiatus*); nazlarma kanalo; apofizoj frunta, zigoma; inciziva kanalo, alveola rando; alveolaj ĝiboĵoj.

2081 **Malacino**, salicilparafenetidino.

2082 **Malaci-o**. 1) Malsana apetito por ekscitantaj kaj acidaj manĝaĵoj (L. *Spicae gravidarum*, G. *Gelüste*); 2) En kombinoj :: moliĝo. Ekz. : **osteo—o**.

2083 **Malari-o**, marĉofebro, paludismo ; **—a**.

2084 **Malat-o** (ĤEM.), salo el **—a** acido poma kun bazo (G. *Apfelsaures Salz*).

2085 **Male-o** (L. *Malleus*, A. *Glanders*, F. *Morve*, G. *Rotz*, H. *Muermo*); **—ino**, substanco eltirita el kulturoj de **—aj** baciloj (v. Farcino).

2086 **Maleol-o**, elstaraĵo ĉe la suba ekstremaĵo de la kruraj ostoj; interna, ekstera —o; **—oj** (F. *Chevilles*).

2087 **Malign-a**, malbonprognoza ; **—eco**.

2088 **Malsprit-eco** (L. *Imbecillitas*); **—ulo**.

2089 **Malta febro** aŭ **Melitokokozo** (v.t.v.).

2090 **Malt-o**, ekstrakto el ekĝermantaj grajnoj de kelkaj grameneoj ; **—ino**, aganta substanco de —o ; **—ozo** ($C^{12}H^{12}O^{11}$).

2091 **Maltusianism-o**, metodo praviganta malplimultigon de la naskoj.

2092 **Malvo** (BOT.) (L. *Malva*, A. *Mallow*).

2093 **Mam-o** (L. *Mamma*, A. *Breast*, G. *Weibliche Brust*); **—a** ; **—pinto** ; artefarita —pinto ; **—pintoforma** ; **—pintoza** (Fr. *Mamillé*); **—suĉi** ; kaŭĉuka **—suĉilo** ; **—nutri** ; **—nu-**

**trado** (L. *Lactatio*); **—nutrantino**; **de—igo** (L. *Ablactatio*); **de—igi**, suĉesigi. ANAT.: Laktoportantaj kanaloj; sinusoj; sebaj glandoj (L. *Gl. areolares*); —a arterio interna kun branĉoj interripaj kaj perikardofrenika (Angl. *Superior phrenic*, F. *Artère diaphragmatique supérieure*). PATOL.: **—ito** aŭ **mastito**, —a inflamo; **ĉirkaŭ—ito**; **—algio** aŭ **mastodinio**.

2094 **Mana-o**, suko el « *Fraxinus* » (L. *Manna*); **—ito**; **—ita** acido; **—itozo**, vario de sukero.

2095 **Mandibl-o**, malsupra parto de makzelo. ANAT.: Mentona protuberanco, tubereto, dornoj (F. *Apophyses géni*); **—a** incizuro (L. *Incisura mandibulae*); kondiloida apofizo; gониono; —a angulo; —a truo; —a langeto (Lat. *Lingula*, F. *Epine de Spix*); —a artiko kun artika disko, ligamentoj tempi—a, sfeno—a.

2096 **Mandragor-o** (BOT.) (L. *Mandragora*, A. *Mandrake*).

2097 **Mandren-o**, rigida stangeto kiu, enigita en nerigidan esplorilon, malhelpas ĝian fleksiĝon.

2098 **Mangan-o**, metalo : Mn (L. *Manganesium*); **—a** dioksido (L. *Manganesium peroxydatum*); —a karbonato, klorido, sulfato.

2099 **Manĝ-i**; **ĉion—anta** (F. *Omnivore*); **—ado** (L. *Manducatio*); **—aĵo**.

2100 **Mani-o**, formo de frenezeco; **argumenti—o**; **demono—o**; **lipe—o** (v.t.v.); **marŝado—o** (F. *Dromomanie*); **megalo—o**; **mensogo—o** aŭ **mito—o**; **mono—o**; **—ulo**; **mono—ulo**.

2101 **Manipul-o**, **—ado**, vario de laboro per la manoj. Ekz. : farmacia (H. *Manipulacion*).

2102 **Mank-o**, malesto. Ekz. : denaska —o de brakoj ; **—osigno** (G. *Ausfallserscheinung*).

2103 **Mankono** (BOT.) ŝelo de « *Erythrophleum guineense* ».

2104 **Man-o** (L. *Manus*); **bul—o** (A. *Club-hand*, F. *Main bote*, G. *Klumphand*, I. *Mano torda*); simia —o; sukplena —o (F. *Main succulente*); **predikanto—o**, en kelkaj nervaj malsanoj ; **—plato** ; **—plata** (L. *Palmaris*); **—platoplanda** signo (F. *Signe palmo-plantaire de Filipovicz*); **sen—a**, al kiu denaske mankas —oj ; **sen—eco** (F. *Achirie*).

2105 **Manometr-o**, premmezurilo ; **—a**.

2106 **Manubrio** (L. *Manubrium*).

2107 **Manum-o**, parto de haŭto, kiun, dum amputo, post entranĉo, oni momente suprenfaldas, kaj kiu poste kovras la tranĉan surfacon.

2108 **Marasm-o**, fizika tutsenfortiĝo ; aĝa —o (L. *Aetas decrepita*).

2109 **Marisko**, fibreca hemoroida saketo.

2110 **Mar-o** (L. *Mare*); **—bano** ; **—malsan(et)o** ; **—terapio** aŭ **talasoterapio**.

2111 **Maronujo** (BOT.) (L. *Aesculus hippocastanum*, A. *Horsechestnut Tree*).

2112 **Marsupializo**, operacio per kiu oni faras poŝon similan al tiu de la marsupialoj. Ekz. : kiam

oni kunkudras al la haŭto neektomieblan kiston.

2113 **Martel-o** (L. *Malleus*). 1) Osteto de la meza orelo. ANAT.: —a manubrio; flanka apofizo (L. *Processus lateralis*); antaŭa apofizo; muskolo streĉanta la timpanon. 2) Ilo por enigi najlojn, k.t.p.; —o por la refleksoj; **—ego**, vario de ĥirurgia ilo (F. *Maillet*).

2114 **Marubio** (BOT.) (L. *Marrubium*, A. *Horehound*).

2115 **Masaĝ-o**, metoda premado de parto aŭ tuto de la homa korpo por kuracaj celoj; **—i**; **—isto**. Varioj de —o: hakilmanbateto; premfrotado; ektuŝeto (F. *Effleurage*); knedado (F. *Pétrissage*); premego (F. *Foulage*, G. *Walkung*), k.t.p.

2116 **Maseter-o**, ĉefa muskolo de la makzelo.

2117 **Mask-o**. 1) Speciala aspekto de la vizaĝo. Ekz.: —o de gravedulinoj. 2) Aparato. Ekz.: —o por kloroformado. 3) **—ita**, neregula, erariga (F. *Larvé*).

2118 **Masoĥism-o**, vario de aberacio de la seksa sento.

2119 **Mastik-o**, rezino el « *Pistacia lentiscus* ».

2120 **Mastit-o** (pref. **Mamito**), inflamo de la mamo; **peri—o**; **para—o**.

**2121** **Mastodinio**, mamalgio.

2122 **Mastoid-o**, **—a** apofizo, parto de la tempiosto. ANAT.: —a sulko, truo; —a branĉo de la okcipita arterio. PAT.: **—ito**, inflamo de la —o.

123 **Masturbo**, seksa ekscito de la generaj organoj per la mano.

124 **Mastĉelo**, vario de leŭkocito (G. *Mastzelle*).

125 **Mate-o** (BOT.) (L. *Ilex paraguayensis*, F. *Maté*).

126 **Materi-o** (L. *Materia*); ekstrakta —o (F. *Matière extractive*); medicina **—aro** (L. *Materia medica*); **—ŝanĝoj**.

127 **Matiko** (BOT.) (L. *Piper angustifolium*).

128 **Matracio**, globa botelo uzata en ĥemio.

129 **Matrikario** (BOT.) genro « *Matricaria* ». VAR. : Kamomilo (v.t.v.), k.t.p.

30 **Matur-a**, atinginta la limon de sia evoluo ; **—eco** ; **—igo** ; **—iĝo** ; **ne—a**, neplenkreska.

31 **Meat-o**, aperturo de kanaleto.

32 **Meĉo**, ŝnurforma peco el sorba ŝtofo, uzata por dreni vundon.

33 **Median-o** aŭ **—a** nervo (L. *Medianus*).

34 **Mediastin-o** (L. *Mediastinum*); **—a** ; **—ito**, inflamo de la kuniga teksaĵo de —o.

35 **Medicin-o**, kuracarto ; **—a** ; **—leĝa** (F. *Médico-légal*) ; **—isto**, kuracisto ; **—studento**.

36 **Medikament-o**, substanco simpla aŭ ne, uzata ekstere aŭ interne kiel sanigaĵo ; **—a** formulo.

37 **Medi-o** (L. *Medium*); organika —o; **—ologio**, scienco pri ĉirkaŭantaj influoj (F. *Mésologie*); **—a** (L. *Ambiens*).

38 **Mediteranea febro** aŭ **Melitokokozo** (v.t.v.)

39 **Medol-o**, mola intraosta substanco ; **—oĉelo** (F. *Médullocelle*) aŭ **—ocito** (F. *Myélocyte*), ĉelo de la medolo, granuloza unukerna leŭkocito;

sanga **—ocitozo**; **—ocitomo**; **—ocitomozo**; multnuklea) **—a** plateto aŭ mjeloplakso; **—ito**, inflamo de la —o; **—ogeneza** leŭkemio; **—oida, —osimila** (A. *Myeloid*).

2140 **Meg...**, komenco de vorto, kiu signifas granda; **—aergo**, vario de elektra unuo; **—ohmunuo**, miliono da ohmunuoj (v. Ohm); **—akojlono**, kojlono pli granda ol norme.

2141 **Megalomani-o**, manio karakterizata de memglor-amo.

2142 **Meĥan-iko**, scienco de la movado; **—ika**; artika **—ismo**, maniero de la movado de artiko; **—oterapio**; **bio—iko**, —iko de la vivo.

2143 **Mejopragio**, funkcia kapabl(ec)o de organo, pli-malgranda ol norme.

2144 **Mekonino**, derivaĵo de opio.

2145 **Mekonio**, fekaĵo de la feto tuj post la naskiĝo.

2146 **Melaleŭko** (BOT.) (L. *Melaleuca viridiflora*).

2147 **Melan...**, komenco de vorto kiu signifas nigra; **—a** tumoro (F. *Tumeur mélanique*); **—ino**, nigra pigmento; **—emio**, —ino en la sango kaj en la vazparioj; **—kolio**, manio karakteri-zata de malgajeco; **—ocito**, —inentenanta leŭkocito; **—ozo** (L. *Melanosis*), kies varioj estas Addison'a, antaŭkankra, malaria, pedi-ka, tuberkuloza.

2148 **Melen-o**, eligo de sango el la anuso, plej ofte post stomaka aŭ intesta hemoragio (L. *Melaena*); —o de novnaskitoj.

49 **Meliloto** (BOT.) (L. *Melilotus officinalis*, G. *Steinklee*).

50 **Melis-o** (BOT.) (L. *Melissa officinalis*, A. *Balm*).

51 **Melitokokozo**, mediteranea febro kaŭzata de « *Micrococcus melitensis* », ankaŭ nomata Malta aŭ ondulanta febro.

52 **Melitozo**, sukero el Aŭstralia manao.

53 **Membran-o**, maldika lameno de teksaĵo; **—a**; **—eca** lameno (ANAT.) (F. *Extension membraneuse*, G. *Ausdehnung*); limiga —o; **muk—o** (A. *Mucous membrane*, F. *Muqueuse*); **nov-o**; **pseŭda —o**; **—oforma**; ondomova —o, organeto por la memmovado de la tripanosomoj; **duon—a** muskolo.

54 **Membr-o** (L. *Membrum*); supraj, malsupraj —oj. Malnormaĵoj: denaska **—omanko**, aŭ ektromelio; **—a** troa longeco, aŭ makromelio; —a troa mallongeco, aŭ mikromelio.

55 **Mening-o** (L. *Meninx*); **—a**. ANAT.: Encefala duramatro, piamatro, araknoido; cerba falĉilo; cerbeta tendeto; diafragmo de la selo (L. *Diaphragma sellae*, A. *Operculum of the hypophisis*); kavoj (A. *Space*) epidurala, subdurala, subaraknoida; cisternoj (F. *Confluents, Lacs*) subaraknoidaj; cisterno cerbetomjela; cisternoj de la flanka foveo de la cerbo kaj de la kiasmo; interpedunkla cisterno; araknoidaj grajnoj (A. *Pacchionian granulations*); koroida epitelia lameno. PATOL.: **—ito** (akuta, ĥronika, cerbo-mjela, epidemia,

sekundara); **—ita streko** (F. *Raie méningitique*); —ita krio; hipertrofia **paki—ito**; **—itismo**, kvazaŭ—ita simptomaro; **—oencefalito**; **—omjelito**; —a apopleksio, **—ohernio** aŭ **—ocelo** (F. *Méningocèle*); **—omo** (F. *Méningiome*). Ekz.: Sursela (aŭ surtu-ksela) —omo.

2156 **Menisk-o**, fibreca interartika organeto; **—ito**, inflamo de —o.

2157 **Menopaŭz-o**, ĉeso de menstruacio; **—a** aĝo.

2158 **Menoragi-o**, troa menstruacia sangado.

2159 **Mens-o** (L. *Mens*); **—a** konfuzo.

2160 **Menstru-o**, monata sangelfluo ĉe virinoj; **—a**; **—aĵoj** aŭ monataĵoj; **—acio**; **—ofaciliga** (F. *Emménagogue*); —aj prodromoj (L. *Molimina menstrualia*).

2161 **Mentagro**, parazita malsano de la mentonharoj.

2162 **Ment-o** (BOT.) (L. *Mentha*); pipra —o (A. *Peppermint*); **—olo**, kamforo de la menta esenco.

2163 **Menton-o** (ANAT.) (L. *Mentum*, G. *Kinn*).

2164 **Meralgi-o**, doloro kaj aliaj nervaj simptomoj (parestezioj, k.t.p.) en la femura regiono; parestezia —o; parestetika —o (L. *Meralgia paresthetica*) de Bernhardt Roth.

2165 **Merg-o** (L. *Immersio*); **—a** objektlenso, uzata en mikroskopio; **el—iĝa** punkto de nervo (F. *Point d'émergence d'un nerf*).

2166 **Merkurial-o** (BOT.) (L. *Mercurialis*, A. *Mercury*); **—a** mielo.

2167 **Merkur-o** aŭ pref. **Hidrargo** (v.t.v.), vario de

metalo; —**a** sceptro, medicina emblemo (Fr. *Caducée*).

2168 **Meroblastika ovo**, kiu konsistas el parto por nutrado kaj parto por formado de la vitelo.

2169 **Merocel-o**, antaŭfemura hernio (F. *Hernie crurale*, G. *Schenkelbruch*).

2170 **Merokrin-a** glando, en kiu la sekrecio devenas el la epiteliaj ĉeloj de la acinoj.

2171 **Mesenter-o** (pref. **Mezentero**) (v.t.v.).

2172 **Mestiz-o**, ido de blankulo (aŭ —ino) kaj alirasulo (aŭ —ino).

2173 **Metabol-o**, ŝtofŝanĝo, naturŝanĝo de la korpoj; la studo de la baza —o estas studo de la aktiveco de la brulkonsumadaj fenomenoj en la organismo, kiuj povas esti aŭ normaj, aŭ plimalpliiĝintaj; —**a** bilanco.

2174 **Metacetin-o**, paraoksimetilacetanilido.

2175 **Metahemoglobin-o**, firma kombinaĵo de oksigeno kaj hemoglobino.

2176 **Metagenez-o**, alterna nasko aŭ produktado.

2177 **Metakarpe-o** (ANAT.) (L. *Metacarpus*); —**aro** (F. *Métacarpe*).

2178 **Metal-o** (ĤEM.) (L. *Metallum*); —**a**; —**oterapio**, surhaŭta aplikado de —oj en nervaj malsanoj; —**oido**.

2179 **Metamer-o**, segmento el la primitiva divido de l'embrio; —**a**; haŭta —**eco** (F. *Métamérie cutanée*).

2180 **Metan-o**, saturita hidrogena karbido; —**olo**, ĝia

alkoholo; **—alo**, ĝia aldehido; **—ata**, aŭ formiata, acido (L. *Acidum formicicum*).

2181 **Metaplazi-o**, transformiĝado, hipoteza proceso en kiu elementoj naskus malsamajn elementojn; **—a** (F. *Métaplastique*).

2182 **Metapsiĥ-o**, scienco pri la fenomenoj meĥanikaj aŭ psiĥologiaj, devenantaj el fortoj, kiuj ŝajnas inteligentaj, aŭ el nekonataj potencoj kaŝitaj en la homa intelekto (P-ro Richet).

2183 **Metastaz-o**, translokiĝo de loka malsana proceso en unu aŭ multajn novajn regionojn.

2184 **Metatars-o**, osto de la piedo; **—a**; **—algio**, —a doloro; **—aro** (F. *Métatarse*).

2185 **Metazoo** (F. *Métazoaire*).

2186 **Meteorism-o**, abdomena ŝveleco per intesta gaso.

2187 **Met-i**, doni lokon al objekto; **al—o**; **ĝuste—o**; **al—igo**; **al—iĝo** (A. *Coaptation*, F. *Affrontement, Apposition*, G. *Anlegen, Aneinanderlegen*); **apud—o** (L. *Juxtapositio*); **re—o** (L. *Repositio*, F. *Réduction*); **en—o**, enkorpigo (L. *Intromissio*); parafina en—o, kiam oni enkorpigas anatomian pecon en parafinan medion por mikroskopa ekzameno; **inter—o** (L. *Interpositio*); **sur—o**, apliko (G. *Auflegen*).

2188 **Metilacetanilido** (L. *Methylacetanilidum*).

2189 **Metilalo** (ĤEM.) ($C^3H^8O^2$).

2190 **Metilen-o**, gaso ($C^2H^2$); **—bluo**.

2191 **Metil-o** (ĤEM.) ($CH^3$); **—a** alkoholo; **—azotido**

(aŭ **amino**); **—klorido**, monoklora metano; **—salicilato.**

2192 **Metod-o**, difinita agmaniero. Ekz.: En reenartikigoj oni povas uzi mildan aŭ kontraŭe fortan —on; **serĉ—o**; objektiva —o.

2193 **Metr...**, komenco de vorto, kiu ofte signifas utero; **—ito**, inflamo de la utero; **endo—ito**; **peri—ito**; **—oragio**, utera hemoragio (inter la monataĵoj); **—oreo**, fluida ne sanga utera eligaĵo.

2194 **Mezencefal-o** (L. *Mesencephalum*, G. *Mittelhirn*). ANAT.: Ponto (L. *Pons Varoli*); brakoj de la ponto (F. *Pédoncules cérébelleux moyens*); lemniskoj (A. *Fillet*) mezaĵa, flanka; kuniga brako de la cerbeto; antaŭa mjela vualo (L. *Velum medullare anterius*, F. *Valve de Vieussens*).

2195 **Mezenter-o** (L. *Mesenterium*); **—a**; **—ito**; **—ganglionа** tuberkulozo (F. *Phtisie mésentérique*, G. *Darrsucht*); kojlona —o aŭ mezokojlono; rektuma —o aŭ mezorektumo.

2196 **Mezereo** (BOT.) (L. *Daphne mezereum*, A. *Mezereon*).

2197 **Mez-o**, loko egaldistanca de ambaŭ finoj; **—a** (L. *Medialis*); —a fingro (L. *Medius*); **—aĵa**, kontraŭo de ekstera. Ekz.: —aĵa aŭ interna maleolo; **—okarpeo**; **—opalata**; **—otarsa** (F. *Médiotarsien*).

2198 **Mezoderm-o**, meza folio de la blastodermo; **—a.**

2199 **Mi...**, komenco de vorto, kiu internacie estas ofte

uzata anstataŭ muskolo. Ekz.: **—algio** aŭ **—odinio**, muskola doloro (F. *Myodinie*); **—astenio**; **—ataksio**, senvolaj movoj refleksaj en kelkaj nervmalsanoj; **—atonio**; **—atrofio**; **—oblasto**, ĉelo de mezodermo, kiu estiĝas fibreto de striata muskolo; **—edemo**, muskola ŝveleco (post frapeto, ĉe kelkaj malsanuloj); **—ografo**, ilo por enskribi la muskolajn kuntirojn; **—okardo**, kora muskolo; **—okardito**, inflamo de —okardo; **—oklonio**, nekunordigitaj aŭ neregulaj muskolaj kuntiroj; **para—oklonio**; **—olemo**, ingo de muskolaj fibretoj; **—olizo**; **—ologio**, parto de anatomio; **—omo**, muskola tumoro; **dermato—omo**; **fibro—omo**; **glat—omo** (F. *Liomyome*); **—omektomio**, forigo de —omo; **—omozo** aŭ **—omatozo**; **—opatio**, muskolmalsano; **—ozito**, inflamo de muskolo.

2200 **Miasm-o**, malsanigaĵo en la aero; **—a**.

2201 **Micelium-o**, funga fibretaro (L. *Mycelium*).

2202 **Micel-o**, molekularo konsiderata kiel la plej malgranda parto de korpo, havanta ĉiujn fizikajn kvalitojn de tiu korpo (F. *Micelle*).

2203 **Micetom-o**, vario de hipertrofia piedo kun tuberoj, ulceroj, ostaj lezoj.

2204 **Midriaz-o**, dilato de la pupilo; **—a**; **—iga** (Fr. *Mydriatique*).

2205 **Miel-o** (L. *Mel*); **—aĵo**, **—siropo** (A. *Honey syrup*, G. *Honig*, I. *Mellito*); skila **—vinagro** (L. *Oxymel scillae*).

2206 **Migdal-o**, frukto el « *Amygdalus communis* »; **—a** oleo el dolĉaj —oj; **—ino**, substanco eltirata el amaraj —oj (L. *Amygdalinum*); **—siropo** (F. *Orgeat*).

2207 **Migren-o** = Hemikranio (v.t.v.).

2208 **Migr-i**, transloĝiĝi; testíka **—ado**; **—antaj** ĉeloj (F. *Cellules migratrices*).

2209 **Mii...**, komenco de vorto, kiu signifas muŝo; **—ocefalo**, vario de stafilomo, en kiu la iriso iom similas al muŝo; **—odopsio**, pseŭda vido de muŝoj ĉe kelkaj okulmalsanuloj; **—azo**, malsano elvokata per muŝlarvoj en la faringo, k.t.p.

2210 **Mik-o**, senklorofila kreskaĵo (L. *Fungus*); **—ologio**, scienco pri —oj; **—ozo**; **antaŭ—oza** (F. *Prémycosique*); **—odermo** (L. *Mycoderma*); **—omiceto**; **—omiringito**.

2211 **Mikosizo fungoida**, danĝera haŭtmalsano (L. *Lymfodermia perniciosa*, F. *Mycosis fongoïde*).

2212 **Mikro...**, komenco de vorto, kiu signifas « malgranda »; **—cefalio** aŭ **—cefaleco**, malgranda kranieco; **—cefalo** aŭ **—cefaliulo**; **—daktilio**, malgranda fingreco; **—fago**, malgranda fagocito; **—farado**, elektra unuo de intenseco; **—koko** (L. *Micrococcus*); **—melio**, denaska troa mallongeco de membroj; **—metro** (A. *Micrometer*); **—no**, milono de milimetro; **—organismo**; **—sfigmio**, malforta pulseco; **—tomo**, ilo por tranĉi ion en tre maldikajn

platajojn; **—zimo**, agento de la fermentado laŭ Béchamp. (V. ankaŭ Mikrobo, Mikroskopo, Mikrosporo.)

2213 **Mikrob-o**, mikroskopa organismo; **kontraŭ—a**; **sen —igi** (F. *Aseptiser*); latenta **—ismo**.

2214 **Mikroskop-o**; **ultra —o**; **por —a** preparaĵo; **per—a** ekzameno; **—io**, scienco en kiu oni uzas —on. Partoj de —o: stativo; plateno kun movebla ĉaro; varmiga plataĵo; mikrometra ŝraŭbo; lumkondensilo; spegulo; objektivo kaj okulario; irisforma diafragmo; merga (enakviga) objektlenso; kloŝo.

2215 **Mikrospor-o** (L. *Microsporum*); furfura —o; tre malgranda —o (L. *Micr. minutissimum*): **—ozo**, malsano kaŭzata de —oj.

2216 **Miksedem-o**, malsano karakterizata de muka edemo, subnorma temperaturo, k.t.p. kaŭzata de denaska manko, aŭ ablacio, aŭ nesufiĉeco de la tiroida glando; **—a**; **—ulo**.

2217 **Miks-i**, intermeti objektojn aŭ iliajn erojn; **—o**, **—ado**; **—aĵo** (L. *Mixtura*); piste **kun—i**, trituri; **kun—aĵo** (L. *Ingrediens*).

2218 **Mild-a** (L. *Dulcis*); **—igi**. Ekz.: —igi doloron per kuracilo, —igi akran guston de medikamento per sukero; **—iga**, **—igata**, ne kompleta, kvietiga, ne akra; **—igilo**.

2219 **Milfolio** (BOT.) (L. *Achillea Millefolium*, A. *Milfoil*, G. *Schafgarbe*).

2220 **Miliamper-o**, milono de ampero; **—metro**, ilo por mezuri —ojn.

2221 **Miliar-o**, erupcio kies elementoj similas al grajnoj de milio; kristala, ruĝa, blanka —o; **—a** febro; —a tuberkulozo.

2222 **Mili-o** (BOT.) popola nomo por kelkaj specoj de greno kun malgrandaj grajnoj; **—oforma** (F. *Miliaire*, adj.); **—aro** (v.t.v.).

2223 **Milita** kuracservo (F. *Service de santé militaire*); milita aŭ militserva kuracisto.

2224 **Milium-o**, haŭtaj kistetoj blankaj milioformaj; **koloid—o** (F. *Colloïd milium*).

2225 **Minac-a**, danĝera; tuja **—eco**, tre proksima danĝero (F. *Imminence morbide*).

2226 **Mineral-o**; **—aj** akvoj; **—akvoterapio**; **—igo**; **—iĝo**; **de—igo**; **de—iĝo**; **mal—iĝo**, troa elimino aŭ seniĝo el —oj.

2227 **Minianto** (BOT.) (L. *Minianthus*, A. *Beanbuck*, G. *Zottenblume*).

2228 **Minio** (ĤEM.) (L. *Minium*).

2229 **Miom-o**, muskola tumoro (v. Mi...).

2230 **Miop-a**, kiu vidas nur de proksime; **—eco**; **—ulo**; **mal—a** aŭ **hipermetropa**; **mal—eco**; **mal—ulo**.

2231 **Mioz-o**, mallarĝiĝo de la pupilo; **—iga** (F. *Myotique*).

2232 **Mirh-o**, gumrezino el Arabio; **—a** tinkturo.

2233 **Miring-o** aŭ **Timpano** (v.t.v.); **—ito**, inflamo de timpano.

2234 **Miristiko** (BOT.) (L. *Myristica*, F. *Muscadier*). VAR.: muskata (v. Muskato).

2235 **Mirozino**, solvebla fermento de la mustarda grajno.

2236 **Mirtiform-a**, en formo de mirto; —a karunklo (ANAT.).

2237 **Mitomani-o**, mensogomanio.

2238 **Mitoz-o**, modo de dividiĝo de ĉeloj; —**a**.

2239 **Mitral-a** (L. *Mitralis*); —a, aŭ bikuspida, klapo; —a nesufiĉeco; —a stenozo.

2240 **Mitridatism-o**, kontraŭvenena alkutimiĝo.

2241 **Miur-a**, grade malpliiĝanta (L. *Myurus*); —a pulso.

2242 **Mizantrop-io** aŭ —**eco**, hommalamo; —**o**, homevitulo.

2243 **Mizogin-io**, virinmalamo; —**o**, virinevitulo.

2244 **Mjelencefal-o**, tuto de encefalo kaj mjelo.

2245 **Mjelin-o**, substanco, kiu ĉirkaŭas la nervajn cilindraksojn; **sen—aj** fibroj (F. *Fibres amyéliniques*).

2246 **Mjel-o**, vertebrara aŭ spina medolo; —**a**. ANAT.: Cervika intumesko; —a konuso; fina fadeno; antaŭa meza fendo; grizaj kolonoj; antaŭa, flankaj, postaj, blankaj kolonoj (F. *Cornes*); centra kanalo; fina ventriklo (L. *Ventriculus terminalis*); dorsa kerno (A. *Clarke's column*); funikloj; faskoj piramida aŭ antaŭa cerbospina (F. *Pyramidal antérieur*), propra antaŭa (A. *Dorso-lateral ascending cerebellar tract*, F. *Cérebelleux descendant*), flanka piramida aŭ flanka cerbospina (F. *Pyramidal latéral*); cerbetospina, propra-

flanka delikatega (L. *Fasciculus gracilis*), kojnoida (L. *Funiculus cuneatus*, A. *Tract of Burdach*, F. *Zone radiculaire postérieure*); lumba intumesko el kiu eliras la lumbo-sakra nervaro (vulg. nomita ĉevalvosto); **—omero**, haŭta parto rilata al metamera segmento de la —o. PATOL.: **—ito**; akuta, daŭra, kola, dorsa, lumba —ito; infana **polio—ito**; **—opatio**, —malsano; **hidro—io**, dilato de la —a centra kanalo; iradataksio aŭ tabeso; griz —a sklerozo; Friedreich'a hereda ataksio; muskola grada atrofio; pseŭdohipertrofia paralizo; —a spasma paralizo supreniranta; —a hernio; **sen—o**, **—manko** (malnormaĵo) (F. *Amyélie*); **—omalacio**; fervojaj —aj perturboj (A. *Railway spine*); **—omeningocelo.** PATOL. ANAT.: **—ocito**, medolocito (v. t. v.); **—oplakso**, medola plateto.

247 **Moderiga nervo** (F. *Nerf modérateur*).

248 **Modiolo**, akso de la orelheliko (L. *Columella*).

249 **Mokso**, vario de kaŭterizilo (L. *Moxa*).

250 **Mol-a,** facile cedanta al premo; **—iĝo** (F. *Ramollissement*, G. *Erweichung*); **—iĝulo**, individuo trafita de cerba —iĝo; **mal—aĵo**; **mal—iĝo**; **mal—iĝinta** (L. *Induratus*); **pli—igi** (G. *Erweichen*); **—iga** (F. *Emollient*, G. *Erweichend*); **—adermio,** —iĝo de la haŭto (F. *Myxodermie*).

251 **Molaro,** muela dento (V. Dento).

2252 **Molekulo,** plej malgranda ero de ĥemia korpo havanta ĝiajn ecojn; **—a.**

2253 **Molibdeno,** vario de metalo. Simbolo: Mo.

2254 **Molimeno,** internaj fenomenoj kiuj antaŭas menstruan hemoragion, hemoroidan ŝvelon, k. t. p.

2255 **Mol-o,** molamaso, hidatidforma —o; kista degeriĝo de placento.

2256 **Molusk-o** aŭ **—umo,** vario de mola haŭta tumoro; komunikebla —o (L. *Molluscum contagiosum*); pendanta —o (L. *Molluscum pendulum*).

2257 **Monataĵoj,** menstruaĵoj.

2258 **Monesi-o,** ŝelo de « *Chrysophyllum glycophloeum* » (BOT.); **—ino.**

2259 **Mongol-a** makulo, sursakra blua makulo ĉe kelkaj infanoj; **—ismo.**

2260 **Moniletrikso,** nodoza hararo.

2261 **Moniliforma,** rozariforma.

2262 **Mono...,** komenco de vorto kiu signifas ofte « unu »; **—ftalmio**; **—okula**, kiu havas nur unu okulon; **—manio**, **—paralizo**, **—testikeco**; **—trika** bacilo, kiu havas unu vibreman haron je ambaŭ ekstremoj.

2263 **Monstr-o,** estaĵo denaske diferenca de la aliaj samspecaj estaĵoj; duobla —o, kiu povas esti per si mem vivanta (F. *Autositaire*) aŭ unuparazita (F. *Monstre double parasitaire*); **—a**; **—eco**; **—aĵo.**

2264 **Mont-o,** altaĵo; puba —o (L. *Mons Veneris*); **—ara** malsan(et)o (F. *Mal des montagnes*).

265 **Montr-i,** elmeti al la rigardo; (**seksorgan**)**el —ema el—ulo** (F. *Exhibitionniste*).

266 **Morbil-o** (L. *Morbilli.* A. *Measles.* F. *Rougeole.* G. *Masern.* H. *Varampion.* I. *Rosolia*); **—a.**

267 **Mord-o** (L. *Morsus*); **—aĵo,** produkto uzata por faciligi koloradon en bakteriologio; **—oforma** vundo (F. *Plaie à bords mâchés*).

268 **Morelo nigra** (BOT.) (L. *Solanum nigrum.* G. *Nachtschatten.* H. *Yerba mora*).

269 **Morfe-o,** vario de haŭtmalsano (L. *Vitiligo morphea,* G. *Weisser Hautfleck*). Var.: atrofia, gutsimila, lepra, k. t. p.

270 **Morfin-o,** alkaloido de l'opio; **— ismo; —omanio; —omaniulo; apo—o; para—o; de—(ig)ado** (F. *Démorphinisation*); **—a hidroklorido** (L. *Morphinum chlorhydricum*).

271 **Morfologio,** studo de la eksteraj formoj.

272 **Morokoko** (L. *Morococcus*).

273 **Mortero** (FARM.) (L. *Mortarium*).

274 **Mort-i,** ĉesi vivi; **—o, —eco;** nurŝajna —o, letargio; **—into,** senviva korpo; novnaskita —into (A. *Stillborn.* F. *Mort-né.* G. *Todgeburt*); **—intejo,** tombejo; **—bruligo,** kremacio; **sin—igo** (A. *Suicide,* G. *Selbstmord*); **sin—igi; —ulejo,** kadavrelmetejo; **—okonstato; —okvanto** (L. *Mortalitas*).

275 **Morton'a fluo** (ELEKT.) (A. *Wave current,* Fr. *Courant de Morton*).

276 **Morul-o,** embria ovo, antaŭ la fino de la segmentado.

2277 **Moru-o** (ZOOL.) (L. *Gadus morrhua*); **—(hepat)-oleo** aŭ **Gadoleo**; **—olo**, alkohola ekstrakto de —oleo.

2278 **Morus-o** (BOT.) (L. *Morum*, A. *Mulberry*, F. *Mûre*, G. *Maulbeere*); **—oforma** ŝtono (F. *Calcul mûral*).

2279 **Motor-o**, movilo; **—a**, moviga; **vazo—a** nervo; **—eco**.

2280 **Mov-o**, ŝanĝo de loko; **—eco** (L. *Motilitas*); **—aparato**, tuto de la muskoloj kaj ostoj; **—ebleco** (L. *Mobilitas*); **—iga**, motora; **—ig-kapableco** (L. *Motricité*); elektra **ek—ilo** (F. *Démarrage électrique*); **ĉirkaŭ—o** (L. *Circumductio*, G. *Kreisbewegung*); **—ilo**, motoro; **sen—eco**, stazo; **sen—igo** (F. *Immobilisation*); **—iĝi**; **—iĝo**; **—iĝeco** (v. Kinezo).

2281 **Mucilag-o**, gumaĵo; **—a**.

•2282 **Mucin-o**, substanco formata el albumino kaj karbonhidrato.

2283 **Muel-a dento** aŭ **Molaro** (L. *Molaris*); **antaŭ—aj** dentoj (L. *Dentes praemolares*); **apud—a** kresto (F. *Ligne myloïdienne*); muskoloj **—oglosa** (F. *Myloglosse*); **—ohioida** (F. *M. mylohyoïdien*).

2284 **Mugeto** aŭ **Soro** (v.t.v.).

2285 **Muk-o**, glua fluidaĵo; **—a**, **—eca** (L. *Mucosus*); **—a puso** (F. *Muco-Pus*); **—edemo** aŭ **miks-edemo** (v.t.v.); **—aĵo**; **—membrano**; **—tuniko** aŭ **—ozo** (A. *Mucous membrane*, G. *Schleimhaut*); sifilaj —membranaj lamenoj (F.

*Plaques muqueuses*); **—viskeca** (L. *Viscosus*); **—viskaĵo** (A. *Slime*, F. *Glaire*, H. *Glara*); **—oida**, **—simila** (F. *Mucoïde*); **—produktanta** (F. *Mucipare*); **—supo**, supo densa kaŭze de enhavo de muko (Ekz.: hordea muko), aŭ farunsupo; **—tumoro** (F. *Mucocèle*); **—ino** aŭ **mucino** (v.t.v.); **—inazo** aŭ **mucinazo**, vario de fermento; **—omo**, tumoro el —a teksaĵo (F. *Myxome*); **adeno—omo**; **—osarkomo**; **—oĥondromo**.

2286 **Mult-a**, grandkvanta, grandnombra; **—obligo** (L. *Multiplicatio*); **—egiĝo** (L. *Pululacio*); **—forma** (F. *Polymorphe*); **—formeco**; **—nuklea** ĉelo; **—fragmenta** ostrompo (F. *Fracture comminutive*); **—ipara**, akuŝinta plurfoje; **—ipareco**.

2287 **Mumi-o**, kadavro konservita per enbalzamigo; **—igo**, **—igado**, **—iĝo** (F. *Momification*).

2288 **Mumps-o** (L. *Parotitis*, A. *Mumps*, F. *Oreillons*).

2289 **Muntad-o**, kunadapto de la partoj de maŝino por funkciado; elektra —o laŭ tensio, aŭ serio, laŭ kvanto aŭ baterio: deriva —o; miksita —o.

2290 **Muriat-o** aŭ **Klorhidrato**; **—a acido** (G. *Salzsäure*).

2291 **Murmur-o**, vario de spiradbrueto; pulmveziketa —o (A. *Respiratory murmur*, G. *Atmungsgeräusch*).

2292 **Musitacio**, movado de la lipoj kiel por mallaŭte paroli (vidiĝas en kelkaj danĝeraj malsanoj) (L. *Mussitatio*, G. *Brummen*).

2293 **Muskarino**, alkaloido el la falsa amanito, vario de fungo (L. *Muscaria amanita*).

2294 **Muskato** (BOT.) (A. *Nutmeg*, F. *Muscade*), migdalo de la frukto de muskata miristiko.

2295 **Musk-o** (BOT.), klaso de kriptogramoj (A. *Moss*); korsika —o (A. *Sea-moss*, G. *Corsikanisches Wurmmoos*, I. *Mosco di mare*).

2296 **Muskol-o** (L. *Musculus*); glata —o; (sulke) strekita —o; triventra —o; **—a**; **en—a** injekto; —a lameno de la arteria pario; —a kuntiro (L. *Contractio*); **—forta** (L. *Musculosus*); **—haŭta** nervo (F. *Nerf musculo-cutané*); **—omembrana** (F. *Musculo-membraneux*); —a grada atrofio; **—inflamo** aŭ **miozito** (v. Mi...)

2297 **Muŝ-o** (L. *Musca*, A. *Fly*); **—vidado** (F. *Myodopsie*, G. *Mückensehen*); flugantaj —oj (F. *Mouches volantes*); **—bruo**, aŭdata kiam oni aŭskultas la jugularan vejnon ĉe ĥlorozulinoj; **—larvozo** aŭ **miiazo** (v. Mii...).

2298 **Mut-a**, kiu ne povas paroli; **—ulo**; **surd—ulo**.

2299 **Mutacismo**, difekto de la elparolado karakterizata de troa ripeto de la literoj b, m, p.

2300 **Mutil-i**, kripligi; **—anta** lepro.

2301 **Muzik-o**; **—nekapableco** (F. *Amusie motrice*); **—nesenteco** (F. *Amusie sensorielle*).

# N

2302 **Nadl-o** (A. *Needle*, F. *Aiguille*, H. *Aguja*, I. *Ago*); kunkudra —o (F. *Aiguille à sutures*); Reverdin'a —o; punkci —o; montrila —o (F. *Aiguille indicatrice*); **—opikado** aŭ **Akupunkturo** (v.t.v.).

2304 **Naftol-o** ($C^{10}H^{7}O^{4}$) ; —o α; —o β, devenoj de la sulfo**—ata** acido; **—ato**; kamfora —o.

2305 **Naganao**, vario de Tripanosomiozo.

2306 **Najl-o** (L. *Clavus*); (histeria) **—sento** (F. *Clou hystérique*); **—ado**, **—enmeto**, ĥirurgia metodo ĉe kelkaj ostrompoj (F. *Enclouement*).

2307 **Najsilbero** aŭ pref. **Novarĝento** (v.t.v.).

2308 **Nan-a**, nenorme malgranda (L. *Nanus*); **—o** aŭ **—ulo**; **—eco** aŭ **—ismo**.

2309 **Narcein-o**, unu el la alkaloidoj de l'opio.

2310 **Narkolepsi-o**, nerva malsano karakterizata de subitaj ekdormoj.

2311 **Narkot-o**, dormiga substanco; **—a**; **—ismo**.

2312 **Narkoz-o**, artefarita dormo, plej ofte per medikamentoj; **—a**, dormiga; **—ilo**, **—aĵo**, narkoto.

2313 **Nask-i**, eligi idon (G. *Gebären*) ; **—o**, **—ado** (L. *Nativitas*); spontanea —o; **—igo** (L. *Procreatio*) ; **—igi**; **—iĝi** (F. *Naître*) ; antaŭtempe —iĝi; **—iĝokvanto**, natalito; **—eca**, puerpera; **—emo**; **—anta** (G. *Zeugend*, I. *Generatore*); **nov—ito** (L. *Neonatus*); **malvive —ita** (F. *Mort-né*); **du—ito**, ĝemelo; **post—aĵo**,

t.e. placento kun membranoj (A. *Afterbirth*, F. *Délivre*, G. *Nachgeburt*, H. *Secundinas*); ellivero (F. *Délivrance*); **de—a**, **kun—a**, **kun—ita** (L. *Innatus*, *Congenitus*); **kun—eco**; perburĝona —o (L. *Gemmatio*, F. *Gemmiparité*).

2314 **Natalit-o**, kvanto da naskiĝoj.

2315 **Natri-o** aŭ **Sodiumo** (L. *Natrium*); **—a** arsenato; —a metilarsenato (F. *Arrhénal*); —a arsenilato, aŭ atoksilo; —a benzoato, borato, hiperborato (L. *Natrium perboracicum*), bromido, kakodilato; —a karbonato, aŭ sodo (L. *Carbonas sodicus*); —a bikarbonato aŭ acida karbonato (L. *Bicarbonas sodicus*); —a klorato; —a hidroksido (L. *Natrium causticum*); —a bioksido; —a hipoklorito, hiposulfito, jodido, nitrato, nitrito, dibaza fosfato, bi- aŭ disulfato, sulfito.

2316 **Natur-o** (L. *Natura*); **—ismo**; **—isto**; **—sciencisto**; **—a**, neartefarita.

2317 **Naŭz-o**, vomemo; **—iga** (A. *Nauseous*).

2318 **Navikl-a**, skafoida (v.t.v.); **—osto**, skafoidosto.

2319 **Naz-o** (L. *Nasus*); **—elfluo**, **—a** sekrecio; **—elparolo** (G. *Näseln*); **—truoj**; **—umo**, **—pinĉilo** (F. *Pince-nez*). ANAT.: —a kavo; **—konĥoj**, supera, meza, suba; **para—aj** sinusoj makzela sinuso; —a supro (L. *Apex nasi*); —aj aloj; granda kartilago de la alo, kun meza kaj flanka kruroj; **—osto**; vomero, —aj arterioj postaj, flankaj, septumaj;

—nervo; **—ofaringa istmo**. PAT. : **—elfluego** (F. *Jetage*); **—hemoragio**, epistakso; **—obstrukco** (A. *Stopping in the nose*, F. *Enchifrènemnt*, G. *Stockschnupfen*, H. *Romadizo*, I. *Gravedine*).

2320 **Neartrozo**,nova artiko.

2321 **Necesej-o** aŭ **Latrino** (A. *Closet*, G. *Abort*); tendaraj —oj (F. *Feuillées*).

2322 **Nefelio**, iom maldiafana makulo ĉe la korneo.

2323 **Nefr-o** (el grek. *Nefros*), komenco de vorto uzata en medicinaj terminoj anstataŭ reno; **—a** koliko; **—ito**, inflamo de reno; **—otomio**, entranĉo en renon; **—ektomio**, ablacio de reno; **—optozo**, aŭ **—ofalo**; **—ofikso** (F. *Néphropéxie*); **—olitiazo**; **—oragio**, rena hemoragio; **—otoksino**.

2324 **Negativ-a**, nea; —a reago; —a poluso; **—o** (Fotogr.) ; **—eco**.

2325 **Negatoskopo**, aparato por ekzameni negativajn radiografaĵojn.

2326 **Nekr...**, komenco de vorto kiu signifas «morto» ; **—obiozo**, aliiĝo de neinfektita teksaĵo, kies sanga circulado ĉesis; **—ofilio**, emo al seksuniĝo kun kadavroj; **—opsio**, ekzameno de kadavra internaĵo; **—ozo**, morto de korpa parto ĉe malsanulo.

2327 **Nematod-o**, vario de helminto.

2328 **Neon-o**, vario de gaso. Simbolo: Ne.

2329 **Neoplasm-o**, tumoro.

2330 **Neoplazo**, novteksaĵa produktaĵo.

2331 **Nerval-a** (L. *Nervalis*); —aj ostoj (L. *Nervalia ossa*); —a balzamo.

2332 **Nerv-o** (L. *Nervus*); —aparato; **—aro**; **—agado**; moviga —o; senta —o; **—eco**; **—ofortiganta** rimedo. ANAT.: **—akso** (F. *Névraxe*); **—ilemo** (A. *Neurilema*, G. *Nervenscheide*); **—oglio**, struktura subaĵo de la —a teksaĵo; **peri—o**, **peri—a** teksaĵo (F. *Périnèvre*); **—okeratino**. PAT.: **—algio**; **—astenio** aŭ **Neŭrastenio**; **—ito**, inflamo de —o; —ito akuta, alkohola, kronika, multobla; **poli—ito**; **—omo**, tumoro de —o; **—opatio**; **—opatiulo**; **—ozo**, —a malsano sen anatomia konata lezo; **—ozeco**, **—ozemo**, emo al nervozoj (G. *Nervosität*); **—(ec)emulo**, kiu havas —an incitiĝemon. ĤIR.: **—oplilongigo**, tiretado de nervo por forigi doloron (F. *Elongation*); **—otomio**, tranĉo de —o; **—ektomio**, —a ablacio; —a forigo; **sen—igo** (A. *Enervation*); **—agmio**, ĥirurgia rompo; —agmia metodo (F. *Méthode névragmique*). (V. Neŭro.)

2333 **Nesufiĉ-eco**, insuficienco; —a surrena sekrecio (F. *Hypoépiphrénie*).

2334 **Neŭr-o**, ofte uzata en kombinoj kiel nervo; **—algio**; **—astenio**; **—ino**; **—ito**; **—oartritismo**; **—oblasto**; **—ofibromatozo**; **—ologio**; **—ono**, nerva ĉelo kun ĝiaj filamentoj; **—onofagio**; **—otropa**, kiu sin fiksas sur la nervan aparaton; **—ozo**; **—ozeco** (v. Nervo).

2335 **Neŭtr-a** (ĤEM.), kiu estas nek acida nek alkalia; **—eco**; **—igo**; **—iga** (A. *Neutralizing*).

2336 **Neŭtrofil-o**, vario de leŭkocito.

2337 **Nevus-o** (L. *Naevus*, A. *Mother's mark*, I. *Voglia*). VAR.: —o atrofia, ebena aŭ kontraŭe malebena, hara, hiperkeratoza, linia, mola aŭ malmola, moluskuma, sangvazeta, pigmenta aŭ senpigmenta, tubera, veruka. PATOL.: **—okarcinomo** aŭ **nevokarcinomo**.

2338 **Nidora**, kiu havas guston kaj odoron de viando (aŭ ovo) putranta (L. *Nidorosus*).

2339 **Nikotin-o**, alkaloido de la tabako.

2340 **Niktacio**, palpebrumado (F. *Clignotement*).

2341 **Niktalopio**, vidkapablo dum la nokto kun netolero de la taglumo.

2342 **Nimf-o**, vulva lipeto; **—ito**, inflamo de —oj; **—omanio**, erotika ekscita stato (G. *Mannestollheit*).

2343 **Niobo** (Ĥemia simbolo: Nb. Atompezo 93,5).

2344 **Nistagmo**, pendola movado de l'okulo.

2345 **Nitono** (Emanacio) (Ĥemia simbolo: Nt (Em). Atompezo 222.

2346 **Nitr...**, mallongigo de nitrogeno (v.t.v.) en kombinoj; **—ata** acido (L. *Acidum nitricum*); **—ato**; **—ita** acido (F. *Acide nitreux*); **—iĝo** (I. *Nitrificazione*); **—o** = salpetro (v.t.v.); **—oglicerino** aŭ **trinitrino**; **—oksilo**, ĥemia radikalo $NO^2$; **—oloj**; **—osilo** (NO).

2347 **Nitritoida** krizo, perturbaro k.k.f. okazanta post injekto de salvarsano, k.t.p.

2348 **Nitrogen-o**, azoto; mallongigo Nitr... (v.t.v.); —aj funkcioj: aminoj, nitriloj, karbilaminoj, k.t.p.

2349 **Nod-o** (L. *Nodus*, A. *Knot*); **—eto** (L. *Nodulus*); **—aĵo** (F. *Nodosité*); **—oza** reŭmatismo.

2350 **Nokardi-o**, vario de mikozo; **—ozo**, malsano kaŭzita de —o.

2351 **Nokturio**, urinado precipe nokta.

2352 **Nomao**, inflama nekrozo de buŝo aŭ vango.

2353 **Nomenklatur-o**, terminaro.

2354 **Nonao**, speco de dormiga malsano.

2355 **Norm-a**, **—ala**, ordinara, laŭregula; —o; **mal—a**; **ne—a**; **mal—aĵo**; **ekster—aĵo**, anomalio.

2356 **Normoblasto**, vario de kernhava ruĝa sangoglobeto.

2357 **Noso...**, komenco de vorto, kiu signifas « malsano »; **—fobio**, mania timo al malsano, kiu ne minacas; **—grafio**, metoda klasifiko de la malsanoj; **—komiala**, kiu rilatas al la hospitaloj; **—logio**, studo de la nomoj de la malsanoj.

2358 **Nostalgio**, hejmdeziro, hejmsopiro.

2359 **Notokordo**, unua signo de la vertebraro ĉe embrio (v. Kordo).

2360 **Novarĝento**, kombinaĵo simila al arĝento sed entenanta nur iom da tiu ĉi.

2361 **Novokaino** (L. *Novocainum*).

2362 **Nukle-o**, kerno; **—a**, **—eca**; **—oza**, kiu havas unu aŭ kelkajn kernojn; **mono—a**; **mono—**

**ozo**, tro da mono —aj globetoj en la sango; **mult—a**; **mult—ozo**; **—oforma**; **—ino**; **—inato**; **—inata** acido; **—oalbumino**; **—olo**, parto de kerno pli kolorakceptema.

2363 **Nuk-o** (L. *Cervix*, G. *Nacken*); **—a**.

2364 **Nukso vomiga** (BOT.) (L. *Strychnos nux vomica*).

2365 **Nulipar-a**, neniam gravediĝinta virino; **—ulino**; **—eco**.

2366 **Nutacio**, patologia kapbalancado.

2367 **Nutr-o** (L. *Alimentum*); ŝpara aŭ ŝpariga —o (F. *Aliment d'épargne*); **—ado**; **de—ado**, malbona, nesufiĉa —ado; **super—ado** (L. *Suralimentatio*); **mam—ado** (L. *Lactatio*); persondila —ado (F. *Gavage*); **—adtaŭga** (L. *Alibilis*); **—ofobio**; **—omanko** (F. *Carence*); senvitamina aŭ vitaminnesufiĉa —ado; **—aĵo**; **—a**; **—ada**; **—aĵa**; **—iga**; **—i**; **—antino**; **—istino**, pagata mamnutristino; **—ilo**, medio por kulturo de mikroboj.

# O

2368 **Obdukcio** aŭ aŭtopsio, sekcado de kadavro.

2369 **Obeliono** (ANAT.) (L. *Obelion*).

2370 **Objektiv-a** (G. *Objectiv*); —a esploro; **—o**, objektlenso (v. t. v.).

2371 **Objektlens-o**, suba lenso de la mikroskopo; merga **—o**.

2372 **Oblato**, macaĵeto (V. Maco).

2373 **Oblikv-a**, flanken iranta; —a ekstera muskolo (L. *Obliquus externus*); —a interna muskolo (F. *Petit oblique*); **—eco.**

2374 **Obliter-o**, malapero de kavo aŭ kanalo per pleniga aŭ cikatra teksaĵo; **—i**; **—ita.**

2375 **Obnubilacio**, vido de objektoj kvazaŭ tra nubo.

2376 **Observ-i**, atente rigardi; **—o**, detala raporto; **—ado.**

2377 **Obstetriko**, akuŝarto, tokologio (v. t. v.).

2378 **Obstip-o**, **—ado**, nesufiĉa intesta funkciado.

2379 **Obstrukc-o**, **—iĝo**, barado. Ekz. : intesta —o; katara naz—o (F. *Enchifrènement*); **—ita** (F. *Engorgé*).

2380 **Obtur-o**, ŝtopo; **—ilo** (F. *Obturateur*); **—a** truo ĉe koksosto; —a kanalo.

2381 **Odont...** = dento (v. t. v.); **—oida**, dentforma; —oida apofizo (L. *Odontoides*).

2382 **Ofiazo**, loka senhareco (L. *Ophiasis*. G. *Schlangenkopf*).

2383 **Ofriono** (AN.) superorbita punkto (L. *Ophryon*).

2384 **Oftalm-o**, vorto uzata en kombinoj anstataŭ okulo; **—ito**, inflamo de l'okulo; **en—ito**; **peri—ito**, inflamo de la bulba kapsulo; **tut-—ito**, inflamo de tuta okulo; **—ologio**; **—oskopo**, ilo por la **—oskopio**; **—ostato**, okulfiksilo (G. *Augenhalter*); **—a** aŭ **—ika** arterio, kun tarsa arko kaj palpebraj branĉoj; —a aŭ —ika nervo.

2385 **Oftec-o**, frekvenco (v.t.v.).

2386 **Ohm**, angla fizikisto; **—unuo**, elektra unuo de rezistokapablo (F. *Un ohm*); **meg—unuo** (V. Meg...).

2387 **...oida**, sufikso kiu signifas simila al, aŭ en formo de. Ekz.: Odontoida, dentforma.

2388 **Oidio**, vario de fungeto (L. *Oïdium*).

2389 **Okaz-o** (F. *Occasion*, G. *Gelegenheit*); **—a** (A. *Ocrasional*); **—igita**, kaŭzita; **—inta**.

2390 **Okcipit-o**, malantaŭa malsupra parto de la kapo; **—osto** (L. *Os occipitale*). ANAT.: interpariet-osta osto (F. *Os épastal*); klivo (L. *Clivus*); faringa tubereto; kondiloida truo; jugulara tubereto; jugulara incizuro; interjugulara apofizo; supra, suba, nuka linio; ekstera protuberanco aŭ iniono; krucforma eminenco; transversa sulko; jugulara truo.

2391 **Okluz-o**, barado (L. *Occlusio*); ekz.: intesta —o.

2392 **Oksal-a** aŭ **—ata** acido ($C^2H^2O^4 + H^2O$); **—ato**; **—urio** aŭ **—aturio**, kalka —ato en la urino; **—emio**, tro da —a acido en la sango; **—urata** acido (G. *Oxalursäure*).

2393 **Oksicianido** (ĤEM.), kombinaĵo de cianido kun oksido.

2394 **Oksid-o**, komponaĵo enhavanta oksigenon; kalia —o; litia —o aŭ litino; magnezia —o aŭ magnezio; silicia —o aŭ silico; **bi—** aŭ **di—o**; **hiper—o**; **hidr—o**; **—eteroj**; **etil—o**, **metil—o**, k.t.p.; **—azo**, fermento, solvebla en akvo, transportanta oksigenon; **—ono**, fermento aganta kiel la —azoj sed ne solvebla

en akvo; **—i**; **—ita**; **—ebla**; **—eco**; **—ado**; **mal—ado** (G. *Herstellen*, I. *Riduzione*).

2395 **Oksigen-o**, gaso kiu, miksita kun azoto k. t. p. formas la aeron; **—a**; **—ata**; **—ado**; sanga **malpli—eco**, anoksemio.

2396 **Oksiklorido**, kombinaĵo de klorido kun oksido.

2397 ...**oksimo** (Ĥem.), fino de vorto uzata por nitrogena funkcio karakterizata per la grupo NOH, ligata ĉu al la lasta karbono de iu ĉeno (aldoksimo), ĉu al interna karbono (hetoksimo).

2398 **Oksiur-o** (A. *Thread*, G. *Fadenwurm*); vermoforma —o (L. *Oxyuris vermicularis*).

2399 **Okulario** aŭ **okullenso**, optike farita vitro, kiu alsendas al la okulo la radiojn, kiuj iris tra la optika ilo. Ekz.: tra la mikroskopo.

2400 **Okul-o** (L. *Oculus*); **—a**; **unu—a**, **mon—a**, **bi—a** (G. *Zweiäugig*); **unu—ulo** (A. *One eyed*, F. *Borgne*, H. *Tuerto*); **alten—eco**; **—kliniko**; **—isto**; **—faristo**, kiu faras artefaritajn —ojn; **—ario** (v. t. v.); **—vitroj** (v. t. v.); bluringitaj —oj (F. *Yeux cernés*). ANAT.: korneo; ĥoroido; ciliara korpo; iriso; vitreca korpo; ciliara zoneto; retino; palpebroj; konjunktivo; **—bulbo**; blanko de l' —o; **—haroj** (A. *Eyelashes*. F. *Cils*. G. *Augenwimper*); **—fundo**; **—kamero**; **—a** aŭ oftalmika arterio; **—mova** nervo (F. *Nerf moteur oculaire commun*); **—abduktora** nervo (F. *Nerf moteur oculaire externe*). PATOL.: —a malforteco aŭ

ambliopio ; paralizoj de la —aj muskoloj ; —moviga kompleta paralizo ; strabeco (V. Straba). Eksternormaĵoj : **bov—eco**, nenorma grandeco de la —oj ; ciklopeco (v.t.v.).

2401 **Okult-a**, nerimarkita. Ekz. : —a ĉeesto de sango en fekaĵoj.

2402 **Okulvitroj** (F. *Lunettes*). Var. : konkavaj por la miopuloj ; konveksaj por la malmiopuloj ; koloraj, kontraŭ tro forta lumo ; ŝirmaj kontraŭ polvo, **k. t. p.**

2403 **Olekran-o**, humera ekstremo de la ulno ; **—a**.

2404 **Ole-o** (L. *Oleum*) ; —o kamfora, kamomila, krotona, hiskiama, el migdaloj, el moruhepato (aŭ gadoleo), ricina ; **—a** ; **—eca** ; **—ecigi**, ŝmiri per —o (F. *Lubrifier*) ; **—ato** ; **—ata** acido (L. *Acidum oleinicum*) ; **—ino**.

2405 **Olfakt-o** (L. *Olfactio*) ; vola —o, flarado ; **—a** ; **—ometro**, mezurilo por —o. V. ankaŭ Rinencefalo.

2406 **Olig-o**... komenco de vorto, kiu en kombino signifas « malpli da » ; **—ocitemio**, malpli da globetoj en sango ol norme ; **—omenoreo**, nesufiĉa menstruacio ; **—urio**, nesufiĉeco de la kvanto da urino.

2407 **Olimpa frunto**, elstaranta kaj konveksa frunto ĉe ke'kaj sifilulidoj aŭ raĥituloj.

2408 **Oliv-o**, frukto el « *Olea europea* » ; **—oleo** ; **—oforma** buĝio.

2409 ...**olo**, sufikso uzata en organika ĥemio por la

alkoholoj; metanolo, etanolo, pentanolo, k. t. p.

2410 **Omento** aŭ epiploo (v. t. v.).

2411 ...**omo,** fino de vorto, kiu plej ofte estas uzata por « tumoro » de iu histo. Ekz.: Adenomo, fibromo, k. t. p.

2412 **Omfal-o** aŭ umbiliko (v. t. v.); —**a**; —**ektomio**; —**ocelo**, umbilika hernio; —**oragio,** —a hemoragio; —**otripsio**, premo al la umbilikŝnuro per —**otribo** aŭ —**otripsiilo**.

2413 **Onanismo** aŭ masturbo (v. t. v.).

2414 **Ond-o**, serpentforma linio : galvana —o; —**o-forma** elektra fluo; farada —**igilo** (F. *Onduleur faradique*); —**elektilo** (F. *Sélecteur d'ondes*); —**a**; —**obruo**, post skuo de kavaĵo kie kunestas gaso kaj likvaĵo (F. *Bruit de flot*); transtoraka —o, konstatebla en hidatida kisto de la konveksa parto de la hepato; —**osento,** ekz.: sentebla per ekbatetoj sur la abdomena pario ĉe ascito.

2415 **Onkologio**, scienco pri neoplasmoj, tumoroj, k. t. p.

2416 **Onomatomanio**, manio pri kelkaj nomoj, kiujn la malsanulo ripetas, aŭ timas aŭdi, aŭ vane serĉas.

2417 **Ontogenio**, individua kreskado.

2418 **Opalec-a**, nuance iom laktosimila, ete blukolora, ĉielarke nuancita; —**eco**.

2419 **Operaci-o** (L. *Operatio*); **post—a** kuracado; —i; —**anto**, ĥirurgo; —**ato** aŭ —**ito** (F. *l'opéré*);

**—ejo**, —a ĉambro; **—a** tablo, kampo, metodo aŭ tekniko, k. t. p.; hernia definitiva —o (F. *Cure radicale de hernie*); dufoja —o (F. *Opération en deux temps*).

2420 **Operklo**, kovrileto (L. *Operculum*).

2421 **Opiato**, farmacia pasto (L. *Opiatum*).

2422 **Opi-o**, suko de papavo; **—eca**, **—enhava**.

2423 **Opistotono**, kurbiĝa postenrenversiĝo de la korpo en tetano.

2424 **Opodeldoko**, kombinata farmacia balzamo.

2425 **Oposino**, unu el la albuminaj substancoj de la muskolkarno, precipe ĉe ŝafoj.

2426 **Opoterapio**, terapio per bestaj organoj, tiroido, ovario, k. t. p.

2427 **Opsimaniulo**, kiu havas nenorman emon por ĉiuj manĝaĵoj.

2428 **Opsiometro**, ilo por mezuro de la netevidpovo.

2429 **Opsito**, malsano kaŭzata de parazitoj, kiu similas al malsano kutime ne parazitdevena.

2430 **Opsiurio**, malpliiĝo de la urinkvanto dum la postmanĝa horo.

2431 **Opson-a** rilato (F. *Indice opsonique*); **—ino**, substanco kiu estas en kelkaj seroj.

2432 **Optik-o**, parto de la fiziko pri la lumo; **—a** nervo; —a traktuso (F. *Bandelette optique*); —a kiasmo; —a tavolo (F. *Couche optique*); —a atrofio primitiva.

2433 **Optometro**, ilo por mezuri la distancon de la vidpovo.

2434 **Optoskopo**, aparato uzata de okulistoj (F. *Optoscope*).

2435 **Optostriita** korpo, tuto de optika tavolo kaj striita korpo.

2436 **Oranĝ-o**; —o dolĉa, amara (L. *Citrus aurantium dulcis, amara*); **—kolora**; **—arbo**.

2437 **Orbit-o**, okulkavo; **super —a**; **sub —a**.

2438 **Orb-o**, cirklo; **—a**; **—eca** muskolo (L. *Orbicularis*).

2439 **Ord-o** (L. *Ordo*); malsana **mal—o**; **kun—igo** (L. *Coordinatio*); **kun—iĝo**; **malkun—iĝo**, **movadmal—eco**, ataksio.

2440 **Orel-o**, organo de la aŭdsento; **—a** (L. *Auricularis*). ANAT.: **—aŭriklo** (A. *Auricla*, A. *Pinna*, F. *Pavillon de l'oreille*); **—konĥo**; heliksa kruro (L. *Crus helicis*); heliksa dorno (L. *Spina helicis*); kruroj de la antelikso; **—konĥa** supra parto (L. *Cymba conchae*); intertriga incizuro; tubereto de la aŭriklo; fina incizuro de la —o (F. *Grande incisure de Santorini*); malsupra lobo de la —o; ekstera akustika meato; —a nervo; tempia nervo (L. *Nervus auriculo-temporalis*). Pri anat. de la meza orelo, v. Timpano. Pri anat. de la interna —o, v. Labirinto. PATOL.: **—ito**, inflamo de la —o, otito; **—isto**, **—kuracisto**, otologisto. (V.ankaŭ Akustiko kaj Ot.).

2441 **Organik-a** (L. *Organicus*); **—a** ĥemio, traktanta pri la karbonhavaj kombinaĵoj; **ne—a**.

2442 **Organismo** (v. Organo).

2443 **Organiz-i**, ordigi; **—o**; **—ado**; **—aĵo**; **—ita**; **mal—o**.

2444 **Organ-o** (L. *Organum*); **—a**; **sen—a**; (L. *Inorganicus*); **ne—a**, sendependa de —a difekto; **—ismo**, tuto de la organoj kiuj konsistigas vivantan estaĵon; **—oterapio**, opoterapio (v. t.v.); **—ogenezo**, **—kreskado**; **—oleptika** (L. *Organolepticus*); **—oplastika**, kiu faciligas la regeneron de —o.

2445 **Orgasmo**, plej alta grado de seksa volupto.

2446 **Orĥ..** (Greke *Orchis*), komenco de vorto ofte uzita en kombinoj anstataŭ testiko; **—ito**, testikinflamo; **—idopeksio**, testika fiksado; **—iepididimito**, inflamo de testiko kaj de epididimo.

2447 **Orienta butono** aŭ **ulcero** (F. *Bouton d'Orient*).

2448 **Orific-o** (L. *Orificium*); **—a**.

2449 **Origin-o**, deveno; **—a** kolonio (MIKROB.) (L. *Originaria colonia*).

2450 **Orkaneto** (BOT.) (L. *Alkana tinctoria*, A. *Alkanet*, G. *Ochsenzunge*).

2451 **Or-o**, vario de metalo (L. *Aurum*); denta **—ŝtopo** (F. *Aurification*); **—natria** klorido (A. *Auronatrium chloratum*).

2452 **Ortodiagraf-o**, ilo por noti la ekzaktajn dimensiojn de organo (Ekz.: koro) ĉe radioskopio; **—io**; **—aĵo**, konturdesegno per —o.

2353 **Ortoform-o** (F. *Orthoforme*).

2454 **Ortoped-io**, kuracado de kripleco, precipe osta aŭ artika; **—ia**; **—isto**.

2455 **Ortopneo**, dispneo deviganta la malsanulon stari aŭ sidi.

2456 **Ortoskop-o**, ilo por ekzameno de okulo tra akva medio.

2457 **Ortostat-a**, rekte stara; —a albuminurio; **—eco** aŭ **—ismo**.

2458 **Oscedo**, nevola malfermiĝo de la buŝo pro laciĝo, enuo, malbona digesto.

2459 **Oscilometr-io** (F. *Oscillométrie*).

2460 **Osmi-o**, vario de metalo (Simbolo: Os); **—ata** acido ($OsO^8$).

2461 **Osmoregulilo**, platina tubeto iam adaptata ĉe kelkaj X-radiaj vitrasferoj por ebligi ŝanĝon de la interna aerkvanto (F. *Osmorégulateur*).

2462 **Osmoz-o**, intermiksiĝo de likvaĵoj tra poroza membrano; **—a**; **en—o**; **eks—o**.

2463 **Ostein-o**, propra organika substanco de la ostoj.

2464 **Ostomjelito** aŭ **Osta medolito**, inflamo de la osta medolo.

2465 **Ost-o** (L. *Os*, A. *Bone*, G. *Knochen*); **—eto**; **—a**; **—eca**; **—aro** (L. *Sceletus*); **—ogenezo**, **—oformado**; **—osimila**; **—iĝo** (A. *Ossification*); **—iĝinta**; **—ino** aŭ **osteino** (v.t.v.); **—oblasto** (F. *Ostéoblaste*). ANAT.: **—ologio** (L. *Osteologia*); **vang—o**. Ĉe karpeo: **navikl—o**; **lun—o**; **triketr—o**, **granda** aŭ **kaphava** —o (L. *Os magnum, capitatum*), **multangula granda —o** aŭ **trapezo**; **malgranda** aŭ **trapezeto**. Ĉe orelo; aŭd—etoj, t.e.: piedingo. amboso kaj martelo. PATOL.: —a

atrofio; —**ito**, —a inflamo; ventoza —ito (A. *Spina ventosa*, G. *Winddorn*); —**oartrito**; —**omalacio**, ostara plimoliĝo; —**odevena** absceso; —**okopaj** aŭ —**odevenaj** doloroj; —**opatio**, —a malsano; —**odensiĝo** aŭ kontraŭe —**oporozo**; —**orompiĝemo** (L. *Osteopsathyrosis*); —**omjelito** (v.t.v.). Frakturoj aŭ —**rompoj** : fendeto (F. *Fêlure*); fendo (F. *Trait de fracture*); —a peco (L. *Ossis fragmentum*); —**ero** aŭ —a peceto (L. *Assula*, F. *Esquille*); multpeceta —rompo; paralela delokiĝo; angula delokiĝo; —**cikatro** aŭ **kaluso** (A. *Callus*, G. *Knochennarbe*); cikatra aŭ ripara malfrueco; pseŭdartiko aŭ pseŭdartrozo. Ĥirurgiaj operacioj: —a grefto; —**oklazio**, ĥirurgia —rompo; —**onajlado** (v. Najlo); —**oplastiko**; —**osintezo** aŭ —a suturo; —**otomio**. Ĥirurgia ilaro: —**oborilo**; —**oprenilo**; —**orompilo**; —**oskrapilo** (F. *Rugine*); —**otomo**. Tumoroj: —**omo**; —**osarkomo**.

2466 **...ostomio**, fino de vorto kiu signifas starigo de daŭra aperturo de organo ĉu je la haŭto, ĉu en alian organon. Ekz.: Gastroenterostomio.

2467 **Ot-o** (Greke *Otis*), vorto kiu en kombinoj anstataŭas ofte « orelo »; —**algio**, oreldoloro; —**ito**, orela inflamo aŭ malsano; **ekster—ito**, **mez—ito**, **intern—ito**; —**olito**, orela ŝtoneto; —**ologio**; —**ologo** aŭ —**ologiisto**; —**oreo**,

kronika fluo el la orelo; **—oskŏpo**, ilo por **—oskopio**; **—hematomo**, orelsangkisto; **—oragio**, orelhemoragio; **—okonio**, blanka pulvoro en la interna orelo; **—akustika**, aŭdadfaciliga.

2468 **Oval-a**, ovoforma; **—a** truo (ANAT.).

2469 **Ovari-o** (L. *Ovarium*); **—a**. ANAT.: **mes—a rando** (L. *Margo mesovaricum*, A. *Anterior border*); tuba ekstremaĵo (A. *Upper end*); primariaj folikloj; vezikecaj folikloj (A. *Graafian follicles*); teko de la foliklo (L. *Theca*); grajneteca stratumo; —a kumuluso (A. *Discus proligerus*). FARM.: **—ino**, opoterapia rimedo. PATOL.: **—ito**, inflamo de l'—o; **—algio**, —a doloro; **para—a** kisto. ĤIR.: **—ektomio**, ablacio de l'—o.

2470 **Ov-o** (L. *Ovum*); **—a**; **—oforma**; **—ogenera**, produktanta —ojn; **—idukto** (G. *Eiergang*).

2471 **Ovul-o** (L. *Ovulus*); **—a**; **—ado**; **—forma**; panlecita (v.t.v.) —o.

2472 **...oza**, adjektiva sufikso, kiu signifas multhavanta. Ekz.: tuberoza, havanta multajn tuberojn. En ĥemio, « oza » estas sufikso por la minimuma salo, kiam metalo donas du seriojn da saloj formitaj kun malsimilaj oksidoj. Ekz.: Feroza sulfato (F. *Sulfate ferreux*)

2473 **Ozen-o**, malsano karakterizata de malbonodoro eliĝanta el la nazaj kavoj (L. *Ozaena*); **—a**; **—eca**; **—ulo**, malsanulo trafita de —o,

2474 **...ozo**, substantiva sufikso, kiu signifas aŭ havanta multajn, aŭ kaŭzata de. Ekz.: Tuberkulozo, pedikozo.

2475 **Ozon-o** (ĤEM.) ; **—a** ; **—ado** ; **—ilo** ; **—produktilo** ; **—ometro**, **—mezurilo**.

# P

2476 **Paciento**. 1) Malsanulo kiu submetiĝas al ia kuracado; 2) Suferanto.

2477 **Paĥi...**, komenco de vorto uzata en kombinoj por « dika » ; **—dermio** ; kaphaŭta —dermio girsimila (L. *Cutis verticis gyrata*, F. *Pachydermie vorticillée du cuir chevelu*); **—haŭteco** aŭ **elefantiazo** ; **—pleŭrito**, inflamo de la pleŭro, karakterizata per dikaj membranoj; **—meningito**.

2478 **Pal-a** (L. *Pallidus*); **—ega** (A. *Dull*, G. *Leichenblass*); **—eco** ; **—egeco** ; **—iĝo** (F. *Etiolement*) en kelkaj malsanoj, ĉefe en anemio.

2479 **Paladio** (ĤEM.), Simbolo : Pd.

2480 **Palat-o** (L. *Palatum*. G. *Gaumen*). ANAT.: muskolo **—ouvula** (F. *Palato-staphylin*); **—a** arterio granda ; **—osto** (kun perpendikla kaj horizontala partoj, **pterigo—a** sulko, konĥa kaj etmoida krestoj). ĤIR. : **—oplastiko** aŭ uranoplastiko, —refaro.

2481 **Paliativ-o**, neradikala rimedo ; **—a.**

2482 **Palpebr-o** aŭ blefaro ; **—a** edemo, kartilago,

mukmembrano; —aj randoj; ekstera, interna, —**angulo** aŭ —a komisuro; —**i** aŭ —**umi**; —**ado** aŭ —**umado** (L. *Nictatio*. A. *Twinkling*. F. *Clignotemnt*. G. *Blinzeln*).

2483 **Palp-i**, esplori per la mano, per la fingroj; —**o**, —**ado**; **ne—ebla** pulvoro.

2484 **Palpitado** aŭ **Palpitacio**, forta korfrapado.

2485 **Paludismo**, marĉa febro, malario (v.t.v.).

2486 **Pampiniforma**, en formo de vitbranĉeto.

2487 **Panaceo**, universala kuracilo.

2488 **Panaricio**, fingra absceso (L. *Panaritium*).

2489 **Pandemio**, epidemio tre disvastiĝanta.

2490 **Panigao**, dermatito kaŭzita de ankilostomo.

2491 **Panikul-o** (L. *Panniculus adiposus*. G. *Fettschichte*); —**ito**, inflamo de —o.

2492 **Pankreat-o** (L. *Pancreas*). ANAT. : —**a** kanalo; hokoida proceso (L. *Processus uncinatus*); *Langerhans*'aj insuloj. PATOL. : —**ito**, inflamo de —o; —**a** karcinomo. ĤIR. : —**ektomio**, ablacio de —o. FIZIOL. : —**ino**, —a fermento

2493 **Panlecita ovulo**, kiu havas periferie sufiĉe da vitelo.

2494 **Pan-o** (A. *Bread*, G. *Brot*); kompleta —o, fabrikata el faruno kun tuta brano; soja —o; rostita —**tranĉaĵo** (F. *Biscotte*, G. *Zwieback*).

2495 **Pans-i**, bandaĝi, kuraci, desinfekti, flegi vundon; —**o**; —**ado**; —**aĵo**.

2496 **Panus-o**, vario de kornea malsano; traĥoma —o.

2497 **Papaj-o** (BOT.) (L. *Carica papaya*. A. *Papaw*. G. *Melonenbaum*); —**ino**, ekstrakto de —o.

2498 **Papav-o** (BOT.) (L. *Papaver*. A. *Poppy*. G. *Mohn*. H. *Adormidera*); blanka, nigra, dormiga —o; —**erino**, unu el la alkaloidoj de la —o; —**eto** (A. *Corn-rose*. F. *Coquelicot*. G. *Klatschrose*. H. *Abadel*. I. *Papavero salvatico*).

2499 **Paper-o**; kontraŭastma —o; —**eca**, —**simila**; —**kompakteca**.

2500 **Papil-o**, konusforma altaĵeto (G. *Warze*); —**a**; —**omo**, —**oza** tumoro; venera —omo (F. *Crête de coq*).

2501 **Papriko** (BOT.) (L. *Capsicum*. A. *Piment*. G. *Reissbeere*).

2502 **Papul-o**, haŭta altaĵeto, ofte skvama; —**a**; —**oza**.

2503 **Para**... 1) komenco de vorto, kiu povas signifi internacie. A) malnormaĵo. Ekz.: —**cefalulo**, —**fazio** (v.t.vjn.). B) tra. Ekz.: —**centezo** (v.t.v.). C) flanke de. Ekz.: —**didimo** (v.t.v.). 2) ...**para**, fino de vorto kiu signifas graveddiĝinta; primipara, sekundipara, multipara (adj.).

2504 **Paracefalulo**, nenormalkapa monstro.

2505 **Paracentezo**, punkcio, ĉerpopikado, ekz.: tra la toraka pario ĉe sera pleŭrito.

2506 **Paradidimo**, organeto apud la epididimo.

2507 **Parafazio**, eraroj en la elekto de la vortoj ĉe kelkaj malsanuloj.

2508 **Parafenilendiamino** (Ĥem.), kolora materio uzata por ŝuoj k.t.p. kiu povas kaŭzi ekzantemojn, astmon.

2509 **Parafin-o,** blanka vaksosimila graso eltirita el petrolo; likva —o (L. *Paraffinum liquidum*); **—omo**, tumoro post protezaj injektoj de —o.

2510 **Parakuzio**, nenorma aŭdado.

2511 **Paraldehido** (Ĥem). (L. *Paraldehydum*).

2512 **Paraliz-o**, perdo de la memvolaj movoj de membro aŭ de la movoj de organo; **—a**; **—ulo**; **—eto** aŭ **parezo** (L. *Paresis*); **mono—o**, —o de unu membro aŭ de unu grupo da muskoloj; unuflanka —o aŭ hemiplegio; duflanka —o; —o tremiga (L. *Paralysis agitans*. A. *Shaking paralysis*, G. *Schüttellähmung*); frenezeca ĝenerala —o (F. *Paralysie générale*); subakuta mjela —o (F. *Paralysie spinale subaigüe*); infana —o; langa-lipa-laringa —o (F. *Paralysie glosso-labio-laryngée*); —o alterna, bulbo-ponto-pedunkla; —o bulbomjela kaj spina (F. *Paralysie bulbo-spinale*); —o muskolopseŭdohipertrofia, nervradika (F. *Radiculaire*), spasma, supreniranta.

2513 **Paramioklono multobla** (L. *Paramyoclonus multiplex*).

2514 **Paramiotonio**, denaska spasma rigideco aperanta kelkfoje en kelkaj simetriaj muskolaj grupoj.

1515 **Paranojo**, ĉiu deliro ĉe la degeneruloj.

2516 **Paranomio**, eraroj pri la nomoj de objektoj ĉe kelkaj mensmalsanuloj.

2517 **Paraoforo** (L. *Paraoforon vaginae*).

2518 **Paraplegio**, paralizo de la subaj membroj.

2519 **Paratenaro**, parto de la manplato ĉe la malgrandfingra flanko.

2520 **Paratif-o**, **—eca** febro (L. *Paratyphus*. F. *Paratyphoïde*).

2521 **Paratiroid-o**, organeto apud la tiroido; **—a**.

2522 **Parazit-o**, besto aŭ vegetaĵo vivanta sur alia besto aŭ vegetaĵo; **—a**; **—eco**; **—ismo**; **—detrua** rimedo (F. *Parasiticide*); **—ologio.**

2523 **Paregorik-a**, kvietiga; —a siropo (je bazo de opio).

2524 **Parencefalo**, cerbeto.

2525 **Parenĥimo** (L. *Parenchyma*).

2526 **Parenteral-a**, ne per la digesta aparato; —a injekto povas esti subhaŭta, envejna, enmuskola, k.t.p.

2527 **Parergio**, flanka ago de diatezo aŭ de malsano konsiderata kiel origino de akcesoraj difektoj.

2528 **Parezo**, paralizeto, ne kompleta paralizo.

2529 **Parietario** (BOT.) (L. *Parietaria*. A. *Pellitory*. G. *Glaskraut*).

2530 **Pariet(ost)-o** (L. *Os parietale*); **—a**; **bi—a**. ANAT.: cerba surfaco; okcipita, skvama, frunta, sagitala, randoj; frunta, okcipita, mastoida anguloj; —a tubero.

2531 **Pari-o**, vando. Ekz.: abdomena —o, toraka —o.

2532 **Paroksism-o**, momente la plej **alta grado** de la malsano ; sinsekvaj **—oj ĉe epilepsiulo** (F. *Etat de mal épileptique*).

2533 **Parotid-o** (L. *Parotis.* G. *Ohrspeicheldrüse*) ; **—a** ; **—ito**, inflamo de la —o ; epidemia —ito aŭ mumpso (v.t.v.); akcesora aŭ flanka —ito; puseca —ito.

2534 **Partenogenezo**, generado sen seksa kuniĝo.

2535 **Part-o**, io el tuto ; **—a** ; —a antigeno (F. *Partigène*); **—iĝo** (L. *Scissio*); **—iĝa** reprodukto ; **dis—igitaj** dozoj (F. *Doses fractionnées*); **du—igo** ; **du—iĝo** (L. *Dirempsio*, F. *Dédoublement*).

2536 **Partur-i**, nature akuŝi ; **—o** (L. *Parturitio*).

2537 **Pasiv-a** movado, farata, ne de la malsanulo, sed **de alia** persono aŭ de aparato, k.t.p. por **movi** la membrojn.

2538 **Pastel-o** (L. *Pastilla*), plata bombono. Ekz. : *Vichy* (elp. : Viŝi) —oj.

2539 **Pasteŭrel-o**, speciala grupo de bakterioj ; **—ozo,** malsano kaŭzita de —oj.

2540 **Pasteŭriz-i**, steriligi laŭ *Pasteur'*a metodo; **—o** ; **—ado**.

2541 **Past-o** (L. *Pasta*); **—a** ; **—eca** ; **—igi** ; **—iĝi** ; **iĝo** ; —a aŭ **—osimila** ŝveliĝo (F. *Empâtement*, G. *Teigige Schwellung*).

2542 **Patel-o** (L. *Patella*. G. *Kniescheibe*. I. *Rotula*), osto ĉe la genuo; **—a** reflekso ; **antaŭ—a** (L. *Praepatellaris*. F. *Prérotulien*).

2543 **Patetik-a** (L. *Patheticus*); —*a* muskolo; —a nervo.

2544 **Patino**, tavolo el mikroboj en ebenkulturaĵoj (I. *Patina*).

2545 ...**patio**, fino de vorto, kiu signifas « malsano ». Ekz.: **artro—**, malsano de artiko; **koro—**, malsano de la koro, k.t.p.

2546 **Patogen-a**, malsaniga; —**io** aŭ —**ezo** (L. *Pathogenesis*).

2547 **Patognomonia**, karakteriza por iu malsano.

2548 **Patologio**, scienco kiu priskribas malsanojn.

2549 **Paŭlinio** (BOT.) (L. *Paullinia*. A. *Guarana*).

2550 **Pavimoform-a** (F. *Pavimenteux*); —a ĉelo; —a epiteliomo.

2551 **Pec-o**, parto; —**etigita**, dividita en multajn partetojn. ĤEM.: tavole **dis—iĝi** (F. *Se déliter*). ĤIR.: **karno—o**, parto de haŭto kaj muskoloj sekcita dum la amputadoj diritaj popecaj (F. *Amputations à lambeaux*), por poste formi la stumpon; —**igado**, ablacio de tumoro, en kiu oni forigas pecon post peco (F. *Morcellement*).

2552 **Peĉo**, vario de rezinaĵo (L. *Pix*. A. *Pitch*. F. *Poix*. G. *Pech*. H. *Pez*. I. *Pece*).

2553 **Pederastio**, sekskuniĝo de viro kun viro.

2554 **Pediatr-io**, studo de la infanmalsanoj; —**o** aŭ —**iisto**, infankuracisto.

2555 **Pedikl-o**, mallarĝa parto kiu ligas tumoron kaj aŭ organon, aŭ la haŭton; **sen—a** (L. *Sessilis*. G. *Sitzend*).

2556 **Pedik-o** (L. *Pediculus*. A. *Louse*. H. *Piojo*. I. *Pidocchio*); **—a**; **—ovo** (F. *Lente*. G. *Nisse*); **—ulo**; **—ozo**; puba —o; puba —ozo.

2557 **Pedunkl-o** (L. *Pedunculus*. G. *Stiel*); Ekz.: cerbaj —oj.

2558 **Peksi-o**, fiksado. Ekz: Organo —o; **—a** povo, eco de teksaĵo fiksi fremdajn substancojn. Ekz.: —a agado de la hepato.

2559 **Pekten-o** (ANAT.), unu el la muskoloj de la femuro (L. *Pectineus*. G. *Kammuskel*).

2560 **Pektino**, karbonhidratsimila ŝtofo en fruktoj k.t.p.

2561 **Pektoral-a** (L. *Pectoralis*), brusta; —a muskolo granda, malgranda; —aj floroj; —a siropo (kontraŭtusa).

2562 **Pektoriloki-o**, resonado de la voĉo dum aŭskultado ĉe pulmkavaĵuloj; afona —o ĉe kelkaj pleŭrituloj.

2563 **Pelado**, vario de limigita senhareco.

2564 **Pelagr-o**, vario de avitaminozo (L. *Pellagra*); **—a**; **—ulo**.

2565 **Peletierin-o**, alkaloido de la ŝelo de la granatujo; **—a** sulfato, tanato.

2566 **Pel-i,** forigi; **el—o** (L. *Expulsio*); **el—igaj** doloroj je la fino de la akuŝo.

2567 **Peliozo** (L. *Peliosis*), reŭmatisma purpuro.

2568 **Pelv-o** (L. *Pelvis*). ANAT.: **—a** kavo; supra kaj suba istmoj; **—eto** aŭ malgranda —o; puba arkaĵo; —a ringo (F. *Ceinture pelvienne*); ilio-pektena linio; obtura kanalo; obtura

truo; sakrotubera ligamento (A. *Great sacrosciatic ligament*); falĉilforma proceso; sakrospina ligamento; arkeca ligamento de la pubo; fibro-kartilaga interpuba lameno. PATOL.: dornoza —o (L. *Pelvis spinosa*. F. *Acanthopelvis*), —a celulito (F. *Cellulite pelvienne*); —a peritoneito. ILARO.: **—osubtenilo**, aparato por faciligi la aplikadon de kelkaj bandaĝoj (F. *Pelvi-support*); **—imetro**, **—omezurilo**, ilo uzata por **—imetrio**, mezurado de —o.

2569 **Pemfig-o**, vario de vezikoza malsano; —o danĝera, denaska, epidemia, joda, juka, lepra, postvunda, recidivema, surkreskanta; **—osimila** (F. *Pemphigoïde*).

2570 **Penad-o** (L. *Nisus*. A. *Effort*. G. *Anstrengung*); muskola —o doloriga.

2571 **Pend-o** (L. *Suspensio*); **—igo**; **—iĝo**; **—i**; **—igi**; **—iĝi**; **—iga** ligamento (A. *Suspensory ligament*); —iga muskolo (G. *Aufhängemuskel*); **al—o**, **al—aĵo**, apendico.

2572 **Pendol-o**, regule balanciĝanta korpo; **—ado**; —a kora ritmo; **—ografo** (F. *Oscillographe*); **—ometro**.

2573 **Penetr-i**, eniri; **—ado**, **tra—ado**; **iom —antaj** aŭ kontraŭe **tre —antaj** X-radioj; **—ebleco**; **mal—ebla**, malsorbema; **mal—ebleco** (A. *Impermeability*. G. *Wasserdichte Beschaffenheit*).

2574 **Penik-o** (F. *Pinceau*); **—oforma** (L. *Penicellatus*. G. *Pinselförmig*).

2575 **Penis-o** (L. *Penis*, G. *Ruthe*). ANAT.: Postglana sulko; prepucio; **—a** aponeŭrozo; pendigaj ligamentoj; kavernecaj korpoj; malkovri la —an ekstremaĵon (F. *Décalotter*); **—ito**, —a inflamo (F *Penitis*).

2576 **Pens-o** (L. *Cogitatio*); **prem—o, trud—o** (L. *Obsessio*); **—foresto**, momenta senkonscio. Ekz. : ĉe epilepsiuloj (F. *Absence*).

2577 **Penta...**, prefikso uzata en ĥemio, kiam la rilato inter la elektronegativa kaj la elektropozitiva ŝtofoj estas 5 : 1; **—glikozo**, glikozo je kvin atomoj da karbo (F. *Pentose*); **—glikozurio**.

2578 **Pepsin-o**, fermento de la stomaka suko; **—iga**, **—produktanta**.

2579 **Pepsi-o**, ĥemiaj fenomenoj de la stomaka digestado; **hipo —o**; **dis —o**; **hiper —o**; **—a** ulcero.

2580 **Pepton-o** (G. *Pepton*); **—ato**; **—urio**, —o en la urino; **pro —o**, substanco inter albuminoidoj kaj —oj; **pro —urio**, pro —o en la urino; **—izi**.

2581 **Per-a** (*Mediate*, G. *Mittelbar*); **—o**, **—ado**; **—e**; **sen —a**; **sen** —e (F. *Directement*, *Sans intermédiaire*).

2582 **Percepto**, konscia sento.

2583 **Perd-i**, nevole seniĝi je posedaĵo; **pez—o**; spermaj —oj; **dis—iĝo** (F. *Déperdition*, G. *Abgang*, H. *Perdida*).

2584 **Perfor-i**, trabori; **—o**, traboriĝo, krevigo.

2585 **Pergamen-o**, besta ledo pretigita por skribaĵoj; **—a** bruo ĉe perikardito; **—eca** kompakteco en kelkaj haŭtaj malsanoj.

2586 **Peri...**, komenco de vorto kiu signifas ofte « ĉirkaŭ »; **—adenito**; **—anusa**; **—artrito**; **—ezofagito**; **—flebito**; **—foliklito**; **—metrito**; **—tiflito**, k.t.p.

2587 **Perikal-o** aŭ Piedo de Madura, malsano speciala al kelkaj landoj, karakterizata per sendolora ŝvelo de piedo kun tuberoj, kaŭzata de filario.

2588 **Perikard-o** (L. *Pericardium*); **—a**; **—ito**, inflamo de —o; **hemo—o**, sango en —o; **hidro—o**; **aerhidro—o**, aero kaj seraĵo en —o.

2589 **Periĥondr-o** (L. *Perichondrium*); **—ito**, inflamo de la —o; **—omo**, tumoro el —o.

2590 **Perinefrit-o**, inflamo de la ĉirkaŭrenaj teksaĵoj; **—a** flegmono.

2591 **Perine-o** (L. *Perinaeum*, G. *Damm*). ANAT.: **—a rafeo**; muskolo levanta la anuson; kokciga muskolo; pelva aponeŭrozo kun ĝia tendeneca arko; supra kaj suba aponeŭrozo de la pelva diafragmo kaj de l'urogenera diafragmo. ĤIR.: **—orafio**, kunkudro por —a riparo.

2592 **Period-o**, fazo, stado en la evoluo de malsano; latenta —o (F. *Stade latent*); pliiĝa, stata, malpliiĝa —oj en tifoida febro; **—ofteca**, aŭ trefrekvenca, elektro (F. *Haute fréquence*); **—a**; **—eco**.

2593 **Periost-o** (L. *Periostium*) ; **—a** ; **—ito**, inflamo de —o.

2594 **Periskopaj** vitroj por okulvitroj (F. *Verres périscopiques*).

2595 **Peristalt-a** (L. *Peristalticus*); **anti—a** ; **—eco**.

2596 **Peritiflit-o**, inflamo de la cekuma peritoneo.

2597 **Peritoksin-o**, toksino algluita ĉirkaŭ bakterio.

2598 **Peritone-o** ; **—a** ; **ekster —a**. ANAT. : Omenta burso (A. *Smaller sac of the peritoneum*, F. *Arrière cavité des épiploons*); omenta truo (A. *Foramen of Winslow*); foveoj duodenojejuna, iliocekuma; vaginala proceso; mezenteroj; mezapendico; mezovario, k.t.p.; ovaria receso; rektumutera faldo; vezikutera kaj rektumvezika kavaĵo. PATOL. : **—ito**, inflamo de —o ; **—ismo**. ĤIR. : **—igo**, kovrigo de surfaco per seroztuniko dum lapatotomio (F. *Péritonéisation*).

2599 **Perklorid-o** (F. *Perchlorure*); fera —o ($Fe^2Cl^6$).

2600 **Perkut-o**, **—ado**, diagnoza frapetado al la korpo ; **—i** ; **—ilo** (F. *Percuteur*); **—grafilo** (F. *Plessigraphe*).

2601 **Perleĉo**, komunikebla fendeto de la lipangulo (F. *Perlèche*, G. *Faulecken*).

2602 **Perl-o**. 1) Gelateneca globeto. Ekz. : eter-(enten)a —o ; 2) Brila ronda korpo ; —o-formaj kraĉaĵoj (F. *Crachats perlés*).

2603 **Permanganat-o** (ĤEM.) (F. *Permanganate*); kalia —o ($KMnO^4$).

2604 **Perni-o**, frostŝvelo; **—a** aŭ **—oforma** eritemo; —a lupuso.

2605 **Pernicioz-a**, pereiga; —a anemio.

2606 **Peroksid-o** (ĤEM.); **zink —o** ($ZnO^2$).

2607 **Perone-o** aŭ **Fibulo** (v.t.v.).

2608 **Persik-o** (BOT.) (L. *Persica*); **—ujo** (A. *Peach tree*, F. *Pêcher*, G. *Pfirsichbaum*, H. *Alberihigo*, I. *Pesco*).

2609 **Persistanta**, daŭra sur sama loko (L. *Perstans*).

2610 **Persulfato** (ĤEM.) (F. *Persulfate*).

2611 **Perturb-o**, malordo, malsaneca stato; kreskad-—oj; trofiaj —oj.

2612 **Pervers-io**, difekto, aŭ malbona ŝanĝo, de norma funkcio.

2613 **Pesaro**, aparato por subteni la uteron ĉe prolapsoj aŭ ĉe nenormaj pozicioj de tiu organo.

2614 **Pest-o** (L. *Pestis*, A. *Plague*); **—a**; **—iga**; **—odona**; **—ulo**.

2615 **Petrio**, vitra skatolo (de Petri) por mikrobkulturoj.

2617 **Petrol-o**, fluida terbitumo, miksaĵo de fluidaj hidrokarbidoj; **—etero**; **—eino**, vazelino.

2618 **Petroselo** (BOT.) (L. *Apium petroselinum*, A. *Parsley*).

2618*bis* **Pfeiffer**, germana bakteriologo; **—'a** bacilo; —'a glanda febro, malsano (ĉefe ĉe infanoj) karakterizata de febro kaj ŝveliĝo de ganglionoj.

2619 **Piamatr-o**, unu el la meningoj; **—ito**, inflamo de —o (L. *Leptomeningitis*).

2620 **Piceo** (BOT.) (L. *Pinus abies*, F. *Sapin de Norvège, Epicéa*).

2621 **Picid-io** eritrina (BOT.) (L. *Piscidia erythrina*); **—ino** (F. *Piscidine*).

2622 **Pied-o** (L. *Pes*); **—a**; **—zorgisto** aŭ **—flegisto**; **bi—ulo** (A. *Biped*). ANAT.: **—fingro**; —a dikfingro, halukso (v.t.v.); malgranda —fingro; instepo (v.t.v.); Supernombraj —ostoj: tibiala, trigona, peroneala (aŭ akcesora kuboido), vezaliana. Muskoloj: abduktoro de la halukso kun oblikva kaj transversa kapoj; kvadrata de la plando (L. *Flexor accessorius*); abduktoro de la malgranda —fingro. Ligamentoj krucoida (F. *Annulaire du tarse*), multpeca; bridiloj antaŭa, suba de la fibulaj muskoloj. PATOL.: arka —o (L. *Pes excavatus*); **bul —o** (L. *Pes varus*, A. *Club foot*, F. *Piet bot*, G. *Klumpffuss*, H. *Pié truncado*, I. *Piedo torto*); ekvina, vara aŭ valga, bul —o; **bul —ulo**; kalkana —o; **plat-—o**; kava —o, kies plando estas tro konkava.

2623 **Pieding-o**, osteto en la mezorelo (L. *Stapes*, A. *Stirrup*, F. *Etrier*, G. *Steigbügel*, I. *Staffa*); **—aj** kruroj antaŭa kaj posta; —a nervo.

2624 **Piedro**, tropika nodoza triĥomikozo.

2625 **Piel-o** (Greke *Pyelos*), rena pelveto je la komenco de la uretero. PATOL.: **—ito**, inflamo de la —o; **—a** litiazo; **hidro—o** aŭ hidronefrozo; **—onefrito**. ĤIR.: **—otomio**. RAD.:

—**ografio**, radiografio de —o post plenigo per substanco malpenetrebla per la X-radioj.

2626 **Piemio**, pusa infekto de la sango.

2627 **Pigment-o**, kolora substanco de la haŭto, k.t.p.; —**aj** makuloj; —a kserodermo; —**aĵoj**.

2628 **Pigopaĵo**, monstro el individuoj kunigitaj per sidparto, sed ĉiu havas umbilikon.

2629 **Pika-o**, perversio de la gusto; gravedaj —oj (L. *Picae gravidarum*).

2630 **Pik-i**, penetrigi korpon per pintaĵo; —**vundo**; —**eto**; —**etado** (A. *Prickling*, F. *Picotement*, G. *Prickeln*, H. *Picazon*, I. *Pizzicore*); —**kulturaĵo** en mikrobologio (I. *Cultura per infissione*); **kav—ilo**, kava nadlo por punkcioj (F. *Trocart*).

2631 **Pikrat-o** (ĤEM.), salo de —**a** acido (L. *Acidum picricum*) kun bazo.

2632 **Pikrokarminato**, komponaĵo uzata por kolori mikroskopajn preparaĵojn.

2633 **Pikrotoksin-o**, venena ekstrakto el « *Anamirta cocculus* » (F. *Coque du Levant*, G. *Kokkelskörner*).

2634 **Pil-o** (ELEKTR.) (A. *Pile*, G. *Säule*).

2635 **Pilokarpin-o**, alkaloido el « *Pilocarpus pennatifolius* »; —**a** hidroklorido (L. *Pilocarpinum chlorhydricum*).

2636 **Pilol-o** (L. *Pilula*); —**a**; —**ego**, boluso (v.t.v.); —**eto**; **suker—o**, —o ĉirkaŭita de sukero (A. *Conflit*, I. *Traggea*); —**ilo**, ilo por fari —ojn.

2637 **Pilor-o**, suba aperturo de la stomako; **—a**; **apud—a**, **sur —a** (F. *Juxtapylorique*). ĤIR.: **—ektomio**, ablacio de —o; **—oplastiko**.

2638 **Pinĉ-ilo** (F. *Pince*, G. *Klemme*); **vaz—ilo**, vazpremigilo; **tranĉ —ilo** (F. *Pince coupante*, *Cisaille*, G. *Schneidezange*); **polip—ilo**; —ilo-kudrilo (F. *Pince porte-aiguille*).

2639 **Pineal-a** (L. *Pinealis*); —a korpo (L. *Conarium*).

2640 **Pingavaro** (BOT.), haroj de tigo de kelkaj hindaj filikoj uzataj kiel kontraŭhemoragia ekstera rimedo.

2641 **Pingvekulo**, tumoreto de la konjunktivo (L. *Pinguecula*).

2642 **Pin-o** (BOT.) (L. *Pinus*, G. *Kifer*); **—a** oleo.

2643 **Pintao**, Meksika haŭta malsano.

2644 **Pint-o**, akuta fino; **kor—o**; pulma —o (L. *Apex*); **fajr—oj** (F. *Pointes de feu*); **—aĵoj** (BOT.) (L. *Summitates*); **—a** (L. *Acuminatus*); **unu—a** dento; **du—a dento** (A. *Bicuspid*); **—akraniulo**, akrocefalulo; **kor—a** blovilbruo (F. *Souffle apexien*).

2645 **Pio...**, komenco de vorto kiu ofte signifas puso. Ekz.: **—cianina** bacilo (L. *Bacillus pyoceaneus*); el ĝiaj kulturoj oni ekstraktas **—cianinon**; **—dermito**, pusa dermatito; **—gena**, pusogenera; **—genezo**; **—hemio** aŭ **piemio** (v. t.v.); **—ktanino**, kelkaj anilinaj koloroj uzataj kiel antisepsaĵoj; **—nefrozo**; **—pneŭmotorako**; **—reo**, kronika pusfluo; alveola —reo; **—salpingito**, k.t.p.

2646 **Piperazin-o** (ĤEM.), dietilenimino ($C^4H^2Az^2$).
2647 **Pipet-o**, ĉerpileto uzata en Ĥemio.
2648 **Pipr-o** (BOT.) (L. *Piper*); kubeba —o.
2649 **Piramid-o** (GEOM.); —**oforma**; —**osto** aŭ triketrosto.
2650 **Piramidon-o**, dimetilamidantipirino; —**salicilato**.
2651 **Piretr-o** (BOT.) (L. *Pyrethrum*).
2652 **Piridino** (ĤEM.) (L. *Pyrydinum*) ($C^{10}H^5Az^2$).
2653 **Pir-o**, frukto (L. *Pirum*); kaŭĉuka —o uzata kiel klisterilo, k.t.p.; —**oforma** kapo.
2654 **Pirogajlat-o**, salo de la —**a** acido ($C^6H^3(OH)^3$) kun bazo.
2655 **Pirogajlolo**, keratoplastika rimedo uzata kontraŭ la psoriazo (L. *Pyrogallolum*).
2656 **Pirokateŝino** (ĤEM.), oksifenolo ($C^6H^4(OH)^2$).
2667 **Piroksilino** (L. *Pyroxilinum*, F. *Fulmicoton*).
2658 **Piromanio**, bruliga manio.
2659 **Piroplasm-o**, pirforma parazito; —**ozo**, malsano kaŭzata de —o.
2680 **Piroz-o**, stomaka varmsento supreniranta ofte ĝis la gorĝo (L. *Pyrosis*, A. *Heartburn*, G. *Sodbrennen*).
2661 **Pist-i**, pec(et)igi; —**o**; —**ado**; (FARM.) —**ujo** (G. *Mörser*, H. *Mortero*); —**ilo** (A. *Pestle*, F. *Pilon*, G. *Stössel*, H. *Majadero*, I. *Masiello*); **mikse** —**o** (L. *Trituratio*); —**opecigi** (A. *To pound*, F. *Concasser*, G. *Zerstossen*, I. *Acciccare*).
2662 **Pitiat-a** malsano, nerva afekcio kuracebla per la persvado; —**eco** aŭ —**ismo**.

2663 **Pitiriaz-o**, vario de haŭtmalsano. VAR. : diverskolora (L. *Versicolor*), graseca, haroza, likensimila, makuloza, rondforma, roza, ruĝa.

2664 **Pituitari-a** (L. *Pituitarius*); —a glando aŭ hipofizo; —a trunketo (F. *Tige pituitaire*); **—ino** aŭ **Pituitrino**, substanco de la interna parto de la hipofizo; **hipo—ismo**, nesufiĉo de la hipofiza sekrecio.

2665 **Pituito** (L. *Pituita*. A. *Phlegm*. G. *Schleim*).

2666 **Piurio**, puso en urino.

2667 **Piziform-a** (G. *Erbsenförmig*); **—o** aŭ **—osto**; **—hokoidosta** aŭ piziuncinata ligamento (L. *Ligamentum pisohamatum*); pizo-metakarpea ligamento.

2668 **Placent-o**, ĉefa parto de la postnaskaĵo (L. *Placenta*. G. *Mutterkuchen*) ; previa —o ; **—a** ringreteno (L. *Incarceratio*. F. *Enchâtonnement*); **—adisiĝo** (A. *Separating*. F. *Décollement*. G. *Ablösen*) ; —a ŝiro ; **—omo**, —a tumoro.

2669 **Plak-o** (F. *Plaques*), plataĵo; sklerodermia —o; mukmembranaj —oj, ĉe sifiluloj.

2670 **Plan-a**, ebena; —a likeno; **—osto** (L. *Os planum*).

2671 **Pland-o**, suba plata parto de la piedo; ebena —o, platpiedo; kava —o (F. *Pied creux*); **—a** (L. *Plantaris*).

2672 **Plank-o** (ANAT.) malsupra parto de kavaĵo; —o de l'orbito; —o de la kvara ventriklo.

2673 **Plantag-o** (BOT.) (A. *Plantain*. G. *Wegerich*); psilia —o.

2674 **Plant-i**, penetrigi; **sur—o**, **en—o**, kiam monstro estas kunigita ekstere kun norma feto (F. *Implantation*); denta **reen—o**.

2675 **Planum-o** aŭ planosto (ANAT.) (L. *Os planum*).

2676 **Plasm-o**, fluida parto de la sango; **—aĉelo** (G. *Plasmazelle*); **—ino**, organika substanco de —o.

2677 **Plastik-o** riparo, refaro, rekreo; **—a** ĥirurgio; **—eco**; **bio—a** povo, riparanta povo de la vivantaj ĉeloj; **aŭto—o**; **meta—a**.

2678 **Plastr-o**, medikamento ŝmirita sur tolo; kaŭĉuka —o; kantarida —o; **plumbagum—o** (L. *Emplastrum diachylon gummatum*); —o kun hidrargo (V. Sparadrapo, vezikatorio).

2679 **Plat-a**, ebena; **—piedo**, ebena plando; **man—o**, polmo.

2680 **Platen-o**, vario de metalo (L. *Platinum*); **—a** fadeno; **—a** anso.

2681 **Platismo**, haŭta muskolo de la kolo.

2682 **Plaŭdetbruo**, bruo kiun oni aŭdas post skuetoj sur la ventro (per la fingraj ekstremaĵoj) kiam stomako (aŭ intesto) samtempe entenas likvaĵon kaj gason (F. *Clapotage*).

2683 **Plazi-o**, nutrada aŭ produktanta aktiveco; **hipo—o**; **hiper—o**.

2684 **Plekt-o**, interplektaĵo de nervoj, de vazoj; **—oforma**.

2685 **Plen-a** (L. *Plenus.* A. *Full.* G. *Voll*); —a pulso; **—eco** (L. *Plenitudo*); **tro—eco**; **—iĝo**; **tro-—iĝo** (L. *Repletio*); **mal—o**, vakuo; **—igi**; **mal—igi**; **mal—aĵo** aŭ lakuno; **—kreskinto** (L. *Adultus*).

2686 **Plesimetr-o**, ilo speciala por perkuto; **—io**, uzado de —o.

2687 **Pletor-o**, tro da sango; **—a**, plensanga.

2688 **Pleŭr-o** (L. *Pleura*); **—a**. PATOL.: **—ito**, inflamo de —o; —ito akuta; —ito senakva aŭ seka; —ito pusa; **paĥi—ito**; **—itulo**; —a elfluaĵo (L. *Effusio.* F. *Epanchement*); **hidro—o** aŭ hidrotorako; **aer—o** aŭ pneŭmotorako; **hydro-aer—o** aŭ hidropneŭmotorako; **pusaer—o** aŭ piopneŭmotorako; **—operikardito**; **—opneŭmonio**; —aj dikaĵoj (F. *Epaississements pleuraux*); —a likvaĵa kurbo, parabola je supra linio; **—odinio**, ripdoloro, doloro ĉe interripaj nervoj; —aj frotbruoj. ĤIR.: **—otomio.**

2689 **Pli-igo, pli-iĝo** (A. *Increase,* G. *Zunahme, Vermehrung*); **mal—igo**, remisio (L. *Regresio*); **mal—iĝo**; **mal—iĝa** (F. *Régressif*); **mal-—igilo** aŭ reduktoro de potencialo (ELEKT.) (F. *Réducteur de potentiel*).

2690 **Pliko** vistula (L. *Plica polonica.* G. *Weichselzopf*); implikiĝo de haroj ĉe pedikhavaj loĝantoj en kelkaj landoj.

2691 **Plomb-o**, **—ado**, operacio per kiu oni ŝtopas dentan kavaĵeton; **—aĵo**; **—i**; **—ita dento.**

2692 **Plumb-o**, vario de metalo : Pb; —**a**; —**ismo**, venenado per —o (F. *Saturnisme*); —**kolora** vizaĝaspekto (A. *Livid.* G. *Bleifarben*); —a acetato; —a likva baza acetato (L. *Plumbum subaceticum*); —**oblanko** (L. *Cerussa.* A. *Whitelead.* G. *Bleiweiss*); —a fandita oksido (L. *Plumbum oxydatum fusum*).

2693 **Plumform-a** (G. *Federförmig* aŭ *gefiedert*); **duon—a** (L. *Semipenniformis*).

2694 **Pneŭmat-a** acido, norme ekzistanta en la pulma teksaĵo (F. *Acide pneumique*).

2695 **Pneŭmatika** (G. *Pneumatisch*).

2696 **Pneŭmatocelo**, gasa tumoro.

2697 **Pneŭmatozo**, gaso en la teksaĵoj.

2698 **Pneŭmogastrika nervo** (L. *Vagus*). ANAT. : plektoforma ganglio, depresora nervo.

2699 **Pneŭmograf-o**, ilo por studi la variojn de la toraka dilato dum spirado; —**io**, uzado de —**o**.

2700 **Pneŭmokok-o**, bakterio de la pneŭmonio; —**ozo** (F. *Pneumococcie*).

2701 **Pneŭmoni-o**, pulma inflamo; —**a**; —**ulo**.

2702 **Pneŭmoperikardo** kaj **Pneŭmoperitoneo** (RADIOL.), enigo de aero aŭ de azoto en perikardon aŭ peritoneon.

2703 **Pneŭmotorak-o**, enpleŭra aero; **hemo—o**, **hidro—o**, **pio —o**, aero en pleŭro kun sango, seraĵo aŭ puso; artefarita —o ĉe la ftiziuloj.

2704 **Poci-o**, likva medikamento trinkota po kuleroj;

—o alkohola, eferveska (L. *Pocio Riveri*), gumoza.

2705 **Podagr-o** (A. *Gout*, F. *Goutte*, G. *Gicht*); **kontraŭ—a** kuracilo; **—ulo**.

2706 **Podofil-o** (BOT.) (L. *Podophyllum peltatum*, A. *American mandrake*); **—ino**, aganta principo de —o.

2707 **Poez-o**, farado; **hemo—o**; **urino—o**; uropoeza sistemo.

2708 **Pojkilocitozo**, deformiĝo de hematioj en kelkaj anemioj.

2709 **Pojkilodermio**, retoforma haŭtatrofio kun pigmentaĵoj kaj vazaj pliampleksaĵoj.

2710 **Pojno**, manradiko, manartiko, karpea regiono. ANAT.: Ligamentoj radiokarpea dorsa, palma, flanka radiusa, flanka ulna, interkarpeaj.

2711 **Pokaloform-a**, en formo de pokalo; —a mikroba kolonio en gelatino (I. *In forma di coppa*).

2712 **Polakiurio**, ofta urinado.

2713 **Polarimetr-o**, ilo por mezuri la agon de korpo (sukero, k.t.p.) sur la polarizatan lumon.

2714 **Polariz(ad)-o** (G. *Polarisierung*); **—i**; **—a** plano.

2715 **Polekso**, mana dikfingro (A. *Thumb*, F. *Pouce*, G. *Daumen*).

2716 **Poli...**, komenco de vorto kiu en kombinoj signifas « multe » aŭ « tro da ». Ekz.: **—daktilio**, multfingreco (v. Fingro); **—dipsio**, troa soifo; **—fagio**, troa manĝado; **—pneo**, dispneo karakterizata per tre oftaj spiradoj;

—**sarcio**, trograseco; —**urio**, tro da urino; —**valenta**.

2717 **Poligal-o** (BOT.) (L. *Polygala*, A. *Milkwort*); —o senega (A. *Senega*, G. *Kreuzblume*).

2718 **Polipaĵo**, vario de monstro kiu havas du vertebrarojn.

2719 **Polip-o**, pedikla tumoro; utera, nazofaringa —o; —**a**; —**oforma**; —**ozo**, multe da —oj.

2720 **Polipod-o** (BOT.) (L. *Polypodium*, G. *Tüpfelfarn*).

2721 **Polm-o**, manplato; —**a** longa muskolo (L. *Palmaris longus*).

2722 **Polucio**, nokta spermelfluo sen sekskuniĝo.

2723 **Polus-o** (ELEKTR.) (L. *Polus*); pozitiva —o; negativa —o; **unu—a**, **bi-** aŭ **du—a** metodo; **inter—i**, meti inter —ojn.

2724 **Polv-o** (L. *Pulvis*); —**ero**; —**ereco**; —**eriĝo**, delitescenso.

2725 **Pomado**, miksaĵo de medikamento kaj ŝmiraĵo.

2726 **Ponto cerba** (L. *Pons*, A. *Varolius bridge*).

2727 **Poplit-o** (L. *Poples*, A. *Ham*, G. *Kniekehle*, H. *Jarrete*, I. *Garetto*); —**a** kavo (L. *Fossa poplitaea*, F. *Creux poplité*).

2728 **Popl-o nigra** (BOT.) (L. *Populus nigra*); —**a** pomado (L. *Unguentum populeum*, A. *Poplarsalve*).

2729 **Poracea**, verda.

2730 **Porci-o**, kvanto de manĝaĵo por unu persono; nutra taga —o (F. *Ration alimentaire*).

2731 **Porencefali-o**, kavaĵoj en la cerbo; pseŭda —o.

2732 **Porfiriz-i**, pisti korpon ĝis akiro de delikatega pulvoro; **—ita**; **—o**, **—ado**.

2733 **Porigo**, vario de haŭtmalsano (L. *Porrigo*, G. *Hautkleie*).

2734 **Por-o**, libera spaceto inter la eroj de korpo; **—a**, **—eca**, **—oza**; **—eco** (G. *Porosität*).

2735 **Port-i** (L. *Ferre*); **al—anta** (L. *Afferens*, G. *Zuführend*); **objekt—anta** vitro en mikroskopio aŭ objekta vitro (F. *Lame porte-objet*); **hom—ilo**, **brak—ilo**, brankardo; **vundul—isto**.

2736 **Portvejn-o** (L. *Vena portae*). ANAT.: Vejna kanalo, mezentera suba vejno. PATOL.: pusa **—ito**, pusa inflamo de —o (F. *Pyléphlébite*); **—a** trombozo.

2737 **Posologio**, sciigo de dozoj pri la medikamentoj.

2738 **Post-a**, malantaŭa; **—aĵo**, ĉio kiu kuŝas aŭ alvenas poste; **—morta** filo, t.e. naskita post la morto de la patro; **—naskaĵo** (v. Naski); **—vivo** (F. *Survie*).

2739 **Potaso** (ĤEM), hidrata oksido de kalio.

2740 **Potenc-o**, efikeco, kapablo; **—ŝanĝoj** (RAD.) (F. *Changements de régime* ou *Oscillations d'un tube*). DER.: **—ialo**, speciala elektro-kvanto; **—iala malpliigilo** (F. *Réducteur de potentiel*).

2741 **Pott**, angla kuracisto; **—'a** malsano, tuberkuloza aŭ sifila malsano de vertebroj ofte kun ĝibaĵo.

2742 **Pozitiv-a** (L. *Positivus*); —a poluso; **—o**, —a kopio, fotografaĵo sur papero.

2743 **Praktik-o**, apliko de la teorio al la realeco; **—a**; **—eco**; kuracisto **—isto**.

2744 **Prapatraro**, la prapatroj (L. *Les Ascendants*).

2745 **Precipit-i** (ĤEM.); oni **—as** sulfaton verŝante solvaĵon de $BaCl^2$ en solvaĵon de $Na^2\ So^4$; la verŝata solvaĵo estas la **—anto**; $BaSO4$ estas la **—ato**; **—eco**; **—ado**; **—ino**, substanco kiu ekzistas en kelkaj seroj.

2746 **Prem-o** (L. *Compressio*); **mal —o**; **—i**; **—aĵo**, **—itaĵo**, densigitaĵo (FARM.) (F. *Comprimé*); **—anta**, **—onta**,**—iga** bandaĝo (F. *Pansement compressif*); **—igita** aero, t.e. aero densigita per —o; **—ilo** (L. *Compressorium*); **—ligilo** (H. *Garrote*); **—sento** (v. Senti); **—signo** (F. *Empreinte*, G. *Ansetzungstelle*); fingra —signo; **—songô** aŭ terursonĝo (L. *Nocturna oppressio*, F. *Cauchemar*); **de—ebla** pulso (F. *Pouls dépressible*); **el—o de la feto** (L. *Expressio foeti*); **—ego** (A. *Crushing*, Fr. *Ecrasement*, Germ. *Zerdrückung*, *Abquetschung*, H. *Plastamiento*, I. *Schiacciamento*); **vazo—ego** (F. *Forcipressure*); **cirkaŭ—ita** hernio (F. *Hernie étranglée*).

2747 **Pren-i**, ekkapti; **—o**; **man—o** (L. *Prehensio*); **(infan)—ilo** (L. *Forceps*, G. *Zange*); **dento—ilo** (G. *Zahnzange*); **osto—ilo** (F. *Davier à os*); **pinĉ—o**; **—aĵeto**, eta kvanto da pulvora kuracilo.

2748 **Prepar-i**, pretigi; **—ita** spongo; **—o**; **—ado** (L. *Praeparatio*); **—aĵo**; **—isto** (en laboratorio).

2749 **Prepuci-o** (L. *Praeputium*. G. *Vorhaut*); **—a**; **—ito**, inflamo de —o.

2750 **Preskrib-o**, recepto, ordono (L. *Praescriptio*); **—i**.

2751 **Prezentiĝo**, modo de pozicio de feto dum akuŝo.

2752 **Priapism-o**, doloriga penisa erektiĝo sen deziro de koito.

2753 **Primara**, unua, direkta.

2754 **Primatioj**, homoj kaj simioj.

2755 **Primipar-a**, virino naskanta la unuan fojon.

2756 **Primitiva**, apartenanta al komenca stadio.

2757 **Primolo** (BOT.) (L. *Primula veris*. A. *Primrose*. F. *Primevère*. G. *Schlüsselblume*).

2758 **Prism-o** (GEOM.) **—a**; **—oforma**.

2759 **Proced-o**, speciala agmaniero; ĥirurgia —o.

2760 **Procesia** raŭpo, raŭpo de « *Bombyx processionea* ».

2761 **Proces-o** (L. *Processus*). 1) evolucio. Ekz.: **malsan—o**. 2) elstaraĵo, plilongaĵo. Ekz.: ciliaraj —oj, alveola —o k.t.p.

2762 **Procidenc-o**, falo; —o de umbilika ŝnuro en akuŝoj.

2763 **Prodigioz-a**, eksterordinara; —a bacilo.

2764 **Prodrom-o**, antaŭsimptomo, antaŭsigno.

2765 **Produkt-i**, liveri, fari; **—o**; **—ado**; **—aĵo**; **re—o**; fenda, segmenta re—o (F. *Scissiparité*); perova re—o (F. *Oviparité*); **re—anto**, kiu **re—as**.

2766 **Profilaks-o**, agoj por malhelpi la venon de mal-

sano; persona, propra —o, sinŝirmo; —**a**; —**i**; —**iga**.

2767 **Profund-a** (ANAT.), kontraŭo de supraĵa.

2768 **Prognata,** kies makzelosto kaj mandiblo elstaras.

2769 **Prognoz-o**, antaŭdiro pri l'estonto de malsano; alarmanta, serioza —o; favora —o; —**a**; —**i**.

2770 **Progres-i**, antaŭeniri; —**anta** paralizo; **sen—a** (F. *Stationnaire*.

2771 **Prokt**... En kombinoj signifas anuso; —**algio**, doloro ĉe anuso; —**ektomio**, ĝia ablacio; —**ito**, ĝia inflamo.

2772 **Prolaps-o**, malsupreniĝo; vagina —o; utera —o, kompleta, nekompleta, aŭ konstatebla nur post penado de la malsanulino; —**a**.

2773 **Proliferacio,** ĉela multiĝo (G. *Sprossung*).

2774 **Prolifika**, multnaska, multiĝema.

2775 **Proligera**, ĝermenhava.

2776 **Promontor-o**, elstaraĵo (G. *Vorgebirge*); timpana —o; pelva —o.

2777 **Pronaci-o**, turno de la mano de ekstere al interne; muskolo —**anta** aŭ pronanta (v.t.v.).

2778 **Pronanta** muskolo, ĉe antaŭbrako; ĝi havas du kapojn, humeran kaj ulnan.

2779 **Prononc-o**, —**ado**, —**maniero**, elparolado; —**aĉoj** aŭ **fuŝ—oj** : malpreciza —o (F. *Dysarthrie*); **rapid—aĉo**, (A. *Stuttering*, F. *Bredouillement*, G. *Stottern*, H. *Farfulla*, I. *Borbottamento*); **silab—adaĉo** (F. *Mogiarthrie*); **L—adaĉo** (F. *Lambdacisme*); **fuŝ-** aŭ **malklare—ita** (F. *Inarticulé*).

2780 **Propaĝ-i**, disvastiĝi; **—o**.

2781 **Propan-o**, hidrogena karbido saturita; **—olo**, alkoholo de —o; **—ono**, ketono de —o; **—ata** acido (A. *Propionic acid*).

2782 **Propedeŭtiko**, instruado pri la elementoj de la medicina scienco.

2783 **Propilamino**, metacetamino ($C^6H^9Az$).

2784 **Propilika** alkoholo ($C^3H^8O$).

2785 **Proporcio**, kvanta interrilato.

2786 **Propr-a**, ekskluzive apartenanta al; **—eco**; **—a-mova**, **—avola**, spontanea.

2787 **Prosektoro**, kuracisto faranta kadavrajn sekcojn, direktoro de la anatomiaj laboroj en fakultato.

2788 **Prostat-o** (L. *Prostata*. G. *Vorsteherdrüse*); **—a**; **—ito**, inflamo de la —o; **—oreo**, ĥronika elfluo el —o; **—ektomio**, ĝia ablacio.

2789 **Prostitu-i**, instigi, devigi virinon al malĉasta vivado por mono; **sin—o**, **mem—o**, agado de publikulino; **—ado**; **—itino**.

2790 **Prostracio**, stato de malsana senforteco.

2791 **Protargolo**, kombinaĵo de arĝento kun proteinaj substancoj.

2792 **Prote-a**, formŝanĝema; **—a bacilo**.

2793 **Protein-o**, sintonino (G. *Protein*); **—a**; **—oterapio** kuraciga enkonduko en organismon de fremdspeca albumino per eksterintesta vojo.

2794 **Proteolizo**, peptonizado, fluidigo de albuminaj proteinoj.

2795 **Protez-o**, artefarita plastiko (L. *Prothesis*) ; **—a** aparato por la buŝo aŭ ekstremaĵo k.t.p.

2796 **Proto...**, sufikso uzata en ĥemio por nomi oksidon aŭ salon, en kiu la pezo de la oksigeno, aŭ de la elektronegativa ŝtofo, estas kombinita kun la simpla ŝtofo laŭ la rilato 1 : 1. Ekz. : Protoksido de mangano (MnO).

2797 **Protoblasto**, ĉelo kies pario ne estas distingebla de l'enhavo.

2798 **Protoksid-o** (ĤEM.) (L. *Protoxydum*). Ekz. : Fera —o.

2799 **Protoplasm-o**, organizita substanco, bazo de la ĉela evolucio; **—a** ; **—olizo**, **—osolviĝo** (F. *Plasmolyse*).

2800 **Protozoo** (L. *Protozoum*).

2801 **Protruzi-o**, elstarado ; okulbulba —o.

2802 **Protuberanc-o** (L. *Protuberantia*); ringa —o aŭ cerba ponto.

2803 **Prov-i**, esplori, porkontrole uzi, ĥemie analizi ; **—o** ; **—kuracado** (F. *Traitement d'épreuve*); **—glaso**, epruveto (G. *Birnprobe*); **—tubo** (A. *Test tube*, G. *Reagensglas*).

2804 **Provizora**, transira, dumtempa, nedaŭronta.

2805 **Prozopalgio**, vizaĝneŭralgio.

2806 **Prurig-o**, vario de jukanta haŭtmalsano ; —o diateza, disĵetita, intensega (L. *Ferox*), limigita.

2807 **Prurit-o**, jukado (L. *Pruritus*). VAR. : diateza, flanka (L. *Secundarius*), lokalizata, primitiva; senila, somera, vintra, vulva. V. Juko.

2808 **Prusiat-o**, cianato; **—a acido** (A. *Prussic acid*).

2809 **Psamomo**, tumoro enhavanta kelkajn konkrementojn kalkecajn granulozajn.

2810 **Pseŭd...** en kombinoj signifas malvera, falsa; **—elefantiazo**; **—ekzantemo**; **—encefalulo**, monstro ĉe kiu la encefalo estas anstataŭata de vaza tumoro; **—omembrano**; **—omembrana** angino (F. *Angine couenneuse*); **—artrozo** (v. Artro).

2811 **Psiĥ-a**, koncernanta la menson; **—ozo**, —a malsano; **—analizo**, freŭdismo; **—astenio**, sendecidemo kun dubemo; **—iatro**, kuracisto specialisto por psiĥaj malsanoj, alienisto; **—iatrio**, scienco de mensmalsanoj; **—ologio**; **—opatio**, —a malsano; **—oterapio**, kuracado per —aj metodoj.

2812 **Psitakozo**, malsano komunikata de papagoj.

2813 **Psoas-o**, unu el la abdomenaj muskoloj (G. *Lendenmuskel*); **—ito**, inflamo de —o.

2814 **Psorenterio**, ŝvelo de intestaj folikloj en kelkaj malsanoj.

2815 **Psoriaz-o**, vario de skvama haŭtmalsano; **para—o**; —oformaj erupcioj. VAR. de **—aj** aperaĵoj: arabeskforma aŭ figurata, cirkloforma, elsorbiĝanta, malfacile kuracebla (L. *Inveterata*), unga, universala.

2816 **Psorosperm-o**, mikroskopa korpeto videbla ĉe multaj fiŝoj; **—ozo**, malsano kaŭzita de —o; pseŭda —ozo folikla surkreskanta (F. *Psorospermose folliculaire, Maladie de Darier*).

2817 **Pterigio**, parta dikiĝo de la subkonjunktiva teksaĵo (L. *Pterygium*).

2818 **Pterigoida**, flugilforma (L. *Pterygoïdes*).

2819 **Ptialino**, saliva diastazo.

2820 **Ptialismo**, salivado.

2821 **Ptomaino**, alkaloido produktata ĉe putraj bestaj materioj.

2822 **Ptoz-o**, falo, malaltiĝo de organo; **gastro—o**; **entero—o**; ĝenerala —o, falo de preskaŭ ĉiuj abdomenaj organoj.

2823 **Pub-o** (L. *Pubis*); **—osto**, antaŭa parto de koksosto. ANAT. de pubosto : Pekteno; obturaj krestoj; **—ostaj** tuberetoj antaŭa, posta. ĤIR. : **—otomo**, ilo por **—otomio** t.e. tranĉo de —osto.

2824 **Puerper-a** (L. *Puerperalis*), akuŝa, postakuŝa; **—io**, —a stato.

2825 **Pulm-o** (L. *Pulmo*); **—a**. PATOL. : **—ito**, pneŭmonio; —a antrakozo, embolio, emfizemo, gangreno, hernio (A. *Pneumocele*); **—okoniozo** (v. Konio), **—osilikozo** (F. *Chalicose*), **—otifo** (F. *Pneumotyphus*). ĤIR. : **—otomio**, **en—a** tranĉo; **—ektomio**, parta ablacio de —o.

2826 **Pulmonario** (BOT.) (L. *Pulmonaria*, A. *Lungwort*).

2827 **Pul-o**, vario de insekto (A. *Flea*, F. *Puce*, G. *Floh*, H. *Pulga*, I. *Pulce*); amerika —o, ĉiko.

2828 **Pulp-o**. 1) Mola parto de organo, de frukto; denta —o. 2) Fingrekstremo (L. *Pulpa*, A. *Fingerbeere*).

2829 **Puls-o**, bato de arterio; **—obato** (L. *Pulsatio*); **—obata** aŭ **—anta** (G. *Pulsierend*); **—a**. VAR.: —o alternanta, ampleksa, depremiĝema, dikrota, eksaltanta, hepata, senĉese malrapida (F. *Pouls lent permanent*), malregula, miura, mola, nekonstanta, paradoksa, polikrota, vazkapilara, vejna, biduopa (t.e. kun du pulsadoj sinsekvantaj apartigitaj de du aliaj per intertempo) (F. *Pouls bigéminé*), triduopa, trisistola (t.e. kun unu pulsado po du korsistoloj). **Mikro—eco** aŭ **Mikrosfigmio; sen—eco** aŭ **asfigmio**.

2830 **Pululacio**, multegiĝo.

2831 **Pulvinaro**, parto de l'okulo.

2832 **Pulvor-o**, seka substanco disigita en subtilaj eroj; **—a**; **—eca**; **—iĝema**, facile peceti ĝa; **—iĝemo** (H. *Friabilidad*); **—igi**; **—igo**; **—izo**, **—izado**; **—izilo**, ŝprucigilo (F. *Pulvérisateur*); gasdonanta —o (A. *Soda powder*); delikatega —o (F. *Poudre impalpable*); —o de glicirizo komponita; *Dovera* —o, —o de ipeko komponita (opiata).

2833 **Pumpil-o** (G. *Pumpe*); **aspir—o**; **stomak—o**.

2834 **Punkci-o**, ĉerpopikado, paracentezo; pleŭra —o, toraka paracentezo; **—aĵo**, elĉerpita likvaĵo.

2835 **Punkt-o** (L. *Punctum*); moviga —o ĉe muskolo; doloriga —o ĉe flanko, aŭ ripdoloro; propleŭrita —o; ostoformadaj —oj ĉe kreskantaj ostoj; **—ita** (L. *Puncticulatus*, A. *Pricked*); plej aktiva —o de malsano (F. *Foyer prin-*

*cipal de la maladie*); **fajro —etoj** (F. *Pointes de feu*); **—oforma**; **akvo —uro** (L. *Aquapunctura*); **nadlo—uro** (F. *Acupuncture*).

2836 **Pupil-o**, aperturo de l'iriso; **sen—eco**, denaska manko de —o; **—a**; **—ektopio**, —o denaske ekstere de irisa centro; **—oskopo** (F. *Corescope*); **—grandiĝo** aŭ **midriazo**; **—malgrandiĝo** aŭ **miozo**; **—barado**; **—malvastigantaj** rimedoj. Ekz.: Pilokarpino kaj ezerino.

2837 **Pup-o**, infaneto; **—pezilo** (F. *Pèse-bébé*).

2838 **Pur-a**, ne miksita kun alia substanco; **—igi**; **—igado**; **—iganta** (L. *Depurativo*); **mal—aĵo**; haŭtaj mal—aĵoj ĉe la maljunuloj, aŭ senila keratodermio (F. *Crasse sénile*).

2839 **Purino** ($C^5H^4Az^4$); unu el ĝiaj derivaĵoj estas urata acido.

2840 **Purpur-o**, haŭtmalsano karakterizata de hemoragioj ofte punktoformaj; —o apiretika, ekzantema, reŭmatisma, urtikoforma, vole estigita (F. *Provoqué*); **—a**; **—ozo**, malsano karakterizata per —o.

2841 **Pus-o** (L. *Pus*, G. *Eiter*); **—a**; **—eca**; **—ado**; **—i**, **—adi**; **—anta**; **—inta**; **—vomaĵo**; **—aerpleŭro** aŭ **piopneŭmotorako**; kuniklejoforma —ejo (F. *Clapier purulent*). (V. ankaŭ Pio... kaj Piurio).

2842 **Pustul-o**, haŭta ŝvelaĵ(et)o kun puso en la supro; karbunkola —o; **—a**, **—eca**; **—oza**.

2843 **Putameno** aŭ **striita korpo** (V. Strioj).

2844 **Putr-o**, **—ado**, malkomponiĝo de organismo kiu ne plu vivas; **—i**, esti en putro; **—iĝi**; **—a**; **—ema**; **—aĵo**; **—opuso** (L. *Sanies ichor*); denta, osta **—iĝo** (V. Kario).

# R

2845 **Rabarbo** (BOT.) (L. *Rheum*, A. *Rhubarb*).

2846 **Rabi-o** (L. *Rabies*, A. *Madness*, G. *Wuth*); **—a**; **—ulo**.

2847 **Radikal-o** (ĤEM.) (G. *Grundstoff*).

2848 **Radik-o** (L. *Radix*); **en—iĝinta** (L. *Inveteratus*); **el—igo** (F. *Eradication*).

2849 **Radi-o** (A. *Ray*, G. *Strahl*); **—ado** aŭ **—izo** (I. *Irradiazione*); **—anta**; **—izata**; **—ĥroismo**; **a—oĥroika**.

1) **X—oj aŭ Rentgen—oj**; —oj tre penetrantaj (F. *Rayons durs*); malmulte penetrantaj (F. *Rayons mous*); akcesoraj —oj; kanal—oj (F. *Rayons canaux*); **X—ologio**; **—oskopio**, kiu fariĝas per speciala muntkadro (F. *Châssis radioscopique*); **—odiagnozo**; **—ografio** aŭ **—ografado**; **—ografaĵo** aŭ **—ogramo**; multigitaj —ografaĵoj (F. *Radiographies en série*); **—olimigilo**; **—opelvimetrio**; **—ofotometro**; **—osklerometro**; **—oĥromometro**; **—oterapio**; **sur—ado** aŭ **—igo**; **sur—igita** parto de la korpo; incitiga sur—ado, ĉe hipofunkcio de kelkaj organoj; **—odermito**;

**—okontrolo** (studo de penetreco de radioj) de Rentgen' vitrosfero (F. *Etalonnage d'un tube à Rayons X*); Rentgenkatero (F. *Mal des rayons*).

2) **Ultraviolaj, infraruĝaj —oj.**

3) **—adoterapio** ampleksanta terapion per ĉiuj radiadoj, Aktinoterapio (v.t.v.), X-Radioterapio, k.t.p., ĝenerale konsiderata; **—o-aktiva**, aganta per **—aĵoj**; **—oaktiveco**; **—aktivigo** (F. *Radio-activation*); **—ogena** aŭ **—ogenera.**

2850 **Radium-o**, vario de metalo; **—bromido**; **—terapio** aŭ Curie' terapio; **—emanado**; **—emanaĵo** aŭ **Radono** (v.t.v.); **—emanaddozo**; **—pingloj.**

2851 **Radius-o** (L. *Radius*, G. *Speichenknochen*). ANAT.:**—a** tubero; foveo de la —a kapeto; ulna incizuro; —a arterio kun karpea, dorsa kaj polma branĉoj; dorsa retaĵo de la karpeo. Muskoloj: —a fleksanta la karpeon (Fr. *Grand palmaire*); —a longa etendanta la karpeon; —a mallonga (L. *Extensor carpi radialis brevior*, F. *Second radial externe*). Ligamentoj : —o karpea, —o ulna.

2852 **Radon-o**, radiuma emanaĵo; **—oterapio.**

2853 **Rafe-o** (ANAT.), linio videbla sutursimila sur la skroto, k.t.p. (A. *Raphe*, G. *Naht*).

2854 **Ragado**, haŭta fendo apud la generaj organoj, precipe ĉe sifiluloj.

2855 **Raĥi...** en kombinoj signifas « vertebraro »;

—**algio**, vertebra doloro; —**anestezo**; —**ko-kainizo**; —**skizo** (F. *Rachischisis*); —**tomo**, ilo por —**tomio** (sekco de vertebraro).

2856 **Raĥit-o**, osta moliĝo ĉe infanoj (L. *Rachitis*); —**a** rozario, nodaĵoj ĉe ripoj; funelforma torako (G. *Trichterbrust*); kokina torako (G. *Hühnerbrust*); —**ulo**, malsanulo trafita de —o.

2857 **Rajdportseĝo**, korbo en kiu oni lokas malsanulon aŭ vunditon por transporto sur mulo (F. *Cacolet*).

2858 **Ramn-o** (BOT.) (L. *Rhamnus*). VAR.: katartika —o (A. *Buckthorn*, F. *Nerprun*); frangulo (v.t.v.).

2859 **Rana kisto**, ŝvelaĵo sub la lango (A. *Ranula*, F. *Grenouillette*).

2860 **Rand-o** (L. *Margo*); anusa —o; —**a** (F. *Marginal*); —a elstaraĵo (F. *Rebord*).

2861 **Rapid-a** (L. *Rapidus*); **mal—a**; **pli—igo** (Lat. *Acceleratio*); **pli—iga** (G. *Beschleunigend*); **marŝ—emo**, en kelkaj nervaj malsanoj (L. *Festinatio*).

2862 **Raport-o**, detala klarigo pri...; medicinoleĝa —**o.**

2863 **Rarigo**, maldensigo (F. *Raréfaction*).

2864 **Ras-o** (L. *Genus*, F. *Race*); —**a** (F. *Ethnique*); —**kunmikso** (A. *Crossing*, F. *Croisement*, G. *Kreuzung*).

2865 **Rasp-a**, malglata; —**aĵo.**

2866 **Raŝo**, skarlatinoforma aŭ morbiloforma erupcio (A. *Rash*).

2867 **Ratanio** (BOT.) (L. *Krameria*, A. *Rathany*).

2868 **Rathke**, anatomisto; **—poŝo**, dermoida kisto formita el restaĵoj de la kranio-faringa poŝo el kiu ĉe feto devenas la antaŭa lobo de hipofizo.

2869 **Raŭk-a**, obtuze sonoranta; **voĉ—eco**; **voĉ—iĝo**.

2870 **Raŭp-o**, larvo de la lepidopteroj (L. *Eruca*, A. *Caterpillar*, F. *Chenille*, H. *Oruga*); **—aj** akcidentoj (F. *Accidents éruciques*).

2871 **Reag-o** aŭ **Reakci-o** (L. *Reactio*, F. *Réaction*, *Répercussion*); nerva —o de degenerado; —o de tuta senfortiĝo (F. *Réaction d'épuisement*); muskola —o laŭlonga (F. *Réaction longitudinale*); **haŭt—o** aŭ kutireakcio; **enderma —o**; **B.W. —o** ĉe sifiluloj; **—oreaperigo** nova apero de la B.W. —o post injekto de salvarsano (F. *Réactivation*); **—a**; **—anto**; **—ilo**; **Esbach' —ilo** por esploro pri albumino.

2872 **Recept-o**, preskribo (L. *Praescriptio*, G. *Arzneiformel*); **—arto**; **—oro**, teoria formo de antikorpo.

2873 **Reces-o** (L. *Recessus*, *Diverticulum*); faringa —o (F. *Fossette de Rosenmüller*).

2874 **Recidiv-o**, reapero de la malsano ĉe individuo.

2875 **Redukt-o**. 1) (ĤEM.): senigo de l'oksigeno; **—ebla**; **—ilo**; **—ita** fero; **—antaj** rimedoj, uzataj en dermatologio; 2) (ĤIR.): hernia —o (A. *Taxis*); fraktura —o, luksacia —o;

3) malpliigo: **—oro de** potencialo (ELEKT.).

2876 **Reduplikacio**, ripeto de unu el la bruoj de korbato, aŭ de ambaŭ (okazas en tiuj ĉi kazoj 4 bruoj por unu korbato).

2877 **Reedukado moviga**, resciigo de movoj ĉe malsanulo kiu momente ne plu povis ilin fari.

2878 **Reefiko** (L. *Repercussio*, G. *Zurücktreibung*).

2879 **Refaro**, denove faro (L. *Refactio*).

2880 **Referat-o**, raporto pri artikolo, verko; **aŭto—o**.

2881 **Refleks-o**, **—a** ago, nememvola nerva ago; **—eco**; renorena —o en kelkaj anurioj; kontraŭflanka —o, t.e. kiu fariĝas ĉe flanko kontraŭa al la ekscito (F. *Réflexe controlatéral*).

2882 **Reflekt-o**, resendo de sono, de lumo... ; **—ita** radio.

2883 **Refojig-o**, **refojiĝ-o** (F. *Redoublement*, I. *Raddoppramento*); —o de korbruoj.

2884 **Refrakt-o** (L. *Refractio*), rompiĝo de lumradioj; **—iga** (L. *Refrigens*) ; **bi—iga** ; **—ita** ; **—ebla** ; **—ebleco.**

2885 **Regener-o**, **—ado**, reprodukto de detruita parto per noveformitaj teksaĵoj.

2886 **Region-o**, sufiĉe vasta parto de korpo ; **—a.**

2887 **Regorĝitacio**, senpenada nedoloriga vomo.

2888 **Regul-o**, normaj bazaj principoj ; **ne—a** ; **mal—a** ; **—iga** ; **—ilo**, **—igilo** (H. *Regulador*).

2889 **Reĝa akvo**, miksaĵo de klorhidrata kaj nitrogena acidoj.

2890 **Reinfekt-i**, denove infekti ; **—o.**

2891 **Rekrementicia** (L. *Recrementitus*).
2892 **Rekrut-o,** novsoldato; medicina **—ekzameno** (F. *Conseil de révision*).
2893 **Rekt-a** (L. *Rectus*); —a muskolo, ĉe abdomena pario; **mal—a** (L. *Devius*); **re—igo**, restarigo (F. *Redressement*); utera **re—igilo**; **mal—eco**; samdirekta mal—eco de du okuloj (F. *Déviation conjuguée des yeux*); mal—eco de la aleksino (v.t.v.).
2894 **Rektit-o,** v. Rektumo.
2895 **Rektum-o** (L. Rectum); **—a**; **antaŭ—a** (F. *Prérectal*). ANAT.: Transversaj faldoj; **mezo—o**, faldo de peritoneo kiu fiksas la —on. PATOL.: **—ito** aŭ rektito, inflamo de —o; **—ofikso** (F. *Rectopexie*); tenesmaj doloregoj —aj (F. *Epreintes*). ILARO: **—oskopo**, ilo por **—oskopio**.
2896 **Rekurant-a** (L. *Recurrens*); —a febro; **—eco**.
2897 **Relief-a**, elstaranta; **—aĵo ĉe nazo** (A. *Spur*. F. *Eperon nasal*. G. *Sporn*. H. *Espuela*).
2898 **Remeto** (L. *Repositio*. F. *Réduction d'un organe déplacé*).
2899 **Remisio**, provizora malpliiĝo.
2900 **Renitent-a**, kiu cedas al la premo de fingro, sed ne tiel facile kiel en la fluktuacio; **—eco**.
2901 **Ren-o** (L. *Ren*. A. *Kidney*. G. *Niere*); **—a**; **—oforma**. ANAT.: kribrita areo; papilaj truetoj; —aj kolonoj; —aj piramidoj; kortikaj lobetoj; radiita parto (A. *Medullary rags*. F. *Pyramides de Ferrein*) kun volvita parto (A. *La-*

*byrinth of the cortex*); —aj korpetoj (A. *Malpighian corpuscules*); glomerula ŝelo (F. *Capsule de Bowman*); —aj tubetoj; arkoformaj, interlobetaj arterioj; arkoformaj, stelformaj vejnoj. PATOL.: —a subfunkciado; —a kongesto; embolia infarkto; amiloida —o; falanta, migranta —o; **ĉirkaŭ—a** absceso (V. ankaŭ Nefr.).

2902 **Rentgen**... (Roentgen), germana fizikisto, eltrovinto de X-radioj; **—ografio, —ogramo, —katero** k.t.p. V. Radio.

2903 **Reoforo**, elektra kondukilo.

2904 **Reostato**, aparato por diversigi la longecon de la elektra cirkvito.

2905 **Reprodukt-i**, generi; **—o, —ado** (V. Produkti).

2906 **Repulsi-o**, repuŝo (L. *Repulsio*. G. *Rückstoss*); **—a**.

2907 **Resekc-o** (L. *Resectio*), ĥirurgia fortranĉo; **—i**.

2908 **Resend-i**, denove sendi; **lum—o** (V. Reflekto).

2909 **Residuo**, postrestaĵo.

2910 **Reson-o** (L. *Resonatio*); **—ado**; **—atoro**; **—anto**, vario de elektra aparato.

2911 **Resorb-o** (L. *Resorptio*); **—i**; **—ita** eksudo.

2912 **Resorcino** (ĤEM.) (L. *Resorcinum*).

2913 **Respondeco**, prirespondo (A. *Responsability*. G. *Verantwortlichkeit*).

2914 **Rest-i**, daŭre esti en sama loko aŭ stato; **—aĵo** (ĤEM.), surfundaĵo; kutima **—adejo** (A. *Habitat*. G. *Standort*); spirita **post—(ec)o** (F. *Arriération mentale*).

2915 **Restiform-a,** ŝnurforma; **—aj** korpoj (ANAT.).
2916 **Reten-o,** nenorma daŭra konservo (L. *Retentio*); **mal—o, ne—o** (L. *Incontinentia*).
2917 **Retin-o,** unu el la okulmembranoj; **—a** dentita rando (L. *Ora serrata retinae*). HISTOL.: Bastonetoj (G. *Stäbchen*); konusetoj (G. *Zapfen*). PATOL.: **—ito,** inflamo de la —o.
2918 **Ret-o,** plektaĵo kun interspacoj; **—eto** (L. *Reticulum*); **—eca**; **—oforma** (L. *Reticulatus*); **—aĵo** (A. *Network*, F. *Lacis*, G. *Geflecht*).
2919 **Retrakt-o,** kuntiriĝo (L. *Retractio*); **—ebla**; **—ilo,** ĥirurgia aparato por —i.
2920 **Retro,** prefikso internacie uzata (sed esperante ne oficiala), kiu indikas ian movon malantaŭen en la sama direkto. Oni do povas diri **—evoluo, —iro, utera —flekso, utera —versio** k.t.p. sed estas preferinde diri: postutera hematocelo, postperitonito, poststernuma doloro.
2921 **Reŭmatism-o**; akuta, deformanta, ĥronika —o; **—a**; **—ulo**; **—oida** aŭ reŭmatoida, **—osimila.**
2922 **Revers-io,** returno en antaŭan staton; **—iebla**; **ne—iebla.**
2923 **Revulsi-o,** ago sur la haŭto por profunde agi per refleksec0; **—ilo**; **—iga** rimedo; **—igo.**
2924 **Rezin-o** (L. *Resina*. G. *Harz*); **—a**; **—eca.**
2925 **Rezist-i,** kontraŭstari, kontraŭagi, lukti, batali; **—o**; **—eco**; pasiva —eco; **—ecaj** aŭ **—iĝintaj**; **—osento**; **—aĵo**; elektra **—adkapablo** (F. *Résistance électrique*).

2926 **Rezoluci-o**, renormiĝo de inflamaĵo; **—iga**, kiu faciligas, kiu kaŭzas —on.

2927 **Rib-o** (BOT.) (L. *Ribes*. A. *Gooseberry*. F. *Groseille*. G. *Johannisbeere*); **—sirupo** (L. *Sirupus ribium*); folioj de nigra **—ujo**.

2928 **Ricev-i**; **—emo** (A. *Receptivity*. G. *Empfänglichkeit*).

2929 **Ricin-o** (L. *Ricinus*); **—oleo**; **—ata acido**.

2930 **Rigid-a**, nefleksebla; **—eco**, malfleksebleco; muskola —eco, konstanta kuntirstato; **—iĝo** (L. *Torpor*. F. *Engourdissement*); membro kiu **—iĝas** (F. *Membre qui s'endort*).

2931 **Rilat-o**: 1) proporcio; kapa —o, rilato inter la diametroj de la kapo (F. *Indice céphalique*); nombra —o, ekz.: rilato inter vivantoj kaj mortintoj, novnaskitoj k.t.p.; 2) reciproka ligiteco: **—a** al, apartenanta al; **inter—o**, reciproka —o inter du objektoj; **kun—eco** (L. *Affinitas*); **—i**.

2932 **Rimed-o**, pero (A. *Means*. F. *Moyen*. G. *Mittel*. I. *Modo*).

2933 **Rin**... en kombinoj = nazo; **—ito** aŭ korizo, inflamo de nazo; **—oreo**, kronika nazelfluo; **—encefalo** (v.t.v.); **—ofimo**, nazhaŭta kuperoza hipertrofio; **—ologio**; **—oskleromo**; **—oskopio**; **—oplastiko**, nazriparo per plastika operacio.

2934 **Rinencefalo** (L. *Rhinencefalus*). ANAT.: Paraolfakta sulko; olfakta giro; olfakta traktuso; mezaĵa strio (L. *Stria medialis*).

2935 **Ring-o**, cirklo; **—a** fingro (I. *Dito anulare*); **—eretenita** (F. *Enchâtonné*); patela **—efikso** (ĤIR.); ingvena —o (ANAT.).

2936 **Rip-o** (L. *Costa*); **—a**; **—algio**; **—a** doloro; **inter-—a** (L. *Intercostalis*); **—otranĉilo** (F. *Costotome*). ANAT.: tubereto de la skaleno; —o-transversaj artikoj; falsaj —oj; ligamento de la ripa cerviko (L. *Ligamentum colli costae*); **sternumo—aj** artikoj kaj radiitaj ligamentoj; interĥondraj artikoj.

2937 **Risortsimil-a** (F. *A ressort*); —a fingro (G. *Springender Finger*); —a kokso.

2938 **Ritm-o** (L. *Rhytmus*); **bon—eco** (F. *Eurythmie*); **mal—eco** aŭ **sen—eco**, aritmio; kuplita —o, malkuniĝo de la ventrikla kaj koraŭrikla —oj (F. *Rythme couplé*); **alo—io** (v.t.v.).

2939 **Rizoform-a**, rizgrajnosimila; sinoviito kun —aj grajnetoj.

2940 **Rizomelik-a**, kiu rilatas al la radikoj de la membroj (Ekz.: —a spondilozo) aŭ al iliaj proksimaj segmentoj (ekz.: —a mikromelio).

2941 **Rodiomo**, vario de metalo, simbolo Rh.

2942 **Roentgen**. (V. Rentgen).

2943 **Roko** (ANAT.) ŝtoneca parto de la tempiosto.

2944 **Roland-o**, piemonta anatomisto; **—a** cerba regiono.

2945 **Rombencefalo** (L. *Rhombencephalus*).

2946 **Romboid-a** (L. *Romboides*, G. *Rautenförmig*); —a muskolo; —a foveo.

2947 **Romp-o** (L. *Ruptura*. G. *Bruch*. *Riss*. H. *Rotura*); **—iĝo**; **ost—o**, frakturo; **—iĝemo**; facila ost—ebleco ĉe iuj; **—i**; **dis—i**; **—iĝi**; **inter—ilo** (ELEKT.).

2948 **Rond-o**, cirklo; **—aĵa** (L. *Circinalis*); **—aĵoj**; **—o-forma**, **—aĵoforma** (L. *Circinatus*); **—ekunigo** (ĤIR.), ekz. por krei anastomozon.

2949 **Ronk-i**, brue spiri dum dormo pro vibrado de la palatvualo; **—o**; **—ado**; **—simila** stertoro (G. *Schnarchend*).

2950 **Rosmareno** (BOT.) (L. *Rosmarinus*. A. *Rosmary*. H. *Romero*).

2951 **Rostro** (L. *Rostrum*); —o de la skriptoria kalamo (ANAT.).

2952 **Rotaci-o**, turniĝo; **—anta** (A. *Rotator*); —anta transformilo (ELEKT.); **—iga** (F. *Rotatoire*).

2953 **Rozeol-o** (L. *Roseola*); medikamenta, papula, sifila, skvama —o.

2954 **Roz-o** (L. *Rosa*); **—a**; **—kolora**; **—acea** akneo; **—oza pomado** (F. *Pommade rosat*, G. *Rosenpommade*).

2955 **Ruband-o** (A. *Band*. H. *Faja*); **vind—o**; subfemura —o (F. *Sous-cuisse*); **—oforma**.

2956 **Rubeol-o** (PATOL.) (G. *Röteln*); **—ulo**.

2957 **Rubidio**, vario de metalo, simbolo Rb.

2958 **Rubus-o** (L. *Rubus*. F. *Mûre sauvage*); **—ujo** (A. *Bramble*. G. *Brombeere*. H. *Zarza*. I. *Rozo*); **—oforma** ŝtono (F. *Calcul mûriforme*).

2959 **Rudimenta**, elementa, komenca (L. *Rudimentarius*).

2960 **Rugino**, ĥirurgia skrapilo por la ostoj.
2961 **Ruĝa** (A. *Red.* G. *Rot.* I. *Rosso*); **—eco**; **—aĵoj**; **—iĝemo** (F. *Erythrose*); **—igo** (L. *Rubefactio*); **—iga**; **—iĝo**; brilege —a (L. *Rutilans*).
2962 **Rukt-i**, kun bruo eligi gason el la stomako; **—o**.
2963 **Rul-i**, turnigante movi; diastola **—bruo** (F. *Roulement diastolique*).
2964 **Rumeks-o** (BOT.) (L. *Rumex*. A. *Dock*); paciencа —o (F. *Patience*. G. *Sauerampfer*).
2965 **Ruminado**, remaĉado.
2966 **Rupia-o**, vario de haŭtmalsano karakterizata de koncentraj krustoj tavoliĝaj; —o kaĥeksa, sifila.
2967 **Rusmao**, vario de senhariga preparaĵo.
2968 **Rust-o**, ruĝa korpo kiu kovras feron post malsekeco; **—aj** aŭ **—okoloraj** kraĉaĵoj en pneŭmonio.
2969 **Rutenio**, vario de metalo; simbolo: Ru.
2970 **Ruto** (BOT) (L. *Ruta graveolens*. A. *Rue*. G. *Raute*. H. *Ruda*).

# S

2971 **Sabin-o** (BOT.) (L. *Juniperus sabina*).
2972 **Sabl-o**; urina —o, vario de urina litiazo.
2973 **Saburala** (L. *Saburralis*).
2974 **Safen-o**, femura vejno (L. *Saphena*); **—a**.
2975 **Safran-o** (BOT.) (L. *Crocus*); **—ino**.
2976 **Sagapeno**, vario de gumrezino.

2977 **Sagitala** (L. *Sagittalis*) aŭ sagoforma.

2978 **Saĥar**... komenco de vorto uzata en kombinoj por sukero; **—ato**; fera —ato (L. *Ferrum saccharatum*); **—ido** (F. *Saccharure*); **—imetro**; **—ino**, pseŭda sukero; **—omika**; kansukero, laktozo, maltozo estas **—ozoj**.

2979 **Sak-o** (L. *Saccus*); **—eto**; **—forma**; **—fundo**, senelira kanalo (A. *Blind canal*).

2980 **Sakr-o** (L. *Sacrum*). ANAT.: flanka parto, aŭrikla surfaco (L. *Facies auricularis*); epidurala spaco. Nervoj de la **—a** plekso : isĥiatiko; malgranda isĥiatiko aŭ posta haŭta nervo de la femuro; komuna fibula nervo (F. *Nerf sciatique poplité externe*) kun branĉoj : muskolaj, flanka haŭta de la suro, anastomoza fibula, surfaca fibula, haŭta dorsa mezaĵa (F. *Nerf pédieux antérieur*); nervo fibula profunda (L. *Nervus peronaeus profundus*. A. *Anterior tibial*) kun branĉoj mezaĵa (A. *Internal*) kaj ekstera; tibia nervo (F. *Sciatique poplité interne*); interosta nervo de la kruro; sura nervo. Artikoj **—oiliaka**; **—olumba**; **—overtebra**; **—okokciga**. Eksternormaĵoj : **—iĝo**, **—osimiliĝo** de la kvina vertebro lumba (F. *Sacralisation*).

2981 **Saksifrago** (BOT.) (L. *Saxifraga*. G. *Steinbrech*).

2982 **Salepo**, orkidtubero (analeptika substanco).

2983 **Salicilat-o**; **—a** acido aŭ salicilacido; **acetil—a** acido (L. *Acidum acetylsalicylicum*).

2984 **Salikario** (BOT.) (L. *Lytrum salicaria*. A. *Purple loosestrife*. G. *Weiderich*).

2985 **Salik-o** (BOT.) (L. *Salix*. A. *Willow*. F. *Saule*. G. *Weide*); **—ino**.

2986 **Salipirino**, salicilato de antipirino.

2987 **Saliv-o** (A. *Spittle*. G. *Speichel*); **—ado**; **—adego**; **en—ado** de la manĝaĵoj (A. *Insalivation*. G. *Einspeicheiung*); **—iga** (L. *Sialogogus*); **—oreo** (L. *Sialorrhœa*); **—ŝtoneto** (F. *Calcul salivaire*); **sen—eco**, aptialismo; **—i**.

2988 **Sal-o**. 1) Komponaĵo de metalo kaj acido (nomi unue la metalon) : kalia ĥromato, natria hiposulfito, natria acida sulfato; Karlsbad —oj artefaritaj; 2) Natria klorido, **kuir—o**, uzata por spici la manĝaĵojn; **—limigo** en kelkaj malsanoj, precipe la edemaj.

2989 **Salofeno**, acetilparaminosalolo (L. *Salophenum*).

2990 **Salolo**, salicilato de fenolo.

2991 **Salpetr-o** aŭ **Nitro**, kalia azotato.

2992 **Salping-o** (A. *Fallopian tube*, G. *Eileiter*). ANATOM.: Infundiblo (F. *Pavillon*); ovariaj franĝoj; ampolo; istmo. PATOL.: **—ito**, inflamo de —o; pusa —ito; —a tuberkulozo; —a gravedeco; **hidro—o**; **—o-ovarito**; **—a endometriozo**, en kiu la —a muktuniko tute similas la uteran; —a endometriomo, en kiu la endometria mukozo disvolviĝas kiel benigna tumoro. ĤIR.: **—ektomio**, fortranĉo de —o.

2993 **Salvarsan-o**, arsenobenzolo (606); nov—o (914).

2994 **Salubr-a**, saniga; **—eco**; **mal—eco**.

2995 **Salvio** (BOT.) (A. *Sage*, F. *Sauge*, G. *Salbei*).

2996 **Sambuko** (BOT.) (L. *Sambucus nigra*, A. *Elder*, F. *Sureau*, G. *Hollunder*).

2997 **Sampatr-a** (L. *Consanguineus*); **—ina**; **—eco**.

2998 **Samvalor-a**, ekvivalenta; **—o**.

2999 **San-a**, kies organoj norme funkcias; **—o**; **—eco** (F. *Etat sanitaire*); **—ejo**, **—domo**; **—ema**; **—igo** (F. *Assainissement*); **—igi**; **—iga** (F. *Curatif*); **re—igebleco** (L. *Curabilitas*); **nere—igebla** (L. *Incurabilis*); **—iĝi**; **—iĝo**; **re—iĝo** (L. *Convalescentia*); **re—iĝi** el malsano; **ekre—iĝi** (*Entrer en convalescence*); **re—igo** (A. *Cure*, G. *Heilung*); **mal—o** (L. *Morbus*); blua aŭ cianoza mal—o; Bright'a mal—o, vario de nefrito; **mal—a**; **mal—iga**; **mal——eto**; **mal—ulo**; **mal—(ul)ejo**, hospitalo; **mal—et(ul)ejo** (A. *Infirmery*); **mal-—(ul)isto**; **mal—(ul)istino**; **mal—ema**; **mal-—emulo** (L. *Valetudinarius*); **remal—iĝo**, mal—reapero (A. *Relapse*, F. *Récidive*, G. *Rückfall*); ekfiniĝo de mal—o (F. *Déclin de la maladie*).

3000 **Sanatorio**, sanigejo por malsanuloj komforte aranĝita.

3001 **Sang-o**; **—a** (L. *Sanguis*); **—eca**; **—oza** (L. *Sanguinolentus*); **—osimila** (L. *Haematoïdes*); —aj tipoj, diversaj laŭ ecoj de aglutinado de ruĝaj sangkorpetoj, k.t.p. ANAT.: **—ovazo** aŭ angio; kapilaraj vazoj; **ruĝa —oglobeto** aŭ **—okorpeto**, aŭ **—odisketo**, hematio;

blanka —oglobeto, leŭkocito; —a sero. FIZIOL.: **—okoagulaĵo**, —a malfluidaĵo; blanka —okoagulaĵo (A. *Buffy coat*, F. *Couenne*, G. *Speckhaut*); **—stabila**, malkoagulema; **—malstabila**, trekoagulema; **—farado**, hematopoezo. PATOL.: **—oriĉa**; **—alfluo**, kongesto; **—alfluosento** (F. *Bouffée de chaleur*); **—omanka, sen—a** (L. *Exsanguis*); **malpli—eco** aŭ **malpli—ozo**, kiam kvanto da —o en organo aŭ organismo fariĝis malpli granda ol norme; **—ado**; **—ellaso**; **—elfluo**, hemoragio; **—i** aŭ **adi** el la nazo; **—kisto**, hematomo; **—sputo**, —a kraĉaĵo; **—pleŭro**, hemotorako; **—aerpleŭro**, hemopneŭmotorako; **—oŝvito**; **—ovomo**, hematemezo; enutera —reteno, hematometrio. TERAP.: **—olavado**; **—eltiro** (L. *Sanguinis emissio*); kuracilo **—haltiga**, hemostaziga; **—elfluiga** (L. *Haemagogus*). (V. ankaŭ: Hem..., Hemat..., Hemio..., Hemo...).

3002 **Santal-o**; —o blanka (A. *Sanders*, G. *Sandel*); —o ruĝa.

3003 **Santonino** (L. *Santoninum*).

3004 **Sap-o** (A. *Soap*, G. *Seife*, H. *Jabon*); **—onino**; **—igo**; **—iĝo** (F. *Saponification*). VAR.: bestodevena (L. *Animalis*), medicina, kalia (L. *Mollis*), k.t.p.

3005 **Saponario** (BOT.) (A. *Soapwort*, G. *Seifenkraüt*).

3006 **Saprofito**, vario de bakterio konstante enloĝanta en kelkaj organoj, en putraĵoj, k.t.p.

3007 **Sarcino**, kubforma bakterio.

3008 **Sarkoido**, haŭta tubero lentoforma (F. *Sarcoïde de Boeck*).

3009 **Sarkom-o**, vario de tumoro; **melano—o**; **kisto—o** (F. *Cystosarcome*); **—ozo** (F. *Sarcomatose*).

3010 **Sarkopto skabia** (L. *Sarcoptes scabiei*, A. *Itch insect*, G. *Krätzmilbe*).

3011 **Sarsaparilo** aŭ **Smilako** (v.t.v.).

3012 **Sartorio**, unu el la muskoloj de la femuro.

3013 **Sasafro** (BOT.) (L. *Sassafras*).

3014 **Satelit-a**, akompananta; **—o**; kultura **—ismo**, favora influo de kelkaj bakterioj al la kreskado de aliaj en la samkulturo.

3015 **Satiriazo**, malsana seksa eksciteco ĉe viro.

3016 **Satur-i**, satigi, meti en solvaĵon substancon solveblan ĝis ne plia solvebleco; **—o**; **—ado**; **—ita**; **super—o**.

3017 **Saturn-a**, plumba; —a salo; **—ismo**, venenado per plumbo; **—ulo**, malsanulo pro —ismo.

3018 **Sciatiko** aŭ **Isĥiatiko** (v.t.v.).

3019 **Scibalo**, malmola fekaĵo.

3020 **Scisur-o**, fendo (L. *Scissura*); pulma —o.

3021 **Seb-o** (L. *Sebum*); **—a**; **—eca** (A. *Sebaceus*, G. *Talgartig*); —a kisto (A. *Grub*, F. *Tanne*, G. *Hautfinne*); **—oreo**, —eca elfluo; **—orea** ekzemo; ĉirkaŭharaj **—oreidoj** ekzemiĝintaj (F. *Séborrhéides péripilaires eczématisées*).

3022 **Sedaci-o**, mildigo; **—a**; **—iga** (L. *Sedativus*, G. *Lindernd*).

3023 **Sedimento**, deponaĵo en likvaĵo.

3024 **Segment-o**, parto; fenda **—a** reproduktado, fendoparo (F. *Scissiparité*); **—ado** (G. *Furchungsprozess*).

3025 **Segregacio** (BIOL.), apartigo de individuoj ne normaj por kreado de novaj specoj, favoranta al la selekcio kaj malhelpanta al la malapero de novakiritaj ecoj.

3026 **Sek-a**, senakva; **mal—a**; **el—igo** (L. *Dessicatio*); **el—iĝo**, senakviĝo; **mal—igi**, **mal—etigi** (F. *Humecter*).

3027 **Sekal-o** (BOT.) (A. *Rye*, F. *Seigle*, G. *Roggen*, H. *Centeno*, I. *Segale*); **—ergoto** aŭ **—kornuto**, eltirita el « *Secale cornutum* ».

3028 **Sekc-i**, tratranĉi, distranĉi; **—o**; **—ado** (L. *Dissectio*); **viv—o** (F. *Vivisection*); **—ilo** aŭ skalpelo; **re—o** (L. *Resectio*); **re—i**; **—eto** (F. *Coupe*); **prov—eto** (A. *Test object*); **dis—anta** aneŭrismo.

3029 **Sekcio**, grupo, divizio.

3030 **Sekreci-o** (L. *Secretio*); **—a**; **—anta** glando; **—i**; **—aĵoj**; **hiper—o**, troa —o.

3031 **Sekretino**, hormono sekreciata de la duodena mukmembrano kapabla eksciti la digestajn glandojn (Pankreaso, k.t.p.).

3032 **Seks-o** (G. *Geschlecht*); **—eco**; **—a**; **vir —o** (F. *Sexe masculin*); **virin —o**; **—havanta** (F. *Sexué*); **—kuniĝo** (L. *Copulatio*);

**—atenco** (L. *Vis illata pudicitiae*); **—inversulo** (F. *Inverti, Uraniste*); **—matura**, edzokapabla, viriĝinta, viriniĝinta; **—matureco**, vir(in)iĝo; **ambaŭ—a**; **ambaŭ—ulo**, hermafrodito; **sam—amulo** (Fr. *Homosexuel*).

3033 **Sekundar-a**, duaperioda; —a sifilo.

3034 **Sekv-a**, okazinta post io; —a anemio.

3035 **Sekvestro osta**, mortinta parto de osto.

3036 **Selakto**, fluidaĵo apartigita el kazeiĝinta lakto.

3037 **Selekcio**, elekto de la plej bonaj.

3038 **Selen-o**, vario de metalo, simbolo: Se; **—ato**; **—ata** acido.

3039 **Self-o** (ELEKTR.), indukto.

3040 **Sel-o** (L. *Sella*); turka —o aŭ hipofiza foveo; **—oforma** lumbo, t.e. tro arkiĝinta (F. *Ensellure lombaire*).

3041 **Seltersa akvo**, gasplena akvo (F. *Eau de Seltz*).

3042 **Sem-i**, disĵeti; **—o** (L. *Semen*); **dis—ado**.

3043 **Semiologio**, studo de la simptomaro de la malsanoj.

3044 **Sempervivo** (BOT.) (A. *Houseleck*, F. *Joubarbe*, G. *Hauswurzel*, H. *Yerba puntera*).

3045 **Senec-io** (BOT.) (L. *Senecio*, A. *Groundsel*, G. *Greisenkraut*, H. *Yerba cana*, I. *Cardoncello*).

3046 **Senil-a**, maljuneca; **—eco** (L. *Senilitas*).

3047 **Sennoma** (L. *Innominatus*).

3048 **Senper-e**, rekte; **—a** kunigo de vundrandoj (F. *Réunion par première intention*).

3049 **Senrekonpovo**, perdo de la kapablo al rekono (F. *Agnoscie*).

3050 **Sensori-o**, centro de la sentoj ; **—a**.

3051 **Sent-i**, ricevi impreson per unu el la kvin **—iloj** aŭ **—umoj** ; **palpe—i** ; **—o**, **—aĵo** (G. *Empfindung*, I. *Sensazione*); frunta **prem—o** (F. *Sensation de barre frontale*); histeria **najl —o** ; **malagrabla —eto** (F. *Malaise*); **tro—eco**, hiperestezio ; **fuŝ—eco**, malnorma —o ; **—emo** ; **—ema** ; **malsanet—emo**, sveneto ; **—emigo** (F. *Sensibilisation*); **—emigaĵo** (F. *Sensibilisine*); **—emigilo** (F. *Sensibilisateur*); **—a** ; **sen—a** (L. *Insensibilis*); **—emiĝinta** ; **kun—ila** reflekso (F. *Réflexe consensuel*).

3052 **Seps-a**, infekthava, putriĝa ; **—eco** ; —eco de sango; **anti—a** (G. *Antiseptisch*); **anti—eco** ; **—emio**.

3053 **Septana febro**, kiu aperas ĉiun sepan tagon.

3054 **Sept-o**, apartigilo ; **—eto** ; **—oforma** ; **naz—o** aŭ **naz —umo** (F. *Cloison nasale*).

3055 **Seringo**, vorto kelkfoje uzata anstataŭ enŝprucigilo.

3056 **Ser-o**, fluida parto de sango ; **—aĵo** (H. *Serosidad*); **—odiagnozo** ; **—oreago** ; **—ologio** ; **—a** ; **—oza** ; **—ozburso** ; **—ozbursito**, higromo ; **—ozo**, **—oztuniko** (A. *Serous coat*, F. *Séreuse*); **—ino**, **—albumino** ; **—inurio**, ĉeesto de —ino en urino ; **—oterapio** ; kontraŭdifteria —o; **anti—o**, —o entenanta

antikorpon; artefarita —o, solvaĵo de natria klorido po 7 el 1000, por medicina uzo.

3057 **Serpigina**, iom serpentsimila.

3058 **Serumo** aŭ **Sero** (v.t.v.).

3059 **Sesamoid-a** (L. *Sesamoïdes*); —**osto**.

3060 **Seskvi...**, (ĤEM.), prefikso uzata kiam la pezo de l'oksigeno kaj de la elektronegativa ŝtofo estas laŭ la rilato de 3 : 2. Ekz.: —**oksido** de mangano ($Mn^2O^3$).

3061 **Sestana febro**, kiu aperas ĉiun sesan tagon.

3062 **Seton-o**, meĉo trapasanta la haŭton duloke por drenado (G. *Haarseil*. H. *Sedal*); —**forma** vundo (F. *Plaie en séton*).

3063 **Sfacel-o**, malseka parta gangreno; —**a**.

3064 **Sfenoid-a** (L. *Sphenoidalis*); —**osto**. ANAT. de la —osto: hipofiza foveo aŭ turka selo; tubereto de la selo (A. *Olivary eminence*); —a kresto (F. *Crête malaire*); karotida sulko (L. *Sulcus caroticus*. F. *Gouttière caverneuse*); —aj konĥoj (F. *Cornets de Bertin*); granda flugilo kun truoj ronda kaj dorna, angula dorno; malgranda flugilo kun kiasma sulko, optika truo, supraorbita fendo; pterigoida apofizo kun flanka kaj mezaĵa lamenoj, kanaloj pterigoida, faringa, bazofaringa; sulko de l'aŭda tubo, pterigodorna apofizo; —**omakzela**, —**opalata**, k.t.p.

3065 **Sfigmo...**, komenco de vorto uzata por pulso; —**grafo**, ilo por —**grafio**; —**gramo** aŭ —**gra-**

**fiko**, desegno de la pulsa kurba linio; **—metro**; **—manometro**; **—skopo**.

3066 **Sfinkter-o**, ringa muskolo, je la aperturo de organisma kanalo; anusa, vezika —o; **—algio**, doloro ĉe —o.

3067 **Sibl-i**, eligi longdaŭran sonon S; **—o**; **—a** stertoro (L. *Rhonchus sibilans*).

3068 **Sider-o**, **—ado**, subita neniigo de funkcio; **—i**.

3069 **Siderozo**, fera pulmokoniozo.

3070 **Sido**. 1) postaĵo (A. *Fundament breech*. F. *Siège*. G. *Sitz*. I. *Sede*); 2) loko. Ekz.: La cerbo estas la sidloko de la pensado.

3071 **Sidonalo**, kinato de piperazino.

3072 **Sifil-o** aŭ **sifiliso** (L. *Lues venerea*); **—a**; **kontraŭ—a** kuracilo; **—ulo**; **—igo**; **—iĝo**; **para—o**; malvidebligi —on per arseno-benzolo (F. *Blanchir une syphilis*); **—ografio**; **—ografo** aŭ **—ografisto**; **—idoj**, —aj erupcioj; —idoj arkformaj, ektimaj, eritemopapulaj, foliklaj, veziketaj, k.t.p.; postulcera falsa —ido ĉe kelkaj pupoj (F. *Syphiloïde postérosive*); ŝankroforma **—omo**; —aj mukmembranaj lamenoj (F. *Plaques muqueuses*). V. ankaŭ Lueso.

3073 **Sigmoid-a**, S-forma; **—o**, —a koj'ono; —a anso; **—ito**, inflamo de la —o.

3074 **Sign-o** (L. *Signum*); histeria **—aro** (F. *Stigmates de l'hystérie*); **duon—o**, duonpruvo; malkonverĝo-signo (v. Konverĝo); **moner—o** aŭ monerbruo (v. Bruo).

3075 **Sikfebro**, vario de spiroketozo (A. *Sick fever*).

3076 **Sikoz-o**, malsano de la haraj folikloj, ofte ĉe barbo, nomita en kelkaj landoj « figoforma ekzemo ». VAR. : —o lupusosimila, mikrospora, stafilokoka, trikofita.

3077 **Silicio**, vario de metalo, simbolo Si.

3078 **Silik-o**, natura kombinaĵo de silicio ; **—ato** ; **—ata** acido ; **—ataparato** ; **—ozo**, silika pulmokoniozo.

3079 **Silvi-a**, kiu rilatas al la cerba fendo de *Sylvius*; —a arterio.

3080 **Simarubo** (BOT.) (L. *Simaruba*).

3081 **Simbioto**, bakterio vivanta en organismaj teksaĵoj kaj helpanta al biologiaj sintezoj.

3082 **Simbiozo**, konkorda kunvivo ; asocio de du aŭ pluraj organismoj, ekz. de mikroboj.

3083 **Simbolo P. H.**, kvanto de la ionoj H en likvaĵoj kaj en teksaĵoj de l'organismo.

3084 **Simetri-o** (F. *Symétrie*) : faca **sen—o**.

3085 **Simfito** (BOT.) (L. *Symphitum off*, A. *Comfrey*, F. *Consoude*. G. *Beinwell*. H. *Consuelda*. I. *Consolida*).

3086 **Simfiz-o** (L. *Symphisis*); puba —o; **—otomo**, ilo por **—otomio**.

3087 **Simpatik-a** nervaro, nerva aparato de l'organa vivo. ANAT. de la granda —a nervo : subklavikla anso, splanknika malgranda nervo kun rena branĉo ; splanknika plejmalgranda nervo (F. *Troisième splanchnique ou nerf ré-*

*nal postérieur*); celiaka plekto. ĤIR.: **—ektomio**, parta fortranĉo de la —a nervaro.

3088 **Simptom-o**, fenomeno montranta malsanon aŭ organan difektiĝon; **—a**.

3089 **Simulata**, ŝajnigata.

3090 **Sinap-o** (BOT.) (A. *Mustard*. G. *Senf*); —o nigra, blanka; **—aĵo**, **—a** faruno, papero, kataplasmo, piedbano; **—izo** aŭ **—ismo**.

3091 **Sinartrozo**, artiko denaske kaj norme nemovebla.

3092 **Sinciputo**, verto (G. *Vorderhaupt*).

3093 **Sindaktilio**, fingrokuneco (per interfingra membrano).

3094 **Sindesmologio**, scienco pri ligamentoj.

3095 **Sindromo**, simptomaro, grupo de simptomoj.

3096 **Sineĥi-o**, kungluo de la iriso kun la korneo (antaŭe —o), aŭ kun la kristalino (malantaŭa —o).

3097 **Sinergi-o**. 1) samtempa ago de pluraj organoj. 2) reciproka influo de korpo sur alian korpon kiu igas ĝian efikon pliforta, pli longdaŭra; **—a**.

3098 **Singenezo**, teorio pri la nasko de organismoj per eningigo (F. *Emboîtement*) de la ĝermoj; ĝia kontraŭo estas epigenezo.

3099 **Singult-o**, **—ado** (L. *Singultus*. A. *Hiccough*. F. *Hoquet*. G. *Schluchzen*. H. *Hipo*. I. *Singhiozzo*); **—i**; **—ema**.

3100 **Sinistrokoreco**, koro iom pli maldekstre ol norme.

3101 **Sinkiz-o**, malklariĝo de la enokulaj humoroj; brilega —o, ĥolesterinaj kristaloj en la vitreca korpo.

3102 **Sinklitism-o**, paraleleco inter la biparieta diametro de la feta kapo kaj la plano de la pelvo ĉe gravedinoj; **sen—o, a—o** (v.t.v.).

3103 **Sinkop-o**, subita forta sveno; **—a**; **—eto**, eksveno, sveneto.

3104 **Sinkron-a**, samtempa; **—eco**.

3105 **Sinok-o**. 1) daŭra febro. 2) vario de febro (L. *Synochus imputris*).

3106 **Sinostozo**, kuniĝo de du ostoj, precipe ĉe kranio.

3107 **Sinovi-o**, norma humoro de l'artikoj; **—aj** kistoj; **—ito**, inflamo de —aj membranoj; tendena kraketanta —ito (F. *Aï douloureux*).

3108 **Sintez-o** (L. *Synthesis*); **—a** medio, artefarita medio por mikrobkulturoj; —a kuracilo, kiu estas produktita per ĥemia —o.

3109 **Sintonino**, substanco eltirita el albuminaj materioj per malfortaj acidoj.

3110 **Sinus-o** (L. *Sinus*, H. I. *Seno*); —oj de la duramatro; kunfluiĝo de la —oj (F. *Pressoir d'Hérophile*); interkaverna, makzela, uretra *Vater*—o; —o; **—ito**, inflamo de —o; **—oida** fluo, vario de elektra alterna fluo.

3111 **Siringomjelito**, mjela malsano kun kavaĵetoj en la griza substanco.

3112 **Siropo** (L. *Sirupus*).

3113 **Sismoterapio**, terapio per vibradoj.

3114 **Sistem-o** (L. *Systema*); **—ado**; **—a**,

3115 **Sistol-o**, kuntiro de la kora muskolo; antaŭ—o (F. *Présystole*); **mezo—o**; **ekster—o**; **hipo—io** aŭ **hipo—eco**; **a—io** (v.t.v.); **—diastol-intertempo**, akinezo; **di—a** pulso, unu pulsa bato po du koraj batoj; senpulsa —o (F. *Faux pas du cœur*); **hemi—o**, izola kuntiro de unu korventriklo.

3116 **Sitofobio**, nutraĵofobio, timo manĝi.

3117 **Skabi-o** (L. *Scabies*. A. *Itch*. F. *Gale*. G. *Krätze*. H. *Sarna*. I. *Rogna*); **—a** sulketo; cementa falsa —o; **kontraŭ—a** pomado; **—ulo**, malsanulo trafita de —o.

3118 **Skafoid-a**, navikla; **—o** aŭ **—osto**, naviklosto ĉe mano, ĉe piedo.

3119 **Skaleno**, muskolo de la kolo.

3120 **Skalpelo**, bisturio, malgranda tranĉilo kun fiksa tenilo por sekcado.

3121 **Skamonio**, gumrezino el « *Convolvulus scammonia* ».

3122 **Skapol-o** (L. *Scapulum*). (ANAT.: dorno; supredorna, subdorna kavaĵoj; subglenoida tubero; muskolo levanta la —on; arterio de la —a kolo; arterio transversa de la —o; —hioidosta muskolo (F. *Muscle homo-hyoidien*). ĤIR.: —aj rompoj korpa, kola, akromia, korakoida. PATOL.: **—algio**.

3123 **Skarifik-i**, fari supraĵajn tranĉojn je la haŭto; **—o**; **—aj kupoj** (F. *Ventouses scarifiées*); **—ilo**.

3124 **Skarlatin-o** (L. *Scarlatina*); **—oforma** erupcio.

3125 **Skarp-o**, larĝa tolaĵo por subteni vunditan supran membron.

3126 **Skatol-o**. 1) substanco en fekaĵo ($C^6H^9Az$). 2) ujo; **Petri—o** aŭ **Petrio**, por kulturo de mikroboj.

3127 **Skelet-o**, ostaro; **—a**; **kvazaŭ—a** malgraseco.

3128 **Skiaskopio**, studo de pupilaj ombroj.

3129 **Skil-o** (BOT.) (L. *Scille*. A. *Squill*. G. *Meerzwiebel*); **—a** bulbo; —a mielvinagro (L. *Oxymel scillae*).

3130 **Skir-o**, malmola tumoro, malmola kankro; **—a**.

3131 **Skizomiceto**, bakterio.

3132 **Skizostomo**, japana vario de bilharzio.

3133 **Skler-a**, fibreca; **—eco**; **—ogenera**; **—emio**, **—eca** haŭto ĉe kelkaj novnaskitoj (F. *Slérème*); **—odermio**; mjela **—ozo** kun **plakoj** (F. *Sclérose en plaques*); flanka, amiotrofia —ozo; **—odaktilio**; **—ito**, inflamo de sklerotiko (v.t.v.); epi—ito.

3134 **Sklerotik-o**, unu el la okulmembranoj. ANAT.: kornea rando, vejna sinuso, fuska lameno (L. *Lamina fusca*). PATOL.: **—ito** aŭ sklerito, inflamo de —o; episklerito; sklerokoroidito.

3135 **Skodismo**, pulma trosonoreco dum toraka perkutado.

3136 **Skoleks-o**, kapo de tenio; **pro—o**, tenia embrio.

3137 **Skolioz-o**, flanka malrekteco de vertebraro.

3138 **Skoparino**, koloriga substanco el genisto, uzata kiel urinigaĵo.

3139 **Skopolamin-o**, alkaloido el « *Scopolia atropoides* » aŭ el hiskiamo; **—a** hidrobromido.

3140 **Skorbut-o**, malsano pro manko de freŝa nutraĵo; **—a**; **kontraŭ —a** siropo.

3141 **Skotomo** (L. *Scotoma*), retina difekto lokalizata.

3142 **Skrap-i**, forigi gratante supraĵajn partojn de haŭto, de osto, k.t.p.; **—vundeto**; enutera **—ado** per **—ilo** (F. *Curettage*); perfingra enutera —ado (F. *Curage*); **for—o** (G. *Abkratzen*); **kav—ilo** (F. *Curette*, I. *Cucchiaja*).

3143 **Skreno**, kelkfoje uzata anstataŭ Ekrano (v.t.v.).

3144 **Skrib-i** (L. *Scribere*); **—omanio** (F. *Graphomanie*); **spegule —ado**, kiam la vortoj skribitaj sin intersekvas de dekstre maldekstren; medicina **—a** atesto (F. *Certificat médical*); **sur-** aŭ **en—ilo**; **sur-** aŭ **en—anta** cilindro.

3145 **Skrofulario** (BOT.) (L. *Scrophularia*. G. *Braunwurz*).

3146 **Skroful-o** (L. *Scrofulae*); **—a**; —aj cikatroj; **—aĵoj**; **—ulo**; **—idoj**, —aj erupcioj; **kontraŭ—a** kuracilo.

3147 **Skrot-o** (L. *Scrotum*. G. *Hodensack*); **—a** hernio; —a inflamo.

3148 **Sku-o**. 1) Tremigo; **—ado** (A. *Succussion*. F. *Ballottement*, G. *Schütteln*, H. *Sacudimiento*); **—i**, malfirmigi. 2) Kolizio; postvunda **—o** (F. *Choc traumatique*). 3) Komocio; cerba —o.

3149 **Skvam-o**, surhaŭta maldika plato; **—eto** (L. *Pellicule*); **—a**; **—oza**; **de-** aŭ **dis—ado**; **de-** aŭ **dis—iĝi**.

3150 **Smegm-o** (L. *Smegma*); prepucia —o.

3151 **Smilako** (BOT.) (L. *Smilax*. A. *Sarsaparilla*).

3152 **Sodiumo** aŭ natrio (v.t.v.).

3153 **Sod-o**, natria salo de la karbonata acido; **—a**.

3154 **Sodokuo**, infekta malsano sekvanta kelkajn ratmordojn.

3155 **Soif-o** (L. *Sitis*); **sen—eco**, adipsio.

3156 **Sojo** (BOT.) (L. *Soja*. A. *Soya*).

3157 **Solanino**, vario de vegetala veneno.

3158 **Sole-a** (ANAT.) (L. *Soleus*); **—o** (G. *Sohlenmuskel*).

3159 **Solenoido**, spiralforma elektra aparato.

3160 **Solitero**, v. Tenio.

3161 **Solv-i**, fluidigi solidan substancon en fluidaĵo; **—o**; **—ado**; **—iĝi** (ekz. salo aŭ sukero —iĝas en akvo); **—ato**; **—ebla**; **ne—ebleco**; **—iĝemo**, akv(ec)iĝemo; **—aĵoj**. Ekz.: de hidrarga biklorido (solvaĵo de *Van Swieten*), de kalia arsenito (Likvoro de *Fowler*), de peroksido de hidrogeno (F. *Eau oxygénée*. G. *Wasserstoffsuperoxyd*), de natria klorido fiziologia.

3162 **Somatoskopio**, trakorpa vido per elektra lumo.

3163 **Somatoz-o**, produkto eltirata el viando.

3164 **Somnambul-o**, kiu iras dormanta kvazaŭkonscie; **—eco**.

3165 **Somnolenta**, dormetema.

3166 **Sond-i**, enkonduki **—ilon** en iun organon (stomakon, vezikon, k.t.p.), por ĝin esplori, plenigi aŭ malplenigi; per—ila nutrado.

3167 **Sonor-a** (L. *Sonorus*); **sen—a** ĉe perkutado (F. *Mat*); **sen—eco** (G. *Dumpfheit*); **duonsen-—eco** (F. *Submatité*).

3168 **Sopor-o**, profunda dormo; **—iga**.

3169 **Sorb-o** (L. *Absorptio*); **—ema**; **—igo**; **—iĝo** (F. *Imbibition*); **mal—ema**; —aj strioj de la lumspektro (F. *Bandes d'absorption du spectre*); **el—iĝado** (A. *Running out*, F. *Suintement*, G. *Sintern*, H. *Resumo*, I. *Stillamento*); **re—o** (L. *Resorptio*, G. *Aufsaugung*); **—i**, altiri en si fluidaĵon.

3170 **Soro**, buŝa malsano kaŭzata de mikromiceto « *oidium* aŭ *saccharomyces albicans* ». (A. *Thrush*, G. *Soor*, I. *Mughetto*.)

3171 **Sozojodol-o**, dijodoparafenolsulfonata acido; **—ata** acido.

3172 **Spac-o** (L. *Spatium*); **inter—a** (L. *Interstitialis*). RADIOL.: senluma —o de Faraday; antaŭvertebra luma —o (F. *Espace clair médian*).

3173 **Sparadrapo**, vario de plastro.

3174 **Spark-o**, elektra fajrero; samvalora, koresponda aŭ ekvivalenta —o (F. *Etincelle équivalente*).

3175 **Spartein-o**, alkaloido eltirita el stipo; **—a** sulfato.

3176 **Spasm-o**, aŭtomata daŭra kuntiriĝo de muskolo aŭ de muskola teksaĵo de organo; **—ofilio**, **—emo** ĉe infanoj; **—ofiliulo**; **anti—a** rimedo; **—e** interrompita, intermita (F. *Saccadé*).

3177 **Special-a**, destinata por unu aparta celo; **—eco**; **—isto**, kuracisto fakulo; farmaciaj **—aĵoj**; **—igo**; **—iĝo**.

3178 **Specifa** (L. *Specificus*).

3179 **Spec-o** (L. *Species*); **—aro** aŭ **gento**; **—igo**, klasifiko.

3180 **Spegul-o** (A. *Miror*, H. *Espejo*, I. *Specchio*); porfrunta —o aŭ reflektoro, uzata de laringologoj, k.t.p.; **—e** skribi (v. Skribi).

3181 **Spekt-i**, rigardi, ekzameni; **intro-** aŭ **internen—o**, rigardo en sin mem; **ekstro-** aŭ **eksteren—o**.

3182 **Spektr-o**, koloroj produktitaj post disiĝo de la lumo per prismo; **—a**; **—oskopo**, ilo por **—oskopio**, esploro de —o; **—ometro**, ilo por **—ometrio** (G. *Spectralanalyse*).

3183 **Spekul-o**, vidilo por kelkaj kavaĵoj; **anus-o**, **naz—o**, **vagin—o**.

3184 **Spermaceto** (G. *Walrat*, H. *Espermaceti*).

3185 **Sperm-o**, eltestika fluidaĵo; **—oreo**, senvola sperma fluo; **—oreteno**; **—oretentumoro** (F. *Spermatocèle*); **sen—o**; **—a**; **—ino**, **en—a** leŭkomaino; **—atino** (G. *Spermatin*); **—iferaj** kanaloj (F. *Canaux séminifères*); **—vazoj**; **—atoblasto**; **—ozoo** aŭ **—ero**, ĉefa elemento de —o; **—ozoogenero**; **azoo—io**, **sen—ozo-eco**.

3186 **Spigelio** (BOT.) (L. *Spigelia*, A. *Indian Pink*).

3187 **Spikabandaĝo** (L. *Spica*).

3188 **Spin-o**, vertebraro; **—aj** nervoj (F. *Nerfs rachidiens*). ANAT.: kola, dorsa, lumba spino;

ripovertebraj artikoj; ripaj foveoj; intervertebraj truoj; karotikaj tuberetoj; akcesoraj ripoformaj apofizoj; elstaranta ĉepa vertebro (L. *Prominens*); intervertebraj fibrokartilagoj; fibrecaj ringoj; pulpaj kernoj; ligamentoj radiitaj interartikaj de la ripa kapeto; ligamento nuka (L. *Nuchae*), laŭlonga (Lat. *Longitudinalis*). PAT.: fenda —o (L. *Spina bifida*); kaŝita fenda —o (L. *Spina bifida occulta*); kola, dorsa, lumba —**rompo**. (V. ankaŭ Raĥi... Spondil... Vertebro...).

3189 **Spintermetr-o** (RADIOL.), ilo por mezuri la samvaloran fajreron aŭ sparkon.

3190 **Spinuloz-a**, kiu prezentas kornecajn elstaraĵetojn; —a likeno; —**eco** (F. *Spinulosisme*).

3191 **Spire-o** (BOT.) (L. *Spirea*). VAR.: Ulmaria (v. Ulmario), k.t.p.

3192 **Spirilo**, spirilforma bakterio.

3193 **Spir-o** (L. *Respiratio*); angora —**ado**; malprofunda kaj rapida —ado, anhelado; —a aparato; —aj vojoj; momenta **sen—o**, apneo; **en—o** (L. *Inspiratio*); vapora **en—ado**, inhalo (F. *Humage*); **el—o** (L. *Exspiratio*); **el—aĵo** (L. *Halitus*, F. *Haleine*); facila —ado (F. *Eupnée*); malfacila —ado (L. *Oppressio*, F. *Essoufflement*); —**a**; **sen—a**, —**manka**; —**i**, **sen—iĝi**, perdi la —on, (Ekz. : pro malbona englutado (F. *S'étrangler*); **tra—adi** (L. *Perspirare*); **ne—ebla** aero; —**os-**

**kopo**, ilo por **—oskopio**; **—ometro**, aparato por **—ometrio**; **—oforo**; **en—iga** muskolo.

3194 **Spiroĥet-o** (L. *Spirochaete*); pala —o; ikterogenera —o; **—ozo**, malsano kaŭzita de —oj.

3195 **Splanknik-a** (L. *Splanchnicus*); **tri—a**.

3196 **Splanknologio**, scienco pri la visceroj.

3197 **Splen-o**, lieno (v.t.v.); **—iĝo** (L. *Splénisation*); **—ektomio**, ablacio de la lieno; **—omegalio**, liena plivolumeniĝo.

3198 **Splenio**, unu el la muskoloj de la kolo.

3199 **Splinto** aŭ **Asulo**, ligna aŭ metala lameno por kunteni rompitajn ostojn (F. *Attelle*, G. *Schiene*).

3200 **Split-o**, **—eto**, pinta korpeto, metala aŭ ligna akcidente subhaŭtiĝinta (F. *Echarde*, G. *Splitter*, I. *Sverza*).

3201 **Spondil...**, en kombinoj uzata por « vertebraro »; **—ito**, inflamo de vertebraro; tuberkuloza, traŭma, rizomelika —ito; **—izemo**, vertebrara subfleksiĝo; **—olizo**, ioma glitado de la kvina lumba vertebro en la pelvon; **—optozo**, kompleta glitado de tiu vertebro en la pelvon.

3202 **Spontane-a**, memstara, memnaska, sendependa; —a nasko, —a produktado (F. *Abiogenèse*); **—eco**.

3203 **Sporada**, izolita, maldensa, neepidemia.

3204 **Spor-o**, reprodukta organo de kriptogamoj; **endo—o**; **ekso—o**; **—formado** (L. *Sporulatio*); **—ozoo** (v.t.v.).

3205 **Sporotriĥ-o** (L. *Sporotrichum*); **—ozo**, malsano kaŭzata de —o.

3206 **Sporozo-o**, protozoo vivanta ĉe bestoj; **—ozo**.

3207 **Spruo**, tropika malsano, kaŝitdevena (avitaminozo, parazito, infektaĵo aŭ mikozo (?); simptomoj: diareo, anemio, malfortiĝo, glosito.

3208 **Sput-i**, **el—i**, kraĉi; **—o**; **—aĵo**; **sango—(ad)o**, hemoptizo; neniu ajn **—aĵero** estu teren kraĉata (kontraŭtuberkuloza profilakso); por —aĵa boteleto, poŝkraĉujo.

3209 **Stafilokok-o** (L. *Staphylococcus*); **—ozo**, malsano kaŭzata de —oj.

3210 **Stafilom-o**, malsano karakterizata de speciala reliefaĵo sur la okulglobo; muŝsimila —o, aŭ miiocefalo (v.t.v.); **—ektomio**, ablacio de —o.

3211 **Stafisagro** (BOT.) (L. *Delphinium staphisagria*, A. *Stavesacre*, G. *Stephanskraut*).

3212 **Stamo**, bazo (BAKTER.) (F. *Souche*).

3213 **Stano** (ĤEM.), vario de metalo. Simbolo: Sn.

3214 **Star-i**, resti vertikale; **—o**; **—igo**; **re—igo** de, aŭ **re—iĝo** ĉe ostrompo (F. *Réduction de fracture*); **re—iga** aŭ revigliga rimedo; utera **re-ilo** aŭ rerektigilo; **el—anta** (L. *Prominens*, G. *Hervorragend*); **el—aĵo**; *Adam* el —aĵo antaŭ la kolo.

3215 **Statik-a** (ELEKTR.) aparato; —a fasketo (Fr. *Aigrette statique*).

3216 **Stativo**, piedo aŭ subtenilo de instrumento. Ekz. : de mikroskopo.

3217 **Stat-o**, maniero esti; **bon—o, bon—sento** (F. *Euphorie*). ELEKTR.: ŝanĝemaj —oj (F. *Etats variables*); konstanta, seninterrompa —o (*Etat permanent*).

3218 **Statur-o**, alteco de la homa korpo; **—mezurilo** (F. *Toise*).

3219 **Staz-o**, stagno; ĝi estas senmoveco ĉe solidaj korpoj kaj senflueco ĉe fluidaĵoj (Ekz. : halto de la cirkulado).

3220 **Stearat-a** acido (L. *Acidum stearicum*); **—o**.

3221 **Steatomo**, tumoro el kvazaŭseba substanco.

3222 **Steatozo**, ĉeesto de graso (en vazparioj, k.t.p.).

3223 **Stelanizo** (BOT.) (L. *Anisum stellatum*).

3224 **Steni-o**, norma stato de la forteco; **hiper—o**; **hipo—o**; **hipo—iga** rimedo (F. *Contro-stimulant*); **a—o** (v.t.v.); **neŭra—o** (v.t.v.).

3225 **Stenoz-o**, plimallarĝigo (L. *Strictura*); uterkola aŭ vagina —o (F. *Gynatrésie*).

3226 **Step-i**, iri kun malstreĉe pendanta piedo kaj iom tro fleksita genuo; **—o**, **—ado**.

3227 **Steril-a**. 1) (BAKTER.) senmikroba; **—igi** aŭ **—izi**; **—ig(ad)o** aŭ **—iz(ad)o**; **—izilo**. 2) (BIOL.) ne naskanta idon; **—eco**, senfrukteco, naskosenpovo.

3228 **Sterko**, vorto kiu signifas fekaĵo. DER.: **—bilino**, substanco kiu donas al fekaĵoj ilian koloron; **—remio**, fekaĵaj elementoj en sango; **—rino**, derivaĵo de fekaĵa ĥolesterino.

3229 **Sternum-o** (L. *Sternum*); mallongiĝo en kombinoj : sterno. ANAT.: manubrio; ksifoida apofizo; sternotiroida kaj sternohioida muskoloj; sternoklavikla artiko.

3230 **Stertor-o**, raŭka sono eliganta el la brusto (L. *Rhonchus*); muka —o (F. *Râle muqueux*); **—a**.

3231 **Stetograf-io**, enskribigo de la dilatiĝo de la brusto; **—o** aŭ **—ilo**, ilo por **—io**.

3232 **Stetometri-o**, mezurado de la torakdilato dum spirado.

3233 **Stetoskop-io**, pera aŭskultado; **—o**, ilo por **—io**.

3234 **Stibiata**, antimona (v.t.v.).

3235 **Stigm-o** (BOT.) (L. *Stigma*); maizaj —oj.

3236 **Stilet-o**, ĥirurgia ileto por esplori fistulojn, k. t. p.

3237 **Stiloglos-o** aŭ **—a** muskolo (L. *Styloglossus*).

3238 **Stilo-hioida** ligamento (L. *Stilohyoideus*).

3239 **Stiloida** apofizo (L. *Styloïdes*).

3240 **Stimul-i**, eksciti aktivecon; **—o**; **—ado**; **—ino**, specifa sera substanco **—anta** la leŭkocitojn kaj helpanta al la fagocitozo.

3241 **Stipo** (BOT.) (L. *Stipa*), speco de gramenacoj.

3242 **Stiptika**, sangadhaltiga.

3243 **Stiraksbalsamo** (L. *Styrax*).

3244 **Stomak-o**; **—a**. ANAT.: Kardio; pilora vestiblo; —aj reliefaj areoj (A. *Pointed process*, F. *Saillies mamelonnées*); —aj foveetoj, faldoj; —a kravato (F. *Cravate de Suisse*); granda kaj malgranda kurbaĵoj. FIZIOL. :

**en—igo** (L. *Ingestio*); **en—igaĵoj** (L. *Ingesta*); acidenhavo de **—suko**. PATOL. : —a atonio, dilato; dispepsio; gastralgio, —a doloro; hiperacideco; hiperkinezo, troaktiveco; hipoacideco; —a ulcero. TERAPIO. : —a lavo. (V. ankaŭ Gastr...).

3245 **Stomatit-o**, inflamo de la buŝo; —o aftoza, difteria, hidrarga, impetiga, mugeta aŭ soro (v.t.v.), ulcera, ulceromembrana.

3246 **Stomatologio**, studo pri la buŝaj malsanoj.

3247 **Stomatoskopio**, tramakzela vido per elektra lumo.

3248 **Stovaino** (L. *Stovainum*), uzata por loka sensentigo.

3249 **Strab-a** (L. *Strabus*); **—ulo**; **—ulino**; **—ismo**, aŭ **—eco**; —ismo alternanta, diverĝa, konverĝa, konstanta, perioda, unuflanka; **—ometro**; ĥirurgia **—okuraco**; **—i**.

3250 **Stramonio** (BOTAN.) aŭ **Stramonia daturo** (v. Daturo).

3251 **Strangurio**, malfacila kaj doloriga urinado.

3252 **Stratum-o**, tavolo; **—a**; **—iĝo**.

3253 **Streĉ-i**, etendi, tiri; **—eco**; **—anta** (L. *Tensor*); **mal—eco**, **mal—iĝo**, senkuntiriĝebleco (A. *Relaxation*); **—igilo** (F. *Serre-nœud*, G. *Knotenhalter*); **dis—o**, distensio; **—vundo** (F. *Blessure par effort*).

3254 **Strekita**, sulkestrekita (L. *Striatus*).

3255 **Streptobacil-o** (F. *Streptobacille*).

3256 **Streptokok-o** (L. *Streptococcus*); **—ozo**, malsano kaŭzata de —oj.

3257 **Streptotriko**, vario de mikrobo (F. *Streptothrix*).

3258 **Stridor-o**, blovsono dum la spirado; denaska —o. naska —o.

3259 **Stridul-a**, kiu eligas siblan sonon.

3260 **Strikn-o** (BOT.) (L. *Strychnos*); **—onukso** (L. *Strychnos nux vomica*); **—ino**, ĝia alkaloido.

3261 **Strikturo**, mallarĝiĝo pro cikatro.

3262 **String-o**, vaza ligaturo; **—i**.

3263 **Stri-oj**, paralelaj linioj; **—ita** korpo (L. *Corpus striatum*), —ita preparaĵo, kulturo. ANAT. de la —ita korpo: rubandeto; vosthava kaj lentoforma kernoj; putameno; pala globo; interna kapsulo; frunta, parieta, okcipita partoj; radiita krono.

3264 **Strofant-o** (BOT.) (L. *Strophantus*); **—ino**, glukozido de —o.

3265 **Stroful-o**, vario de haŭtmalsano (L. *Strophulus*).

3266 **Stromo**, fundamenta teksaĵo (L. *Stroma*).

3267 **Stronci-o** (ĤEM.), vario de metalo (Simbolo: Sr); **—ano**, oksido de —o.

3268 **Strongilo**, vario de vermo (L. *Strongylus*, A. *Worm ascaris*).

3269 **Struktur-o** (L. *Structura*); **—difektoj**, malnormaĵoj.

3270 **Strum-o** aŭ **Kropo** (v.t.v.); **—ektomio**, ablacio de kropo; **—ipriva**; **—ito**, inflamo de kropo.

3271 **Stump-o**, restaĵo de amputita membro; **—ulo**; **—igi**; **—igado**; denta —o (v. Dento).

3272 **Stupor-o** (L. *Stupor*); **—i**; **—igi**; **—iga** (L. *Stupefaciens*).

3273 **Sub...**, prefikso kiu signifas : 1) Plimalalte ol : **—akviĝo**, **—mergiĝo**; **—astragala**; **—haŭta**; **—muktunika**; **—unga**; **—a**. 2) (ĤEM.) Enteno, ĉe salo, de pli da bazo ol da acido: **—acetato**; **—karbonato**. 3) Je malgranda grado: **—deliro**; **—eniranta** (L. *Subintrans*); **—iktero**; **—involucio**; **—konscia**; **—luksacio**; **—sensonoreco**.

3274 **Sublimato**, hidrarga biklorido.

3275 **Sublim-o**, **—ado** (ĤEM.), vaporigado de solidaĵo per varmo (F. *Sublimation*, G. *Sublimierung*); **—aĵo**, **—ata** korpo.

3276 **Subtil-a**, tre maldika; **—a** bacilo.

3277 **Suĉ-i** (L. *Succio*); **—o**; **—ado**; **—igi**, mamnutri; **—botelo** (A. *Feeding bottle*, F. *Biberon*, G. *Saugflasche*, H. *Bebedor*, I. *Zampilleto*); **—infano** aŭ **—ulo** (A. *Nursling*, F. *Nourrisson*, G. *Säugling*); **—aĵo** (F. *Sucette*); **mam—i** (F. *Téter*); **mam—o** (F. *Tétée*); **mam—lakto** (F. *Lait d'une tétée*); ĉesigi la mam—adon (F. *Sevrer*).

3278 **Sudaminoj**, ŝvita veziketa erupcio.

3279 **Sufiĉ-a** (L. *Sufficiens*); mitrala **ne—eco**.

3280 **Sufok-i**, mortigi per manko de aero; **—iĝi**; **—iĝo**; **—o**; **—premeco**, **—sento** (L. *Suffocatio*); **—a**.

3281 **Sufuzio**, subhaŭta sangelfluo.

3282 **Sugest-o**, influo sur alian personon hipnotigitan, k. t. p.; **aŭto—o**; **—ebleco**.

3283 **Sukcedano**, surogato.

3284 **Sukcen-o**, malmola flava rezina substanco; **—ata** acido (L *Acidum succinicum*); **—ato**; **—kolora**; **—imido** (F. *Succinimide*).

3285 **Suker-o** (L. *Saccharum*); **—ato**; **—igado**; **—iĝado** (A. *Saccharification*, G. *Zuckerbildung*); **—ometro**, aparato por **—ometrio** (F. *Saccharométrie*); **—aĵo** (F. *Saccharolé*); tinktura —aĵo (F. *Saccharure*); **—ecigo** (L. *Edulcoratio*); **—omiko** (F. *Saccharomyces*); **—ecigi**.

3286 **Suko** (L. *Succus*).

3287 **Sulf...**, komenco de vorto kiu signifas sulfuro; **—ato**; **bi-** aŭ **di—ato**; **sub—ato**; **—ata** acido (L. *Acidum sulfuricum*); **—ido** (A. *Sulphuret*, F. *Sulfure*, G. *Sulphid*); **—ito**; **hipo—ito**; **—ita acido** (L. *Acid. sulphurosum*); **—hidrato**; **—hidrata** acido ($H^2S$); **—arsenito**; **—ocianido**; **—okombinata** acido (F. *Acide sulfoconjugué*); **—osalo** (G. *Schwefelsalz*); **—anilata** acido (L. *Acidum sulfanilicum*); **—a**, **—enhava**, —a pomado, —a akvo.

3288 **Sulfonalo** (L. *Sulfonalum*).

3289 **Sulfur-o**, ĥemia elemento. Simb.: S. (v. Sulf...).

3290 **Sulk-o**, **—eto**, longforma kavaĵeto; **—oforma** aŭ faldoforma aparato, uzata por senmovigi ostrompitajn membrojn; **—estrekita**, striita; atrofiaj (haŭtaj) sulketoj.

3291 **Sumbulo** (BOT.) (L. *Ferula Sumbulus*).

3292 **Sun-o** (L. *Sol*); **—bano**; **—bato**, **—frapo**, insolacio; **—brulvundo**; **—eritemo**; **—kuracado**, **—terapio** aŭ **helioterapio**; **—ado**; **—umi**.

3293 **Super...**, prefikso kiu signifas : 1) supre de. Ekz. **—dorna**; **—fekundigo**; **—fetacio**; **—hepata**; **—orbita**, k.t.p.); 2) Pli ol kutime, ekstreme, troe: **—nutrado**; **—saturado**; **—nombra** (L. *Surnumerarius*).

3294 **Supinaci-o** (L. *Supinatio*, G. *Auswärtsdrehung*); **—anta** aŭ **supinanta**, kiu efektivigas la —on; longa (aŭ mallonga) supinanta muskolo.

3295 **Supozitorio**, konusforma kuracilo enkondukota en anuson aŭ vaginon.

3296 **Supr-a**, kiu estas pli alta ol; —aj membroj; **ma'-—aj** ekstremaĵoj; **—o**, **—aĵo**, pli alta parto de objekto aŭ organo; pulma —o (L. *Apex*); **—eniranta** (L. *Ascendens*); **mal—iranta**; **—enigo**; **mal—enigo**, ago per kiu oni mallevas ion; **—enigô** aŭ altiĝo de la temperaturo; **mal—eniĝo**, prolapso; **mal—eniĝinta**; **mal—enigilo**, mallevilo (F. *Abaisseur*).

3297 **Sur...**, prefikso kiu signifas « super » kun ia kontakto; **—rena glando**; **—tuko**, ŝirmtuko (F. *Alèze*).

3298 **Surd-a**, neaŭdkapabla; **—eco**; **—ulo**; **—amuta**; **—amuteco**; **—amutulo**.

3299 **Surfaco**. Ekz. : antaŭa, flanka, posta surfaco de organo, de osto.

3300 **Surfundaĵ-o**, restaĵo; **—a** (F. *Résiduel*).

3301 **Surmetiĝo**, paralela delokiĝo de la du partoj de osto en kelkaj ostrompoj (F. *Chevauchement*, G. *Ueberlagerung*, I. *Accavallamento*).

3302 **Sur-o**, tibikarno, posta muskola parto de la kruro (L. *Sura*, A. *Calf of the leg*, F. *Mollet*, G. *Wade*, I. *Polpaccio*); **—a**.

3303 **Surogato**, anstataŭaĵo (L. *Succedaneus*).

3304 **Surren-a** glando; la **—a** sekrecio povas esti nesufiĉa, sufiĉa, aŭ troa; **hiper—eco** (F. *Hyperépiphrénie*); **—ino** aŭ **adrenalino** (v.t.v.); **—ito**, inflamo de —aj glandoj.

3305 **Surverŝo**, verŝo de akvo sur tutan korpon aŭ parton de ĝi (L. *Affusio*, G. *Uebergiessung*).

3306 **Suspensio**, mikso de likvaĵo (akvo, oleo, k.t.p.), kaj de substanco nesolvebla en ĝi.

3307 **Suspensoro**, subtenbandaĝo uzata por skroto.

3308 **Susuro**, murmureto aŭdata en iaj vazaj tumoroj (L. *Susurrus*).

3309 **Sutur-o**. 1) (ANAT.) endentiĝo, kunartikiĝo ĉe kraniostoj; 2) (ĤIR.): kunkudro; —o per unua, per dua kuniĝo; —o per apartaj eroj, aŭ apartaj **—eroj**.

3310 **Sven-i**, perdi konscion kaj movkapablon; **—o**; **—eto**; **ek—i**; **ek—o**; **ek-eto**; **—inta**.

3311 **Sving-o**, skuado, skuiĝ **—ado** (F. *Ballottement*).

# Ŝ

3312 **Ŝajn-i**, havi aspekton; **—igi**, preni aspekton erarigantan pri la realaj ecoj; **—o**; **—igo**; **—iga**; **—igata** (G. *Fingiert*); **—iganto** (F. *Simulateur*).

3313 **Ŝanĝ-i**, aliigi; **potenc—oj** (RAD.) (F. *Oscillations d'un tube*); **ŝtof—oj** (v. Metabolo); **—ilo** de la elektra fluo (F. *Convertisseur*).

3314 **Ŝankr-o**, infekta ulcero; **—o** mola, malmola aŭ indurata, miksita; **—oforma** ulcero.

3315 **Ŝarĝ-i**, elektra **mal—o**, **mal—ado** (F. *Décharge*).

3316 **Ŝaulmograo** aŭ **Ŝolmograo** (v.t.v.).

3317 **Ŝaum-o** (L. *Spuma*, F. *Ecume*, *Mousse*, G. *Schaum*); **—a**; **de—igo** (I. *Despumaccione*).

3318 **Ŝel-o**, natura kovraĵo de arbo, de frukto; citrona —o; **sen—igo**; **sen—igita** rizo; artika **ĉirkaŭ—o** (L. *Capsula articularis*).

3319 **Ŝir-i**, rompi per tirado aŭ malfacile tiri; **—ita**; muskola **—aĵo** kun sento de vipobato; ekspansia —o (L. *Divulsio*); **el—o** de dento; ĉirkaŭunga **—etaĵo** (L. *Reduviae*, F. *Envie*); **dis—o** (L. *Dilaceratio*).

3320 **Ŝlim-o** (L. *Coenum*, A. *Mud*, G. *Koth*); **—banoj**; perradiumagantaj —oj (F. *Boues radioactives*).

3321 **Ŝmir-i**, kovri per substanco grasa, k.t.p.; **—o**, **—aĵo** aŭ ungvento; **—oleaĵo**, oleeca lini-

mento; —**ado** (L. *Unctio*, F. *Onction, Badigeonnage*); —**eca** (A. *Onctuous*); epiderma —aĵo ĉe novnaskitoj (L. *Vernix caseosa*).

3322 **Ŝnur-o** aŭ **Kordono** (v.t.v.); umbilika —o.

3323 **Ŝoko** aŭ **Kolizio** (v.t.v.) (A. *Shock*).

3324 **Ŝolmogra-o** (BOT.) (A. *Chaulmoogra*); —**a** semoleo, kontraŭlepra kuracilo; —**ata** acido (F. *Acide gynocardique*).

3325 **Ŝpinilforma** (L. *Fusiformis*).

3326 **Ŝpruc-igi**, vive eligi fluidaĵon; —**igilo** (F. *Seringue*); **en—igi** (F. *Injecter*, G. *Einspritzen*); **en—igilo, en—igilego** (F. *Injecteur, Bock*).

3327 **Ŝraub-o** (F. *Vis*); mikrometra —o ĉe mikroskopo; osta —**ado**.

3328 **Ŝtelomani-o**, manio preni sekrete ies propraĵon; (L. *Kleptomania*); —**ulo**.

3329 **Ŝtof-o**, substanco, histo; —**ŝanĝoj** (v. Metabolo).

3330 **Ŝton-o**, —**eto** (L. *Calculus*); urin—o; gal—o; —**tenilo** (A. *Pincers*, G. *Blasensteinzange*, H. *Tenacilla*); —**frakasilo**; —**solvanta** kuracilo (A. *Lithontreptic*). (V. ankaŭ Litiazo kaj Lito.) ANAT.: —**eca** parto de la tempiosto (v.t.v.); —**oskvama** (F. *Pétroécailleux*); —**eca** (L. *Petrosus*) ganglio.

3351 **Ŝultr-o** (L. *Scapula*, F. *Epaule*). ANAT.: Artiko de la humero; glenoida ĉirkaŭrando. ĤIR.: Humera luksacio aksela, subkorakoida, subakromia; malstreĉe pendanta —o (F. *Epaule ballante*).

3332 **Ŝunto** (ELEKT.) (A. *Shunt*), aparato kiu permesas pliigi aŭ malpliigi la kvanton da elektra fluo laŭ ia oblo.

3333 **Ŝvanomo**, tumoro devenanta el *Schwann'a* ingo de nervo.

3334 **Ŝvel-o**, plivolumeniĝo; abdomena progasa **—eco**; proinflama **—aĵo**; lokalizata —aĵo inflama (F. *Gâteau inflammatoire*); faca **—aĉo** (A. *Swelling*, F. *Bouffisure*, G. *Aufgedunsenheit*); tranĉea pied—o, ofta malsano ĉe batalantoj; postkontuza **—tubero**; **—i**; **ek—i**; **—igi**, kaŭzi—on; **mal—igo**; **mal—igi**.

3335 **Ŝvit-o** (L. *Sudor*); **—ado**; **—egoj** eluzantaj la malsanulojn; **tro—emo**; **sen—o**, **ne—o** (L. *Anidrosis*); **—eta** (F. *Moite*); **—eteco** (G. *Feuchtigkeit*, H. *Humidad*); **—naskaj** (A. *Sudoriparous*) glandoj; **—iga** (L. *Sudorificus*); **—i**, eligi **—on**; **el—i** (L. *Exsudare*); **el—o**, **el—ado**; **el—aĵo**; **tra—i** (L. *Transsudare*); **kontraŭ—a**; **sang—o**; hemathidrozo; —a febro (A. *Sweating sickness*, F. *Suette*); —a erupcio; —a adenito, abceso de —naska glando ofte aksela.

# T

3336 **Tabak-o**, folioj de Nikotiano (L. *Nicotiana tabacum*); **—ismo**, nikotinismo, venenado per —o aŭ **—venenado**.

3337 **Tabano** (L. *Tabanus*), vari de muŝo kiu povas transporti infektajn malsanojn.

3338 **Tabes-o** (L. *Tabes*) ; dorsa —o ; dorsa spasma —o; pseŭda —o; —**ulo** ; —**ocerbeta** irmaniero (F. *Démarche tabéto-cérébelleuse*).

3339 **Tableto** (FARM.) (L. *Tabella*).

3340 **Taĥi...**, uzata en kombinoj por « rapida » ; —**kardio**, tro rapida korbatado ; —**fagio**, tro rapida manĝado ; —**pneo**, rapida spirado.

3341 **Takamehako** (L. *Tacamehaca*), rezino eltirata el kelkaj sudamerikanaj arboj, uzata ĉe reŭmatismo.

3342 **Takseo** (L. *Taxis*), reenkonduko en ventron de hernia entenaĵo.

3343 **Taksi-o**, influo de fizikaj kaj ĥemiaj agantoj sur protoplasmon; **ĥemio—o** ; **sun—o**, heliotropismo.

3344 **Talalgio**, kalkando'oro.

3345 **Talam-o** (L. *Thalamus*, F. *Couche optique*); —**encefalo.** ANAT. de la —encefalo : pulvinaro, antaŭa tubero; metatalamo; genuecaj korpoj; pineala receso ; supra pineala receso ; habenuloj (L. *Habenula*); mjela strio (L. *Stria medullaris*, F. *Taenia thalami*); komisuroj de la habenuloj; habenula kerno; refleksita fasko (F. *Faisceau de Meynert*); hipotalamo; mamoidaj korpoj; infundiblo; hipofizo; optika traktuso; optika kiasmo; fina lameno (F. *Lamelle grise optique*); hipotalama kerno (A. *Nucleus of Luys*); supra komisuro; —**a** ma-

moida fasko (F. *Faisceau de Vicq d'Azir*); pedunklaj mamoidaj faskoj.

3346 **Talasoterapio**, terapio per mara klimato, per marbanoj.

3247 **Talino**, devenaĵo de kinolino.

3248 **Talium-o**, vario de metalo, simbolo Tl; **—a** (F. *Thallique*).

3249 **Talko** (ĤEM.) magnezia silikato.

3250 **Tamarind-o** (BOT.) (L. *Tamarindus indica*); **—a** pulpo.

3251 **Tampon-o**, vatbulo, ŝtopilo, sorbilo; **—ado**; **—prenilo**.

3252 **Tan**..., mallongiĝo de Tanino; **—ato; —ata** acido (L. *Acidum tannicum*); **—igeno** (F. *Tannigène*); **—albino**, —ato de albumino.

3253 **Tanaceto** (BOT.) (A. *Tansy*. F. *Tanaisie*. G. *Rainfarn*).

3254 **Tanin-o**, tanata acido (v. Tan); acetilata —o.

3255 **Tantalo**, vario de metalo, simbolo Ta.

3256 **Tapiŝ-o** (ANAT.) (L. *Membrana versicolor oculi*. G. *Choroideafläche*).

3357 **Tapsi-o** (L. *Thapsia*); **—a** rezino.

3358 **Tars-o** (L. *Tarsus*. A. *Instep*. G. *Fusswurzel*); **—a**; **—algio**, —a doloro; **—ektomio**, —a parta ablacio. ANAT.: transversa artiko de la —o (F. *Articulation médiotarsienne*); **—ometatarsaj** artikoj. Ostoj : kalkaneo, astragalo, skafoido, kuboido, kojnoformoj. Supernombraj ostoj : skafoida akcesoro (L. *Tibiale externum*); astragala akcesoro (L. *Os*

*trigone*); kuboida akcesoro (L. *Os peroneum*); vezaliana osto.

3359 **Tartremetiko**, antimona kalitartrato.

3360 **Tartr-o**, sedimento de juna vino; **—ato**; **—ata** acido (L. *Acidum tartaricum*); **bi-** aŭ **di-—ata acido** (F. *Acide racémique*); **—emetiko** (v.t.v.).

3361 **Tatu-i**, fari sur la haŭton neforigeblajn desegnaĵojn; **—o**; **—ado**; **—aĵo**.

3362 **Taŭrino**, kristaligebla substanco eltirata el bovgalo.

3363 **Taŭrokolat-o**, substanco eltirata el galo; **—a** acido.

3364 **Tavol-o**, stratumo; **—eto**; **—eco**; **de—iĝo**, deskvamo; **—e** dispeciĝo, delitescenzo.

3365 **Tebaika**, opia.

3366 **Tebaino**, unu el la alkaloidoj de l'opio.

3367 **Teg-i**, kovri per ŝtofo, teksaĵo; **mal—i**; **mal—igo** (L. *Denudatio*); **—aĵo** (F. *Revêtement*); **—umento** (v.t.v.).

3367bis **Tegolita**, aranĝita kiel tegoloj (F. *Imbriqué*).

3368 **Tegument-o**, kio tegas, ĉirkaŭkovras, ŝirmas, ekz. haŭto; **—a**.

3369 **Teko de la foliklo** (L. *Theca folliculi*. A. *Basement membrane*) subepitelia tavolo ĉe mukmembranoj.

3370 **Teksaĵ-o**, histo (A. *Tissue*, G. *Gewebe*, H. *Tejido*); kuniga —o (L. *Tela conjunctiva*); nedifinebla —o (F. *Tissu anhiste*); **—a**.

3371 **Teksturo**, ordo de la anatomiaj elementoj de teksaĵo.

3372 **Telangiektaz-io**, dilatiĝo de haŭtaj (haŭtvazektazio) aŭ de muktunikaj sangvazetoj.

3373 **Telencefalo**, cerbaj hemisferoj. ANAT.: 1) Mantelo (L. *Pallium*): cerbaj fendoj, laŭlongaj, transversaj; cerba flanka foveo (F. *Fosse de Sylvius*); transiraj giroj (L. *Gyri transitivi*). 2) Frunta lobo: antaŭa centra sulko (F. *Sillon prérolandique*); centra giro (A. *Ascending frontal*); paracentra lobeto; supraj fruntaj sulko kaj giro; olfakta sulko; rekta giro; meza frunta giro (F. *Deuxième circonvolution frontale*); suba frunta giro, kun partoj operkla (L. *Pars opercularis*. A. *Posterior part*), triangula, orbita; orbitaj giroj. 3) Parieta lobo: posta centra giro (A. *Ascending parietal circumvolution*), supra parieta lobeto; antaŭkojno (L. *Praecuneus*. A. *Quadrate lobule*), suba parieta lobeto; supra marĝena giro (F. *Lobule du pli courbe*); angula giro; interparieta sulko. 4) Tempia lobo: transversaj tempiaj giroj: supra, meza, suba; ŝpinilforma giro; kunflanka sulko (L. *Fissura collateralis*); forniksa, cingula aŭ kaloza giroj; istmo de forniksa giro; hipokampa giro, kun hoko; hipokampo aŭ Amona korno; hipokampaj fimbrio, fingraĵoj, dentita fascio kaj komisuro; cindreca fascieto; migdaloforma kerno (L. *Nucleus amygdalae*). 5) Okcipita lobo:

ŝtonecaj premsignoj; giroj supraj kaj flankaj; langa giro (L. *Gyrus lingualis,* A. *Fifth temporal gyrus*); kojno; kalkarina fendo; transversa okcipita sulko. 6) Insulo : cirkla sulko; operklo kun partoj frunta, parieta, tempia; sojlo, giroj (longa kaj mallonga) de l'insulo; klaŭstro (F. *Bandelette vermiculaire*). 7) Kaloza korpo : rostro, splenio; radiaĵo; cingula sulko kun subfrunta kaj marĝena partoj; subkaloza giro; mezaĵaj, flankaj, laŭlongaj strioj. 8) Fornikso (v.t.v.). 9) Striita korpo (v. Strioj). 10) Flanka ventriklo: antaŭa, suba, posta kornoj; interventrikla truo; alfiksita lameno, fina strio; kunflanka altaĵo; birda sprono (L. *Calcar avis*, F. *Petit hippocampe*).

3374 **Telur-o**, vario de metaloido (Simb. : Te) ; **—ato**.

3375 **Temperament-o** (L. *Temperamentum*); fizika —o, korpa kondiĉaro; malbona —o, diskrazio.

3376 **Temperatur-o** ; esplori —on ; vespera **—a** pliiĝo ; —a kurbo ; —aj ŝanĝoj aŭ diversiĝoj.

3377 **Tempi-o** (A. *Temple*, F. *Tempe*, G. *Schläfe*, H. *Sien*); **—a** ; **—osto**; cerba —a lobo (v. Telencefalo). ANAT. de la —osto: ŝtoneca parto, aŭ roko; timpana tegmento; kanalo de la faca nervo (A. *Aqueduct of Sylvius*) kun sia genueto; triĝemela foveo (F. *Fossette du ganglion de Gasser*); interna akustika poro; jugulara incizuro; intrajugulara apofizo; ingo de la

stiloida apofizo; ŝtoneca foveeto; timpana kanaleto (F. *Canal de Jacobson*); kanaleto de la heliko; duonkanalo de la muskolo streĉanta la timpanon; duonkanalo de l'aŭda tubo; mastoido (v.t.v.); tempiosta skvamo; petro-timpana fendo (A. *Fissure of Glaser*); mandibula foveo; artika tubereto (F. *Tubercule zygomatique*).

3378 **Temp-o** (L. *Tempus*); **antaŭ—a** (trofrue naskiĝinta) infano.

3379 **Tenar-o**, unu el la partoj de la mano (antaŭa ekstera kaj supra).

3380 **Tenden-o**, ekstremaĵo de muskolo kuniganta ĝin kun osto; Aĥila —o; **—aj** interkruciĝoj (Lat. *Inscriptiones tendineae*); —aj anastomozoj; —a ĥiasmo; **mezo —o** (L. *Vinculum tendinum*); **—ito**, inflamo de —o (F. *Ténosite*); **—algio**, —doloro; **—orafio**, **—suturo**; **—otomo**, ilo por **—otomio** (**—tranĉo**); **—ingo** (F. *Gaîne du tendon*); **—ingito**, inflamo de —ingo.

3381 **Tend-o** (F. *Tente*); cerbeta —o (L. *Tentorium cerebelli*).

